Petro DIKSZTEJN

INTER SOVETAJ POPOLOJ

[1939 - 1946]

* unua parto

Cercle espérantiste de l'Agenais
"Laùte!" * F 47340 Laroque Timbaut
1981 * 10 FF

SAT-Broŝurservo

Petro **DIKSZTEJN**

INTER SOVETAJ POPOLOJ 1.

* enkonduko	5
ĉap.1 - orienten migras grupoj...	13
ĉap.2 - en Krupki kolektiĝis...	22
ĉap.3 - antaŭ la verdikto	67
ĉap.4 - la longdistanca veturado	138

Cercle espérantiste
de l'Agenais * Laùte!
F 47340 Laroque Timbaut
1981 *

Tiu ĉi broŝuro aperas en la kadro
de SAT-broŝurservo.

enkonduko

La konstante diskutita problemo en Polio, en la jaro 1939, ĉu minacas fakte la militatako de Germanio, okazis ankaŭ inter la viroj malliberigitaj pro kontraŭfaŝista kaj komunista agado en la malliberejo ĉe strato Daniloviĉovska 7 en Varsovio.

Ĝis fino de la jaro 1937, kiam la komunista partio en Polio ekzistis kaj agadis - kvankam sekrete - la nombro de suspektitaj pro komunista aktiveco atingis en tiu malliberejo kelkcent virojn. Post la deklaro de Kominterno en la jaro 1937, ke en ĉiuj instancoj de la Komunista Partio Polia ennestiĝis agentoj de la sekreta polico kaj ili regas la partion, tiulanda sekcio estis likvidita, la agado de KPP ĉesis kaj la nombro de tiuspecaj "krimuloj" iom post iom malmultiĝis.

Somere de la jaro 1939 restis de la iama tiukaraktera klientaro en tiu malliberejo ĉirkaŭ kvardek viroj, lokitaj en du ĉeloj. La homoj en unu el tiuj ĉeloj ricevis ĉiutagajn gazetojn kaj ili pli-malpli povis scii, kio okazas en la "ekstera mondo". La homoj en la dua ĉelo ne rajtis ricevi gazetojn. Sed la ĉelanoj, al kiuj ne venis gazetoj, ricevis informojn de la "gazetanoj" per la eblecoj praktikataj en ĉiuj malliberejoj, per "telegrafado" - frapado sur la murojn aŭ sur la varmigkondukilojn kaj trasendado de skribitaj paperetoj per nepermesitaj manieroj. Inter tiu neprivilegiita anaro (en gazetara senco) estis ankaŭ mi.

La diskutado koncernis du ĉefajn demandojn : Unue, ĉu la pola registaro fakte rezistos la postulojn de Hitler, eĉ se devos okazi arma konflikto, aŭ ĉu la pola registaro cedos al Hitler por eviti la militon ? Due, se sekvos la milito, kia devos esti nia konduto, ĉar ni estas kontraŭuloj al ambaŭ tiuj reĝimoj ?

Laŭ kutimo apliki ekzemplojn, kelkaj opiniis, ke la

pola registaro agos laŭ la ekzemplo de la ĉeĥoslovaka Haĥa kaj cedeme obeos al Hitler. Kelkaj opiniis, ke la pola registaro agos laŭ la ekzemplo de Ĉang Kaj Ŝek kaj rezistos la invadon de la germana armeo.

Ankaŭ pri la demando kiel ni devas agi en okazo de arma konflikto ne estis unueca opinio, sed la plimulto opiniis, ke okaze de hitlerista invado ni devas partopreni en defendo de Polio, kvankam la registaro estas diktatura.

La 23an de aŭgusto, kiam ni kuŝis en la litoj, venis sciigo de la "gazetanoj", ke estas atendata ia grava interkonsento de la germana kaj sovetunia registaroj kaj pri tiu afero Ribentrop veturis al Moskvo.

Inter ĉ. dudek homoj en la ĉelo, nekomunistoj estis mi kaj ankoraŭ du, unu el ili estis adepto de la Kvara Internacio - trockisto - kaj unu estis "viktimo", tiel estis nomitaj homoj arestitaj kvazaŭ ili estus farintaj ion kontraŭregistaran, sed fakte ne estis ligitaj al iu partio. Kio okazis dume en la mensoj de la komunistoj - inter kiuj estis kelkaj de altaj partiaj instancoj - mi ne scias. Ŝajnis, ke la informo pri la veturo de Ribentrop al Moskvo "paralizis" iliajn parolkapablojn. Neniu diris ion ajn, kvankam ĉiuvespere post la enlitiĝo okazis diskutoj pri diversaj aferoj.

Eble la komunistoj en tiu vespero estis la unuan fojon en sia politika aktiveco lasitaj al sia propra rezonado. Kiam la partio ekzistis, ili ĉiam ricevis instrukciojn de la superaj instancoj kaj ĉiam ili havis argumentojn pravigantajn ĉion, kio estis al ili ordonita de Kominterno. Ili kredis kaj akceptis la motivon de Kominterno por likvidi la partion, ĉar ĝi estis gvidita de spionoj en la servo de la pola faŝista registaro - en Moskvo oni scias pli bone. Daŭre ili estas fidelaj komunistoj kaj Sovetunio estas por ili la plej alta sanktaĵo en la mondo, do laŭ kiaj premisoj rezonadi kaj agi, se necese ?

Inter ni estis M., verŝajne unu el la plej altaj estintaj partiaj instancoj. En diversaj diskutoj lia opinio estis la decida. Supoze, ĉiuj atendis kion diros M., sed li silentis.

Post iom da kompleta silentado unu sidiĝis sur la lito kaj diris jene : "La nuna momento memorigas al mi la atmosferon de antaŭ du jaroj, kiam mi ankaŭ troviĝis en malliberejo, venis la sciigo, ke la partio estas likvidata. Tiam unu inter ni verkis poemon, mi ĝin memoras kaj se vi deziras, mi povas ĝin nun deklami." Ĉiuj akceptis tion.

En la poemo estis esprimite, ke arestito pasanta la mallongan distancon sur la planko de la ĉelo, tien kaj reen, rememoras siajn aspirojn, sian kredon je la giganta tasko, kiun li plenumas kune kun fidelaj kamaradoj, kiuj same kiel li oferis multe el sia vivo kaj estis pretaj oferi por la partio ĉion, sed subite li venis al abismo, li ne scias kion fari, li ne scias ĉu li sonĝis ĝis nun, aŭ ĉu eble li sonĝas en la nuna momento.

La deklamitan poemon neniu komentis, neniu kritikis, ĉiuj silentis kiel antaŭe.

En la sekvintaj tagoj ĉesis la aranĝo de komuna diskutado. En tiuj tagoj ni ankaŭ haviĝis al ni parton de gazeto, kie estis la komuniko pri la interkonsento en Moskvo. Mi ne memoras la apartajn paragrafojn de la komuniko. En mia memoro konserviĝis pli-malpli jene : Neniu el la du registaroj, germania kaj sovetia, entreprenos malamikajn agojn kontraŭ la dua registaro kaj ne helpos iun alian registaron en iu agado direktita kontraŭ unu el la du registaroj subskribintaj inter si la supre menciitan traktaton.

La iamaj instancaj aktivuloj diris nenian opinion pri la komuniko, sed la simplaj membroj komentis kaj komentis la komunikon, serĉinte en ĝi pravigon por Sovetunio.

Kvar aŭ kvin tagojn post tiu informo, M. aranĝis kunvenon. La paroladon li komencis pri la gigantaj baraktoj de Sovetunio en la konstruado de la socialismo, estante ĉirkaŭbarita de la malamika kapitalista mondo ; pri la oferemo de la sovetia popolo, kiu libervole rezignante je pligranda peco da pano, ĉiam zorgas pri la defendo de sia patrio, kiu estas ankaŭ la patrio de la tutmonda laborista klaso.

Se iu diskutanto parolis pri eventualaj situacioj en nia aktiveco por defendi Polion, M. ĉiam menciis, ke por la tutmonda laborista klaso ne ekzistas io pli valora, pli alta, pli sankta ol Sovetunio, pri tio ni ĉiam devas memori.

Fine estis decidite, ke ĉiu el ni direktu skriban deklaron al la justicinstancoj, kiuj pritraktas la akuzmaterialojn kontraŭ ni, ke ni volas esti liberigitaj por partopreni en la defendo de Polio.

Vendrede la unuan de septembro je la sesa matene ni aŭdis alarmon kontraŭ aviadilatako, baldaŭ aŭdiĝis ankaŭ pafado kaj eksplodoj en malproksimeco kaj proksimeco. Kiam la gardisto malfermis la pordon por la matena eliro al la necesejo, ni demandis, ĉu la milito jam fakte eksplodis, aŭ ĉu okazas ekzercoj. "Portempe tio estas ekzercoj, sed povas esti ankaŭ realaĵo". Ni tuj komprenis, ke koncernas ĝuste realaĵon.

Tiu vendredo estis la tago, kiam parencoj de la arestitoj rajtis viziti siajn proksimulojn en la malliberejo. Tiu vizitado okazis je la deka horo. Kelkaj en nia ĉelo estis vizitataj kaj post ilia reveno ni ja sciis, ke la milito estas fakto.

Ĝis la sepa de septembro ne okazis io grava en nia ĉelo. Sed tri fojojn tage, precize je la sesa matene, je la dekdua tagmeze kaj je la sesa posttagmeze ni aŭdis la aviadilajn atakojn, pafadon kaj eksplodojn.

Jam la unuan militan tagon ĉesis veni gazetoj al la malliberejo. Ni neniel sciis, kio okazis post la komenco de la milito. Ĉiuj klopodoj por ricevi iun ajn informon de la gardistoj estis vanaj, ili evitis respondi. Laŭ la mienoj sur iliaj vizaĝoj ni komprenis, ke la situacio ne estas bona, sed ĝis kia grado ĝi estas malbona ?...

La sepan de septembro okazis kiel "normale" je la sesa matene la aviadilatako. Ni atendis, ke la gardisto malfermos la pordon por la matena eliro al la necesejo, sed forpasis pli longa tempo ol kutime kaj la pordo ne estis malfermita, ni ankaŭ ne aŭdis, ĉu iu gardisto estas en la koridoro.

Subite aŭdiĝis teruraj krioj en la ĉeloj, en kiuj estis la simplaj krimuloj. La kriojn postsekvis frapadoj sur la pordojn per la lignaj taburetoj. Ŝajnis, ke tiuj krioj venas de furiozanta amaso da mensmalsanuloj. Tiu furiozado daŭris ĉirkaŭ dek minutojn kaj aŭdiĝis kurado en la koridoroj kaj sur la ŝtuparoj, poste kompleta silento.

Ni komencis rezonadi : kio okazis ? Ĉu povas esti, ke la germana armeo post sestaga militado jam atingis Varsovion kaj la mallibereja administristaro liberigis la simplajn krimulojn kaj nin lasis al germanoj por likvidi nin ?... Do kion ni faru nun, fermitaj per dika fera pordo inter la dikaj muroj ? La afero aspektis senespere, eĉ ion entrepreni. Neniu estis kapabla eĉ proponi ion ajn.

En la malliberejo estis grupo da junuloj, kiuj ne atingis la t.n. maturan aĝon - 18 jaroj. Kiam ni estis kelkajn minutojn kiel "mense paralizitaj", malfermiĝis la pordo. Antaŭ ĝi staris kelkaj el tiuj junuloj kaj per emociaj voĉoj ili vokis : "Kamaradoj ! Sinjoroj ! Ni liberigas vin ! Okazas milito ! Forkuru ! Ni ekbruligos la malliberejon !"

Al nia demando : "Kiu malfermis la pordon ?", ili respondis : "Ni ! Ni vin liberigas ! Forkuru !" " - Kaj de kiu vi havis la ŝlosilon ?" Al tiu demando ili ne sciis kion respondi, ili ŝajnis surprizitaj, kvazaŭ pri io, kio ankaŭ por ili estas enigmo.

Ni povis veni almenaŭ en la koridoron.

Venis baldaŭ ankaŭ la "gazetanoj".

Ĉiuj ĉeloj en la koridoroj estis malfermitaj. La junuloj malaperis ien antaŭ ol ni kapablis ĉirkaŭrigardi la koridoron.

Por ni la problemo estis, ĉu ankaŭ la elirejo al la strato estas libera. Unu eĉ diris : "Eble ili lokis ie maŝinpafilon kaj ni estos pafitaj, se ni volos forlasi la malliberejon."

Intertempe unu rapidis malsupren kontroli kia stato estas ĉe la elirejo. Li baldaŭ revenis kun la sciigo, ke la vojo estas libera. Urĝe ni forlasis la malliberejon. Post rapida adiaŭo ĉiu foriris en sia direkto.

Veninte al la ĉefstrato, en tiu regiono mi baldaŭ rimarkis, ke en la urbo regas ĥaoso. Junuloj, unuope, duope aŭ triope kun dorsosakoj urĝis en diversaj direktoj. La vendejoj estis fermitaj, neniu tramo videbla. Militistaj kamionoj veturis en la direkto de la Vistulo, t.e. orienten. Grupoj da vunditaj soldatoj malrapide paŝadis, iuj helpe de bastonoj en siaj manoj.

Mia unua intenco estis aĉeti iun gazeton, sed baldaŭ

mi rememoris, ke mi ne posedas eĉ minimuman moneron, ĉar en la malliberejo estis de ni forprenita ĉiu mono.

Mi iris al la hejmo de miaj gepatroj sciiĝi, ĉu ili ne iĝis viktimoj de la milito. Feliĉe mi ilin trovis vivantajn.

De la raportoj kaj reporteraĵoj en la gazetoj estis klare, ke la situacio ĉe la frontoj estas tre malbona.

Opinio de la loĝantaro estis, ke oni povas atendi la germanan armeon en Varsovio en la proksimaj tagoj. Mi eksciis ankaŭ, ke dumnokte la radio anoncis, ke ĉiuj militkapablaj viroj devas forlasi Varsovion kaj foriri al la orientaj partoj de Polio.

Mi iris al miaj gebopatroj por ricevi iun scion pri mia edzino, ĉar ankaŭ ŝi estis dum la tuta somero en la malliberejo, speciala por virinoj, kiu havis la strangan nomon "Serbio", sed mia edzino el la malliberejo ne revenis.

Veninte al la malliberejo, kie estis mia edzino, mi renkontis kelkajn homojn venintajn pro la sama afero - ion ekscii pri siaj parencoj kaj familianoj. Ĉe la malliberejo mi aŭdis, ke la virinoj akuzitaj kaj kondamnitaj pro krimoj nepolitikaj estis matene liberigitaj. Por ia provo aliajn liberigi perforte ni estis malmultaj - kvin aŭ ses homoj kaj ne ĉiuj deciditaj por tia ago.

Dum la tiamaj tri aŭ kvar horoj la politikaj kaj militistaj instancoj decidis defendi Varsovion. Al la stratoj revenis la policistoj, al la malliberejo revenis pli da gardistoj, por gardi ĝin ekstere venis ĝendarmoj, neniu ŝanco estis, ke ni ion povus fari por liberigi la virinojn.

Posttagmeze sur la muroj aperis afiŝoj sciigantaj, ke Varsovio estos defendata. La loĝantaro estis alvokita partopreni en la defendado de sia ĉefurbo. Varsovio komencis aspekti pli-malpli normale. La tramoj ekveturis, la vendejoj estis malfermitaj, komencis funkcii diversaj institucioj. Tamen la laboro en la grandaj fabrikoj preskaŭ ĉesis. La aviadilatakoj unuavice detruis la fabrikojn. Sed la ĝenerala situacio malboniĝis tagon post tago.

Ekde mezo de septembro, Varsovio estis dumtage atakata de aviadiloj kaj dumnokte de kanonoj. En la parkoj kaj sur la placoj estis enterigitaj homoj, kiuj falis en la stratoj (por veturigi ilin al tombejoj necesus tro da formalaĵoj), sed la rezistado plu daŭris. Dekmiloj da homoj libervole sin anoncis al la militservo, sed mankis por ili armiloj.

La informo de la 18a de septembro, ke la sovetia armeo trapasis la polan limon kaj okupas la orientajn teritoriojn, preskaŭ ĉiujn ŝokis. Ne estis dubo, ke la premo de la du gigantaj malamikaj flankoj rapide finos la reziston kaj ekziston de la pola armeo.

Kelkajn tagojn poste, Varsovio estis sieĝita de la germana armeo. Pri la ceteraj batalfrontoj sciis nur la militista komandantaro, sed ne la simpla loĝantaro. Nur unu komuniko sciigis, ke granda parto de la armeo trapasis al Rumanio. En iuj stratoj estis preparitaj barikadoj, oni supozis, ke okazos bataloj en la stratoj, sed nenio parolis pri tio, kio okazos.

En la tria militsemajno la germanaj aviadiloj detruis la uzinojn elektran, telefonan kaj akvoliverantan. Varsovio estis sen elektra kurento, sen telefono kaj sen akvo en la domoj. Domoj brulis kaj ne estis eble estingi la fajron. Por ricevi iom da akvo estis necese iri kelkajn kilometrojn al la rivero Vistulo. Multaj homoj pereis survoje por akiri iom da akvo, almenaŭ por trinko, lavado de la manoj estus tro granda luksaĵo. La normalaj necesejoj ne povis esti uzataj, la urbon minacis epidemioj, tamen ne regis ia paniko.

Matene la 26an de septembro komenciĝis aviadila atako. Tiun fojon falis amase bruligbombetoj. Tiu atako daŭris dum la tago. Brulis ne unuopaj domoj, sed kvartaloj en diversaj partoj de la urbo. Homoj kuradis kiel frenezaj, serĉante ŝirmejon, sed en la proksimo ĉie brulis. Vespere kaj nokte okazis la "kutima" artileria bombardado. Kompare al tio, kio okazis dumtage, ĝi estis ludo.

En tiu nokto Varsovio aspektis kiel brulanta maro, sur kiu troviĝis insuletoj minacataj en ĉiu momento de la fajro. Laŭ supozo, pereis en tiu tago ĉ. centmil homoj, nur civilaj.

Du tagojn post la bruligo de la urbo, ĉesis ĉiuj pafadoj. Post kvarsemajnaj militaj travivaĵoj la trankvilo impresis iom nenormale. Inter la homoj komencis disvastiĝi diversaj nekontroleblaj informoj, de la plej pesimismaj ĝis la plej optimismaj, ekzemple, ke la germana armeo komencis forlasi Polion. Posttagmeze ĉio klariĝis, per afiŝoj.

La du ĉefaj afiŝoj estis de la militkomandanto kaj de la urba prezidanto, sciigantaj la kapitulacon kaj instrukciojn al la loĝantaro kaj soldatoj - sufiĉe malĝojigajn. Multaj homoj traleginte la afiŝojn ne kapablis regi la larmojn.

Estis tre multaj malpermesoj por la loĝantaro, konforme al la kapitulackondiĉoj diktitaj de la okupantoj. Interalie, devis ĉiuj politikaj partioj kaj diversaj organizaĵoj ĉesigi sian agadon. La oficiroj devis sin anonci al la germana militkomandejo. Afiŝoj de diversaj partioj kaj asocioj sciigis al la membroj la agadĉeson. En la sama tago estis ankaŭ de la "Serbio" liberigitaj la virinoj kaj mia edzino dume ankaŭ elvenis.

La unuaj tagoj sub la germana okupado komenciĝis per homkaptado en la stratoj. Precipe judojn serĉis la kaptantoj. En tiu laboro ili havis helpantojn en la germanoj loĝantaj en Polio. Ĉiu kun semidaj trajtoj estis viktimo de kaptado en la stratoj. Multaj homoj estis kaptitaj nur por unutaga laboro kaj vespere liberigitaj. Multaj estis forveturigitaj en kamionoj por ĉiam. En tiu tempo mi estis sen mono, sen laboro, sen loĝejo, sen persona dokumento, - persono kontraŭ kiu ekzistis akuzmaterialoj pro la kontraŭfaŝista agado. En la sama situacio estis mia edzino. En simila situacio estis centmiloj da homoj. Multaj komencis forlasi siajn loĝlokojn por foriri en la "mondon", multaj foriris en Rusion.

***

1 _ orienten migras grupoj...

Sur la vojoj en la orienta direkto migradas grupoj de diversaj aĝoj, venantaj el diversaj urboj. La plimulto inter ili estas judaj junuloj. De tempo al tempo preterpasas ilin kamparana ĉaro, sur kiu sidas kelkpersona familio kun suĉinfanoj kaj maljunuloj.

Multaj estis devigitaj forlasi siajn hejmojn pro ordonoj de la germanaj militkomandejoj. Multaj foriras, ĉar iliaj hejmoj estis detruitaj aŭ bruligitaj dum la militbataloj, aŭ iliaj hejmoj estis ekbruligitaj de germanaj soldatoj post kiam la urbeto estis okupita. Multaj foriras, ĉar ili komprenas, ke de la hitleristoj nenion bonan oni povas atendi. Estas ankaŭ tiaj, kiuj ĝojas, ke finfine realiĝos ilia multjara revo veni en Sovetunion.

Inter la piedpaŝantoj estas ankaŭ multaj familioj kun malgrandaj infanoj. Ili moviĝadas malpli rapide, ili estas preterpasataj de la pli junaj, pli fortaj. La familioj preskaŭ senĉese kverelas, la edzo koleras je la edzino, la edzino respondas ankaŭ kolereme, la infanoj, kiuj plorante petas ripozon, kolerigas la gepatrojn kune.

Rigardante la infanojn, oni havas la impreson, ke tiuj hometoj komprenas ĉion en siaj tragediaj travivaĵoj. Sur iliaj palaj vizaĝetoj estas nenio infaneca, ili estas seriozaj kaj zorgemaj.

Kiam la kriadoj de la gepatroj ne trankviligas la infanojn, la gepatroj klopodas trankviligi ilin per promesoj : "Rigardu ! Post la arbo tie ni sidiĝos, tie en la dometo ni haltos !". Sed la promesoj ne senlacigas la infanojn, dum ripozo ili estas trankvilaj, kiam ili komencas paŝadi ĉio ripetiĝas.

Antaŭ la sunsubiro oni devas zorgi pri loko por tranokti. Multaj daŭrigus la migradon dumnokte, ĉiu trapasita kilometro proksimigas la finon de la turmento, sed ordono de la germana militkomandanto sciigas, ke de vesperiĝo ĝis

la mateno estas malpermesate esti sur la stratoj kaj sur la vojoj. Malobeo al tiu ordono riskigas tujan mortpafon.

Trovi tranoktejon ne estas facile. Ĉiujn regas timo, la migrantoj timas tranokti ĉe nekonatoj, la vilaĝanoj timas enlasi fremdulojn kaj ĉiuj timas, ke dumnokte povas veni germanaj soldatoj. De ili oni povas atendi la plej malbonan. Multaj tranoktas en la arbaroj.

Ĉe la novfiksita germana-sovetia limo staras longa vico da homoj - la senĉese alvenantaj rifuĝintoj. Parto el ili havas malgrandajn paketojn aŭ kofretojn, la posedaĵo de la dua parto konsistas nur el tio, per kio ili estas vestitaj, la humoro ĉe la lastaj estas pli bona - ili ne timas, ke dum la revizio estos de ili io forprenita.

Ĉe la pinto de la vico du germanaj soldatoj rapide traserĉas la paketojn kaj la poŝojn de la rifuĝintoj. Apud la soldatoj kolektiĝis kelkaj lokaj loĝantoj, plejparte maljunaj vilaĝanoj kaj infanoj de la 13-16 jaraĝo.

Dum la revizio la soldatoj forprenas de la rifuĝintoj horloĝojn, razilojn, juvelojn kaj monon, se iu havas pli ol dudek polajn zlotojn, aŭ dek markojn germanajn. La konfiskitajn valoraĵojn la soldatoj enpoŝigas en siaj manteloj aŭ pantalonoj. La soldatoj forprenas ankaŭ ĉiujn novajn vestaĵojn kaj donacas ilin al iu el la ĉirkaŭstarantoj. Ricevinto de donaco klinas la korpon kaj per flatrideto li esprimas sian dankon al la bona soldato.

La 22an de oktobro posttagmeze mi kaj mia edzino jam estis inter la reviziitaj. La soldato komandis : "Antaŭen for!" - montrante al la t.n. neŭtrala teritorio. Neniu regas super ni, ni estas sub la protektado de la "internaciaj leĝoj". En niaj oreloj ankoraŭ eĥis la artileria kanonado, la eksplodoj de krevantaj bomboj kaj la bruo de la malamikaj aeroplanoj, kaj ankaŭ nur antaŭ kelkaj minutoj ni povis atendi de la germanaj soldatoj la plejmalbonan.

Ĉe ĉiuj la humoro pliboniĝis kaj irante ni ekvidis

la unuajn rusajn soldatojn. Multajn trapenetris ĝojo, ili komencis krii, fajfi, ĵetadi la ĉapojn supren, esprimante tiamaniere sian kontenton, sian amikecon al la soldatoj.

La unua demando de la rusaj soldatoj estis : "Kioma horo ?" Tiu neatendita demando memorigis al ni la normalan vivon, de kiu ni dekutimiĝis dum multaj semajnoj.

En la komenco de la milito estis por ni la tempodifino ĉiutago kaj nokto, kiam ni komencis la migradon en niaj mensoj ekzistis nur la kilometroj kaj la urboj, kiujn ni devos trapasi, - horoj, minutoj, aferoj de ni ne praktikitaj. Kiam la ruĝarmeanoj aŭdis, ke la germanaj soldatoj forprenis de ni la horloĝojn, ili nin kompatis, iom poste ni komprenis la kaŭzon de tiu kompato.

La 23an de oktobro, proksimume unu monaton post kiam la ruĝa armeo okupis la orientajn partojn de Polio, la sovetunia registaro tie aranĝis balotojn.

Antaŭvespere de la antaŭa tago por la voĉdonado, mi venis en la urbeton Zaromb-Koŝĉelni, - la unua urbeto ĉe la limo sur la rusa flanko. Sur la urba placo ĉe la ĵus starigita tribuno kolektiĝis la loĝantaro kaj multaj el la ĵus alvenintaj rifuĝintoj, venis ankaŭ militista orkestro, kelkaj oficiroj kaj soldatoj.

Komenciĝis la antaŭbalota kunveno. La unua parolanto estis oficiro. En sia parolado li certigis la loĝantojn, ke finiĝis por ili la tempo de la faŝista teroro, ekonomia ekspluatado kaj spirita sklaveco. Komenciĝis por ili epoko de la libera kaj feliĉa vivo. Ne minacas al ili iu ajn danĝero, ĉar ili nun estas defendataj de la ruĝa armeo kaj sub la protekto de la genia gvidanto de la popoloj kamarado Stalin. La ceteraj paroladoj estis de la sama enhavo. Ĉiufoje, kiam estis menciita la nomo Stalin, la orkestro ludis la melodion de la Internacio. Post la kunveno, kiam ni komencis serĉi iun lokon por tranokti, la urbanoj klarigis al ni, ke la militkomandanto malpermesas doni al la rifuĝintoj tranoktejojn en la urbeto, ĉar ĝi situas ĉe la limo. Malobeo al tiu ordono riskigas monpunon.

Matene la 23an de oktobro mi venis al la urbo Bjalistoko. La stacidomo estis preskaŭ envolvita en ruĝaj flagoj. Sur la muroj pendis portretoj. En la mezo - la plejgranda de Stalin, apude dekstre kaj maldekstre iom pli malgrandaj

portretoj de Molotov, Voroŝilov, Kalinin, Berja, Ĵdanov kaj aliaj. La portretoj de Marks, Engels kaj Lenin ne estis forgesitaj. Inter la portretoj kaj flagoj estis lokitaj sloganoj laŭdantaj la ruĝan armeon kaj la sovetian registaron. Videble, ke la dekorado ne estis finita, sur la tero kuŝis monto de dekoracia materialo, soldatoj grimpis sur ŝtuparoj, aldonante flagojn kaj sloganojn.

Ĉe la elirejo de la stacidomo, haltigas la alvenintojn grupoj de junuloj. Ili diras : "Antaŭ ol vi iros al la urbo, vi devas ĉi tie voĉdoni". Ili gvidis ĉiujn al granda salono. En la balotejo, laŭlonge de la muroj, sidis komisiitoj por tiuj elektoj. La homo, kiu min registris, diris : "Nia kandidato estas laboristo-ŝuisto". Surtola surskribo en la salono anoncis : "Ni voĉdonas por kamarado Ĵimnoĥ !" - nomo al mi konata, tiu Ĵimnoĥ estis du jarojn antaŭ la milito juĝita pro aparteno al la centra komitato de la komunista partio, sed mi dume ne sciis, ke li estas ŝuisto, eble li iĝis ŝuisto antaŭ tiuj balotoj.

Post kiam mi estis registrita, mi ricevis "voĉdonilon" kun la nomo Ĵimnoĥ kaj koverton.

"Kion mi devas nun fari ?" mi demandis. "Nun vi devas meti la voĉdonilon en la koverton kaj meti ĝin en la urnon". Montrante per la mano, li diris : "Tie staras la urno". Fakte, sur scenejo staris granda urno ĉirkaŭvolvita per ruĝa tuko. En ĝin ĉiuj ĵetis la ĵus ricevitajn "voĉdonilojn".

Tiu balotado daŭris ĝis ĉirkaŭ noktomezo, sed nek la loĝantaro nek la rifuĝintoj sciis celon de tiuj balotoj, kiun oni elektas, kial tiu balotado ĝenerale okazas ?...

Post kelkaj tagoj tiu demando klariĝis. La gazetoj informis, ke "la peto de la elektitaj deputitoj, ĉe la sovetunia registaro, por anigi la teritoriojn de Okcidenta Blankrusio kaj Okcidenta Ukrajno, liberigitajn per la ruĝa armeo, al la federacio de la Sovetuniaj Respublikoj, estis akceptita de la sovetunia registaro."

***

La centmiloj da rifuĝintoj de sub la germana okupado en Polio vagadis en la grandaj urboj sur la teritorioj de la novbaptitaj nomoj Okcidenta Ukrajno kaj Okcidenta Blankrusio. Siajn tranokteojn ili havis en la stacidomoj, en ejoj, kie antaŭe estis diversaj institucioj kaj organizaĵoj. Multaj foriris al la proksimaj urbetoj. Multaj ne povis trovi iun ajn lokon kun tegmento super la kapo. Iliaj hejmoj estas la stratoj.

Inter la rifuĝintoj estis ankaŭ privilegiita parto, tiuj, kiuj estis kondamnitaj aŭ arestitaj pro la politika antifaŝista agado. Pri ili zorgis la novaj regantoj, ili okupis grandajn loĝejojn, kie antaŭe loĝis riĉuloj. En tiuj domoj estis aranĝitaj kuirejoj nur por ili. La manĝaĵo por ili estis simpla, eĉ nesufiĉa, sed kompare al la ceteraj rifuĝintoj ilia situacio estis bona.

Tiu privilegiita parto estis ankoraŭ dividita en du kategorioj (privilegiitoj kaj pliprivilegiitoj). Al la simple privilegiitaj apartenis ĉiuj, kiuj iam estis malliberigitaj pro tiuspeca agado ; al la pliprivilegiitaj apartenis tiuj, kiuj forlasis la malliberejon dum la milito.

Formale, estis en tiu anaro ĉiuj malliberigitaj pro politika agado, sendepende de sia politika partia aparteno, aŭ partiaj simpatioj, se ili estis antifaŝistoj.

Mi kaj mia edzino, laŭ la formala koncepto havis la rajton esti inter la pliprivilegiitaj. Ambaŭ ni forlasis la malliberejon dum la milito, ambaŭ ni estis akuzitaj pro kontraŭregistara agado, ambaŭ ni estis antifaŝistoj, sed ni ne estis komunistoj.

Kiam ni venis al la ejo de tiu organizaĵoj en Bjalistoko, ni ankaŭ tie renkontis konatojn, antaŭajn samsortanojn. Ilia konduto al ni estis sufiĉe amikema. Alimaniere nin traktis la kamaradino, kiu nin registris. Ŝi diris jene : "Provizore vi povas ĉi tie esti, sed ĉar vi estas sindikatistoj, mi devas pri via afero kontakti aliajn personojn."

Post du tagoj la sama kamaradino al ni klarigis : "Vi povas ĉi tie nur manĝi kaj dormi, sed vi ne havos la samajn rajtojn, kiujn havas la ceteraj anoj de la asocio. Ekzemple : por ricevi laboron vi estos la lastaj, vi ne ricevos la monsubtenon kaj vintrajn mantelojn, kiujn aliaj jam ricevis, vi ne povos partopreni en niaj kunvenoj kaj simile, sed povas esti ŝanĝo en tio, se vi deklaros, ke

via ĝisnuna ideologio kaj agado estis malĝusta, erara kaj bedaŭrata". Ni respondis : "Ni ne volas aparteni al la organizaĵo, kie ni estos anoj de malsupera grado, kaj ĝis nun ni nenian kaŭzon havas por deklari, ke nia ideologio estis malĝusta kaj erara". Post tio ni foriris al la urbeto Suprasl, situanta dekses kilometrojn de Bjalistoko. Tie lokiĝis kelkcent rifuĝintoj en dometoj, kie ĝis la milito estis nur someraj loĝejoj.

***

Post kiam la sovetia registaro akceptis la deziron de la novelektitaj popol-reprezentantoj por aligi la liberigitajn teritoriojn al Sovetunio, ĝi komencis enkonduki la sovetian ordon pli fervore ol antaŭe.

Ĉiunokte la NKVD-istoj arestis milojn da homoj kaj ilin forveturigis. Kien ?...Neniu sciis. Samtempe iliaj reprezentantoj komencis varbi la rifuĝintojn por laboro en Sovetunio. La lacigitaj homoj kredis, ke en Sovetunio ili trovos pli-malpli normalajn vivkondiĉojn kaj ili sin anoncis por forveturi. Specialaj trajnoj estis preparitaj kaj forsenditaj al diversaj regionoj de la "proleta patrio".

Ankaŭ ĉe ni en Suprasl okazis tiu varbado kaj ni atendis la tagon por forveturi.

Du tagojn antaŭ la forveturo estis por ni aranĝita kunveno. La parolintoj promesis feliĉan vivon en la grandega, riĉega kaj potencega Sovetunio. Por la granda okazontaĵo - forveturo - oni preparis ruĝajn flagojn kaj grandajn afiŝojn, kiuj dekoracios la vagonojn.

La kvinan de novembro ni ĉiuj devis esti en la fervoja stacidomo de Bjalistoko por atendi nian trajnon. La stacidomo estis plenplena de rifuĝintoj kaj ruĝarmeanoj en neimagebla grado, la homoj simple kuŝis aŭ staris kunpremitaj, ĉar ekstere estis malvarme. En tiu stato ni atendis dum la tuta nokto.

Finfine, matene, ni ekaŭdis, ke la vagonoj jam staras ĉe la kajo kaj ni povas envagoniĝi.

La trajno al la lando tiom multe promesata konsistis el ordinaraj ŝarĝvagonoj, kaj ni en ili enŝarĝiĝis.

Post la enŝarĝiĝo ni ankoraŭ la tutan tagon atendis

la forveturon. Kvankam kuŝado en ŝarĝvagono ne estas luksa travivaĵo, tamen neniu plendis. Ni estis kontentaj, ke ni havas tegmenton super la kapo, eĉ se tiu tegmento estas en ŝarĝvagono.

Same kiel en la urboj kaj en la vilaĝoj, ankaŭ sur la fervojoj svarmis rusaj soldatoj. Milittrajnoj staris po kelkaj en ĉiu stacio, kun abundo de militbezonaĵoj, tankoj, kanonoj, kamionoj, ĉevaloj kaj ĉevalĉaroj.

En ĉiu malgranda stacio nia trajno staris dum kelkaj horoj, en la pligrandaj stacioj ĝi staris tutan tagon, aŭ tutan nokton - unue oni devas preterlasi la milittrajnojn, ni civiluloj povas atendi.

Intertempe ni komencis interbabiladi kun la soldatoj. Pli ol ĉio nin interesis, ĉu ni havos en Rusio laboron. Kiam la soldatoj aŭdis, ke ni demandas pri laboro, ili komencis ridi. "En nia lando estas multe da laboro, se vi nur volos multe labori." La esperigoj de la soldatoj pliintensigis nian deziron veni en landon, kie oni povas havi sufiĉe da laboro, sed ni veturas nur kelkajn horojn tage kaj piede ni do ne kuros.

Fine, dumnokte, meze de novembro, ni ekrimarkis sur la tero laŭlonge de la fervojo blankajn kvinangulajn steletojn. Ni malfermis la pordojn de la vagono ambaŭflanke. Ĉiuj stariĝis kaj rigardis eksteren sur la teritorion delonge prirevitan. Ĉe iuj tiu teritorio estis la revo de multaj jaroj. Krom la kvinangulaj steletoj, ni nenion vidis. Tiel ni dumnokte alveturis al stacio de la malnova limo, Niegorelaja.

***

En la tridekaj jaroj estis en Polio populara la libro de la pola roman-verkisto Stefan Ĵeromski sub la titolo "Antaŭ printempo". Preskaŭ ĉiu progresema homo ĝin tralegis. La aŭtoro priskribis la vivon de pola aristokrata familio vivanta dum la unua mondmilito en Rusio. La familio havas plenaĝan filon. Kiam eksplodas la revolucio, la filo en ĝi partoprenas ĉe la flanko de la revoluciistoj. Post iom da tempo mortas la patrino, la patro kun la filo reveturas al Polio. La patro estas pola patrioto, la filo estas daŭre revoluciisto. Inter ili okazas konstante diskutoj, dum kiuj la patro rakontas al la filo pri la feliĉa vivo en la liberigita Polio, interalie li rakontas, ke en Polio oni konstruas por

la popolo vitrajn domojn. La priskribo de la vitraj domoj estas ĉarmega kaj konserviĝis en la memoro de ĉiuj, kiuj legis tiun libron. Kiam ili traveturis la limon kaj troviĝis sur la pola teritorio, la filo vidis anstataŭ vitraj domoj malnovajn kadukajn kabanojn. Li tiam demandas la patron nur pri tio : "Patro! Kie estas viaj vitraj domoj ?"

***

Inter la rifuĝintoj al Rusio estis multe da aktivaj komunistoj kaj komunistaj simpatiantoj. Estis multaj, kiuj kritikadis la stalinistan regmanieron, tamen, preskaŭ ĉiu rifuĝinto estis konvinkita, ke kompare al la kapitalistaj landoj, la vivnivelo en Sovetunio estas pli alta, kaj ekonomie kaj kulture. Sed kiam ni atingis la unuan rusan urbeton, ni vidis ion, kio mirigis : la plimulto el la loĝantoj havis sur siaj piedoj anstataŭ ŝuoj, "lapĉojn" - bastoŝuojn. La vestaĵoj de la viroj konsistis el ĉifonecaj vatumitaj pantalonoj kaj mallongaj vatumitaj jakoj. Iliaj ĉemizoj estis preskaŭ saktolaj, kaj kun pureco ili havis nenion komunan. Ĉe multaj homoj eĉ tiaj ĉemizoj ne estis videblaj. La plimulto el la viroj en Niegorelaja havis barbumitajn vizaĝojn, sur la kapoj ili havis strangajn ĉifonpeltajn ĉapojn. Ĝenerale la homoj aspektis kiel el malproksimaj ĝangaloj, aŭ kiel severe kondamnitaj krimuloj, kiujn oni povis vidi nur sur filmoj. La vestaĵoj de la virinoj estis preskaŭ la samaj. Sed tion vidis nur parto el la rifuĝintoj. Tiuj, kiuj havis en siaj mensoj nur la komunistan propagandon fiere rigardis la grandegajn kanonojn kaj tankojn, ili vidis afablajn soldatojn, kiujn oni ne timis kiel la germanojn. La homoj kun "malfermitaj okuloj" ankaŭ vidis, ke la lokaj loĝantoj alvenis kaj demandis, ĉu iu volas vendi iun ajn vestaĵon, - iuj petis nur ĉemizon, iuj petis pantalonojn, aliaj petis ŝuojn, robojn k.c.

Dum nia kelktaga restado en Niegorelaja okazis komercado per malnovaj vestaĵoj. La prezoj petitaj de la rifuĝintoj estis tuj pagitaj kaj post la negoco la aĉetintoj manpremis la vendintojn kaj dankis. La rifuĝintoj ne komprenis kial la sovetunia registaro ne sendas varojn al tiu urbeto, kial tiuj homoj estas tiel malbone prizorgataj. Sed neniu rifuĝinto havis iun

plendon. Dum la kelktaga restado en Niegorelaja ni ricevis manĝaĵon senpage ; vere, ke tiu manĝaĵo estis tre simpla kaj nesufiĉa, sed la plimulto el tiuj homoj estis sen mono kaj tiu manĝaĵo ilin savis de kompleta malsato.

Post kelktaga restado en Niegorelaja ni veturis antaŭen kaj ĉie ni vidis homojn en la samaj vestaĵoj ; ĉe ĉiu stacio demandantoj ĉu iu volas vendi iujn ajn vestaĵojn ; dume en la cerbojn de la rifuĝintoj komencis enpenetri la demando - malkuraĝe kaj malrapide - ĉu ni eraris ĝis tia grado ? Ĉu tiel granda povis esti la blufo ? Tiuj, kiuj iam legis la libron "AntaŭPrintempo" memoris ĝis la demandon de la filo : "Kie estas la vitraj domoj ?".

***

2. en krupki kolektiĝis...

En la fervoja stacio de la blankrusa urbeto Krupki kolektiĝis multaj homoj por renkonti la rifuĝintojn, kiujn ili atendis de kelkaj tagoj. Inter la atendantoj estis kolĥozanoj kun ĉevalĉaroj, ĉiu el ili aspektis en la malforta lumigado kiel moviĝanta granda nigra ĉifonaĵtubero. Atendis nin ankaŭ junaj vilaĝaninoj, ili estis vestitaj "feste" - sur la kapoj maldikaj florpresitaj tuketoj, sur la piedoj novaj "lapĉoj". La ceteraj vestaĵoj ĉe la virinoj estis la samaj kiel la viraj, "egaleco".

Atendis nin ankaŭ grupoj da laboristoj. Verŝajne ili venis saluti siajn venontajn laborkamaradojn. La aspekto de la laboristoj estis pli bona ol tiu de la vilaĝanoj. Iliaj vizaĝoj almenaŭ ne estis barbumitaj, sur la piedoj ili havis ŝuojn aŭ botojn.

Surloke estis ankaŭ grupo el la elito. Oni povis ilin distingi ankaŭ laŭ iliaj vestoj, parto da ili estis en soldatmanteloj, kelkaj en peltoj, kelkaj en civilaj manteloj, ili staris kune kaj nur ordonis.

Unue venas al ni la kolĥozanoj. Ili volas, ke ni sidiĝu sur la ĉaroj por veturigi nin al la urbo, kie estas por ni preparita tagmanĝo. Ilia konduto al ni estis tre afabla. Ili preparis la sidlokojn zorgeme, laŭeble oportunaj, kontrolas, ĉu ĉiu sidiĝis "komforte". Oni povis vidi ilian sinceran gastemon.

La manĝaĵo, kiun ni ricevis, ne estis luksa, kvankam kontentige bongusta kaj sufiĉe abunda. Sed la parolado post la tagmanĝo enhavis pli da abundo. La parolanto estis kunveninta rifuĝinto. "Rigardu ! kiel bonkore kaj amikeme Sovetunio kaj ties civitanoj gastigas nin. Ekde la momento kiam ni atingis la por ni destinitan lokon, jam atendis nin la urbaj reprezentantoj. Ili havas por

ni la plej grandan zorgon. Forpelitaj de niaj hejmoj kaŭze de la malfeliĉa kaj stulta politiko de la polaj sinjoraĉoj, kiuj lasis sin trompi de la anglaj kaj francaj imperiistoj kaj poste tiuj sinjoraĉoj mem forkuris lasinte nin sen protekto, ni nun dank'al la ruĝa armeo kaj ties genia ĉefo kamarado Stalin, ni trovis la veran liberan hejmon, kie nin atendas feliĉa vivo, kune kun ĉiuj homoj de la grandega, riĉega kaj potencega Sovetunio, sub la genia gvidado de kamarado Stalin. Pro tio ni promesas esti fidelaj kaj laboremaj homoj, plifortigi la landon, kie venkis la laborista ideo per la granda rusa revolucio kaj nun tiu lando gardas ne nur la interesojn de la sovetuniaj popoloj, sed ankaŭ la interesojn de la tutmonda laboristaro, kaj ankaŭ la mondpacon, kiu estas nun minacata de la anglaj kaj francaj imperiistoj. Ni promesas ankaŭ, ke se estos necese ankaŭ ni kune kun ĉiuj civitanoj de Sovetunio libervole kun armiloj defendos la landon, kiu estas la espero de la laboristaro en la tuta mondo. Nun, ni ĉiuj iros al la klubo por tie tranokti." Per tiuj vortoj li finis la paroladon.

La klubo estis en iama rusa preĝejo. Ĝi estis ankaŭ la urba kinejo. Ĉirkaŭe ĉe la muroj estis metita pajlo kaj post dusemajna veturado en ŝarĝvagonoj eĉ la nura kuŝado sur la pajlo estis por ni luksa ripozo. Ni dormis malmulte, sed tre multe babiladis. Konstante venis al ni zorgantoj kun la samaj demandoj : Kiel ni fartas, ĉu ni estas kontentaj, ĉu ni manĝis, ĉu ni estas sataj.

La fruan matenon kolektiĝis ĉe la klubo loĝantoj de la urbeto. Plejparte virinoj kaj pliaĝaj infanoj. Ĉe la kluba enirejo staris miliciano kaj li ne permesis al ili eniri. Ĉiu el ni, kiu trapasis apud tiuj homoj, estis akompanita de iliaj rigardoj. La vizaĝoj de tiuj homoj estis seriozaj. Ili parolis inter si tre mallaŭte, ne estis eble aŭdi iun sonon, kiel dum preĝado.

Mi kune kun kelkaj alvenintoj faris promenadon en la urbeto, por rigardi ĝin. Imponan impreson ĝi ne donis, ĉie malnovaj lignaj konstruaĵoj. Sur iuj domoj pendis portretoj de la ĉefregantoj, la plej honoran lokon okupis Stalin. En la ĉefstratoj la trotuaroj estis el lignaj bretoj, en la apudaj stratoj neniaj trotuaroj. La aŭtunaj marĉoj en tiuj nepavimitaj stratoj kompletigis la mizeran aspekton.

Subite ni vidis ion, kio efikis al ni kiel ricevita frapo.

Ĉe du fermitaj vendejoj staris homoj en longaj vicoj. Al tiuj vendejoj oni devis alveturigi panon kaj por aĉeti panon la homoj atendis tie de antaŭ kelkaj horoj. Al ni en la klubo oni sciigis, ke ni povos aĉeti panon en la restoracio kaj ni ne devas esti premitaj ĉe tiuj magazenoj. La privilegio sciigita al ni ne povis ŝanĝi nian rilaton al la fakto, ke en Sovetunio oni devas atendi kelkajn horojn en vico por ricevi panon. Se iu volis aĉeti ion krom pano, ekzemple, buteron, lakton aŭ kolbason, oni klarigis, ke tiajn aĵojn oni povas aĉeti nur dimanĉe sur la bazaro, kiam tion alportos vilaĝanoj.

Proksimume je la deka horo venis al la klubo grupo el lokaj gvidantoj. Ili komencis nin registri. La demandoj dum la registrado estis multaj, iuj kiel politika esploro, ekzemple : ĉu oni apartenis al iu politika partio, aŭ simpatiis al iu politika partio, ĉu oni apartenis al profesia sindikato, se jes, ĉu tiu sindikato estis komunista, aŭ kontraŭkomunista, ĉu oni posedis grandajn riĉaĵojn, ĉu la gepatroj posedis riĉaĵojn, ekzemple domojn, fabrikojn, aŭ grandajn magazenojn.

Dum la registrado ĉiu ricevis kvindek rublojn. La parolinto de la pasinta vespero estis jam inter la lokaj gvidantoj kaj helpis al ili. Interalie li sciigis, ke tiuj, kiuj sin registrigis, devas iri al la banejo preparita speciale por ni.

Banejo estis por ni afero, pri kiu ni revis de kelkaj semajnoj, kaj fine ni tion atingis. La banejo situis ĉ. unu kilometron de la urbo. La vojo al ĝi kondukis tra deklivoj, montetoj, koto. Kiam la virinoj komencis paŝadi tra la koto, ili komencis koleri kaj insulti. Iuj kontraŭe komencis ridi kune kun la viroj, kiujn la marĉoj instigis al bona humoro.

Kiam ni venis al la banejo, nia zorgo estis kiamaniere ni ankoraŭ unu fojon trapasos la koton reen al la klubo. La banejo estis aranĝita en domo el lignaj traboj kaj konsistis el du ĉambroj. En la unua ĉambro por senvestiĝi staris kelkaj benkoj por meti la vestaĵojn. En la muroj inter la traboj multe da fendoj kaj truetoj tra kiuj enblovis la aŭtuna vento, kvankam

dume milda.

En la dua ĉambro por sin lavi troviĝis en unu anguło konstruaĵo kun malfermita granda kaldrono por la varma akvo. La akvon oni ĉerpis desupre. La ujoj por la akvo konsistis el kelkaj lignaj kestoj kaj kelkaj lignaj siteloj. La du homoj, akvodonantoj ĉe la kaldrono, aspektis pro la vapora nebulo en la lavĉambro kvazaŭ fantomoj. De la plafono konstante falis gutoj, la aspekto de la planko memorigis al ni la trapasitan vojon al la banejo. En ambaŭ ĉambroj ne estis pli varme ol ekstere. Tiu banejo ne logis por lavi sin. Kiel senvestiĝi en tia malvarma ĉambro ? Ni eble reirus al la klubo, ne lavinte nin, sed la koto forprenis de ni la volon ankaŭ por tuja reiro. Iu ŝerce eĉ proponis, ke ni atendu ĝis venos al ni la kamparanaj ĉaroj, kiuj hieraŭ vespere nin veturigis al la urbo.

Dume, kiam ni ŝercbabiladis pri nia sorto, okazis io "grava", por kio ni eĉ akceptis iom da malvarmaj suferoj. Dum la dusemajna estado en la vagonoj venis al ni pedikoj, aldone al ĉiuj niaj ne tro komfortaj travivaĵoj, la pedikoj estis kiel kompletigo. Komence, kiam ni rimarkis sur ni pedikojn, ni hontis pro la najbaroj. Iom post iom, kiam ni vidis, ke ĉiuj ni posedas tiujn estaĵojn, ni ĉesis honti. La masakro de la pedikoj ne estis efika por ekstermi ilin. La pedikoj ĉiam kaj ĉiam plimultiĝis kaj ili rampis sur niaj eksteraj vestaĵoj. Ni ĉiam pritraktis kiamaniere forigi tiujn pedikojn.

Kiam ni staris ĉe la banejo, alveturis milita kamiono. Oni malŝarĝis du lignajn budojn. La homoj, kiuj demetis la budojn, klarigis al ni, ke baldaŭ ili hejtigos sub tiuj budoj, kaj ĉiu, kiu havas pedikojn, povos enpendigi siajn vestaĵojn kaj la pedikoj estos bruligitaj.

Ni iom atendis kaj unu desinfektisto anoncis, ke jam estas la necesa temperaturo kaj li enpendigis niajn vestaĵojn. Al tiu, kiu hejtis, li ordonis : "Nun submetu iom da seka ligno kaj ĉio estos en bona ordo !" La desinfektistoj preparis ankaŭ argilaĵmorteron kaj post kiam ili lokis niajn vestaĵojn en la budoj, ili ĉirkaŭmorterigis la fendojn ĉirkaŭe de la pordoj. Pro la varmego la mortero tre rapide sekiĝis kaj defalis, la desinfektistoj seninterrompe estis devigitaj konstante surmeti malsekan morteron. Ili ankaŭ seninterrompe rigardis la du termometrojn interne de la budoj.

Kvankam ni estis nudaj kaj iom tremis pro la malvarmo, ni havis almenaù esperon forigi de ni la etajn turmentantojn. Fine, la du specialistoj diris : "Jam estas preta.", kio devus signifi, ke la pedikoj estas bruligitaj.

Kiam ni rericevis niajn vestaĵojn, ni konstatis, ke la pedikoj plimultiĝis kaj iĝis pli viglaj ol antaùe. Ni tion montris al la "pedikbruligistoj", sed ili sin senkulpigis, klarigante, ke ili faris ĉion kiel estas nesece, sed la "desinfektkameroj" estas interne iom difektitaj kaj pri tio ili ne respondecas. La banejo havis por ni gravan utilon. Ĉiu ricevis senpage novan ĉemizon kaj kalsonon. Ni tre rapide spertis, ke tia donaco en Sovetunio havas grandan valoron.

Sekvontan tagon de nia alveno al Krupki ni estis senditaj al laboro. Nur la tajloroj kaj ŝuistoj ricevis laboron laù siaj metioj. Mi kune kun mia survoja kamarado estis sendita al kooperativo "Ruĝa Martelo". Tiu kooperativo produktis ĉefe ferajn litojn kaj hakilojn. Nia laboro estis kolorigi la litojn.

Kiam ni vidis la litojn, ni demandis : "Kiu aĉetas tiajn litojn ?". Estis nekredeble ne honti tiajn aĉajn produktaĵojn. La kooperativa administranto, montrinte al ni la laboron, diris : "La rekompenco por kolorigi unu liton estas kvindek kopekoj. Mi opinias, ke tio estas sufiĉe alta prezo kaj vi enspezos multe da mono. Tiun laboron faris antaùe virino, ŝi kolorigis kvindek litojn tage, sed vi estas metiistoj kaj vi kapablos kolorigi tage pli ol kvindek, kaj vi enspezos multe da mono."

Estis nekredeble, ke iu kolorigis kvindek litojn dum ok horoj, tamen tion asertis ankaù la ceteraj laboristoj. La farbo, kiun ni ricevis por la laboro, estis la plej malaltkvalita kaj tio ankaù decidas pri la rapideco en la laboro.

La unuan tagon ni ambaù ĝis tagmezo kolorigis dekkvar litojn. Depost tagmezo ĝis la vespero ni kolorigis nur dek litojn. Nia taga enspezo por persono estis ses rubloj. De tiu sumo oni do devas pagi imposton. La plej simpla tagmanĝo en la restoracio kostis kvar rublojn, do tia enspezo estis ridinda. Nia streĉado en la sekvontaj tagoj por kolorigi pli da litoj ĉiutage ol en la

komenco ne estis tre sukcesa. Ni petis de la kooperativestro, ke li pagu al ni por la laboro ĝis nun farita, ĉar ni volas trovi alian laboron. La kooperativestro ne volis nin liberigi, certigante, ke iom post iom ni alkutimiĝos al la laboro kaj ni enspezos tre multe da mono.

Vole nevole ni restis kaj spertis la cirkonstancojn en la kooperativo. En Sovetunio estas kutimo, aŭ eble ekzistas por tio leĝo, ke la laborejadministrantaro por siaj laboristoj prizorgas nutraĵojn, loĝejojn, vestaĵojn kaj ankaŭ kulturon. Ankaŭ kooperativo "Ruĝa Martelo" iom prizorgis siajn laboristojn en tiuj aferoj. Ĉiu laboristo en tiu kooperativo povis aĉeti ĉiutage po unu kilogramo da pano. Ĉar mia edzino tiam ne laboris, ŝi panon ne povis ricevi. Mi petis de la kooperativo panon ankaŭ por ŝi, ĉar mi vidis, ke aliaj laboristoj ricevas panon ankaŭ por siaj familianoj. Vere, en la t.n. stalina konstitucio estas skribite "kiu ne laboras, tiu ne manĝos", sed la stomako ne konas la konstitucion.

Kiam la homo, kiu prizorgis panon por la laboristoj en la kooperativo, menciis la necesajn formalaĵojn, por ke mi ricevu kilogramon da pano por ŝi, mi rezignis la aranĝon. Unue mi devas de iu oficejo en la urba komunumo ricevi atestilon, ke mi fakte havas edzinon kaj kiel ŝi nomiĝas. Kun tiu atestilo mi devas iri al la sekretario de la profesia sindikato, tie klarigi, ke ŝi ne laboras kaj ankaŭ la kaŭzojn kial ŝi ne laboras. De tiu oficejo mi ricevos atestilon pravigantan laŭleĝe la kaŭzojn, ke ŝi ne laboras. Kun tiuj atestiloj mi devas iri al la dua sekretario de la Regiona Parti-Komitato, li devas ilin subskribi kaj atesti, ke ĉiuj tiuj dokumentoj estas ĝustaj kaj laŭleĝaj. Poste la kooperativestro aldonos atestilon, ke mi fakte laboras en tiu kooperativo. Tiujn atestilojn mi devos doni al la administranto de la urba bakejo, tiam mi ricevos panon ankaŭ por ŝi.

Okaze de la sesdekjaraĝa jubileo de Stalin oni alveturigis al Krupki diversajn vestaĵojn. Al la kooperativo "Ruĝa Martelo" estis disponigitaj iom da vestaĵoj por la laboristoj-rifuĝintoj. Sume estis kvar paroj da ŝuoj, kelkaj ĉemizoj, kelkaj kalsonoj kaj kelkaj metroj da tolo.

Por mi la kooperativestraro decidis ses metrojn de tiu

tolo. Kiam mi venis al la magazeno ĝin aĉeti, mi eksciis, ke la al mi donita donaco kostas tridek rublojn (tritaga laborenspezo). Mi opiniis, ke ĝi ne valoras tridek rublojn kaj ĝin ne aĉetis. Kiam mi venis hejmen kaj pri tio rakontis al la dommastrino, kie mi loĝis, ŝi baldaŭ donis al mi sesdek rublojn, por ke mi tuj iru al la vendejo kaj alportu la tolon al ŝi. Mi opiniis, ke mi ne devas preni de ŝi pli ol mi pagis, sed la dommastrino komprenigis al mi, ke en Sovetunio oni ne devas esti tiel honesta, ĉar ankaŭ partianoj "spekulacias".

Post kelkaj tagoj la dommastrino rakontis al mi, ke de konato-vilaĝano ŝi ricevis por tiu ŝtofo tri pundojn da hordeo. La hordeon ŝi portis al la muelejo kaj paginte nur kelkajn rublojn ŝi havas nun la hordean farunon. Ŝi estis al mi tre dankema, ĉar per la faruno ŝi povas variigi la manĝojn kaj ĝis nun ŝi povis kuiri nur terpomojn. Precipe ŝiaj tri infanoj ĝojis pri tiaj luksaj manĝaĵoj.

***

En ĉiuj sovetuniaj entreprenoj troviĝas homo, kies tasko estas informi la laboristojn pri la politikaj okazintaĵoj, konforme al la partia "linio" kaj eduki la laboristojn politike, en la partia spirito, - tio nomiĝas "kulturlaboro". Tiuj kulturigpersonoj estas sendataj de la partio. Ĉiu politika informado kaj kultura agado devas esti sub la partia kontrolo. Tiuj partikontrolantoj ricevas salajron de entreprenoj, kie ili "laboras", kvankam ekzistas ankaŭ imposto, kiu nomiĝas "Kultzbor" t.s. imposto por kulturaj bezonoj.

Tiuj kvazaŭ nur-kulturigistoj devas ankaŭ kontroli ĉion, kio okazas en la entrepreno, kien ili estas senditaj. La laboreja administrantaro devas pri ĉiuj intencoj informi tiujn kulturpersonojn kaj akiri iliajn akceptojn. Tiuj "kulturigistoj" havas diversajn titolnomojn, ekzemple : en la armeo ili nomiĝas "Politrukoj" - politikaj gvidantoj; en la malliberejoj kaj en la koncentrejoj ili nomiĝas "Upolnomoĉenij" - plenrajtigitoj, sed en la koncentrejoj ili havas helpantojn, kiuj nomiĝas "Vospitateli" - edukantoj (edukistoj). En la koncentrejoj la kontrolo devas esti pli strikta, pli gardata. Necesas duobla nombro da kontrolantoj. En la

grandaj fabrikoj ili nomiĝas plejparte "Partorgoj" - homoj por partiaj aferoj. En la kooperativoj kaj en la kolĥozoj ili nomiĝas plejparte "Kultrabotnikoj" - laborantoj por kulturaj aferoj.

La "kultrabotniko" en la kooperativo "Ruĝa Martelo" estis nomita Kamarado Hajdaŝ. Lia aĝo estis inter 30-40 jaroj. Li ĉiam estis vestita en soldata mantelo (eĉ kiam li estis en varma ĉambro) sen iuj ajn eksteraj signoj. Lia voĉo estis trankvila kaj sufiĉe simpatia, kaj lia ĝenerala konduto estis afabla. Dum la unuaj tagoj, kiam la rifuĝintoj eklaboris en la kooperativo, kamarado Hajdaŝ paŝadis inter ni, komprenigis al ĉiu aparte, poste en komuna kunveno, kial ni devas en Sovetunio labori pli ol en la kapitalista Polio : Unue, en Polio ni laboris por la kapitalistoj, sendepende, ĉu ni produktadis pli aŭ malpli, la monon ĉiam forprenis la kapitalista labordonanto. Alie estas en Sovetunio. Se ni produktadas pli, ni ricevas pli da mono. Due, en Polio ni vivis en kapitalista ŝtato kaj ni havis neniajn rajtojn, ĉi tie en Sovetunio la ŝtato estas nia propra kaj ni havas ĉiujn rajtojn.

En Polio, laboristo devis resti laboristo por sia tuta vivo, sed en Sovetunio ĉiu laboristo havas la rajton kaj la eblon lerni kaj studadi ; ĉiu laboristo povas estiĝi inĝeniero, doktoro, parlamenta deputito, eĉ ministro, aŭ io simila. Krom tio, se laboristo estas tre honesta kaj tre laborema, li povas aniĝi al la partio, kaj la nura membreco en la partio estas tre nobla kaj honoriga afero.

Ni jam sufiĉe bone komprenis kiel estas en Sovetunio kaj kiam kamarado Hajdaŝ parolis al iu, la aŭskultanto nur kapjesis kaj atendis la foriron de la "kultrabotniko".

Kiam kamarado Hajdaŝ opiniis nin sufiĉe kontentige edukitaj, kulture kaj politike, li rekomencis sian normalan "laboron", sidadi en la kontoro apud la varma forneto. Li ĉiam enmetis en ĝin lignon, atentis, ke la ligno brulu kaj varmigante sin li legis gazetojn aŭ iun libron.

Se iu venis al la kontoro, kamarado Hajdaŝ tre volonte babilis iomete kun la veninto.

La rusajn laboristojn Hajdaŝ edukis dum la tagmanĝpaŭzoj, tiam li laŭtlegis iun artikolon de la ĉiutagaj gazetoj, aŭ iun artikolon el la "Bloknot Agitatoro" kaj komentis ĝian enhavon.

Dum tiu tempo kamarado Hajdaŝ pritraktis tri aktualajn temojn : la militon en Eŭropo lige kun la germana-sovetia amikecalianco, la sovetunian konflikton kun Finnlando kaj la sovetunian balotkampanjon tiam okazantan.

Koncerne la militon en Eŭropo, Hajdaŝ ĉiam konkludis - laŭ la artikoloj - , ke la anglaj kaj francaj imperiistoj ĉiam minacis kaj ankaŭ nun minacas al la germana popolo, kiu leviĝis por liberiĝi de la malhonorigaj katenoj, kiujn sur ĝin metis la samaj anglaj kaj francaj imperiistoj per la malhonoriga Versajla traktato.

Citante kaj komentante la artikolojn, kamarado Hajdaŝ ĉiam menciis la saĝan politikon kaj la pacajn intencojn de kamarado Stalin, kiu ne lasis sin trompi de la anglaj kaj francaj imperiistoj kontraŭ la germana popolo, kun kiu la sovetuniaj popoloj havas tre bonajn rilatojn, tiujn rilatojn la sovetunia registaro kaj la sovetuniaj popoloj deziras daŭrigi por ĉiam.

Plejofte Hajdaŝ finis siajn paroladojn per jenaj vortoj : "Ĉiu popolo rajtas havi registaron kaj politikan ordon laŭ sia plaĉo kaj laŭ sia deziro, tial, ne devas nin interesi la politika sistemo en Germanio."

La saĝan politikon kaj la pacajn intencojn de Stalin Hajdaŝ motivigis per jenaj faktoj : "Ni liberigis la popolojn en Okcidenta Ukrajno kaj en Okcidenta Blankrusio. Ni ebligis al tiuj popoloj unuiĝi kun siaj gefratoj de Oriento. Kamarado Stalin plenumis la revojn de tiuj popoloj aniĝi al lia ŝtato.

Kiel amiko de ĉiuj popoloj en la mondo, kamarado Stalin akceptis protekti la baltmarajn ŝtatojn kaj popolojn, ke ili ne estu viktimoj de la anglaj kaj francaj imperiistoj" , kaj preskaŭ ĉiam per forta voĉo li finis : "Ni protektas la baltajn ŝtatojn kaj tiamaniere ni certigas al ili ilian liberecon kaj ilian sendependecon."

Rilate Finnlandon, Hajdaŝ estis malpli pacema, verŝajne tio estis la kulpo de la "Blankfinnlandaj banditoj de Manerheim kaj Taner", tiel estis nomita la tiama finnlanda registaro.

Dum tiu tempo la milito kontraŭ Finnlando estis ankoraŭ en la prepara stadio. La sovetuniaj gazetoj ĝis tiam ne informis, ke jam ekzistas "finnlanda registaro", kiu komencos "ofici" en la unua vilaĝo, kiun liberigos

la ruĝa armeo. La gazetoj menciis nur la "pravigitajn postulojn" de la sovetunia registaro rilate Finnlandon. Tiuj pravigitaj postuloj estis jenaj : La sovetunia registaro opinias, ke dum la nuna armiltekniko estas tre danĝere, ke la granda urbo Leningrado situu nur 36 kilometrojn de la finnlanda limo, tial Finnlando devas sian limon malproksimigi de Leningrado. Due, Sovetunio ne povas esti sekura en la haveno de Kronŝtat, se la haveno de Viborg ne estos sub ĝia regado, tial la finnlanda registaro devas transdoni al Sovetunio la urbon kaj havenon Viborg.

Tiuj postuloj (laŭ la opinio de la sovetuniaj gazetoj) ne estas imperiismaj pro jenaj motivoj : Por la ricevotaj teritorioj de Finnlando la sovetunia registaro volas rekompenci Finnlandon per aliaj teritorioj en la norda parto de Sovetunio, kie troviĝas tre valoraj arbaroj. Krome, ĉiu lando rajtas sekurigi siajn limojn laŭ la necesoj en la ekzistanta situacio. Ĉiam, kiam kamarado Hajdaŝ menciis tiun aferon, li finis la parolon per laŭtigita voĉo : "Ni ne volas esti viktimoj, kaj se la blankfinna bandita registaro rifuzas akcepti niajn proponojn, tio signifas, ke ĝi ne volas respekti niajn pacajn intencojn, sed ni trovos sufiĉe da rimedoj por sekurigi nian landon laŭ niaj bezonoj ! Do, kamaradoj ! tio estas la saĝa kaj la pacema politiko de kamarado Stalin."

La tria temo, kiun Hajdaŝ pritraktis dum la manĝpaŭzoj koncernis la balotojn. Unu el tiuj paroladoj mi konservis en la memoro, kaj ĉi tie ĝi estas laŭvorta : "Kamaradoj ! En ĉiuj kapitalistaj landoj, la laboristoj havas aŭ limigitan voĉdonrajton, aŭ ili havas neniajn voĉdonrajtojn. Sed neniu kapitalista ŝtato permesos elekti laboristan reprezentanton por la parlamento. Ĉe ni, en Sovetunio, ĉiu laboristo kaj ĉiu kamparano havas la rajton voĉdoni kaj ankaŭ la rajton por mem esti elektita.

En la kapitalistaj landoj la voĉdonrajto dependas de la posedata riĉaĵo, ekzemple : posedanto de malgranda fabriko aŭ posedanto de malgranda magazeno havas rajton nur por unu voĉo. Posedanto de pligranda fabriko havas la rajton por du voĉoj. Riĉeguloj, aŭ posedantoj de grandaj bienoj, havas la rajton por tri kaj eĉ por pli da voĉoj, la laboristoj kaj kamparanoj havas la rajton maksimume por nur unu voĉo, aŭ nenian rajton havas por voĉdoni. Ĉe ni, ĉiuj estas egal-

rajtaj. Ĉiu homo havas la rajton nur por unu voĉo, sendepende ĉu laboristo, ĉu kamparano, ĉu intelektulo, ĉu ministro, eĉ kamarado Stalin ne havas pli da rajto ol por unu voĉo.

Sed la plej malrajtigitaj en la kapitalistaj landoj estas la virinoj, ili havas nenian balotrajton. Alie estas ĉe ni en Sovetunio : ĉiuj virinoj de la dekokjara aĝo havas la samajn rajtojn, kiujn havas la viroj.

Do ni povas konstati, ke ĉe ni estas la vera kaj la plej alta demokratio."

***

Post kelksemajna laborado en la kooperativo ni konstatis, ke nia enspezo povas atingi maksimume 10-12 rublojn tage. Tiu sumo povis sufiĉi por malabunda nutraĵo. Por aĉeti iun ajn vestaĵon oni ne povis eĉ revi.

Ni volis, ke la kooperativestro pagu al ni por la farita laboro, ĉar ni volas serĉi alian laboron. La kooperativestro rifuzis liberigi nin de la laboro kaj postulis, ke ni nepre daŭrigu la laboron en la kooperativo. Ni dume reiris al la laborejhalo, sed ni ne volis labori.

La kooperativa estro baldaŭ venis al ni kaj diris : "Ĉu vi scias, kamaradoj, ke ĉe ni oni ne strikas ?" Lia parolmaniero evidentigis minacon kontraŭ ni, al kiu ni ne estis alkutimigitaj kiel la sovetuniaj homoj kaj ni venis en vortkonflikto, respondinte : "Vi nin ne aĉetis, se la laboro al ni ne konformas, ni faras nenian krimon, se ni volas serĉi alian por ni pli oportunan laboron."

La kooperativa estro vokis nin al la kontoro, pagis al ni por nia laboro kaj diris : "Memoru, kamaradoj, ne daŭros longe kaj vi venos al mi ree ."

Kun la rifuĝintoj amikiĝis diversspecaj "politrabotnikoj" kaj aliaj partifunkciuloj. Dum la konversacioj ili kondutis tre ĝentile. Ili tre atente aŭskultis niajn plendoj, precipe demandis ili pri Polio kaj nin esperigis, ke en Sovetunio oni povas ankaŭ vivi tre bone, necesas nur alkutimiĝi al ĝia vivmaniero.

Inter tiuj partifunkciuloj estis ankaŭ administrantoj de diversaj laborentreprenoj ; se ili aŭdis, ke iu rifuĝ-

into plendas pri sia laboro, aŭ pri salajro, ili tuj proponis laboron en siaj entreprenoj, promesante la plejbonajn kondiĉojn kaj altajn enspezojn. La rifuĝintoj ŝanĝis la laborlokojn, veturis de unu urbo al alia urbo, sed ĉie spertis la samajn elreviĝojn.

La rusaj laboristoj parolis al ni kiel gepatroj : "Kamaradoj, infanoj, ne serĉu feliĉon, ne ŝanĝu viajn laborlokojn, vi nenie trovos pli bonajn. En Sovetunio estas ĉie la samaj vivcirkonstancoj. Precipe pri Polio vi ne devas rakonti, pro tiaj babiladoj vi povas sperti malagrablaĵojn, kiujn vi eĉ ne povas imagi."

Sed neniu rifuĝinto atentis la avertojn de la rusoj. Ni nek povis nek volis konsenti, ke ni devas labori por salajro, kiu ne sufiĉas por normala nutraĵo.

Ankaŭ mi kaj mia laborkamarado estis "viktimoj" de tiuj feliĉserĉoj. En la sama tago, kiam ni ĉesis labori en la kooperativo "Ruĝa Martelo", ni renkontis en la restoracio dum la vespermanĝo homon de la najbara urbeto Bober. Li prezentis sin sekretario de la partia grupo en tiu urbo. Al Krupki li venis por partopreni regionan partikonferencon.

Tiu sekretario instigis nin veturi kune kun li al Bober, kie li prizorgos por ni bonan laboron kaj tre bonan salajron. Por esprimi al ni sian simpation, tiu sekretario invitis nin al komuna manĝado pagita de li. Poste li invitis nin al la kinejo, ankaŭ je lia kosto kaj malfrue vespere ni forveturis sur kamiono al Bober, situanta dekdu kilometrojn de Krupki.

De neniu domo estis videbla ia ajn lumo. Nur mezo de la granda urboplaco estis iom lumigita de pendanta lanterno, kies lumigita cirklo impresis iom mistere, kiel sur tombejo.

La al ni promesitan fortunon en la mallumo ni ne povis vidi, sed post la surterigo de niaj kruroj ni spertis malagrablan koton. Kiam ni demandis la sekretarion, ĉu ili ne havas en Bober elektran lumon, li respondis : "Ni ricevos en la estonteco ankaŭ elektran lumon, ni klopodas pri tio de kelkaj jaroj. Sed estu certaj, ke ĉe ni estas pli bone sen elektra lumo ol en Krupki kun elektra lumo."

La sekretario frapis en unu fenestron, vekis la dommastrojn, maljunajn, judajn geedzojn. Ili estis parencoj al lia edzino, kaj tiamaniere ankaŭ liaj parencoj, kvankam li

estis "pursanga" ruso. Li komisiis al ili tranoktigi nin kaj adiaùante nin, li diris, ke ni povos lin renkonti je la deka horo matene en la kontoro de la kooperativo "Mebla Fabriko".

Matene la dommastroj gastigis nin per matenmanĝo kune kun ili, ĝi konsistis el terpomoj kuiritaj en la ŝeloj kaj teo kun sukero. Tiun sukeron - ili klarigis al ni - ili ricevis kiel donacon de sia filo, kiu loĝas en Kiev, por la festotagoj de la revolucia datreveno, t.n. "Oktiaberskoje". Ili estis tre fieraj pri sia filo. "Iam li estis kvazaù ŝuisto, nun li estas inĝeniero en la ĉefurbo de Ukrajno." Kiam ni komencis demandi pri detaloj de iliaj vivkondiĉoj, ili iĝis malparolemaj, ili diris nur : "Oni devas esperi."

Je la deka horo matene ni renkontis "nian sekretarion" en la "Meblo-kooperativo". Li prezentis al ni la kooperativan administranton, kiu demandis pri niaj metioj. Aùdante, ke ni estas domfarbistoj, li esperigis nin : "Vi havos ĉe ni multe da laboro, sed post kelkaj monatoj, dum somero, kaj nun vi devas labori ĉe radfarado." Ni konsentis, alian elekton ni ne havis. Ni ankaù nenion sciis pri nia nova metio, kaj ni ne havis kaùzon ne esti kontentaj. Ĉar jam estis tagmezo, ni interkonsentis komenci la laboron venontan tagon.

Post eliro el la kontoro mi volis aĉeti kelkajn necesaĵojn. En la urbeto estis du magazenoj. Mi eniris en unu kaj demandis : "Ĉu vi havas eble pecon da sapo, tualetan?" "Jes", respondis la vendistino, dika judino, eble ne tiom dika, sed envolvita en multe da dikaj vestoj.

- Do bonvolu doni al mi ian sapon.
- Sed sapon ni ne havas.
- Vi ja antaù minuto diris, ke vi havas sapon.
- Nu jes, ĝenerale ni havas ankaù tualetan sapon, sed nun ni ne havas tian.
- Do kiam vi havos ? La vendistino movis la brakojn kaj respondis :
- Tion mi ne povas diri al vi, tion mi ne scias mem.

Ĉar la sapo, kiun mi havis, preskaù finiĝis, spite, ke per multe da lavado mi dum tiu tempo ne pekis, mi petis ordinaran sapon. La vendistino respondis, ke ankaù ordinaran sapon ŝi ne havas.

- Do kie mi povas aĉeti tiun artiklon ? Ĉu en la dua vendejo ili havas sapon ?

La vendistino movis la kapon kaj respondis, ke ankaŭ en la dua vendejo ili nun ne havas sapon.

La tuta konversacio pri la neokazinta komerco min iom amuzis, sed la problemo ŝajnis al mi tre grava. Mi estis ankoraŭ tro naiva por scii, ke oni povas vivi ne uzante sapon. Verŝajne tion rimarkis ankaŭ la vendistino, ŝi komencis min esperigi : "Mi aŭdis, ke estis en Minsko pasintan semajnon, povas esti, ke oni liveros sapon al ni, certa pri tio mi ne estas, sed post iom da tempo ni ricevos sapon". Rezignintе pri la sapo, mi demandis : "Ĉu mi povas aĉeti kajeron ?"

- Ho, tion ni absolute ne havas.

- Do, kie mi povas aĉeti kajeron ? La vendistino respondis per indiferenta voĉo : "Nenie."

Havigi al mi kajeron ŝajnis al mi afero grava. Kiel oni povas vivi sen iu ajn skribpapero ? Mi demandis tre serioze : "Kion oni faras, se iu volas havi kajeron ?" La vendistino iomete ridetis kaj respondis trankvile, same indiferente kiel antaŭe : "Neniu tion devas havi."

- De kie la infanoj prenas kajerojn por lerni ?

- La infanoj ricevas kajerojn en la lernejoj.

Pro mia naiveco mi daŭrigis la demandojn. "Diru al mi tamen, se iu plenaĝulo volas ion skribi, kion li faras por ricevi kajeron aŭ aliajn similajn paperojn ?"

- La plenaĝuloj ne skribas.

Dum nia interparolo estis en la vendejo junulo. Verŝajne li taksis min needukita homo, kiun oni povas renkonti nur en la kapitalistaj landoj. Li proksimiĝis al mi kaj diris : "Kion vi ne povas kompreni, la infanoj ja ricevas kajerojn en la lernejoj, la plenaĝuloj ne skribas, por kio do oni havu en la magazenoj kajerojn ?" Lia klarigo estis eldirita tre serioze kaj impresis, ke fakte pravas li, ne mi.

***

Venontan tagon, mi kun mia laborkunulo Moniek venis al la "Mebla Kooperativo" lerni la novan metion, fari lignajn ĉarradojn.

La ĉefa laborhalo estis aranĝita en iama juda preĝejo; kompreneble, ke de la iamaj relikvoj ne restis eĉ postsigno.

En ĝi oni faris la radojn. En la najbaraj ĉambroj oni produktis ŝrankojn kaj matracojn. Verŝajne la juda preĝejo estis iam "plialte taksita" ol la rusa ortodoks-kristana, la rusa preĝejo servis kiel provizejo de iaj rubaĵoj, kvankam ĝi estis masiva, el brikoj pompa konstruaĵo.

La ŝranko-produktado prosperis malbone, ĉiam mankis iuj materialoj, iam mankis bretoj, iam mankis najloj, iam mankis seruroj, aŭ pendigiloj.

Pli malbone prosperis la matracproduktado. Por la matracoj plejofte mankis la tolaj kovraĵoj; la kaŭzo de tiu manko estis, ke la kooperativa administrantaro foruzis la ricevitan tolon por viraj ĉemizoj, por roboj, aŭ por aliaj vestaĵoj. Nur la radproduktado okazis regule.

Kiam venis al la kooperativo ĉ. dudek rifuĝintoj, mankis por ili laboriloj. Nia laboro estis preskaŭ nur la alportado, forportado kaj transportado de aĵoj necesaj kaj malnecesaj, sed plejparte ni nur babiladis kaj ŝercadis pri nia sorto.

Iun tagon oni sciigis al ni, ke vespere ni devos ĉeesti kunvenon pri tre gravaj aferoj. En la granda laborhalo estis starigita longa tablo, kovrita per ruĝa tuko. La lumigiloj konsistis el tri petrollampoj. Kolektiĝis ĉ. kvardek personoj, pli ol duono estis la rifuĝintoj. La tagordo konsistis el tri punktoj :

1. Prelego pri la balotoj.
2. Akcepti aŭ "malakcepti" la kandidatojn por la elektado.
3. Tiu punkto koncernis nur la rifuĝintojn : ĝeneralaj informoj pri ĉiutagaj aferoj.

Antaŭ ol la prezidanto donis la voĉon al la preleganto, li deklaris : "Vi kamaradoj-rifuĝintoj devas pli atenti la prelegon ol la ceteraj ĉeestantoj. La sovetuniaj civitanoj scias tiujn aferojn sufiĉe bone, sed vi estas homoj venintaj el la kapitalista Polio kaj nun vi havas ĉe ni la rajton voĉdoni. Estas do necese, ke vi ricevu scion pri nia ŝtatsistemo, pri la ŝtatsistemo de nia socialista, proleta patrio."

Ankaŭ la preleganto, en siaj unuaj vortoj, konsilis al ni, ke estas por ni ne nur deŝirinde sed eĉ tre grave

studadi la sovetunian konstitucion, t.s. la stalinan konstitucion. Ni ekscios en ĝi pri aferoj tre interesaj, pri kiuj ni ne povis scii en la kapitalista Polio. Sed ĉar tio estas longdaŭra studado, li klarigos al ni tiujn partojn, kiuj estas por ni necesaj jam nun scii, ĉar ni devas voĉdoni kaj elekti la diversajn sovetiajn instancojn.

La prelego enhavis jenon : "Sovetunio konsistas (tiam konsistis) el dek unu respublikoj. Ĉiu respubliko havas sian propran parlamenton, sian propran registaron, siajn proprajn leĝojn kaj sian propran juĝistaron. Kelkaj niaj respublikoj situas en Eŭropo kaj kelkaj en Azio. La plej grava respubliko estas la Rusa, ĝi estas teritorio la plej granda. En ĝi ni havas nian ĉefurbon Moskvo, tie estas la sidejo de nia tutsovetia registaro kaj la ĉefaj oficejoj. Nia respubliko, en kiu ni loĝas, estas la Blankrusa kaj nia ĉefurbo estas Minsko. Niaj najbaraj respublikoj estas la Ukrajna, ĝia ĉefurbo estas Kievo, kaj la dua najbara respubliko estas la Rusa. En Azio ni havas jenajn respublikojn : Kazaĥa, Turkmena, Uzbeka, Kirgiza, Gruzina, en ĝi estis naskita nia Stalin, Armena kaj Azerbajĝana. Krom tiuj memstaraj respublikoj ekzistas kelkaj aŭtonomaj regionoj, kiuj estos respublikoj en estonteco.

Ĉiuj tiuj respublikoj unuiĝis libervole kaj formis la komunan Sovetunion.

Krom la ĉiulandaj parlamentoj ekzistas ankaŭ supera parlamento, elektita per la voĉdono de la tutsovetia loĝantaro, kaj ankaŭ tutsovetunia registaro. Ĉe ni ankaŭ ĉiu urbo kaj ĉiu regiono elektas siajn lokajn konsilantarojn. Ĉe ni rajtas voĉdoni ĉiu viro kaj ĉiu virino ekde la dekoka jaraĝo.

Voĉdoni ĉe ni en Sovetunio estas ne nur devo, sed ankaŭ honoro de ĉiu civitano. Vi gekamaradoj-rifuĝintoj devas opiniivin honorataj voĉdoni kune kun ĉiuj civitanoj de Sovetunio.

Mi kredas, ke malgraŭ via mallonga estado en Sovetunio vi jam akiris la necesan komprenon por plenumi vian devon dum la nunaj elektoj kaj ke vi estos bonaj, fidelaj kaj plenkonfidaj sovetiaj civitanoj en la estonteco.

Dum la nuna kunveno ni proponas unu kandidaton por la komunuma konsilantaro, unu kandidaton por la blankrusa parlamento kaj unu kandidaton por la tutsovetia parlamento.

Ĉe ni en Sovetunio proponas kandidatojn diversaj organizaĵoj, laboristoj en la kooperativoj, laboristoj en la fabrikoj, kamparanoj en la kolĥozoj, ktp. Kompreneble, la kandidatoj devas esti akceptitaj de la partio, tio signifas de nia registara partio, kiu ĉe ni en Sovetunio decidas pri ĉiuj aferoj.

En la dua punkto de nia hodiaŭa kunveno oni diros al vi la nomojn de la kandidatoj kaj okazos akcepto de tiuj, kiujn ni elektos per nia voĉdonado."

Post tiu prelego la prezidanto demandis, ĉu iu havas demandojn. Ĉiu silentis. La prezidanto demandis duan fojon : "Ĉu vi kamaradoj-rifuĝintoj ĉion komprenis ? Eble estas io por vi neklara ? Ne hontu, vi ankaŭ ne devas timi, ni volonte respondos al ĉiuj viaj demandoj, ni tre volonte klarigos al vi pri ĉiuj nekomprenataj aferoj."

Post kelkminuta silentado stariĝis "kuraĝulo"-rifuĝinto kaj diris : "Se ekzistas nur unu kandidato, oni neniam povas scii, ĉu la voĉdonantoj fakte deziras tiun kandidaton, aŭ oni voĉdonas por li, ĉar alia kandidato absolute ne ekzistas."

La sidantoj ĉe la tablo rigardis reciproke unu la alian rideteme. Pli da demandoj ne estis. La preleganto stariĝis kaj demandis : "Nu, kion vi, kamaradoj-rifuĝintoj, opinias pri la demando de via kamarado ?"

Neniu havis la kuraĝon subteni lin malkaŝe, neniu havis la intencon lin malpravigi, - neniu ion respondis.

La kunvenprezidanto petis ĉe la preleganto, ke li volu respondi.

"Mi vidas, ke devas daŭri iom da tempo, ĝis vi, gekamaradoj, komprenos ĉion, kiel ni sovetuniaj homoj, sed mi ne miras pri vi. Vi ĵus venis el la kapitalista lando kaj vi ĝis nun ne kapablas pensi "sovete".

Do, ĉe ni en Sovetunio estas kutimo ne fari malnecesan laboron, ekzemple: se ĉiuj organizaĵoj, ĉiuj laboristoj en la fabrikoj kaj ĉiuj kolĥozanoj kaj ankaŭ la partio akceptas la samajn kandidatojn, kial ni havu ankoraŭ aliajn kandidatojn ? Ni devas elekti nur unu deputiton; se ĉiuj konsentas, ke estu elektita la koncerna homo, ni ne devas havi aliajn kandidatojn. Tiamaniere ni ŝparas tempon, kiun ni bezonas por plimultigi nian produktadon. Nur en la kapitalistaj landoj, kie oni

malmulte laboras, oni povas foruzi multe da tempo por la balotbataloj inter diversaj kandidatoj. Ĉe ni en Sovetunio oni aranĝas ĉion racie, organizite, sen perdo de tempo, unuvorte laŭ soveta metodo, pro tio ni superas la kapitalistajn landojn. Ĉu nun vi komprenis ?"
- Jes! Jes! ni ja ĉion komprenis.

Laŭ la dua punkto de la tagordo ni bezonis akcepti (aŭ "malakcepti") la proponitajn kandidatojn. Laŭ la soveta balotleĝo la kandidatoj devas ĉeesti la balotkunvenojn, prezenti sin antaŭ la voĉdonantoj, rakonti siajn biografiojn, unuvorte, la voĉdonanto devas scii kiun li, aŭ ŝi elektas. Se la kandidato ne povas ĉeesti la balotkunvenojn, estas necese, ke la biografio de la kandidato estu rakontata aŭ laŭtlegata.

La biografioj de du kandidatoj, unu por la supera parlamento, kaj unu por la blankrusa parlamento, estis laŭtlegitaj kaj unuanime akceptitaj. La kandidato por la komunuma konsilantaro ĉeestis la kunvenon, li estis kamarado Gureviĉ, la kooperativa administranto kaj la prezidanto de la kunveno. Li do povis mem rakonti sian biografion.

Gureviĉ rakontis sian biografion sufiĉe detale, kie li estis naskita, kiuj estis liaj gepatroj, kie li lernis, kie li laboris ĝis li estis elektita por administri la kooperativon. En sia biografio li ne menciis iujn heroecojn, nek iujn specialajn meritojn, nek iujn intelektajn aŭ aliajn atingaĵojn.

Kiam Gureviĉ finis rakonti sian biografion, stariĝis lia prezidanstataŭanto kaj diris : "Kamaradoj! Mi opinias, ke kamarado Gureviĉ estas ĝusta kandidato kaj meritas, ke ni akceptu lin kandidato por la komunuma konsilantaro en Bober. Do, kiu akceptas kamaradon Gureviĉ kiel nian kandidaton al la komunuma konsilantaro en Bober levu la manon." Ĉiuj levis la manojn kaj la prezidanto eĉ nombris ilin.

"Kiu estas kontraŭ, ke ni akceptu kamaradon Gureviĉ kiel nian kandidaton por la komunuma konsilantaro en Bober levu la manon." Neniu kontraŭis.

"Kiu detenis sin voĉdoni por kamarado Gureviĉ kiel nian kandidaton por la komunuma konsilantaro en Bober levu la manon." Neniu levis la manon.

Do, mi anoncas, ke kamarado Gureviĉ estis unuanime akceptita de la laboristoj en la Mebla Kooperativo kiel kandidato

por nia komunuma konsilantaro en Bober." La sidantoj ĉe la tablo eĉ aplaŭdis, aplaŭdis kelkaj en la halo.

La tria punkto, speciale por ni, rifuĝintoj, sekvis per parolado de la tria aŭ dua sekretario de la regiona parti-komitato. Li diris jene :

"Gekamaradoj ! Vi devas forgesi vian iaman Polion kaj precipe vi ne babilu pri ĝi tiom multe. Polio ĉesis ekzisti por ĉiam ! Nun vi estas en Sovetunio kaj vi devas vivi kiel la ceteraj civitanoj en nia lando. Komence tio estos por vi iom malfacila. Sed vi devas alkutimiĝi. Ĉefe, ke vi forigu de viaj mensoj, ke vi iam reiros al Polio.

La malfacilaĵoj ricevi nutraĵojn kaj vestaĵojn estas nur portempaj. Ĉe ni ĉiam estis sufiĉe da nutraĵo kaj ni havos sufiĉe da nutraĵo en la venontaj semajnoj. La nuntempan mankon kaŭzis : unue, ke al la regiono venis kelkmil homoj rifuĝintoj, kiujn ni ne antaŭvidis, kiam ni planis la prizorgadon de nutraĵo por la regiono. Due, ni mobilizis la armeon en Blankrusio kontraŭ la sinjoraĉan Polion kaj ni devas tiun armeon nutradi ĝis alvenos por ĝi nutraĵo el la ĉefaj militprovizejoj. Ni devas ankaŭ sendi nutraĵon al la lokoj de la iama Polio, sed ne daŭros longe kaj ĉe ni estos havebla ĉio, same kiel antaŭe. Jen sidas inter ni la sovetaj homoj kaj ili povas atesti, ke ni havis sufiĉe da manĝaĵo ĝis nun."

La parolanto direktis demandon al la rusoj : "Diru vi, ĉu estis ĝis la milito ĉe ni manko de nutraĵo kaj vestaĵoj, aŭ ĉu ni havis ĉion sufiĉe ?" Ĉiuj rusoj preskaŭ komunvoĉe respondis, ke "ĝis la milito ni havis ĉion sufiĉe." " - Do vi povas konvinki vin, ke mi ne mensogas. Do mi konsilas al vi, ke vi laboru honeste, serioze, ĉion ceteran por vi prizorgos la partia regionkomitato. Se iu inter vi havas iujn plendojn, diru pri tio al la "kultrabotniko", aŭ al la sekretario de la partia grupo, kiu informos pri viaj plendoj la regionan parti-komitaton."

Kiam la parolinto finis sian prelegon, unu petrollampo eligis la lastajn flamojn, ĝia najbara lampo komencis sekvi la ekzemplon.

***

Laŭ la promesoj de la parti-sekretario devus esti iom post iom sufiĉe da nutraĵo, sed okazis la malo. Kiam ni venis al Bober, oni povis aĉeti matene en la restoracio bulkojn, aŭ ian kompoton el sekigitaj fruktoj, unufoje eĉ pecon da kuirita viando, kvankam de nekonata speco. Sed iom post iom oni povis aĉeti en la restoracio matene nur ducent gramojn da nigra pano kaj teon, ofte sen sukero. La tagmanĝoj konsistis el iom da supo kaj iom da legomoj. En ambaŭ magazenoj oni povis aĉeti je nelimigita kvanto salon, alumetojn, ian surogatkafon, kiu eĉ neniun interesis kaj sekan mustardon en duonkilogramaj paketoj.

Al ĉiuj mankoj ni alkutimiĝis, almenaŭ ĝis certa grado. Pravis la "kultrabotnikoj", kiuj al ni predikis alkutimiĝon. Speciale malsataj ni ne estis, kvankam nia manĝaĵo estis plejparte la nigra pano.

Problemo por la fumantoj estis akiri la fumeblaĵon kaj al tiuj homoj apartenis ankaŭ mi, mia edzino kaj mia laborkunulo Moniek. De tempo al tempo ni sukcesis ricevi de la rusoj - almozpetante - iom da "maĥorko", sed ankaŭ ili ne havis multe da tiu varo.

Kiam ni menciis al niaj "prizorgantoj" la mankon de fumeblaĵo, ili respondis, ke en la regionurbo Krupki oni povas nun aĉeti fumeblaĵon kiom oni nur deziras.

Mi kaj mia laborkunulo Moniek decidis, ke dimanĉe ni piediros al Krupki kaj aĉetos tie fumeblaĵon. Niaj kvazaŭ-prizorgantoj ankaŭ diris al ni, ke en la vendejo ĉe la stacidomo en Bober, situanta kvin kilometrojn de la urbeto, oni povas aĉeti cigaredojn, sed multekostajn.

Post nia decido havigi al ni fumeblaĵon en Krupki ni estiĝis esperemaj - ni do fumos post kelkaj tagoj.

Dimanĉe ni ellitiĝis pli frue ol kutime. En la restoracio ni estis la unuaj. Post la normala matenmanĝo de ducent gramoj da nigra pano kaj teo, ni ekmarŝis kuraĝe, kvazaŭ ni havus la venkon certigitan.

Laŭ nia plano ni ja fumos post la unuaj kvin kilometroj. Ni intencis aĉeti ĉe la fervoja stacio unu paketon da multekostaj cigaredoj kaj en Krupki ni aĉetos tabakon kaj "maĥorkon", ke sufiĉu por longa tempo.

Estis matenkrepusko, iomete neĝadis. De la vilaĝkabanoj, laŭlonge de la vojo, apud neĝkovritaj kampoj neniu homo estis videbla. Nur de tempo al tempo bovina blekado per malgaja

voĉo perturbis la kvietecon de la naturo. Irante kaj babilante, ni ekvidis la stacidomon de Bober. Spite la fruan matenon, staris ĉe la magazeno multaj homoj, plejparte virinoj. "Kion oni donas ? " ni demandis. "Ĥamsa". Vorto, kiun ni aŭdis la unuan fojon. "Kio estas ĥamsa ?" La ĉirkaŭstarantaj virinoj malfermis la saketojn kaj montris al ni la ĵus ricevitan varon. Ĥamsa estas malgrandaj salumitaj fiŝetoj, pli malgrandaj ol pilĉardoj. La virinoj tuj proponis al ni tion gustumi, laŭ ilia opinio tio estas tre bongusta manĝaĵo, kiun oni povas aĉeti malofte.

"Ĉu ili havas en la magazeno cigaredojn ?" La homoj movis la brakojn, respondis : "Eble, ni ne scias." En la magazeno estis plenplene da homoj. Malantaŭ la vendotablo staris gevira paro, ili vendis po du kilogramojn al ĉiu persono la sole posedatan varon, ĥamsa. La prezo estis ĉirkaŭ du rubloj por kilogramo. Estus senutile demandi la vendistojn pri cigaredoj, kiam ili estas okupataj kun multaj atendantaj homoj, kiuj venis antaŭ ni. La nura eblo havigi al si fumeblaĵon estis trapasi la ceterajn sep kilometrojn al Krupki.

Ĉiuj diverskarakteraj "politrabotnikoj" havas komunajn ecojn, interalie, ili ĉiam ĉion promesas, eĉ ne atentante pri kio oni parolas al ili, kaj ili plejofte ruzvulgare mensogas. Inter ili neniu kredas sian kamaradon, alian "kultrabotnikon", sed ni rifuĝintoj, spite ke ni havis iom da "soveta sperto", estis naivaj kompare al ili. Kiam la "kultrabotnikoj" rakontis al ni, ke ĝis la milito oni povis aĉeti en Sovetunio nutraĵon kaj vestaĵojn kiom oni nur volis, ni jam sciis, ke ili mensogas. Sed ni ne imagis, ke ili mensogas, kiam ili diris ke en la najbara urbeto oni povas aĉeti fumeblaĵojn.

Estante proksime de Krupki, ni renkontis konaton, ankaŭ rifuĝintoŋ. Post la unuaj salutvortoj, ni diris al li : "Aŭdu, unue ni volas, ke vi donu al ni ion por fumi, indiferente kion, ni pli ol semajnon ne fumis."

La konato rigardis nin iomete kaj diris : "Vi volas, ke mi donu al vi ion por fumi, eĉ se vi volus pagi en Krupki dek rublojn por unu cigaredo, vi ĝin ne ricevus, mi ne memoras la daton, kiam mi lastfoje fumis."

"Sed en Bober oni diris al ni, ke en Krupki oni

povas aĉeti fumeblaĵon kiom oni nur volas." Nia konato ekridegis. "Kaj en Krupki oni diras, ke en Minsko estas aĉeteble multe da tabako kaj cigaredoj." Ni ja ridis kune. Tiel fiaskis nia 24-kilometra piedira "ekspedicio" por havigi al ni fumeblaĵon. Kiam mi revenis tre malfrue hejmen al Bober, la unuaj vortoj de mia edzino estis : "Nu, fine vi jam venis kaj mi povos fumi ian cigaredon."

***

"Per nia regadsistemo ni superas la kapitalistajn landojn en la politika senco. Ni devas celi per sepmejlaj paŝoj superi la kapitalistajn landojn ankaŭ en la ekonomia senco." Stalin.

Tiuj "sepmejlaj paŝoj" estis la unua kvinjara plano. Kiam tiu plano estis anoncita, ĝin akompanis giganta propagando promesanta, ke post la realigo de tiu plano, Sovetunio estos transformita je la plej potenca industria lando en la mondo.

Post la unua kvinjara plano sekvis multaj kvinjaraj planoj. Ĉiuj ili celis superi la kapitalistajn landojn en la ekonomia senco. Iom post iom ĉesis en la kapitalistaj landoj la intereso por tiu planpropagando. La vero estas, ke en la tempo de la unua kvinjara plano la loĝantaro en Sovetunio spertis pli da malsato ol dum la revoluciaj jaroj. En la magazenoj preskaŭ nenio estis aĉetebla. En la fabrikoj estis aranĝitaj kuirejoj kaj kuiritan manĝaĵon ricevis nur la laboristoj en la koncernaj fabrikoj, la kvanto kaj la kvalito de tiuj manĝaĵoj estis minimumaj. Kiel aldonrekompencon por la farita laboro, tre multaj laboristoj en la fabrikoj ricevis honoriglegitimilojn, "Udarnik", tio povas signifi "multeproduktanto".

Multaj laboristoj dume forlasis la urbojn kaj preferis labori en kolĥozoj ĉe la terkulturado, kie oni malpli malsatis. En la okcidentaj aŭ kapitalistaj landoj tiu epoko estis nomita "la sovetia dumpingo". Sovetunio tiam eksportis preskaŭ ĉiujn produktitajn varojn kaj ilin vendis je konkurencprezoj.

Per tiuj "sepmejlaj paŝoj" Stalin celis, unue subfosi la ekonomion en la kapitalistaj landoj por plimultigi la senlaborulojn, kio rapidigus la premisojn por la tutmonda revolucio, due, Sovetunio celis kiel eble plej rapide

ricevi de la kapitalistaj landoj la necesajn industriajn instalaĵojn kaj pliintensigi la "dumpingon".

En multaj urboj de Sovetunio tiam okazis manifestacioj kontraŭ la reĝimo, sed eksterlande tiuj aferoj ne estis konataj. Ĉu Stalin ĉesigis la "sepmejlan paŝadon" ĉar en Sovetunio minacis amasaj ribeloj, aŭ ĉu li komprenis, ke per la dumpingo li ne "subfosos" la tutmondan kapitalismon, tion sciis nur la sovetuniaj regantoj.

En tiu tempo ekzistis ankaŭ vendejoj, en kiuj estis aĉeteblaj ĉiuj nutraĵoj kaj vestaĵoj, sed por juveloj aŭ por eksterlanda kapitalista mono, tion posedis nur unuopuloj, sed ne la popolo. Tiel aspektis la leninisma-stalinisma ekonomia egaleco, en la lando kie la leninistoj jam komplete posedis la regadaparaton.

La komencita unua kvinjara plano kreis en Sovetunio ankaŭ atmosferon de planmanio kaj pli ĝuste planpsikozo. Pri la planoj estas multe skribite en la gazetoj. Pri la plenumo de la planoj okazas ankaŭ nun multaj kunvenoj de laboristoj kaj de diversaj burokratoj je ĉiuj niveloj. Pri la planoj parolas homoj inter si iom serioze kaj iom ŝerce. Sed plenumo de la plano estas traktata kiel tasko minimuma. La ambicio de ĉiuj laborejoj estas la planon superplenumi.

Mi ne posedas la necesan scion pri la teorioj de la sovetunia planado. Mi nur spertis la planplenumon en la praktiko kaj mi ne kredas, ke ekzistas praktikaj ebloj kontroli ĉu iu laborejo plenumis iun planon. Ĵurnalistoj en la kapitalistaj landoj, kiuj verkas artikolojn pri plenumitaj aŭ neplenumitaj laborplanoj en Sovetunio, certe ne imagas ĝis kia grado iliaj artikoloj estas naivaj kaj ridindaj.

En la jaroj 1939-40 la planpsikozo estis ankoraŭ forta. Multaj partianoj traktis tiujn planojn serioze, precipe partianoj de la juna generacio. Pri ekonomiaj problemoj en la praktika senco tiuj partianoj sciis nenion. Por ili ekzistis vizioj por superplenumi la planojn, kiuj ankaŭ donos ŝtatajn premiojn kaj por akiri tion oni devas multe produktadi. Teorie tio estas ĝusta, en la praktiko tiuj aferoj estas komplikaj kaj la primitivaj viziuloj ne kapablis tiujn aferojn mastri.

Se la administrantaro de la "Mebla Kooperativo" ne havis la materialojn por produkti ŝrankojn, neniuj ŝrankoj estis produktitaj. Sed la kooperativo fiksis planon

por produkti ŝrankojn. Por raporti, ke la plano estis plenumita kaj superplenumita, la laborentreprenoj trovas "kromlaborojn", kiuj nenion komunan havas kun la produktado. Ekzemple, la kooperativo "Ruĝa Martelo" sendis homojn por ripari ponton en Krupki kaj pri la "kromlaboroj" estis raportite pli ol estis fakte farite. Se mankas tiuj "kromlaboroj" oni raportas blufojn, precipe la rektaj ŝtataj entreprenoj blufas pri "kromlaboroj".

Kiam en la "Mebla Kooperativo" komencis labori dekkelkaj rifuĝintoj ne daŭris longe, ke la provizo da materialoj por la radfarado elĉerpiĝis pli rapide ol antaŭvidite laŭ la plano. La menditajn materialojn por la radfarado krom la plano la kooperativo ne ricevis. Krome, la laboristoj-rifuĝintoj estis komence rigardataj kun kompato kaj iom atrakcie, sed tio iom post iom ĉesis. La laboro de la rifuĝintoj ne estigis gravajn akirojn, tamen al ili oni devis iom pagi el la kooperativa kaso. La konstantaj laboristoj komencis esti pri tio malkontentaj.

Ankaŭ la "kultrabotniko" same kiel aliaj "kultrabotnikoj" komencis trakti la rifuĝintojn kiel homojn malfacile "edukeblajn". La "kultrabotnikoj" direktis al la rifuĝintoj riproĉojn, ke ili ne estas dankemaj al Sovetunio kaj ke ili daŭre klaĉadas pri Polio, kiu ne ekzistas. Laŭ sia rezonado kiel 'kulrabotnikoj" ili pravis, sed la rifuĝintoj ne rezonadis laŭ la mensoj de la "kultrabotnikoj".

Fine ni povis konstati, ke pravis la administranto de la kooperativo "Ruĝa Martelo", kiu diris, ke ni revenos al li. Vere, ke ankaŭ en la kooperativo "Ruĝa Martelo" mankis de tempo al tempo diversaj materialoj, sed la administrantaro tie iamaniere kapablis trovi iujn laborojn, eĉ kiam estis necese interrompi la produktadon de litoj. Kaj ni reiris al Krupki, al la "Ruĝa Martelo", pli rapide ol ni supozis. Ĉar la administrantaro tie estis interesita, ke ni laboru ĉe ili, ni sukcesis ricevi iom pli altan pagon ol antaŭe.

***

U Ĥ V A L A

****

Ĝis la fino de januaro mia edzino ne laboris. Ŝi scipovis perfekte la rusan lingvon kaj deziris labori kiel instruistino, kion ŝi tre ŝatis. La estraro de la instruista sindikato ne rajtis decidi, ĉu oni konfidu al la eksterlandanino eduki infanojn en la spirito de Sovetunio. Ankaŭ la regiona partikomitato ne rajtis, aŭ eble ne volis pri tio decidi. Fine ŝi ricevis postenon kiel sekretariino de la profesia sindikato en la urbeto Uĥvala, ĉ. 40 kilometrojn de Krupki.

La sindikato havis sian oficejon en la ĉambro de la loka partia grupo. Ĝi havis la pompan nomon "partikabinet" (tiel nomiĝas la partiaj ĉambroj en la tuta Sovetunio). Formale, laŭ la reguloj, sur tia posteno oni havas multe da laboro. Formale la sindikato estas kunrespondeca pri la plenumo de la laborplano kaj la sindikato devas tion atenti. La sindikatoficistoj devas viziti la laborejojn, kolekti la kotizon, ricevi kaj forsendi korespondaĵojn, skribi raportojn k.s. Sed tio estas formale, fakte ŝi laboris nenion. Ŝia ĉefo ruso, la t.n. prezidanto de sindikato, kamarado Bogdanov, mem faris nenian profesisindikatan laboron. Ĉu li ne havis la emon, aŭ ĉu li ne havis la devon tion fari, mi ne scias. Ĉiam li estis for de la urbeto. Li venis hejmen nur por kelkaj horoj, aŭ eventuale por tranokti.

Al la "partikabinet" li venis demandi, ĉu venis por li leteroj.

Iam okazis, ke li restis en la "partikabinet" dum unu aŭ du horoj por babili kaj ĉiam li diris : "Ni devas komenci ian aktivecon en la sindikato post mia reveno." Sed ĉiam li devis baldaŭ forveturi kaj neniam komencis realigi siajn intencojn por la sindikato.

En la ĉambro de "partikabinet" troviĝis duspecaj dokumentoj : dokumentoj de la partio kaj dokumentoj de la profesia sindikato. La dokumentoj de la partio estis lokitaj en bela ŝranko kun vitra pordo, ĉiam ŝlosita kaj ankaŭ sigelita. Malfermita kaj malsigelita estis la ŝranko nur dum la partiaj grupkunvenoj. La profesisindikataj dokumentoj kuŝis en granda kesto, ankaŭ ĉiam ŝlosita. La dokumentoj en tiu kesto estis metitaj sen ordo.

Se kamarado Bogdanov serĉis iun dokumenton dum siaj vizitoj en la "partikabineto", li neniam ĝin trovis.

En alia ŝranko troviĝis kelkdek libroj - la sindikata biblioteko. Por la biblioteko estis ĉiujare asignitaj kelkcent rubloj por aĉeti novajn librojn, sed de kelkaj jaroj neniu nova libro estis aĉetita. La laste aĉetitaj libroj datiĝis de antaŭ 1936. Inter ili ni trovis librojn laŭdantajn la heroecojn de Jeĵov kaj de aliaj partiaj ĉefoj mortkondamnitaj de stalinaj juĝejoj en la jaroj 1936-37. Tiuj libroj devis esti bruligitaj. Ĉu tiuj libroj restis tie pro ies intenco aŭ pro simpla neglekto de la partiaj instrukcioj, mi ne scias. Ĉu kamarado Bogdanov la ricevitan monon por libroj fordrinkis, aŭ elspezis ĝin por aliaj celoj, mi ne scias.

En la "partikabineto" staris ankaŭ du tabloj, unu tre longa, kovrita per ruĝa tuko, ĉirkaŭ ĝi multaj seĝoj kaj unu tablo malgranda. La muroj estis dekoritaj per kelkaj portretoj de la sovetuniaj regantoj kaj granda mapo de Sovetunio. Verŝajne kiel restaĵo de la pasinteco pendis sur la muro afiŝo kun la titolo en germana lingvo " "Rotfront!". Sur la afiŝo, en unu flanko, en koloroj grizaj kaj nigraj, kuraĝe marŝanta homamaso al la direkto rozkolora, en kies fono troviĝis la ruĝa kvinangula stelo kun la sovetunia blazono, martelo kaj serpo. Apud la stelo belaj konstruaĵoj. La rozkoloraj partoj simbolis Sovetunion kaj la grizkoloraj homoj prezentis la proletaron marŝantan al la komunista regsistemo.

Ĉiutage venis al la "partikabineto" purigistino por forigi la polvon de la objektoj, hejtigi la fornon kaj se ŝi havis iom da libera tempo, ŝi iomete babiladis kun la sekretariino - mia edzino. Purigistino en Sovetunio ricevas salajron de cent rubloj monate. Ekzistas iu dekalkulo de tiu sumo, do motivoj por plendi al ŝi ne mankis.

La oficlaskoj de mia edzino konsistis : estadi en la "partikabineto", tie ŝi povis legi, dormi, filozofadi en soleco kaj revi, sed labori nenion. Krom la ĉiutagaj vizitoj de la purigistino, venis de tempo al tempo al la "partikabineto" iu homo demandi pri kamarado Bogdanov kaj tuj foriris. La trankvileco de la sekretariino povis esti daŭrigata.

Kvankam mia edzino havis nur bluflaboron, ŝi tamen

apartenis al la oficista klaso - plisupera. Ŝi havis ankaŭ aron da privilegioj, ekzemple : panon ŝi ricevis ekster la vico, la samo okazis ankaŭ por la manĝaĵo en la restoracio. Ŝi estis invitita al la apotekistaj geedzoj, verŝajne la plej inteligentaj homoj en la urbeto. Ili estis mohikanoj* de la iama bonanima rusa intelekularo.

De tempo al tempo venis al la partikabineto la kuracistino - juna knabino - okazigi kvazaŭ kulturan konversacion. Babiladis kun la edzino la du administrantoj de la magazenoj. Kutime tiuj administrantoj opinias sin tre privilegiitaj. De tiuj magazen-administrantoj ŝi ricevis po peco da sapo je normala prezo, iam ankaŭ paketon da cigaredoj kaj unu fojon eĉ kilogramon da sukero, kompreneble, ŝi devis promesi silenti pri tiu "sekreta bonfarkomerco". Babiladis kun ŝi ankaŭ la partianoj pri "politiko".

Propravole ŝi kompilis katalogon de la libroj kaj propagandis al la lernanta junularo, ke ili prunteprenu librojn kaj legu. Tiuj junuloj komencis legi sufiĉe fervore kaj ĉiuvespere venis kelkaj junuloj ŝanĝi la librojn. Sed ŝi baldaŭ havis klopodojn. Kelkaj legis tre rapide kaj libroj estis malmultaj.

Kiam Bogdanov aŭdis pri la biblioteka agado, li estis tre entuziasmigita. Ĉiufoje kiam li venis al la partikabineto, li ankaŭ menciis, ke estos necese mendi novajn librojn, sed kiam li revenos.

Bogdanov verŝajne raportis al siaj superaj instancoj pri la biblioteka agado de lia sekretariino, ĉar ŝi ricevis aldone al sia salajro 150 rublojn kiel bibliotekistino de la profesia sindikata biblioteko.

Kien kaj por kio Bogdanov forveturis, neniu en la urbeto sciis. Laŭkutime en malgrandaj urbetoj ne mankis pri Bogdanov diversaj klaĉaĵoj, interalie, ke lia patrino servas por li kiel edzino en la seksuma senco, kaj pro tio li post kelktaga forestado de la hejmo revenas por tranokti.

****

* mohikanoj : nomo de indiana tribo, el kiu restas nur malmultaj pluvivantoj (N.d.l.kontrol.)

Komence de marto ĉesis por iom da tempo la litoproduktado en la kooperativo "Ruĝa Martelo" pro manko de ladaj folioj. Mi profitis tiun ŝancon por iri al Uĥvalo renkonti mian edzinon.

Regula persontrafiko inter Krupko kaj Uĥvalo ne ekzistis. Nur la poŝtoficejo havis je sia dispono sledon kun unu ĉevalo kaj ne veturigis pasaĝerojn. Plie, la poŝttransporto okazis du fojojn semajne. Unu tagon daŭris la veturo de Uĥvalo al Krupko, sekvontan tagon okazis la veturo de Krupko al Uĥvalo. Verŝajne, post okdek kilometroj la ĉevalo estis laca ĝis tia grado, ke ĝi devis havi unutagan ripozon.

La sola eblo, ke mi iru al Uĥvalo, estis piediri. Trapasi 40-kilometran neĝkovritan vojon estis sufiĉe laciga afero, tio tamen ŝajnis al mi iom romantika. Ripozi survoje estis risko pro la frosto, mi devis seninterrompe paŝadi kaj paŝadi.

Kiam mi venis al Uĥvalo vespere mi ricevis luksan manĝon de mia edzino. Pro ŝia "privilegiita" posteno ŝi povis havigi al si litron da lakto kaj mi vespermanĝis per sufiĉe da blanka pano kaj varma lakto. Tiam mi diris, ke por ricevi tian manĝaĵon valoris iri la 40 kilometrojn.

En la rusa lingvo estas populara kaj esprimita en diversaj formoj diraĵo : "La unua faras nenion kaj la dua helpas al li". En Uĥvalo mi estis helpanto de mia edzino, kiu kvazaŭ oficis en la "partikabineto". La diferenco estis, ke ŝi ankaŭ ricevis salajron dum mi estis helpanto senpaga. En Uĥvalo mi povis resti du semajnojn. Mi havis ŝparitajn ducent rublojn kaj niaj ĉiutagaj elspezoj estis ĉ. dek rubloj. Du kilogramoj da pano kostis du rublojn, du manĝoj en la restoracio kostis 4-6 rublojn, ni povis eĉ trinki kelkajn glasojn da teo ĉiutage en la restoracio, se estis sukero. Cigaredojn ni ne devis aĉeti, ĉar tio ne estis aĉetebla en Uĥvalo. Nur de tempo al tempo mia edzino ricevis donace iom da "maĥorko", aŭ tabako de iu partiano, kvazaŭ bonfaro al la homo kvazaŭ proksima de la privilegiita klaso.

En Uĥvalo estis al mi proponitaj kelkaj laboroj. Unu eĉ proponis al mi laboron en la kontoro de "Lessovĥoz"-entrepreno, kiu faligis arbojn kaj alveturigis ŝtipojn al la fervoja stacio.

Kiam mi diris, ke mi ne sufiĉe scipovas la rusan lingvon por esti kontoristo, li rigardis min naivulo. "Ĉu vi ne scipovas legi kaj skribi ?" "Nu jes, mi ja povas legi kaj skribi, sed mi tamen scias malmulte da rusaj vortoj." "Tio ne gravas, vi lernos pli bone iom post iom dum la laboro." Kiam mi demandis pri la salajro, li diris, ke tia komencanta kontoristo ricevas ĉ. 150 rublojn monate. Tia salajro estis tro malalta por ke mi fariĝu kontoristo.

Oni proponis al mi laboron en la arbaro kiel ŝarĝisto. Oni devis ŝarĝi ŝtipojn sur sledojn, kiuj estis eltiritaj el la arbaro per traktoroj. Tiu laboro postulis multe da fizikaj streĉoj kaj la salajro ne estis pli alta ol tricent rubloj monate. Tiun laboron faris kamparanoj de la kolĥozoj dum vintro, precipe por ricevi panon, ĉar la ricevita greno en la kolĥozoj ne sufiĉis, ke ili havu panon dum la vintro.

Unu el la "kultrabotnikoj", kiu de tempo al tempo venis al la "partikabineto" trarigardi la gazetojn, estis kamarado Spancer. Li rekomendis al mi laboron en segejo. La pago tie devus esti bona, almenaŭ laŭ lia aserto. Mi iris al la t.n. segejo laŭ la rekomendo de kamarado Spancer.

La horo estis ĉ. la deka matene. Mi renkontis tie la laboristojn sidantajn en ĉambro apud la segejo, tre okupitajn per fervora babilado inter si. Mi demandis pri la brigadisto. Unu el la babilantoj venis al mi. Aŭdinte kion mi volas, li iris kun mi al la laborejo montri la laboron.

La segilo estis movata per elektra kurento kaj mia laboro devus esti meti ŝtipojn sur longan mallarĝan tablon kaj puŝi ilin antaŭen. Tiel la ŝtipoj estis segitaj en tabulojn. Mi opiniis la laboron akceptebla.

- Ĉu mi povas komenci la laboron morgaŭ ?
- Ho ne ! Vi ja vidas, ke la segilo hodiaŭ ne funkcias. Vi povos veni post tri-kvar tagoj.

Ne havante alian okupon, mi reiris al la apuda ĉambro partopreni la babiladon kun la estontaj laborkamaradoj. La laboristoj min demandis pri la vivo en Polio, pri la milito k.c. Junulo demandis : "Ĉu vi scias kio estas Komsomol ?"

- Ho jes, tio estas la komunista junular-organizaĵo.
- Nu, mi estas la sekretario de Komsomol en Uĥvalo.

Li donis al mi la manon kaj diris sian nomon. Post sia prezentiĝo li montris al mi siajn botojn kaj demandis fiervoĉe : "Ĉu ĉe vi en Polio oni povis aĉeti tiajn botojn ?" La botoj estis el la plej ordinara dika ledo.

- Nu jes, oni povis aĉeti tiajn botojn en Polio.
- Kaj kiom kostis tiaj botoj en Polio ?
- Ekzakte mi ne scias kiom tiaj botoj kostis, sed mi supozas, ke inter 40-50 zlotoj.
- Kaj kiom da tempo oni devis labori por tiu mono ?
- En la vilaĝoj la salajroj estis malaltaj, sed en la urboj oni devis labori por tiu mono kvar-kvin tagojn.

Aŭdinte tion, la sekretario foriris de mi. Li komencis paŝadi en la ĉambro. Mi ĉirkaŭrigardis la ceterajn laboristojn. Ĉiuj havis sur siaj piedoj bastŝuojn. La unuura en botoj estis la sekretario de Komsomol. Kiam li venis en mia direkto, mi demandis : "Kiom vi pagis por tiuj botoj ?" "Ili kostas tricent rublojn", fiere sonis lia respondo. Mi ja komprenis. Tiu sekretario volis antaŭ mi fanfaroni pri siaj botoj, ĉar li estas la sekretario de Komsomol en Uĥvalo.

Post tri tagoj mi denove iris al la segejo informiĝi pri la laboro. Mi renkontis la laboristojn, kiel la unuan fojon, sidantajn kaj babilantajn. La brigadisto venis al mi kaj diris : "La segilo ankoraŭ ne funkcias." "Do kiam ĝi funkcios ?" La brigadisto iom pensis kaj demandis : "Eble vi povas akrigi la segilon ?" "Jes", mi respondis, kvankam mia scio pri tio estis, ke iun fojon mi vidis kiel oni tion faras, kaj mi sciis, ke por akrigi segilon oni devas havi fajlilon. "Ĉu vi havas fajlilon ?" "Nu, tio do estas la problemo, ke ni ne havas fajlilon, sed eble vi havas fajlilon ?"

- De kie mi havu fajlilon, mi ja venis el Polio.
- Nu povis do okazi, ke vi kunprenis fajlilon el Polio, ĉe vi fajlilojn oni ja povis aĉeti.

Dum nia interparolo venis laboristo kaj sciigis : "Oni jam alveturigis la panon al la magazeno kaj ni devas iri tien preni nian panon."

Li kolektis po tri rublojn, prenis sakon kaj vokis al si du homojn por preni la panon el la magazeno. Mi supozas,

ke, post kiam la laboristoj ricevis la panon, ili iris hejmen kaj revenis venontan matenon atendi la panon kaj kompreneble iom babiladi. Post interparolo kun la brigadisto li rekomendis al mi portempe trovi alian laboron, ĉar li ne scias, kiam la segilo komencos funkcii.

Estis al mi rekomendita laboro kiel sekigisto. En Rusio ekzistas speco de ŝarĝaŭtomobiloj, kies motoroj estas movataj per betula ligno. Pri la valoro de tiu hejtmaterialo mi nenion scias, sed en Rusio tia materialo estas grava. En diversaj partoj de la lando estas multe da tiu ligno, dum petrolon oni devas alveturigi de malproksime. Por uzadi tian lignon, ĝi devas esti pecigita je longeco de 10 centimetroj, poste ĝi devas esti sekigita en forno. Tiu sekiglaboro estis kvazaŭ facila, sed por facila laboro oni pagas facilan monon, la salajro estis ĉ. 150 rubloj monate kaj por tiu laboro ĉiam mankis volontuloj.

***

Unu vesperon, estante en la kontoro de "Lessovĥoz", mi aŭskultis konferencon de la nova administranto kun liaj kontoristoj. Tio ne estis oficiala kunveno, ĝi havis nur neoficialan informadon pri la laboro. Tiu nova administranto transprenis "Lessovĥoz" por pli bone organizi la laboron. Sub la administrado de la antaŭa ĉefo, "Lessovĥoz" plenumis 43 % de la laborplano. Tiu nova administranto parolis per troigita energio. "Mi estas bolŝeviko ! Vi do tion komprenas, la ĉefa tasko de bolŝeviko estas trovi la ĉefajn erarajn punktojn. Do diru al mi, kie mi devas serĉi la erarajn punktojn en nia laboro."

La ĉirkaŭsidantaj kaj ĉirkaŭstarantaj kontoristoj jesis al ĉio, kion diris la nova administranto - bolŝeviko - ili ne nur konsentis, sed ili ankaŭ rakontis pri diversaj ekzemplaj malbonaj okazintaĵoj dum la lastaj tagoj. Unu estis tre karakteriza : antaŭ kelkaj tagoj la ŝtipŝarĝistoj en la arbaro sendis skribitan raporton, ke ili ne laboris, ĉar la traktoristoj ne venis al iliaj laborlokoj en la arbaro. Dum la sama vespero venis raporto de la traktoristoj, ke ili ne

laboris en tiu tago, ĉar la ŝarĝistoj ne venis al la laboro. Ambaŭ raportoj koncernas la saman tagon, do kiu mensogas ? Eble mensogis ambaŭ brigadoj, sed kion fari kun tiuj du dokumentoj, kiuj estos poste kontrolataj de superaj instancoj ? Kiamaniere la nova administranto solvis la problemon por kapti la ĉefajn erarojn, estis konate fine de la monato. Li forprenis de la laboristoj trionon de la salajroj. Supozeble li rajtis tion fari.

***

La ruzeco de la komunista regado konsistas el tio, ke ili ne nur aranĝis en la lando la inferon sur la tero, sed ili ankaŭ profanas la idealojn, por kiuj batalis kaj pereis homoj kun plej noblaj intencoj de ĉiuj popoloj.

Spite la diversajn filozofiajn kaj politikajn konceptojn en la tutmonda socialista movado, ĉiuj socialistoj opinias, ke la Pariza Komuno en la jaro 1871 estis la unua praktika provo realigi la socian justecon laŭ la socialistaj principoj.

Ankaŭ la Parizan Komunon la komunistoj ne evitis profani. Ili kunigis la datrevenon de la Pariza Komuno kun la Internacia Virina Tago, la okan de marto.

Antaŭ ĉiuj ŝtataj festotagoj, la laboristoj dum specialaj kunvenoj akceptas rezoluciojn por kromproduktado kaj en tiu kunligo iuj laboristoj ricevas "premiojn". La samo okazas antaŭ la oka de marto por la Internacia Virina Tago. En la paroladoj dum virinaj kunvenoj estas menciate, ke la virinoj batalu por akiri kompletan politikan, ekonomian kaj socian rajtojn, same kiel la viroj. En Sovetunio tiuj egalrajtoj estas akiritaj, sed en Sovetunio okazas tre multe da kunvenoj kaj tre multe da propagandaj paroladoj por plimultigi la produktadon kaj tiamaniere honorigi la virinojn.

En la jaro 1940 multaj edzoj jam estis mobilizitaj al la armeo kaj estis necese iom flati al la "ruĝarmeaninoj" - edzinoj de la mobilizitoj kaj mobilizotoj. Ankaŭ en Uĥvalo la propagando por la Internacia Virina Tago okazis per sufiĉe da pompo.

Dumtage okazis kunvenoj en ĉiuj laborejoj. Kamarado Spancer venis antaŭ vespero al la "partikabineto" kaj rakontis, ke hodiaŭ li prezidis tri kunvenojn. Laŭ lia mieno

oni povis vidi, ke li taksis la prezidadon de tiuj tri kunvenoj tre peniga laboro. Mi persone partoprenis en tiuj preparoj per skribo de afiŝoj kaj sloganoj sur ruĝkoloraj tapetoj. Por la vespero estis anoncita la ĉefa festo en la restoracio - paroladoj kaj la plej grava kaj alloga festa vespermanĝo.

Ĉeesti tiun feston rajtis ĉiuj virinoj senescepte kaj viroj nur speciale invititaj. Mi havis la rajton ĉeesti tiun feston laŭ du motivoj : unue, ke mi skribis la afiŝojn, due, kiel edzo de la oficistino en la regiona profesia sindikato kaj bibliotekistino en tiu sindikato.

La domo, en kiu troviĝis la restoracio, ne diferencis ekstere de aliaj domoj en Uĥvalo : konstruaĵo el dikaj ŝtipoj vertikale metitaj, super la enirpordo pendis portreto de la alta tutlanda ĉefo.

Interne tiu restoracio pli similis stalon ol restoracion - treege granda, la kelkaj fenestretoj ne sufiĉis por tralasi multe da taglumo. De la najbara kuirejo ĉiam envenis vaporo kaj ĝi plinebuligis la aeron. Estante en tiu manĝoĉambro, oni ĉiam havis la impreson, ke ekstere estas krepusko, eĉ kiam la suno brilis.

Dum la vesperoj tiu granda "salono" estis lumigita per tri kaj ofte du elektraj lampoj, ne tro fortaj. Tiam la homoj en dikaj peltoj aŭ en ĉifonitaj vestoj, murmurantaj inter si, aspektis kiel fantomoj. Okazis, ke ili iam komencis reciproke insulti kaj minaci unu la aliajn, tiam ili aspektis kiel diabloj.

Se en la restoracio estis aĉetebla dolĉa teo, venis trinki tiun luksaĵon multe da junaj knaboj, kiuj ankoraŭ ne laboris. Tiuj junaj vizitantoj ĉiam petis tro grandan kvanton da teo kaj la vendistino ne povis doni al ili la petitan nombron da glasoj da teo. Tiam okazis intertraktoj pri la kvanto da teo, kiun ili ricevos. Se oni rifuzis al ili teon, la knaboj aranĝis aventurojn kaj la servistinoj timis iri hejmen, riskante ricevi kelkajn de ili ĵetitajn ŝtonojn.

Por la vespero de la Internacia Virina Tago, la restoracio ricevis festan aspekton. Ĝi estis lumigata per pli da lampoj ol kutime kaj eĉ unu lampo pendis ekstere super la enirpordo, ĝi lumigis ankaŭ la por-

treton de Stalin.

Kolektiĝis kelkcent virinoj ĉe la tabloj. Por eviti eventualajn incidentojn, kiujn povus aranĝi la knaboj, oni starigis milicianojn ĉe la enirejo.

Kiam la prezidantino malfermis la kunvenon, ŝi citis ĉiujn membrojn de la "polit-buroo". La menciado de iliaj nomoj simboligis honoriĝan ĉeestadon de tiuj personoj.

La prelegon faris la juna kuracistino. Ĝia enhavo estis de la sama karaktero kiel multaj milionoj da aliaj prelegoj en Sovetunio - pri la nuntempa feliĉa vivo en la "laborista patrio". Estis menciitaj ankaŭ specialaj sukcesoj, kiujn akiris la virinoj en tiu lando. Interalie estis menciite, ke en Sovetunio estas 43 lokomotivgvidistinoj kaj tre multaj virinoj laboras en la karbminejoj.

Post la prelego povis okazi demandoj, sed neniu ion demandis. Unu virino nur proponis : "Ĉi tie estas kamaradino Katja. Inter ni ŝi estas la plej maljuna kaj ŝi memoras la iamajn antaŭrevoluciajn jarojn. Eble ni petos kamaradinon Katja, ke ŝi rakontu pri la vivo antaŭ la revolucio."

Ĉiuj konsentis la proponon. Kamaradino Katja, aŭ pro sia maljuneco, aŭ pro sia "reakcia pensmaniero" ne kapablis sin entuziasmigi por la nova feliĉa vivo. Ŝi komencis rakonti : "Iam, panon oni povis aĉeti kiom oni nur volis. En Uĥvalo estis ĉ. tridek ok magazenoj, ĉiam ili estis malfermitaj. Oni povis aĉeti ĉiujn varojn. La vendistoj estis tre afablaj, ĉio estis malkara. Nun mi devas stari en la vicoj por ricevi panon kaj ĉiam atenti, kiam la pano estos alveturigita. Ricevi iujn varojn mi neniam povas, ĉar en mia aĝo mi ne povas min puŝpremi ĉe la magazenoj, kiam io estas havebla, ĉar oni min mortigus dum tiuj premoj. Ŝloskin (la magazenadministranto) kondutas kiel altranga sinjoro..."

Se kamaradino Katja ne estus travivinta sepdek jarojn, ŝi certe ne riskus tian parolon, sed pro ŝia aĝo la prezidantino nur vokis al ŝi : "Jam sufiĉas viaj stultaĵoj." Ĉiuj ĉeestantinoj estis kontentaj, ke ili sukcesis per la buŝo de kamaradino Katja esprimi siajn opiniojn sen ia ajn risko. Post tiu "incidento" okazis la manĝado kaj la dancoj.

***

Kun la proksimiĝo de la printempo 1940 multaj rifuĝintoj sin preparis fuĝi el Sovetunio. De la malproksimaj lokoj ili venis al Blankrusio kaj Ukrajno. Plejparte ili kolektiĝis en la ĉefurboj de tiuj du respublikoj, Minsko kaj Kievo. En tiuj urboj esti sen permeso de la milici-instancoj ne rajtis eĉ la sovetuniaj civitanoj, sed la rifuĝintoj tiun malpermeson neglektis. Ili ne havis konstantan loĝlokon, la tranoktejoj estis ĉefe la stacidomoj kaj tie ĉiam estis plenplene da homoj. Dum dokumentkontrolo de la milicianoj oni do ĉiam povis esti veninta en la sama tago.

De tiuj respublikoj la rifuĝintoj intencis iel trapasi la limon al la partoj, kiuj ĝis la milito apartenis al Polio. Poste ?... Iuj volis esti kun siaj parencoj sub la germana okupacio kaj partopreni la sorton de siaj proksimuloj. Iuj planis iel veni al Rumanio, kiu tiam ankoraŭ ne estis dividita inter la germanoj kaj la rusoj. Iuj kredis, ke ili sukcesos trapasi la limon al Hungario. Iuj volis atingi la baltajn landojn, kiuj estis ankoraŭ nur sub la sovetunia protektado, sed la registaroj tie kvazaŭ rajtis mastrumi laŭ siaj voloj. Multaj nenian konkretan planon havis kien ili volus iri, nur ĉefe forlasi Sovetunion, povas esti kien ajn.

Por la plimulto el la rifuĝintoj la renkontloko en Minsko estis moderna restoracio sub la nomo "Fabrika Kuirejo". Tie la kuirado okazis per mekanizita sistemo. Ankaŭ la distribuado estis aranĝita tre racie kaj la prezoj estis sufiĉe malaltaj. La rifuĝintoj venis tien ne nur por manĝi, sed ankaŭ por ricevi informojn pri konatoj, aŭdi novaĵojn, esplori ĉe aliaj la eblojn por daŭrigi la vagadon.

Dum tiuj renkontoj ili estis inter si sufiĉe sinceraj. Ĉiujn kunigis la sama sorto de vagantoj en la lando sub la malbenita reĝimo, kvankam konsciaj, ke NKVD sendube ankaŭ tie havas siajn informantojn.

Multaj rifuĝintoj jam estis arestitaj pro sia konduto. Ricevi informojn kie ili troviĝas, estis preskaŭ neeble. Iliaj krimaj agoj estis la plendoj pri la enspezoj, kiuj ne sufiĉas por la normalaj vivbezonoj. Interalie ilia malkontento estis esprimita per kantoj laŭ popularaj melodioj, kies enhavo esprimis la revojn rememorajn pri la pasinteco, kvankam por multaj la pasinteco absolute

ne estis tre komforta. Unu el tiuj kantoj mi volas prezenti laù libera traduko :

"Hejmen ! hejmen reen !
Mi estas homo de varsovia rand'
mi volas for de la soveta land'
Mi volas hejmen ! hejmen reen !

Hejme mi manĝis panon kun buter'
En Rusio mia vivo estas acida kaj amara
Hejmen ! hejmen reen ! :/.

Hejme mi manĝis rizon kun rozin'
En Rusio la pedikoj manĝas min ./."

Tiuj kantoj havis eble naivan enhavon, prirevitaj de junuloj ĉiam malsataj, kuŝantaj en iuj anguloj dum la noktoj, tremantaj de malvarmo kaj mordataj de pedikoj. La kantoj penetris en la animojn de la rifuĝintoj, inspiris ilin al la rezisto kaj plua batalo por forlasi Sovetunion. Preskaù neniu pensis, kio povas okazi post la forlaso de Sovetunio - okazu ĉio ajn, morto, pereo, sed ne vivi en Sovetunio !

La riskan traveturon al la t.n. Okcidenta Blankrusio povis entrepreni nur soluloj. Iuj sukcesis traveturi kaŝante sin sub fervojaj vagonoj. Iuj sukcesis trapasi la malnovan limon dumnokte. Iuj traveturis kaŝante sin en malfermitaj ŝarĝvagonoj. Iuj estis traveturigitaj per "bona" pago al rusaj lokomotivgvidistoj. Tiu bona pago konsistis el bona kostumo, horloĝo, bona mantelo, ora ringeto k.s. Multaj tiuj riskantoj estis survoje kaptitaj de milicianoj aù de NKVD-soldatoj kaj tiuj kaptitaj jam ricevis sekuran lokon en la malliberejoj kaj poste en koncentrejoj.

Homoj kun familio, precipe kun infanoj ne povis riski tian vojaĝon. Tiuj penis ricevi la necesan traveturpermeson donitan de la miliciistaj instancoj. Komence kelkaj sukcesis ricevi tiajn permesojn, klariginte, ke ili kvazaù veturas al siaj parencoj. Kiam multaj homoj venis peti tiujn permesojn, la miliciejoj ĉesis doni ilin.

Iom post iom NKVD entreprenis severajn gardkontrolojn kaj ĉiu fuĝo estis preskaù malebligita. La rifuĝintoj vagadis en Minsko sen iu ajn espero por foriri. Ili demandis

unu la alian kion fari. Respondi neniu kapablis. Al la rifuĝintoj en Minsko estis atentigite de NKVD, ke ili reveturu al siaj laborlokoj. Tiuj atentigoj okazis individue sur la stratoj, la rifuĝintojn oni povis distingi de la sovetaj loĝantoj laŭ la vestoj. Ĉiu rifuĝinto renkontita de milicia aŭ de NKVD-oficiro estis demandita pri la dokumento, laŭ kiu estis permesate restadi en Minsko.

La rifuĝintoj jam povis antaŭvidi, ke NKVD intencas ilin "elpurigi" de Minsko laŭ la soveta metodo. Tiu suspekto plifortiĝis, kiam oni malfermis por la rifuĝintoj la klubon de blinduloj, kie ili povis tranokti. La afero estis klara. Dum iu nokto venos al tiu klubo NKVD, ĉiujn arestos kaj forveturigos.

***

Unu el la plej grandaj konstruaĵoj en Minsko estis la t.n. "Dom Pravitelstva" (Registardomo). Ĝi estis kelketaĝa, novkonstruita, ĉirkaŭita de belaj razenoj, zorge ordigitaj. Antaŭ la ĉefa enirejo staris statuoj de Lenin kaj Stalin je natura grandeco, aŭ eble pli grandaj. Kompare al la ĉirkaŭaj domoj, ĝi estis kolosa. En tiu domo estis ministerioj de la blankrusa registaro, krome ministerio por la internaj aferoj de la lando - NKVD. La ministroj kaj la oficistaro en tiu domo ĉiam povis atendi diversajn surprizojn de siaj ĉefuloj, sed la surprizo, kiun ili spertis per propraj okuloj dum ordinara merkredo en la vintraj monatoj de 1940, estis ekster iliaj imagoj kaj ekster la imagoj de la loĝantaro en Minsko.

Proksimume je la deka horo matene kolektiĝis kelkcent rifuĝintoj sur la strato de tiu Registardomo, marŝantaj en la direkto al ĝi kaj vokantaj : "Donu al ni la permeson forlasi Rusion !" Kelkaj homoj sin metis sur la tramrelojn por haltigi la trafikon. La veninta amaso forprenis la revolverojn de miliciistoj gardantaj la Registardomon, tratranĉis la telefondratojn, atakis la kabinetojn, disŝiris dokumentojn, rompis fenestrajn vitrojn kaj ĵetis ŝiritajn kaj neŝiritajn dokumentojn tra la fenestroj sur la straton. Post ĉ. dek kvin minutoj ĉiuj estis for. En la regiono de la Registardomo

svarmis post tiu okazaĵo miliciistoj kaj NKVD-istoj. Ĉiu rifuĝinto kaptita en tiu regiono estis arestita, poste akuzita kiel partopreninto en tiu kontraŭregistara provokaĵo.

Oni povis supozi, ke inter tiuj manifestaciantoj neniu kredis, ke la soveta registaro plenumos iliajn dezirojn kaj ellasos ilin el Sovetunio. Sed ili ĉiuj celis publike anonci, ke ili ne volas vivi kiel sklavoj en Rusio. Ĉiuj partoprenintoj en tiu manifestacio jam sufiĉe komprenis, ke ilia kvazaŭa libereco povos daŭri eventuale ankoraŭ kelkajn tagojn kaj tiu manifestacio eble estis krio de la homoj, antaŭ ol estos forprenita de ili la ebleco por tiu publika krio.

La sovetaj civitanoj jam delonge estis alkutimiĝintaj vidi, aŭdi kaj legi pri diversaj amasaj arestoj sub diversspecaj akuzoj kontraŭ agantoj de la reĝimo, sed eĉ ne unu fojon ili vidis aŭ aŭdis pri kontraŭregistara manifestacio.

La plendoj de la rifuĝintoj estis de la rusoj traktataj kiel kuraĝa naiveco kaj rusaj homoj eĉ timis aŭdi, se iu rifuĝinto esprimis sian opinion laŭte.

Kiam la rusaj civitanoj aŭdis, ke la rifuĝintoj intencas trapasi la sovetunian limon sen permeso, ili ne kapablis kompreni tiujn aventuristojn kaj jen tiuj aventuristoj atencis la Registardomon, antaŭ la okuloj de sovetaj civitanoj.

Pri la manifestacio neniu gazeto raportis, sed tiu okazaĵo estis konata en ĉiuj urbetoj de Blankrusio.

Ĝenerale la rusoj ne komentis la manifestacion de la rifuĝintoj, sed oni povis ĉe ili vidi klare simpation al la rifuĝintoj, kvankam kun bedaŭro kaj kompato pri la konsekvencoj, kiuj poste nin trafos.

Kaj la konsekvencoj eksekvis. Multaj rifuĝintoj estis arestitaj kaj en Minsko kaj en aliaj urbetoj. Fine la rifuĝintoj komprenis, ke estos pli oportune silenti kaj prepari sen bruo la fuĝon, en kies sukceso multaj ankoraŭ kredis. Sed por tiaj preparoj jam estis malfrue. NKVD havis siajn informantojn inter la rifuĝintoj. Multaj rifuĝintoj komencis esti arestitaj pro perfido de siaj samsortanoj, inter tiuj perfiditaj estis ankaŭ mi.

Sendube, NKVD sciis post la veno de la polaj rifuĝintoj, ke tiuj homoj ne havos multan simpation al la soveta reĝimo.

En la altaj instancoj de NKVD estis do konate kiel kondutis la grupoj, kiuj venis al Sovetunio kun la naiva kredo, ke Sovetunio estas lando de socia justeco. Tiuj estis la rifuĝintoj de la hitlerista Germanio. Poste venis grupoj de la aùstriaj ribelantoj post la jaro 1934. Poste venis hispanaj revoluciuloj. Ĉiuj tiuj homoj post la renkonto de la soveta efektiveco seniluziiĝis. Ankaù ili ne estis silentemaj pri siaj vivkondiĉoj, kiel la rusaj civitanoj, ili ankaù volis forlasi Sovetunion kaj pro tio NKVD transprenis la protektadon de tiuj homoj en la NKVD-"edukejoj". La rifuĝintojn el Polio trafis la sama sorto, kiun spertis antaù kelkaj jaroj aliaj homoj.

Tiu tempo estis por NKVD periodo de abunda "rikoltado", post la trankvila periodo, kiam la grandaj "purigoj" per la antaùa ĉefo Jeĵov estis ĉesigitaj kaj kiam lian lokon transprenis Berja.

Por NKVD la ĉefa afero estis "purigi" la "liberigitajn teritoriojn" post la foresto de la polaj reginstancoj (Okcidentan Blankrusion, Okcidentan Ukrajnon, kaj ankaù la baltajn landojn) de la malamikaj elementoj. Forveturigi pli ol du milionojn da homoj al la malproksimaj partoj de Rusio dum kelkaj monatoj postulis multe da laboro, kvankam NKVD havis en tiu laboro longjarajn spertojn.

Al la malamikoj de la "laborista klaso" apartenis ne nur la riĉuloj, sed multaj posedantoj de modestaj magazenoj, multaj metiistoj, kiuj havis proprajn produktejojn, ĉiuj estintaj oficistoj - ŝtataj kaj komunumaj, eĉ de la plej malalta grado, ĉiuj policistoj, eĉ la simplaj, ĉiuj oficiroj de la armeo, eĉ la maljunaj, kiuj ĉesis militservi.

Forveturigitaj estis ankaù ĉiuj partiaj agantoj, ne nur de burĝaj partioj sed ankaù socialdemokratoj, ĉiuj ĵurnalistoj, eĉ tiuj, kiuj pri politiko ne skribis - unuvorte, ĉiuj homoj, kiuj partoprenis ian socian agadon krom la komunistoj. Kune kun tiuj homoj estis forveturigitaj ankaù iliaj familianoj, eĉ se inter ili estis maljunuloj. La venintaj rifuĝintoj estis sur la liberigitaj teritorioj garditaj de NKVD, eble pli ol en Sovetunio, precipe estis inter serĉataj kategorioj la homoj, kiuj devus esti forveturigitaj.

Aldone al la plagoj, kiujn la liberigantoj venigis al la "liberigitaj teritorioj" estis ankaŭ la spekulacia komercado. Tiu plago disvastiĝis al neimagebla grado. Tiun "komercadon" okazigis ankaŭ multaj rifuĝintoj.

Je la komenco, kiam venis la liberigantaj rusaj soldatoj, ili estis la ĉefaj aĉetantoj. Ili aĉetis ĉion, sed plej favore ili aĉetis horloĝojn. Post la soldatoj ekvenis al tiuj teritorioj sovetaj funkciuloj kaj simplaj partianoj, kiuj sukcesis akiri permeson por veni al tiuj teritorioj por la komercado.

Verŝajne la magazenposedantoj, kiuj ne estis tuj forveturigitaj al Siberio, jam sciis pri la varomanko en Sovetunio. Ili fermis siajn vendejojn kaj per diversaj homoj ili vendis la varojn je spekulaciaj prezoj sur la t.n. "libera merkato". Aliaj varoj al la magazenoj ne estis liveritaj. La novaj regantoj malfermis kelkajn ŝtatajn magazenojn, sed en tiuj oni povis aĉeti tiom, kiom oni povis aĉeti en la magazenoj en Sovetunio.

Estis nature, ke la administrado de la magazenoj estis donita unuavice al la komunistoj. La administrantoj de la novaj magazenoj ankaŭ tre rapide komencis praktiki laŭ la ekzemplo de siaj kolegoj en Sovetunio - kaŝe ili disponigis la ricevitajn varojn al spekulantoj por la vendado sur la bazaroj. La novaj regantoj trankvile rigardis la okazantan spekulacion kaj ĝin praktike ne malpermesis. Sur la liberigitaj teritorioj la spekulacikomercado devas esti libera, same kiel en Sovetunio.

Estis nature, ke tiuj magazen-administrantoj preferis havi kiel agentojn por la "libera merkato" siajn iamajn kamaradojn, al kiuj ili povis havi pli da konfido en tiu "socialista komercado". Sendube, en tiu "agenta selektado" decidis la motivo helpi sian kamaradon ekonomie. En la ideologio de komunismo jam nek la laŭleĝaj komercistoj nek la "libermerkataj" komercistoj kredis.

Multaj iamaj komunistoj rapide akiris sperton en tiukaraktera komercado kaj se iu el tiuj renkontis amikon, kiu laboris kaj plendis pri la malalta enspezo, la komercisto ĉiam rekomendis al tiu kamarado forlasi la laboron kaj okupi sin per komercado. La soveta sistemo sur la "liberigitaj teritorioj" iom post iom realiĝis en ĉiuj detaloj.

Fine inter la rifuĝintoj laboris nur tiuj, kiuj estis je alta morala nivelo, aŭ tiuj, kiuj povis ŝteli en siaj laborejoj. Estis ankaŭ tiuj, kiuj laboris nur formale kaj praktike prizorgis siajn vivbezonaĵojn per komercado kaj ŝtelado.

***

Kiam la liberigantoj de Okcidenta Blankrusio kaj Okcidenta Ukrajno kredis, ke la "aktivaj popolmalamikoj" estas "elpurigitaj" el la socio, ili komencis "honori" la ceterajn loĝantojn sur tiuj teritorioj per soveta civitaneco. Por ricevi tiun civitanecon, sufiĉis nur formalaĵo : akcepti sovetan pasporton, kaj laŭ la soveta praktiko tian pasporton ĉiu povis, eĉ devis ricevi. Laŭ la sovetaj leĝoj devas havi pasporton ĉiu civitano de la aĝo de dekok jaroj. La konstanta loĝantaro vole nevole prenis tiujn pasportojn. Prenis pasportojn ankaŭ aro da rifuĝintoj, sed la plimulto inter la rifuĝintoj rifuzis pasportojn, klarigante, ke ili ne volas akcepti la sovetan civitanecon.

Kiel kutime la ŝtataj instancoj uzis ĉiuspecajn allogojn, minacojn al tiuj, kiuj ne volis preni pasportojn. La rezulto estis minimuma. Kvankam tiela rezisto estas la plej pasiva, sed laŭ la psiko de la rusaj diktatoroj nenia kontraŭstaro povas esti tolerata, - ĉiuj ordonoj devas esti akceptitaj kaj plenumitaj, sen iu ajn kritiko. Certe ekzistas iaj internaciaj leĝoj, laŭ kiuj ne estas permesite devigi homojn akcepti ian civitanecon kontraŭ sia volo, sed tiajn aferojn la regantoj en Sovetunio ĉiam neglektis. Ili povis tiom neglekti precipe dum sia alianco kun la reĝimo de Hitler.

Kiam la agitaj allogoj kaj la minacoj por akcepti la pasportojn fiaskis, NKVD komencis montri, ke ĝi kapablas obeigi la obstinulojn al la soveta sistemo. En la pligrandaj urboj "liberigitaj", miloj da NKVD-istoj nokte ĉirkaŭsieĝis apartajn kvartalojn, ili paŝis de loĝejo al loĝejo, vokis la dormantajn homojn, kontrolis, ĉu ĉiuj plenaĝuloj posedas la sovetajn dokumentojn. Ĉiuj, kiuj ne havis la sovetajn pasportojn, estis arestitaj, forveturigitaj en por tiu celo starantaj kamionoj, al la ŝarĝvagonoj preparitaj kaj forsenditaj al la malproksimaj malvarmaj partoj de

la lando por tie konstrui novajn loĝlokojn.

Kelkaj miloj da homoj estis forveturigitaj dum kelkaj tagoj en tiu unua rifuĝint-ĉasado. Post kelkaj tagoj NKVD ĉesigis tiun ĉasadon kaj anoncis novan datlimon de registrado por preni la pasportojn. Aro da rifuĝintoj mense kaj fizike lacigitaj rezignis la reziston kaj sin registrigis por la pasportoj. Tiu anoncita nova datlimo estis nur ruza kaptilo de NKVD por havigi al si adresojn de almenaù parto de la obstinuloj.

Post kelktaga registrado, NKVD havis malpli da laboro kaj pli da sukceso en tiuj dumnoktaj homĉasadoj. Kiam la rekomencitaj dumnoktaj arestadoj estis konataj, NKVD-konfidenculoj disvastigis informojn, ke oni arestas nur tiujn, kiuj ne registrigis sin kaj tiuj homoj, kiuj finfine komprenis, ke la sovetaj instancoj havas rilate la rifuĝintojn nur bonajn intencojn, ne estos arestitaj. La propagando por la registrado estis daŭrigita. Kontroli la veron, la rifuĝintoj komence ne povis. Ili ne sciis kiu sin registrigis kaj kiu ne registrigis sin. Baldaù tiu blufaĉo estis konata, sed la rifuĝintoj jam havis neniun solvon por savi sian kvazaùan liberecon. Restis nur atendi la dumnoktan areston, sendepende ĉu oni estis registrita aù neregistrita. Fine NKVD venkis la obstinajn "popol-malamikajn elementojn" inter la rifuĝintoj. Tiuj "malamikaj elementoj" estis la plimulto, nur malmultaj prenis la pasportojn. La kelksemajna vivado sub la komunista regado faris por tiuj homoj miraklon, kiun ne kapablus akiri eĉ la plej fervora antikomunista propagando.

***

En la lastaj tagoj de marto mi reiris de Uĥvalo al Krupko. Antaù ol mi rekomencis labori, mi veturis al Minsko esplori la eblojn por fuĝo. Mi jam ne renkontis tiom da rifuĝintoj, kiom mi renkontis tie la unuan fojon, komence de januaro. La rifuĝintoj ja estis post la malvenko eĉ por tiuj, kiuj restis netuŝitaj de NKVD. Kelkaj ricevis la permeson labori en Minsko post klopodoj de siaj laborejoj. Kelkaj laboris sen permeso de la milici-instancoj. Kelkaj kredis ricevi tian permeson. Ĝenerale ili jam estis malgranda grupo. Paroli pri fuĝo ili eviti kaj ili eĉ insultis tiujn, kiuj aranĝis la aventurojn. Kion ili pensis, mi do ne povis scii.

Interalie mi renkontis en Minsko mian amikon el Varsovio A. Kaf. Hejme li estis ŝuisto, en Minsko li laboris en la lokomotiva riparejo kiel simpla, nekvalifikita laboristo. Tiun laboron li akceptis pro du motivoj : unue, kiel laboristo ĉe la fervojoj li ricevis la permeson esti en Minsko, due, li kredis per la helpo de rusaj fervojistoj, precipe helpe de la rusaj lokomotivgvidistoj, forveturi al Okcidenta Blankrusio. Li opiniis, ke la ŝancoj por fuĝi estas pli bonaj en Kievo (Ukrajno). Ĉar ni estis bonaj amikoj, li malkaŝis al mi sekreton, ke kun unu lokomotiv-gvidisto li jam marĉandas pri la traveturigo kaj li havas ŝancojn, ke tio sukcesos. Li promesis memori pri mi kaj sciigi, se estos ia eblo tiamaniere fuĝi. En aprilo mi eksciis de mia perfidinto, ke iun tagon tiu Kaf ne venis al la laboro kaj malaperis. Tamen mi kredis, ke li plenumis sian promeson, ĉar dum esplordemando la NKVD-oficiro menciis lian nomon. Eble li skribis al mi, sed la letero venis en la posedon de NKVD. Spite la antaŭajn arestojn ĉefe en Minsko, okazis, ke iuj rifuĝintoj de la malgrandaj urbetoj iom post iom malaperis kaj neniu sciis kien. De iuj poste venis leteroj el Polio, sed tio estis unuopuloj.

***

Dum mia estado en Krupko amikiĝis kun ni du junuloj, M. Frim kaj J. Lerner, ambaŭ en la 17-18-jaraĝo el Varsovio. Ĝis la milito ili estis membroj de la socialista junular-organizaĵo. Ambaŭ estis inteligentaj knaboj kaj sufiĉe konsciaj pri sociaj kaj politikaj problemoj. Estis ĉe ili ankaŭ enradikigita la reciproka amikeca helpemo, kiel ĝenerale ĉe junuloj edukitaj en liberaj organizaĵoj. Tiuj du knaboj ĉiam rakontis al ni pri siaj ĉiutaga kaj pasinta vivo, strebadoj kaj sentimentoj. Ankaŭ mi kaj mia edzino estis rilate al ili sinceraj.

Ni ĉiuj komencis plani komunan fuĝon. Post ĉiuj eblaj akiritaj informoj, kies verojn kaj fantaziojn ni ne povis kontroli, ni decidis unue veturi al Kievo kaj de tie al Okcidenta Ukrajno. Kien daŭrigi la vagadon poste, ni povis fiksi nenian decidon. Ĝenerale ni kredis, ke ni sukcesos atingi Rumanion.

Nian forveturon ni planis por la fino de aprilo aŭ la komenco de majo. Por la unua de majo ni devis ricevi

kelkcent rublojn, la salajron por aprilo. Se mankos al ni mono survoje, ni havis kelkajn bonajn ĉemizojn kaj ĉemizaĉetantojn oni en Rusio ĉiam trovos. Tiuj du knaboj ne estis sufiĉe silentemaj kaj pri nia intenco rakontis al alia varsoviano A. Biderman. Tiu Biderman estis forta viro, en la aĝo inter 25-30 jaroj kaj havis tre fortan apetiton. Ĉiam li plendis, ke li estas malsata, kvankam li manĝegis trioble pli ol aliaj. En Varsovio li havis propran malgrandan laborejon de lustroj. Li ofte menciis, ke ĝis la milito li estis komunisto kaj al Rusio li venis pro ideologiaj motivoj. Kompreneble, post la veno al Sovetunio li malentuziasmiĝis de sia ideologio. Tiu Biderman komencis kun ni amikiĝi kaj proponis, ke ni lin kunprenu por la fuĝo. Por kvinpersona grupo komuna fuĝo jam estis pli riska. Sed Biderman havis grandan oran poŝhorloĝon, kiu en Rusio estas eksterordinara valoraĵo. Biderman nin allogis, ke per tiu horloĝo ĉiu rusa soldato ĉe la limo nin certe tralasos kaj la diferenco inter kvar kaj kvin personoj ne estas granda.

Post nia konsento lin kunpreni, Biderman ĉiam partoprenis niajn komunajn babiladojn, promenadojn k.c. Neniu inter ni povis imagi, ke Biderman pri ĉiuj niaj babiladoj raportas al la NKVD-ĉefo en Krupko.

Por la festotagoj la unuan de majo venis al Krupko el la najbara urbeto Ĥalupniĉi amiko de Frim kaj Lerner. Kiel al ilia bona amiko kaj kamarado en la organizaĵo ili malkaŝis niajn intencojn pri la fuĝo. Tiu alveninta junulo nin petis kiel infano, ke ni kunprenu ankaŭ lin; sendepende pri kio okazos kun ni li ne volas resti kaj la diferenco inter kvin kaj ses homoj ne estas granda. Vole nevole, ni akceptis ankaŭ lin al nia grupo.

Pro iuj kaŭzoj ni ne povis forveturi antaŭ la kvina de majo. En tiu findecidita tago de la forveturo ni aĉetis biletojn al Kievo. Biletojn ni aĉetis po du, por ne atentigi la biletvendistojn pri la komuna forveturo.

La trajno devis veni al Krupko kelkajn minutojn post la kvina horo posttagmeze. Ni faris ĉiujn eblojn por eviti ies atenton al ni. Dumtage ni ne promenis kune k.t.p. Ni ne volis eniri ĉiuj en la saman vagonon, sed renkontiĝi en la disvojiĝa stacio Orŝa post kelkhora veturado, ĉar tie ni devos sidiĝi en alia trajno rekte al Kievo.

Kelkajn minutojn antaŭ la alveno de la trajno, ni estis ekstere sur la kajo, starante po du, malproksime inter ni. Mi staris kun mia edzino.

Jen mi aŭdis de la malproksimo la lokomotivan signalon, niaj okuloj estis rigardintaj en la direkto de kie venos la trajno. Subite mi aŭdis malantaŭ mia dorso "Razraŝitje" (permesu), sammomente mi sentis sur mia brako pezan manon. Mi turniĝis en la direkto de la voĉo. Antaŭ ni staris altstatura viro en civila vesto kaj du miliciistoj. La afero estis klara, ni ĉiuj estis arestitaj en la momento, kiam ni volis eniri en la vagonon.

La miliciistoj nin gvidis al ĉambreto de la stacio. La viro en la civila vesto forprenis de ni la provizorajn dokumentojn. Ni estis veturigitaj po du en la aŭtomobilo de la loka NKVD al la miliciejo. Mi kaj Biderman estis veturigitaj la lastaj. Kun ni veturis ankaŭ la altkreska viro. Kiam ni venis en la atendejon de la miliciejo, mi renkontis la kolegojn sidantajn tie. Apud ili staris miliciistoj kaj ilin gardis.

"Enkarcerigu lin !" ordonis la altkreska viro, montrante je mi. Antaŭ mia foriro mi volis dividi la panbulon kiun mi havis en kofreto, ĉar ĝi devis esti por tri personoj de la grupo. Mi petis de Biderman la tranĉilon, ĉar li ĝin posedis. Biderman respondis, ke la panbulon mi povas preni tute por mi mem, por li tiu pano ne estas necesa. La miliciisto forgvidis min al la karcero, nenion mi povis diri al la kolegoj. En tiu momento mi eksuspektis, ke Biderman nin perfidis.

***

3_ antaŭ la verdikto

En la homa animo ekzistas interesiĝo vidi kaj sperti nekonatajn aferojn. En mia decido iri al Sovetunio, sendube decidis en certa grado la intereso vidi tiun landon pri kies ordo ekzistis ekstremaj opinioj. Kvankam laŭ la okazintaĵoj inter la regantoj en tiu lando ĉiu racie pensanta homo povis konkludi, ke pravas la kontraŭuloj de la bolŝevika reĝimo. Tamen vidi tiun landon, kie inter ĝiaj regantoj okazis reciproka ekstermado pro akuzoj, kiujn homoj normalmensaj taksis neimageblaj misteraĵoj, estis sufiĉe alloga. Neniam mi eĉ komencis pensi, ke kiel eksterlandano mi ne rajtos forlasi tiun landon, se mi tion deziros.

Se por mia veno al Sovetunio decidis en certa grado la scivolemo vidi kaj sperti tiun landon, ankaŭ la aresto ebligis al mi vidi kaj sperti la sovetajn malliberejojn kaj koncentrejojn, observi kaj kompreni la psikon de la plej privilegiita kasto en tiu lando - la NKVD-istoj.

Post la aresto mi komprenis, ke komenciĝis por mia vivo ĉapitro nekonata, sed sendube malagrabla. En la karcero - malgranda ĉambro - mi estis kun sola objekto, la t.n. "paraŝa". Paraŝa estas granda ligna sitelo por la fiziologiaj bezonoj. Krom mi kaj la "paraŝa" nenio troviĝis en la karcero. Al la necesejo mi estis gvidita matene kaj vespere, tiam mi ankaŭ elverŝis la enhavon de la "paraŝa".

Matene mi ricevis kvarcent gramojn da nigra pano, dudek gramojn da sukero kaj iom da teo. Tagmeze mi ricevis duonlitron da supo. Plejofte mi ricevis ankaŭ vespere iom da teo, sed tio dependis en kia humoro estis la deĵoranta miliciisto. Dumnokte en la karcero estis malvarme, neeble endormiĝi, sed nenu min maltrankviligis dum la tagoj kaj mi povis dormi.

Dum la unuaj tagoj mi nenion povis manĝi. Mi pensis kaj pripensis diversajn travivaĵojn, agrablajn kaj malagrablajn, kio povus okazi se... kaj kio povos okazi. Multe mi pensis pri la kolegoj kaj pri la edzino, kio okazis al ili.

Mi penis per diversaj demandoj havigi al mi iun informon de la miliciistoj, kiuj alportis al mi manĝaĵon aŭ gvidis min al la necesejo. Ĉiam mi aŭdis de ili unuuran respondon : "Mi nenion scias."

Mia nura okupo estis iradi en la karcero de muro al muro, aŭ kuŝi sur la planko en unu el la anguloj. Kiam lacigis min la kuŝado, mi paŝadis, kiam lacigis min la paŝado, mi kuŝiĝis.

La trian tagon komencis min turmenti la soleco kaj la malsato. La soleco en fermita loko ŝajnis al mi la plej malbona kio povas ekzisti, sed kiel erara estis mia tiama opinio, kompare al la venontaj okazaĵoj.

Post ses tagoj mi demandis la miliciistojn, kiom da tempo mi ĉi tie restos. Ilia respondo estis kiel kutime la frazo : "Mi nenion scias." Ke la miliciistoj nenian alian respondon donos al mi, ankaŭ tion mi komprenis. Mi demandis nur por paroli kelkajn vortojn al iu vivanta estaĵo. Mi komencis min senti laca, mi pli longe kuŝadis ol iradis. La soleco min malpli turmentis ol la malsato. Mi komencis atendi la venontan matenon - la venontan panporcion.

Matene de la oka tago en la karceron oni enlasis al mi vilaĝanon je la aĝo de ĉ. tridek jaroj. Ke li estas vilaĝano mi povis vidi laŭ liaj vestaĵoj. Sur la piedoj li havis bastŝuojn, pantalonon kaj jakon el hejme teksita dika ŝtofo.

Enirante li diris nur "saluton" kaj komencis paŝadi de muro al muro, laŭlonge de la karcero. Proksimume post unu horo la miliciisto alportis por mi la ĉiutagan porcion da pano kaj teo. Tiam mia karcerkunulo komencis ion paroli. La kaŭzoj de lia aresto estas, ke li ne liveris al la ŝtato la kompletan kvanton de la laktimposto de sia bovino.

Ĝenerale ĉiu posedanto de bovino devas liveri al la ŝtato ĉiujare tricent litrojn da lakto. Lia bovino (almenaŭ laŭ lia aserto) dum certa tempo malsanis kaj li liveris ĝis laŭleĝe fiksita datlimo cent kaj kvindek

litrojn. Hejme li havis edzinon kaj du infanojn. Li komencis paroli al mi en maniero kvazaŭ li volus sin senkulpigi: "Kion mi povis fari, se la bovino malsanis ? Mi ja post certa tempo liverus la ŝuldon. Kiamaniere la edzino prizorgos la du infanojn mi ne komprenas. Nia ĉefa enspezo estas nur tio, kion ni produktas sur la peco da tero, la legomĝardeno. Se mi ne estos hejme, la ĝardeno ne estos prizorgata kaj ili devos morti de malsato."

Mi demandis lin kian punon li povas ricevi.

"Ĝenerale por tia krimo oni punas per sesmonata deviga laboro en ia proksima koncentrejo, kompreneble la ŝuldon oni devas liveri." La afero jam estis sufiĉe klara, la ŝtato ricevas senpagan laboriston por ses monatoj.

Proksimume je la deka horo en la sama tago, mi estis gvidita al ia milicikabineto. Tie sidis oficiro, antaŭ li amaso da paperoj. Mi estis fotita en diversaj pozoj de diversaj flankoj. Li prenis tuŝsignojn de miaj fingroj, eble cent kopiojn - ĉiu fingro aparte, ĉiuj fingroj kune, ĉiuj fingroj kune kun manplato. Ĉiuj tiuj fingraj tuŝsignoj estis faritaj en multaj ekzempleroj. Ĉiujn tiujn paperojn kun la signoj mi devis subskribi. La nigraj makuloj sur la helruĝaj paperoj impresis strange, precipe la manplatoj havis misteran aspekton.

Kiam mi subskribis la amason da helruĝaj paperoj, mi estis gvidita al bele ordigita kabineto. Tie sidis la altstatura viro, kiu min arestis ĉe la stacio, sed nun li estis en uniformo. Li estis la ĉefo de NKVD en la regiono de Krupko. La miliciisto militmaniere raportis al li mian envenigon.

La ĉefo de NKVD sidis en angulo kontraŭ la porda muro ĉe skribtablo. Por mi la miliciisto starigis seĝon en la angulo de la porda muro. La distanco inter ni estis la plej longa, kiun oni povis aranĝi en tiu ĉambro. Dum kelkaj minutoj la NKVD-ĉefo okulumis paperaĵojn. Fine li demandis mian nomon, adreson, naskiĝdaton k.c. Poste li laŭtlegis el papero : "Nomo... estas akuzata, ke post la alveno en Sovetunio komencis konstantan, planitan, kontraŭsovetan, kontraŭrevolucian kaj provokadan propagandon kaj organizis grupon da homoj por fuĝi el Sovetunio". "Venu al mi kaj subskribu tion." Mi respondis, ke mi ne volas tion subskribi, ĉar mi rifuzas akcepti tiun akuzon.

Li respondis : "Subskribi tiun paperon ne signifas, ke vi akceptas tiun akuzon. Tiu subskribo estas nur formalaĵo, ke vi estis informita pri kio vi estas akuzata."

- Tamen mi ne volas tion subskribi.
- Se vi ne subskribos, mi vokos miliciiston kaj li subskribos, ke la akuzo estis al vi laŭtlegita.

La NKVD-ĉefo tuŝis sonorig-butonon sur la tablo. Venis miliciisto kaj subskribis la paperon. La soveta justeco ja estis en ordo.

La NKVD-ĉefo laŭtlegis al mi laŭ datoj, tempo kaj lokoj miajn dirojn, eĉ la plej banalajn. Li menciis babiladojn, pri kiuj mi absolute ne memoris. Ĉion, eĉ la plej simplan ŝercon li traktis kiel eksterordinare seriozan akuzmaterialon. El la tuta amaso da detaloj li elektis kelkajn ĉefajn momentojn ; mi diris, ke en aliaj landoj, ekzemple Francio, Anglio, Usono k.a. la laboristoj havas pli bonajn vivkondiĉojn kaj pli da politika libereco ol en Sovetunio. Mi diris, ke eĉ en la faŝista Polio estis pli da libereco ol en Sovetunio. Mi diris, ke ĉiuj en la gazetoj raportitaj ekonomiaj akiraĵoj, la t.n. "stahanovismo" estas giganta blufo, ĉar fakte nenian varon de ĉiutaga bezono oni povas aĉeti.

Tiu unua esplordemandado daŭris ĉ. du horojn kaj ĝi devis esti daŭrigata alian fojon. Mi ĝenerale ĉion malkonfesis, kvankam ĉio, kion li menciis, estis fakte vera.

En la ĉambro venis miliciisto kaj raportis : "La kuracisto jam atendas." En la kabineto venis kuracisto, ekzamenis min kaj diris : "Praktike sana."

La NKVD-ĉefo min demandis, ĉu mi havas iujn dezirojn. Mi demandis kio okazis kun la kolegoj kaj mia edzino, sed li nenian respondon donis al mi. Poste mi estis gvidita en la miliciistan atendoĉambron. Tie atendis min frizistino, ŝi razis mian barbon. Dum la razado mi demandis pri la kolegoj. "Mi nenion scias." Mi provis kun ŝi iomete paroli, sed ŝi atentigis, ke kiam oni estas razata, oni ne devas paroli, "kaj mi nenion scias" - la plej praktikata respondo, kiam oni estas en proksimeco de NKVD.

*
* *

Lenin nomis la caran Rusion "la malliberejo por la popoloj". Lenin transprenis Rusion de la caroj, ankaŭ ties malliberejon por la popoloj, sed organizis ĝin pli perfekte.

Kiam Stalin transprenis la heredaĵon de Lenin, ankaŭ li tiun frazon uzis. Tiu frazo estis publikigita en diversaj propagandaj artikoloj precipe dum la balotada kampanjo kaj anoncita en diversaj afiŝoj, kiel frazo de Stalin. Sed laŭ eldiro de Stalin "Sovetunio estas ŝanĝita je la lando de interpopola amikeco."

En la cara Rusio estis ministro (kiu subpremis la revolucion en la jaroj 1905-1907), kiu havis la nomon Stolipin. Tiu Stolipin enkondukis specialajn vagonojn por transporti arestitojn. Kiel tiuj vagonoj estis nomitaj iam oficiale, mi ne scias, sed la arestitoj nomis tiujn vagonojn "stolipinki". En la Rusio de Stalin kaj Lenin tiuj vagonoj estas nomataj oficiale : "Vagon dlja zakljuĉonniĥ" (Vagono por arestitoj). Ĉar ankaŭ en Sovetunio ekzistas tendenco mallongigi la nomojn de diversaj institucioj, oni mallongigis ankaŭ la nomon de tiuj vagonoj kaj ili oficiale estas nomataj "Vagon Zak". Sed la arestitoj nomas ilin same kiel iam "Stolipinki". Ekstere tiuj vagonoj aspektas kiel normalaj pasaĝervagonoj, sed en unu flanko ili havas anstataŭ normalaj fenestroj, supre ĉe la plafono, malgrandajn dikajn vitretojn, ne trarigardeblajn. Tiuj vagonoj veturas laŭ konstantaj veturplanoj, je fiksitaj horoj, tagoj kaj direktoj, sed ligitaj al la normalaj pasaĝertrajnoj. Pro kompreneblaj kaŭzoj, tiuj vagonoj estas lokitaj aŭ en finon de la trajnoj, aŭ en komencon, ĉe la lokomotivo.

La 13an de majo 1940, mi la unuan fojon venis en tian "Vagono Zak". Pri ĝia ekzistado mi antaŭe ne sciis.

Interne tia vagono havas koridoron kaj kupeojn kiel normalaj vagonoj. Sed en la pordoj de la kupeoj estas anstataŭ vitroj enmuntitaj kradoj el tre dika drato. Ĉe ĉiu pordo staras ĉiam NKVD-soldato kaj observadas la homojn en la kupeo. En la kupeoj estas aranĝitaj trietaĝaj benkoj, kiel en la normalaj vagonoj en Sovetunio.

La gardanta soldato rimarkis laŭ miaj vestoj, ke mi ne estas Ruso. Li demandis kiu mi estas. Audante, ke mi estas Polo, li demandis, ĉu mi estas spiono. "Ne" mi respondis. "Do vi

estas sabotisto." "Ankaù tio mi ne estas." "Do kial oni vin arestis ? Se vi estas Polo, vi estas aù spiono aù sabotisto." Dum tiu momento mi rememoris la frazon de Stalin : "Sovetunio estas nun ŝanĝita je lando de interpopola amikeco."

Post duhora veturado mi estis en fervoja stacio forigita el la vagono, kun kelkaj aliaj arestitoj. Apud la vagono atendis nin kelkaj miliciistoj por gvidi nin al la malliberejo.

En la blankrusa urbo Borisov, apud la rivero Berezino, troviĝas malgranda strato, kiu ĝenerale ne diferencas de aliaj stratoj en tiu parto de la urbo. Samaspektaj estas la kadukaj lignaj malnovaj domoj. Dum somero estas en ĝi multe da polvo, kiom en la najbaraj stratoj, dum aùtuno la sama koto. Nur unu afero diferencigas tiun straton : en ĝia fino granda kelketaĝa domo konstruita el brikoj. La fenestroj de tiu domo estas ekstere kaŝitaj sub lignaj kestoj. La domo estas ankaù ĉirkaùbarita per ligna palisaro.

Tra tiu strato ekde la frua mateno ĝis la malfrua vespero estas gviditaj grupoj da arestitoj al aù el la malliberejo. Ofte okazas, ke estas gvidita multnombra grupo, inter kelkdek-kelkcent malliberuloj. Dum tia "procesio" la malliberigojn akompanas multaj NKVD-soldatoj, tenantaj fusilojn en la manoj, pretaj ilin uzi. En la fino de tia "procesio" paŝadas kelkaj soldatoj kun grandaj hundoj. Post la hundoj sekvadas kelkaj kamionoj kun soldatoj ĉe la pafadpreparitaj maŝinpafiloj. Nu, la "procesio" havas la ĝustan sovetan aspekton.

De kie la homoj estas venigitaj, kien ili estas forgvidataj, kiel ili vivas interne de tiu alta domo, pri tio la loĝantaro en Borisov ne parolas. Paroli pri tiu afero estas por ili neoportune kaj nedezirate.

La distanco de la fervoja stacio Borisov ĝis la malliberejo estas ĉ. tri kilometroj. Mi estis gvidita kune kun kvar arestitoj. La nombro de nia gardistaro estis la sama kiel nia.

Trapasinte pordeton en la ligna ĉirkaùbaranta palisaro, ni estus sur la korto; en ĝia mezo staris la alta domo, kun la lignaj kestoj kovrantaj la fenestrojn.

Al la malliberejo ni estis vokitaj unuope. Post kiam mi estis vokita, la soldato gvidis min en grandan ĉambron, kie staris longa tablo kaj longa benko. Sur la muroj estis skribitaj aŭ gravuritaj nomoj ; iuj estis pseŭdonomoj, ekzemple : Saŝa, Miŝa, Ŝurek, Murek... Apud iuj nomoj estis menciitaj akuzparagrafoj aŭ akuzoj, ekzemple : huligano, ŝtelisto, bandito, defraŭdinto k.s. Ne mankis la diversaj "grasvortaj" insultoj pri seksaj aferoj. Krom la nomoj tipe rusaj estis alinaciaj, ukrajnaj, polaj, germanaj, judaj kaj kelkaj aziaj. Malliberejo por la popoloj loĝantaj en Sovetunio laŭ la slogano de Lenin kaj Stalin pri Rusio de la caroj.

Forpasis apenaŭ kelkaj minutoj kaj mallibereja gardisto malfermis la pordon kaj atentigis min : "Vi ne skribu sur la muro, tio estas malpermesata kaj ankaŭ punata." Mi atendis iom da tempo kaj la sama gardisto min gvidis al la mallibereja oficejo. Unue li trarigardis miajn paperojn kaj diris : "Vi estas laboristo kaj vi faris tiajn aferojn. En Polio vi estis ekspluatita de la kapitalistoj, en Sovetunio vi havis laboron kaj liberecon kaj vi agis kontraŭ ĝi." Li forprenis de mi ĉiun monon, ŝuajn laĉojn, pantalonrimenon. Poste li ordonis, ke mi senvestiĝu. Li traserĉis ĉiujn poŝojn, tre atente palpis ĉiujn vestaĵojn. Fine mi ricevis la permeson vestiĝi kaj li gvidis min al la ĉelo 15. La horo jam estis ĉirkaŭ la deka vespere.

Veninte en la ĉelon, mi havis surprizon. Mi renkontis amikon-rifuĝinton Leski. Ankaŭ li estis varsoviano kaj antaŭ ol li estis arestita, ni laboris en Krupko en la kooperativo "Ruĝa Martelo". Leski estis arestita, kiam mi estis en Uĥvalo. La akuzoj kontraŭ li - la "normalaj" : inciti la laboristojn, plendi pri la enspezoj kaj laŭdadi al la kapitalismaj regsistemoj. De Uĥvalo mi sendis al li poŝtkarton, sed li ne ricevis ĝin, ĝi venis en la manojn de la NKVD-ĉefo, kiu eĉ pri tio informis al Leski kaj demandis pri kio mi skribis. Feliĉe, ne estis en ĝi skribita io kontraŭsoveta, en la akuzmaterialoj ĝi ne estis menciita.

La meblaro en la ĉelo konsistis el "paraŝo", barelo por akvo kaj malgranda tablo. Neniaj matracoj, neniaj litkovriloj. Ni kuŝis kaj dormis sur la planko. La vazaro konsistis el argilaj ujoj kaj lignaj kuleroj.

La ĉiutagaj okazantaĵoj en la ĉelo estis jenaj : matene

ni ricevis po sescent gramojnda nigra pano, dudek gramojnda sukero kaj varman akvon, ofte la varma akvo havis dolĉan fruktodoron. Mi eksciis, ke ekzistas io, kio estas nomata "fruktteo", tio estas forigitaj partetoj de fruktoj, kiam oni preparas fruktojn por sekigi. Tiuj partetoj estas kunpremitaj kaj vendataj en paketoj kaj anstataŭas teon.

Dum tago ni ricevis supon (trikvaronojn da litro), iom da griaĵo - po du kuleroj kiel mezurilo. Vespere la sama kvanto da supo, kiom dum tago. Ĝenerale ni la manĝaĵon ricevis regule, sed ankaŭ okazis, ke ni ricevis la panon post tagmezo kaj la vespermanĝon je la unua aŭ dua horo post noktomezo.

En la ĉelo ni havis ankaŭ librojn. De tempo al tempo venis bibliotekisto kaj alportis kelkajn librojn kaj ni povis ŝanĝi la librojn. Libroj estis en kelkaj lingvoj: rusa, blankrusa, ukrajna, pola, juda, germana k.a. Troviĝis ankaŭ libro por lerni la francan lingvon. La poloj en la malliberejo devas havi ankaŭ siajn naciajn kulturojn, almenaŭ literaturajn.

Krom Leski estis en la ĉelo kelkaj aliaj Poloj, arestitaj antaŭ kelkaj monatoj. Pli ol ĉio interesis ilin la militaj kaj politikaj okazintaĵoj en la mondo kaj mi devis pri tio rakonti. Bedaŭre, la okazintaĵoj tiam ne estis por ni ĝojindaj. Danio jam estis okupita de la germana armeo. Kvankam en Norvegio okazis rezisto kontraŭ la germanoj, laŭ la gazetaj informoj oni povis antaŭvidi, ke ankaŭ tiu lando estos venkita de la germanoj. La rusoj triumfis sian venkon en Finnlando.

La sovetaj gazetoj ofte presis raportojn kaj artikolojn, ke "malamikaj elementoj" en la baltaj landoj kondutas kiel banditoj - ruĝarmeanoj estas de ili rabitaj, lokitaj en kelojn, kaj turmentitaj, iuj estis mortigitaj. La intenco de tiuj informoj estis klara. La soveta registaro finos la evidentan ludon, ke tiuj landoj estas de Sovetunio nur protektataj, sed ili estas sendependaj. Kaj tiuj landoj estos ankaŭ formale anigitaj al Sovetunio.

Kiam Stalin solenis sian sesdekjaran aĝon, li ricevis de Hitler longan leteron kun elkoraj bondeziroj. Tiu letero estis presita en kompleta teksto en ĉiuj sovetaj gazetoj sur la unua paĝo, kiel fiera novaĵo. Por mi estis

terure vidi tiun leteron presitan ankaù en la du judlingvaj gazetoj.

La militkomunikoj de la germana ĉefa militkomandejo estis presitaj en la sovetaj gazetoj kun simpatio. La opinioj de la naciistaj gazetoj estis en la sovetaj gazetoj komentitaj kun aprobo. Ekzemple, kiam la germana armeo atakis Danion kaj Norvegion, la germana registaro deklaris: "Estus niaflanke tro stulte, se ni ebligus al la malamiko okupi tiujn landojn kaj mem veni en malpli bonan situacion nur pro motivoj kvazaù moralaj." La sovetaj gazetoj tiakarakterajn deklarojn ĉiam pravigis.

Laùdita estis la politika kaj precipe komerca alianco kun Germanio, kiu donas profiton al ambaù popoloj. Tio ne estis nur vortoj. La loĝantoj en Krupko diris, ke neniam antaùe veturis tiom da ŝarĝvagonaroj kiom nun. Tio estis krudaĵoj el Sovetunio por la germana militindustrio. En la gazetoj, eble la unuan fojon en la historio de Sovetunio estis anoncitaj tajpmaŝinoj produktitaj en Germanio. Skribmaŝinoj estis reklamitaj, sed manĝaĵo mankis pli ol antaùe.

La rusoj eĉ komencis murmuri, ke ĉiuj manĝaĵoj estas senditaj al Germanio kaj por ili nenio restas. Pli ol nur murmuri ili ne kuraĝis kaj la murmuro okazis mallaùte - NKVD estas bone organizita kun multe da sperto, neniam ekzistas minaco por la registaro de la civitanoj.

Pri la grado de la Stalin-Hitlera amikeco kaj kiom longe ĝi daùros, ekzistis du opinioj. Iuj estis optimistoj, ili opiniis, ke en certa momento la Germanoj atakos ankaù Sovetunion kaj tiam estos por ni ia ŝanco. Iuj opiniis, ke la politika alianco kondukos ankaù al milita alianco. Tiam la komuna militpotenco kaj la produktadaj ebloj de tiuj du gigantoj estos tre grandaj kaj eble ambaù barbarecoj triumfos komunan venkon en Eùropo, Azio kaj Afriko.

***

La ununura loko en Sovetunio, kie la homoj estas inter si konsiderinde sinceraj, estas en la malliberejoj, malgraù ke eĉ en la ĉeloj NKVD havas siajn informantojn. La arestitoj ofte forgesas, ke de ili esprimitaj opinioj povas veni al scio de iliaj subpremantoj. La homoj ĝenerale parolas en la malliberejoj pri ĉio, kio premas iliajn animojn,

ili estas sinceraj precipe en la rakontoj pri siaj travivaĵoj kaj okazintaĵoj en Sovetunio dum la pasintaj jaroj. Oni povas diri, ke la veron pri la pasinteco kaj estanteco oni povas aŭdi nur en la malliberejoj.

Mi eksciis de iliaj rakontoj, ke la malliberejoj sub la soveta reĝimo havas pasintecon progresivan kaj reakcian. Komence, post la revolucio, ekzistis en la malliberejoj progresema sistemo. La ĉeloj estis dumtage malfermitaj, la arestitoj rajtis iri al aliaj ĉeloj viziti siajn kamaradojn. La arestitoj rajtis havi gazetojn, ricevi librojn de ekstere, ili havis eĉ komitaton, kiu zorgis, ke la administrantaro traktu la arestitojn laŭ la revoluciaj principoj. Tiu progresema periodo ne daŭris longe.

Kiam la bolŝevikoj komencis likvidi ĉiujn aliajn partiojn per kruelaj metodoj, la malliberejoj denove havis la antaŭrevolucian karakteron. En la jaroj 1928-29, kiam la soveta registaro organizis la kolĥozojn, la reĝimo en la malliberejoj estis pli severa, ĉiuj rilatoj inter la arestitoj kaj iliaj parencoj ĉesis. La plej kruela periodo en la malliberejoj estis, kiam Stalin definitive likvidis siajn iamajn kamaradojn, en la jaroj 1936-37, kaj precipe kiam la NKVD-ĉefo estis Jeĵov. La fenestroj estis duone malgrandigitaj.

Ĉar ne sufiĉis loko por ĉiuj arestitoj, malgraŭ ke la homoj havis spacon en la karceroj nur por stari alpremitaj unu al aliaj, estis aranĝitaj trietaĝaj kvazaŭkuŝejoj. Sur ili la homoj povis sidi. En la ĉeloj estis ĉiam krepuska lumo, la odoro en la ĉeloj estis sufoka, multaj homoj svenis. Al la necesejoj ili estis gviditaj nur unu fojon dum tagnokto. Ĉiam dum tiuj eliroj el la ĉeloj kelkaj homoj restis sur siaj lokoj jam senmovaj - tiujn elportis la NKVD-soldatoj, plejparte al la tombejo.

La mallibereja administrantaro ne kapablis funkciigi normalan ordon. La manĝaĵo estis disdonata dum la tuta tagnokto. La arestitoj en la ĉeloj ĉesis scii la daton kaj multfoje ili ne sciis, ĉu estas tago aŭ estas nokto. Kiam homo dum tiu tempo estis vokita al esplorjuĝisto, li akceptis ĉiujn akuzojn kontraŭ li, nur por ne reiri al la ĉelo.

Kiam finiĝis la t.n. "jeĵovismo", pliboniĝis iom ankaŭ en la malliberejaj ĉeloj. La trietaĝaj kuŝejoj estis forprenitaj ; por la malmultigita nombro da arestitoj sufiĉis la planko, tiuj juĝitaj dum la Jeĵov-periodo jam estis en la koncentrejoj, kie ili konstruis la t.n. socialismon kaj pereis amase.

Post kelktaga estado en la malliberejo, mi estis iun posttagmezon vokita el la ĉelo. En la oficejo atendis min miliciisto el Krupko por gvidi min por ankoraŭ unu esplorado.

Denove mi troviĝis en la milicieja karcero, sola kun la "paraŝo". Denove pasis kelkaj tagnoktoj en soleco, interrompitaj du aŭ tri fojojn tage de la miliciistoj, kiuj alportis manĝaĵon aŭ gvidis min al la necesejo.

Iun tagon oni alvenigis al la najbara ĉelo ebriulon, kiu antaŭe estis konato mia en la kooperativo "Ruĝa Martelo". Kiam li malebriiĝis, mi komencis kun li konversacii. De lia rakonto mi eksciis, ke krom mi neniu de nia grupo estis arestita. La ceteraj kolegoj estis vokitaj al la NKVD-ĉefo por atesti kontraŭ min, sed krom Biderman, neniu subtenis la akuzon. Biderman jam malkaŝe deklaris, ke li informis pri ĉiuj niaj intencoj la NKVD-ĉefon. Li postulis de la kolegoj, ke ili subtenu lin en lia akuzo kontraŭ mi, sed la ceteraj kolegoj lin evitis, ofendis kaj insultis, la samon faris ankaŭ la ceteraj rifuĝintoj en Krupko. Komencis lin eviti ankaŭ aliaj loĝantoj en la urbeto.

Iun tagon Biderman malaperis el Krupko. Post kelkaj tagoj revenigis lin miliciistoj kaj li estis arestita. Supozeble tiu aresto estis nur por ŝajnigi. La NKVD-ĉefo certe lin sendis al alia loko, kie li povos daŭrigi sian servon por Sovetunio. Mi penis ekscii en la malliberejo, ĉu tiu homo troviĝas, sed li ne estis tie.

Dum rakontoj kaj interparoloj kun aliaj arestitaj rifuĝintoj mi eksciis, ke dum la esplordemandado ili suferis fizike. Plejofte la esploroj okazis dumnokte kaj daŭris dum multaj horoj. Koncerne tion, mi havis "feliĉon", la NKVD-ĉefo kondutis korekte. Kial mi ne scias, eble en tiu tempo la NKVD-istoj ricevis instrukciojn por trakti la polajn arestitojn malpli severe dum la esploroj.

Dum la dua "esploro-kunsido", la NKVD-ĉefo min demandis pri la sama kiel la unuan fojon, sed pli detale; ekzemple:

ĉu mi agis kiel solulo, aŭ laŭ instrukcioj kaj en kontakto kun ia pola organizaĵo. Ĉu mia kontraŭsoveta propagando estis konscie planita aŭ nur erara agado kaj precipe, ĉu mi bedaŭras mian kontraŭsovetan propagandon. Interalie li diris al mi, ke Biderman estas arestita. Tia informo de NKVD-ĉefo povis min nur certigi, ke Biderman plenumas sian taskon en alia loko. Mi ŝajnigis la sciigon pri Biderman kiel surprizon kaj demandis kio okazis pri la ceteraj kolegoj de nia grupo ; je tio li nenion respondis. Fine la NKVD-ĉefo laŭtlegis al mi kelkajn skribitajn paĝojn, kies enhavo estis liaj demandoj kaj miaj respondoj, tion mi devis subskribi, la esploro estis finita. Nun mi devis esti reveturigita al la malliberejo kaj atendi, kion ?...

La duan fojon, al la malliberejo gvidis min miliciisto el Krupko - la "vagonzak" tiun tagon ne haltis en Krupko. La miliciisto volis ŝpari por si la kelkajn rublojn, kiujn li ricevis por aĉeti biletojn. Eniri internen en la vagonon li ne permesis al mi, ni staris en la koridoro. Kiam venis la konduktorino kaj demandis min pri la bileto, mi montris al la miliciisto. Ĉar ankaŭ li ne havis bileton, la konduktorino minacis, ke en la venonta stacio ni devos forlasi la trajnon kaj tie klarigi kial ni ne havas biletojn. Kompreneble, min tiu afero ĉagrenis. En alia situacio estis la miliciisto, lia devo estis aĉeti biletojn. La miliciisto laŭtegis patriotan paroladon pri la danĝeraj malamikoj en la lando, inter kiuj mi estas. "Ĉu vi scias, ke li estas ne iu simpla krimulo, li estas popola malamiko kaj pola patrioto. Li sendube fuĝus dum la kelkaj minutoj, kiam mi starus en la vico por aĉeti biletojn. Do, kio estas por nia lando pli grava, ĉu la kelkaj rubloj por la fervojo, aŭ pli bone gardi niajn malamikojn ?"

La kontrolistino direktis al mi indiferentan rigardon, kiu povus esprimi ankaŭ kompaton kaj eble simpation. Sed pli da klopodoj la miliciisto havis, kiam li volis min transdoni al la malliberejo.

En Rusio estas tre disvastigita la tria plago, kiun dio sendis al Faraono kaj al la Egiptoj, kiam ili ne volis ellasi la judojn el sia lando. Por kontraŭbatali la pedikojn estas aranĝitaj multe da "desinfektkameroj".

Tia kamero estas malgranda ĉambro, kiun oni fermas hermetike, kaj ĝi estas hejtata de ekstere. Kiam la temperaturo en la kamero atingas cent gradojn, oni enpendigas la vestaĵojn kaj la pedikoj bruliĝas. Tiuspecaj kameroj troviĝas senescepte en ĉiuj banejoj, en la grandaj kaj malgrandaj urboj. Ili troviĝas en ĉiuj malliberejoj, en ĉiuj koncentrejoj kaj cetere. Por enveni en lokon, kie kolektiĝas multaj homoj, por pli longa estado, necese estas havi ateston, ke oni antaŭe desinfektis siajn vestaĵojn. Ekzemple : neniu hotelo akceptos homon por tranokti, se li ne havas ateston eldonitan en la sama tago, ke li desinfektis siajn vestaĵojn. Biletvendisto en la fervoja stacio ne vendos bileton por pli longa distanco, se oni ne havas tian ateston. Ĉiuj tiuj rimedoj ne forigis la pedikojn, sed en siaj apartaj cirkonstancoj la rusoj faras tion, kio estas por ili ebla.

Por esti enlasita en la malliberejon oni devas havi ankaŭ ateston, ke la vestaĵoj estis senpedikigitaj.

Kiam mi venis al la malliberejo la unuan fojon per la "vagon zak", ne akompanis min la miliciisto de Krupko kaj la deĵoranto en la malliberejo estis devigita akcepti min sen desinfekt-atesto: li ja ne sendus min al banejo sen gardisto. La duan fojon al la malliberejo gvidis min miliciisto el Krupko kaj la deĵoranto en la malliberejа kontoro ne volis min enlasi sen atesto de banejo, ke mi estas senpedikigita. Jam estis vespere, kaj tiam la banejo estis fermita.

La miliciisto volis min tranddoni al la malliberejo kaj veturi hejmen. Komenciĝis diskutado inter la malliberej-deĵoranto kaj la miliciisto, ĉu mi estas senpedikigita, aŭ ĉu mi ne estas senpedikigita. Ambaŭ sekuriggardistoj baldaŭ ekuzis esprimojn absolute ne amikajn kaj eĉ riproĉojn pri popola malamikeco, neplenumo de la taskoj al ili komisiitaj kaj tio jam estas sabotismo, aŭ preskaŭ sabotismo.

Kiam ĉiuj iliaj argumentoj estis elĉerpitaj sen ia interkonsento, la miliciisto turnis sin al mi kaj demandis : "Nu, diru la veron, ĉu vi estas senpedikigita, aŭ ĉu vi ne estas senpedikigita."

Eĉ se mi dirus, ke mi estas senpedikigita, la deĵoranto min certe ne akceptus. Sed mi volis scii, kion faros kun

mi la miliciisto ĝis la morgaùa mateno. Krome, mi havis senton de venĝemo kontraù li pro liaj esprimoj en la trajno. Mi movis miajn brakojn kaj respondis : "Mi ne scias". Tiu nekonkreta respondo sufiĉis definitive por la mallibereja deĵoranto kaj li diris al la miliciisto: "Faru kun li kion vi volas, sen la atesto de banejo mi lin ne akceptos."

Elirinte el la mallibereja korto, la miliciisto "elŝarĝis" al mi sian maliçon, fine li aldonis : "Se vi dirus, ke vi ne havas pedikojn, vi ricevus hodiaù en la malliberejo vespermanĝon, vi dormus "kulture" kiel homo, sed nun ni devos tranokti en la stacidomo kaj atendi ĝis la deka horo morgaù matene, kiam oni malfermos la banejon."

Tranokti en la stacidomo min absolute ne ĝenis. Mi estis eĉ kontenta esti dum nokto inter homoj, eble mi renkontos iun konaton, eble mi aùdos iujn novaĵojn pri la okazintaĵoj en la mondo, kiuj povas ankaù influi mian sorton en Sovetunio. Eĉ se mi devas iom pli malsati, ankaù estas preferinde esti inter homoj ol en la fermita ĉelo. Ĉu mi dormos sur planko en la stacidomo, aù sur la planko en la ĉelo, estas ja por mi indiferente. En la stacidomo la miliciisto forpelis kelkajn homojn de unu angulo kaj mi sidiĝis sur la benko, paroli kun iu ajn li ne permesis al mi.

Ĝis noktomezo mi ne povis endormiĝi, turmentis min la malsato, poste mi endormiĝis. Pli turmentis sin la miliciisto. Ankaù li estis malsata kaj dormi li ja ne riskos, li ja devas gardi min.

Matene la miliciisto petis sian kolegon deĵoranton en la stacio, ke li gardu min kaj li mem foriris, verŝajne ion manĝi. Kiam li revenis, mi petis la miliciiston, ke li aĉetu por mi iom da pano, aù iun ajn manĝaĵon kaj monon mi redonos al li en la malliberejo, tie mi havis monon. "Vi nenion aĉetos nun, estas tro frue." Iom poste mi ripetis mian deziron aĉeti iun manĝaĵon, ĉar mi dum tuta tagnokto nenion manĝis. "Ne daùros longe kaj vi venos en la malliberejon kaj ĝis tiam vi ne mortos."

Post la naùa horo ni iris al la banejo. Jam atendis tie aliaj miliciistoj kun aliaj arestitoj por la sama celo kiel ni. La horo jam estis post la deka, sed la

servistinoj en la banejo neniun vokis por la senpedikiga operacio. Baldaŭ ni eksciis, ke la desinfektkamero eĉ ne estas hejtata, oni ne havas lignon - la ligno troviĝas en iu kamero fermita, kaj la ŝlosilon havas la administranto, kiu ankoraŭ ne venis.

La atendantaj miliciistoj koleris kaj insultis la banservistaron, ke ili estas popolaj malamikoj kaj sabotistoj. Fine unu servistino iris serĉi la administranton sur la bazaro, kie li plenumis sian "normalan libermerkatkomercon". Kiam venis la banadministranto, li sin senkulpigis per motivo, ke la pasintan vesperon li lasis en la hejtĉambro sufiĉe da ligno, sed dumnokte oni la lignon forŝtelis kaj en tio kulpas la nokta gardisto, kiu dumnokte dormis, anstataŭ gardi la lignon, aŭ eble la noktgardisto mem forŝtelis la lignon. Ĉirkaŭ tagmezo niaj vestaĵoj estis senpedikigitaj kaj mi povis esti enlasita en la malliberejon, formale kiel senpedikulo.

***

En Sovetio ekzistas kutimo, aŭ eble speciala celo aranĝi modelon de certaj institucioj. Ekzemple : ekzistas speciale modelaj kolĥozoj nur por montri ilin al eksterlandaj vizitantoj. Verŝajne la ĉefo de la malliberejo en Borisov volis havi unu modelan ĉelon. En tiu malliberejo tiu ĉelo estis konata sub la nomo n-ro 16. Inter la arestitoj okazis rakontoj, ke en tiu ĉelo troviĝas litoj, matracoj kaj eĉ litkovriloj. Interalie estis rakontite, ke en tiu ĉelo troviĝas diversaj sciencistoj kaj ili okupiĝas pri sciencaj laboroj.

Kiam mi venis la duan fojon en la malliberejon, la oficejdeĵoranto gvidis min al alia etaĝo ol antaŭe. Kiam la deĵoranta soldato en la koridoro malfermis la pordon por enlasi min, mia gvidanto diris : "Al la ĉelo 16". Aŭdante, ke mi iros al la ĉelo 16, mi surpriziĝis, sed la deĵoranta soldato estis okupata kun alia arestito. Li ordonis al mi stariĝi la vizaĝon al la muro por ke mi ne vidu la duan arestiton kaj por ke la dua ne vidu min, tia estas la rigoro en la sovetaj malliberejoj.

Kiam la deĵoranto finis la aferon kun la dua arestito, li gvidis min al la ĉelo. Malfermante la ĉelon 16, mi

fakte ekvidis litojn, matracojn kaj litkovrilojn. Nun min interesis, ĉu tiuj homoj estas sciencistoj kaj ĉu ili okupiĝas pri sciencaj laboroj.

Post la salutdiroj, miaj novaj kamaradoj montris al mi liberan liton, kiun mi povas okupi. Post kiam mi metis sur la liton mian dorsosakon, kiun mi kunhavis el Varsovio, ni reciproke konatiĝis. Ĝenerale mi baldaŭ rimarkis, ke tiuj homoj kondutas pli simpatie kaj estas pli trankvilaj ol la homoj en la antaŭa ĉelo. Mi rimarkis, ke inter ili troviĝas du en oficiraj uniformoj, kompreneble sen la distingsignoj. Troviĝis tie ankaŭ unu samlandano. Mia samlandano nomiĝis sinjoro Pomikalski Stanislav Kasproviĉ. Ĉiuj sin turnis al li per sinjoro, kvankam tiu alparolmaniero en Sovetunio ne estis aplikita de post la revolucio. Aŭ oni diras kamarado, aŭ oni diras civitano. Sed Pomikalski ĉiujn titolis "sinjoro" kaj ĉiuj lin sammaniere titolis. Li estis en la sesdekjara aĝo. Ĝis la milito li loĝis en Vilno, li estis policoficiro por la mobilizaj aferoj. Se la milito ne eksplodus, li post unu jaro estus pensiulo kaj ne devus labori. Li estis arestita kelkajn tagojn post la okupo per la ruĝa armeo de Vilno, kune kun sia filo kuracisto. La edzino kaj la filino ne estis arestitaj samtempe kun li, sed li kredis, ke ankaŭ ili estis arestitaj iom poste. Kune kun li estis arestitaj multaj aliaj policistoj.

Kontraŭ Pomikalski la NKVD havis specialan akuzon. Antaŭ la alveno de la ruĝa armeo en Vilnon, li bruligis la mobilizajn planojn. Pomikalski tiun agon konfesis, pravigante sin, ke kiel oficisto de la pola ŝtato li devis obei ĝiajn ordonojn kaj li ricevis ordonon forbruligi la planojn. Sed la NKVD-oficiro, kiu esploris lin, opiniis, ke Pomikalski devis la planojn konservi kaj transdoni al la enveninta ruĝa armeo.

Pomikalski estis esplorita multajn fojojn dum longaj horoj, precipe dumnokte. Kun la filo ĉiu kontakto estis rompita post ilia alveno en la malliberejon en Vilno.

De la malliberejo en Vilno Pomikalski estis sendita kun multnombra anaro da samsortanoj al la malliberejo en Bjalistoko.

Post mallonga restado en Bjalistoko li estis sendita al la malliberejo en Minsko kaj poste al Borisovo. En

la malliberejo de Vilno la reviziantoj forprenis de li kelkajn objektojn jenajn : gantojn, koltukon, fontoplumon de tre bona kvalito, la edziĝringon, termobotelon, horloĝon, monujon, poŝtranĉilon kaj okulvitrojn.

La oficiro, kiu forprenis de li la objektojn, notis ĉion kaj promesis doni al li kvitancon iom poste, ĉar en la ĵusa momento li estis tre okupata. Pomikalski kvazaŭ sperta policisto, demandis la oficiron pri lia nomo, por scii, kiu tiujn objektojn de li forprenis. Sed Pomikalski absolute ne imagis, ke tiaj valoraĵoj estas en Sovetunio tre allogaj eĉ por NKVD-oficiro. Precipe tia alproprigo povas esti pravigita laŭ la "revoluciaj principoj" deproprigi la havaĵojn de la malamika klasano.

Pomikalski poste memorigis la deĵorantajn soldatojn en la koridoro pri la kvitanco, menciante la nomon de la oficiro, kiu forprenis liajn objektojn. Pomikalski verŝajne ne komprenis, ke la soldatoj estas sendube enviaj pri la objektoj, kiuj venis en la posedon de la oficiro, sed neniam ili ja ĝenos la oficiron pri tiaj naivaĵoj.

Kiam Pomikalski estis veturigita de Vilno al Bjalistoko, li postulis siajn objektojn, aŭ kvitancon. Sed la oficiroj tiam estis tre okupataj por ordigi la karavanon de arestitoj, lian memorigon ili notis kaj promesis al li transsendi la objektojn al la malliberejo, kien li estas veturigita.

En la bjalistoka malliberejo Pomikalski tuj post sia alveno menciis pri la forprenitaj de li objektoj, kiuj devas esti al li senditaj. Sendube la NKVD-oficiroj en la bjalistoka malliberejo ridis pri la naiveco de Pomikalski, sed ili promesis al li ordigi la aferon, kiam la objektoj estos ricevitaj.

Pomikalski ofte demandis en la malliberejo pri siaj objektoj, ĉiam li ricevis la saman respondon, la promeson, sed nek la objektoj nek la kvitanco venis al Bjalistoko.

De Bjalistoko Pomikalski estis veturigita al Minsko kaj ankaŭ tie li tedis la malliberejan administrantaron pri siaj objektoj, la rezulto estis la sama kiel en Vilno kaj en Bjalistoko. La samo okazis en la malliberejo en Borisovo. Fine la administrantaro en la borisova malliberejo rekomendis al li skribi al ĉiuj malliberejoj, kie li estis antaŭe kaj klarigi kiel okazis pri liaj objektoj.

Pomikalski skribis longajn kaj ĝentilajn leterojn, enhavantajn ĉiujn detalojn pri liaj objektoj kaj atendis respondon, sed neniu respondo venis.

La administrantaro rekomendis al li skribi duan fojon, sed la respondo estis sama, neniu respondo.

La administrantaro konsilis al li skribi al diversaj juĝinstancoj, al prokuroroj. Pomikalski skribis ĉien, kien oni rekomendis al li, sed neniu ajn respondo venis.

Liaj skribaĵoj poste ne havis la ĝentilan formon kiel la komencaj, ili estis eĉ iom ofendaj, ne helpis eĉ tia skribformo.

Iom post iom Pomikalski kutimiĝis al tiu leter-skribado. Ĉiun semajnon li petis paperon kaj skribilon kaj skribis. Li ne skribis por ricevi ian respondon, nur por skribi. Li rigardis tiujn skribadojn kvazaŭ ian normalan okupon. Eble liaj leteroj estis ĵetitaj en la korbon por nenecesaj paperaĵoj en la mallibereja kontoro.

***

Kvankam la ceteraj ĉelanoj estis neniel sciencistoj, tamen ilia pasinteco ligita al ilia aresto estis sufiĉe interesa. Pli ol ĉiuj estis rimarkitaj la du oficiroj en la uniformoj. Unu nomiĝis Bielov, la nacia deveno tataro. Kiam la revolucio venis, li estis 16-jara laboristo kaj kompleta analfabeto. Tiam li aniĝis al la revolucia junularo, partoprenis en la revoluciaj bataloj kun armiloj.

Post la bolŝevika venko li komencis studadi en militistaj lernejoj kaj fine li atingis la generalan rangon. Sed li servis en la armeo kiel "politruko". Antaŭ la aresto li estis en la garnizono de la urbo Reĉice, proksime de la pola limo. Arestita li estis en la jaro 1937 dum la amasaj kaj famkonataj "elpurigoj" en la Jeĵovperiodo. Li estis persone amikiĝinta kun generaloj Putno, Ajdeman, Jakir kaj aliaj pereigitaj oficiroj. Unufoje li menciis, ke ĉiuj liaj kamaradoj jam delonge estas mortpafitaj, aŭ troviĝas jam delonge en la koncentrejoj, nur li ankoraŭ vagadas en la malliberejoj. Kial, li mem ne scias klarigi, - eble li tion ne volis klarigi.

Laŭ la persona vidpunkto, tiu homo havis la eblon akiri sian karieron nur dank'al la bolŝevika venko, kaj

li ne devus esti iu malamiko de la soveta reĝimo. Lian inteligenton ni taksis ne pli ol mezgrada, tamen li konis la politikajn okazintaĵojn en Polio sufiĉe bone. Li bone konis ankaŭ la klasikan mondliteraturon kaj ĝenerale mi rimarkis, ke la rusoj havas grandan intereson por literaturo, ne nur por la rusa, sed ankaŭ por la tutmonda. Mi kuraĝas opinii ankaŭ, ke ili estas indiferentaj al la modernaj sovetaj ŝmiraĵoj, aŭ por la t.n. postrevolucia literaturo. Mi preskaŭ neniam aŭdis, ke ili parolu serioze pri la nuntempaj verkistoj, escepte de kelkaj, kiel Ŝoloĥov, Aleksej Tolstoj kaj ankoraŭ unuopaj verkistoj.

Pri sia pasinteco kaj kariero Bielov nek fieris nek multe rakontis. Nur unu fojon li rakontis kiamaniere okazis lia aresto. Li estis iun vesperon vokita per telefono, ke alveturis iu armea inspektoro, kiu dum tago inspektis kelkajn milittrupojn en la regiono kaj la inspektoro volas al li sciigi kelkajn rimarkojn.

Kiam Bielov venis al la indikita loko, li tie renkontis NKVD-oficirojn. Tiuj postulis, ke li formetu la pistolon kaj partian legitimilon. Komence Bielov rifuzis plenumi tiujn ordonojn, sed la ordonojn de la NKVD ne eblis malobei kaj tiam li estis arestita. Pli da detaloj li ne rakontis. Se mi aŭ Pomikalski parolis pri la kruelaĵoj en Sovetunio, Bielov ĉiam indignis, komencis kun ni kvereli, uzante ankaŭ akrajn kaj ofendemajn esprimojn. Li dum tiuj okazaĵoj uzis amason da sovetaj propagandesprimoj, kvankam li mem ofte en siaj paroloj opiniis la samon kiel ni, pri la samaj aferoj.

La dua oficiro estis kapitano Strelecki, kvin aŭ ses jarojn pli juna ol la generalo. La nacia deveno de Strelecki estis ukrajna. Ankaŭ Strelecki estis arestita en la jaro 1937 kaj kondamnita al la mortpuno. En la ĉelo por tiaj kondamnitaj li estis 98 tagojn, poste ellasita al alia normala ĉelo kaj lia afero estis sendita al nova ekzamenado. Lia edzino dum tiu tempo sin memmortigis per pendigo. Li vagadis tra kelkaj malliberejoj, li estis multfoje ekzamenita, en Borisovo li atendis verdikton. Strelecki pri tio malpli rakontis ol la generalo. Laŭ sia konduto Strelecki impresis esti pli ĝentila ol lia kamarado generalo. Iam li komencis lerni la germanan kaj anglan lingvojn, sed progresojn en tiuj lingvoj li ne akiris, li scipovis nur la lati-

nan alfabeton kaj kelkajn simplajn frazojn. Strelecki kredis, ke li ne ricevos grandan punverdikton, eble nur kvin jarojn kaj longe en la koncentrejoj li ne devos esti, ĉar kelkajn jarojn li jam estas arestita.

La motivojn por ricevi malgrandan verdikton Strelecki bazigis jene : La akuzo, ke li apartenis al kontraŭrevolucia organizaĵo estas nuligita, restis nur la akuzo, ke li elparolis kelkajn kontraŭrevoluciajn diraĵojn, ekzemple, iam li komparis ian malgrandan libron pri Stalin al preĝlibro. En sia defendado li klarigis, ke li opiniis tion nur pro la ekstera aspekto, sed ne pri la enhavo. La ceteraj akuzoj estis similaj al tio. Krome, nek li persone, nek lia edzino havis parencojn eksterlande kaj neniam li skribis al eksterlando.

Karpienko Jefim Sidroviĉ

Kun sia altstatura figuro, kun siaj korpmovoj li similis homkamelon. Tia estis ankaŭ lia ĉelnomo, sed li neniam estis ofendita, se iu lin nomis kamelo. Supoze li tiun nomon eĉ ŝatis kaj li estis kontenta, se iu lin nomis kamelo. Ĉion, kio koncernis lin, li tre alte taksis, eĉ la ne tro komplezan ĉelnomon. Inter li kaj Bielov ofte okazis diskutoj pri la preferecoj de iliaj landoj : ĉu estas pli bone la varmegaj sudaj landoj de kie devenas Bielov, kie kreskas vinberoj, multe da aliaj fruktoj kaj tabako, aŭ la malvarma Blankrusio, kie kreskas "nur terpomoj".

Laŭ la konkludoj de Bielov, fruktoj kaj tabako estas altvaloraj kreskaĵoj, precipe tabako. Sed Karpienko laŭ diversaj sciencaj motivoj konkludis, ke la blankrusa malvarma klimato estas pli bona ol la varmega sudo. Terpomoj estas pli nutraj kaj pli necesaj por la korpo ol vinberoj. Koncerne tabakon, ja li persone ne fumas kaj la plej bonaj tabakspecoj kreskas ne en la lando de Bielov, sed en Turkio, Egiptio kaj en Macedonio. Ĉu Karpienko en siaj opinioj estis sincera kaj serioza oni neniam sciis.

Lia aĝo estis pli ol kvindek jaroj. Siajn studojn li faris antaŭ la revolucio, sed iun sciencan titolon li ne havis, tamen li fakte havis diversflankan scion pri multaj aferoj kaj li povis en siaj motivoj uzi sciencajn

argumentojn, pri kiuj la generalo havis nenian komprenon.

La ŝatatajn diskutojn de la generalo li komplete evitis kaj en ili neniam partoprenis. Li amis paroli speciale pri botaniko kaj pri zoologio. Ni rigardis lin en nia rondo kompetentulo en tiuj aferoj kaj ankaŭ en aferoj kiuj rilatas konkretan sciencon. Kiam Karpienko estis pri io demandita, oni povis laŭ liaj diversflankaj klarigoj kaj respondoj konstati, ke li fakte konas tiujn aferojn.

Karpienko estis arestita en la jaro 1936. La ĉefa akuzo kontraŭ li estis :

Iam li administris lagon kun kastoroj, en blankrusa urbeto, kie li loĝis. Dum lia administrado la plejparto el la kastoroj mortis. La kaŭzoj de ilia mortado, laŭ la akuzo, estis, ke li al la bestoj ne donis manĝaĵon. La ricevitan manĝaĵon por la kastoroj li vendis kaj sen manĝaĵo ja ne vivas eĉ kastoro. Tiu fiago, aŭ kiel en Sovetunio populare nomita "ekonomia sabotado" de Karpienko estis kaŭzita pro liaj kontraŭrevoluciaj ideoj. Lian kontraŭrevoluciismon atestis interalie, ke li partoprenis la diservojn, kiam la preĝejoj ankoraŭ estis malfermitaj. Poste kiam la preĝejoj estis anstataŭitaj per kulturaj kluboj, kinejoj, laborejoj, magazenoj, kaj eĉ per staloj por bestoj, li ofte aŭdis per la radio la diservojn el Polio. Kompreneble, per tiukarakteraj bolŝevikaj dialektikaj principoj oni ja ĉion povas konkludi.

Por ni klare estis, ke Karpienko ne riskus tiajn aferojn. Laŭ sia timema karaktero, ĉiam li penis prezenti al la mallibereja administrantaro kaj gardistaro sian lojalecon al la bolŝevika reĝimo. Karpienko estis kondamnita je dek jaroj da "eduklaboro".

Por lia "edukado" li estis sendita al la koncentrejo "Ustvimlag". (La nomo Ustvim estas prenita de la rivero, kiu fluas en tiu regiono, norde en Rusio, en la proksimeco de Kotlas). En la tendaro li estis ĉirkaŭ tri jarojn.

Dum sia restado en "Ustvimlag" li sendis multe da petskriboj al diversaj juĝinstancoj, ke li estis senkulpe kondamnita. Liaj petskriboj tamen ion rezultigis. Li estis reveturigita al la malliberejo kaj lia afero estis sendita al la NKVD por esplorado duan fojon. La esplorado daŭris kelkajn monatojn kaj post ĝia fino la dosiero estis trasendita al juĝistaro en Borisovo.

Por konstatigi sian senkulpecon dum la juĝado, Karpienko proponis alvenigi kelkajn atestantojn. La juĝistaro akceptis lian proponon kaj decidis okazigi la juĝproceson duan fojon, aŭdonte la atestantojn.

Kiam la juĝistaro kolektiĝis la duan fojon, mankis iuj atestantoj kaj la juĝado ne okazis. Tio ripetiĝis 26 fojojn. Ĉiujn kelkajn tagojn Karpienko estis vokita al la juĝejo matene kaj revenis vespere, rakontante al ni, ke la juĝado ne okazis, ĉar mankis iu atestanto.

En nia triviala mallibereja vivo, la foriro kaj la reveno de Karpienko estiĝis amuzaĵo. Ĝi estus amuza ankaŭ por Karpienko, se ĝi ne estus por li turmenta. En Rusio ekzistas kutimo, aŭ eble regulo, ke se iu estas en la juĝejo kondamnita, li ne devas reveni al la sama ĉelo, kie li estis antaŭe, por ke la ceteraj samsortanoj ne sciu pri la verdikto. Tial, se iu estas vokita al juĝejo, li ĉiam devas kunpreni sian havaĵon.

En la kvarjara mallibereja kaj koncentreja "kariero", Karpienko kunkolektis diversajn "valoraĵojn" kaj havis ilin en granda sako. Ekzemple : du paroj da malnovaj sed ripareblaj feltbotoj, tri paroj da bastŝuoj, inter tiuj estis du paroj komplete novaj, unu paro da soldataj ŝuoj, krom tiuj, kiujn li portis sur la piedoj, du aŭ tri ĉemizoj, kelkaj pecoj da gumo de aŭtomobilaj pneŭoj (tio servas por plandoj), iomete da ŝnuretoj, malnova litkovrilo, du ladaj tasoj, longa leda rimeno kaj aliaj diversaj etaj objektoj.

La distanco inter la institucioj - malliberejo kaj juĝejo - estis ĉirkaŭ kvin kilometroj. Ĉiufoje, kiam Karpienko iris al la juĝejo, li devis porti sian sakon en ambaŭ direktoj. Kiam li revenis al la ĉelo, ĉiam enpuŝante antaŭ si la sakon, li estis tre laca, li diris nur : "La juĝado ne okazis", kaj tuj sidiĝis aŭ kuŝiĝis sur la lito, nenion plu dirinte. Ĉiujn okazintajn detalojn pri la neokazinta juĝproceso li rakontis venontan tagon.

Iun tagon Karpienko estis matene vokita al la juĝejo kaj ĝis la venonta mateno ne revenis. Ni jam estis ricevintaj nian matenan barelon da varma akvo, la sescentgramajn porciojn da pano kaj ni komencis manĝi, parolinte pri Karpienko, kiu ne revenis. Iuj estis eĉ

optimismaj kaj opiniis, ke Karpienko estis liberigita. Ankaù estis skeptikuloj, kiuj opiniis, ke Karpienko ne ne povas esti liberigita tiel rapide... Tamen ni estis certaj, ke tiun fojon la juĝproceso havis sian finon.

Dum nia manĝado kaj parolo pri Karpienko, malfermiĝis la pordo kaj kiel ĉiam, enpuŝante antaù si la sakon postpaŝis Karpienko. Li kuŝiĝis sur sia lito kaj pro treega laciĝo ne kapablis rakonti kio okazis tiun fojon en la juĝejo. Karpienko petis nur ĉe la surkoridora gardanta soldato sian tagan porcion da pano.

Post iom da ripozo kaj post manĝo de la pano kun la apenaù varma akvo, li rekuŝiĝis sur la lito. Ni vidis, ke li estas tre laca kaj ni ne volis, ke li ion rakontu.

Post kelkaj horoj Karpienko sidiĝis kaj rakontis detale pri la okazinta juĝkunsido, laù la nombro la 27a. Ĝi komenciĝis malfrue vespere. Tiun fojon ĉio okazis por lia favoro. Ĉeestis ĉiuj atestantoj kaj iliaj atestdiroj estis por lia favoro. Laù la okazaĵoj dum la juĝadtraktadoj, ĉio aspektis, ke li estos liberigita. Tiam la akuzinto petis la vorton kaj deklaris jene : "Ĉar la nun ŝanĝita stato en la afero de Karpienko ne estas konforma por findecido, mi proponas ne juĝi lin nun, sed transdoni lian aferon por denova ekzamenado al la NKVD-instancoj". Post mallonga konsiliĝo de la juĝistaro, ili akceptis la proponon de la akuzinto. Mi konkludis jene : Juĝisto liberiginte homon riskus akuzon de NKVD kontraù li mem, la sekvontaj praktikoj konstatigis, ke mi ne eraris.

Stefanoviĉ

Tre malofte li parolis. Se li iam diris ion, tio estis nur kelkaj necesaj vortoj pri la koncerna afero. Tamen la diversajn okazantajn diskutojn inter ni li ofte aùskultis atente. Sed plejofte li kuŝis sur sia lito kaj dormis, revadis. Lia estado en la ĉelo estus preskaù ne rimarkita, se li ne estus servema, helpema kaj tre kontenta, se li havis okazon fari al iu ian servon, eĉ la plej etan.

Stefanoviĉ estis 27-jara kaj lia pasinteco enhavis kvarjaran restadon en malliberejoj, koncentrejoj kaj denove en la malliberejo. Demandite pri sia nacia aparteno, li respondis polo en la dokumentoj. Sed la polan lingvon li nek parolis nek komprenis.

Inter la homoj, pri kiuj oni parolis en la malliberejo, ke ili estas ĉiuj sciencistoj, Stefanoviĉ estis kompleta analfabeto. Li subskribis per ia signo kaj lian nomon subskribis tiu, kiu de li prenis la subskribon.

La homoj en la ĉelo instruis lin subskribi sian nomon, sed la alfabeton li ne scipovis, li nur kopiis diversflanke direktitajn strekojn sen kompreno pri ĉiu litero aparte. Fine li subskribis sin Stefoviĉ. Sendube estus eble lin instrui iom legi kaj skribi, spite ke la regularo malpermesis havi en la ĉelo krajonon kaj paperon. Tio tamen ne estus la ĉefaj malfacilaĵoj. Krajonon ni havis kaŝitan kaj paperaĵojn ni ankaŭ povus iamaniere havigi al ni.

Kelkaj provoj por instrui lin skribi kaj legi estis faritaj, sed Stefanoviĉ ne havis por tio la paciencon. La ĉiama kuŝado sur la lito kaj revado forprenis de li ĉiun ajn intereson por lerni.

Li estis arestita en la jaro 1937 post kelksemajna kunvivado kun sia edzino. La akuzo kontraŭ li estis : "ideologia kaj aktiva buĥarinisto" kaj "ekonomia sabotisto". Lia sabotado estis, ke, laborante en kolĥozo, li sterkon de la bestaro ĵetis en ĉevojan kanalon anstataŭ veturigi ĝin al la kampoj. Li estis kondamnita per la t.n. "trio", je dek jaroj de "eduklaboro". Kiamaniere la kompleta analfabeto povis esti "ideologia kaj aktiva buĥarinisto" estas afero por NKVD-istoj, kiuj al neniu devas tion klarigi. Por ke Stefanoviĉ konfesu la akuzon pri ekonomia sabotado, havas NKVD sufiĉe da rimedoj kaj multe da praktiko.

Dum lia restado en la koncentrejo, liaj familianoj kaj la administranto de la kolĥozo, en kiu li antaŭe laboris, klopodis per diversaj advokatoj liberigi lin. Al la malliberejo li estis revenigita en la fino de la jaro 1939. Kelkfoje li estis esplorita de NKVD. De la oficiro, kiu lin esplordemandis, li ricevis promeson, ke li havas bonajn ŝancojn esti liberigita. La samaj promesoj estis donitaj ankaŭ al lia edzino kaj al lia patrino. Li estis la sola en la ĉelo, kies edzino kaj patrino ricevis la permeson viziti lin tri aŭ kvar fojojn dum mia preskaŭ tutjara restado en la ĉelo. Dum tiuj renkontoj li ankaŭ ricevis de ili manĝaĵpakaĵojn. La pakaĵoj enhavis iom da

pano, iom da bulboj kaj botelon da lakto. Sed pli ol la pakaĵoj lin ĝojigis la renkontoj kun la edzino aŭ kun la patrino kaj la aŭdita promeso de la NKVD-oficiro, ke li estos liberigita, kvankam la liberigo devos daŭri iom da tempo.

Sergejenko

Inter ni ĉiuj lia aresttempo estis la plej longa. Lia aĝo estis proksimume la sama kiel tiu de Stefanoviĉ. Li estis arestita en la jaro 1935 en la blankrusa urbeto Biegomel. Antaŭ la aresto li apartenis al Komsomol kaj laboris kiel ĉefo de "buterfabriko" en la urbeto, kie li loĝis. En Sovetunio tiuj buterfabrikoj plenumas gravan taskon en la ŝtata ekonomio. Laŭ la soveta impost-sistemo ĉiuj kolĥozoj kaj individuaj agrikulturistoj devas pagi la imposton per produktoj.

La imposton oni devas pagi de ĉiuj posedaĵoj. De la tero oni devas pagi terkulturitajn produktojn, de la dombestoj oni devas lakton kaj viandon. Se oni havas ŝafojn, oni devas ankaŭ pagi lanon. Se oni havas kokinojn, oni devas pagi ankaŭ ovojn. Se oni havas abelojn, oni devas pagi ankaŭ mielon, ktp.

La t.n. "buterfabrikoj" estas ankaŭ la lokoj, kien la kolĥozoj kaj la individuaj bovinposedantoj devas liveri la lakton. La liverita lakto devas esti kontrolita dum ĝia ricevo, ĉu ĝi enhavas la necesan 3% da graso.

En ĉiuj entreprenoj en Sovetunio okazas dum tiuj diversaj kontroloj ankaŭ diversaj trompoj, kiuj estas "domaĝaj" por la ŝtato kaj poste oni malkaŝas tiujn trompojn. Kompreneble, la buterfabriko en Biegomel ne estis tiurilate escepto. Jen kio do okazis : Laŭ la liverita kvanto da lakto al la fabriko, ĝi devas produkti la konforman kvanton da butero, kaj poste la buteron liveri al alia ŝtatkomerca institucio. Se la fabriko ne liveras tiun kvanton da butero, oni povas al la fabrika ĉefo riproĉi aŭ akuzi jenon : aŭ la fabriko akceptis lakton nehavantan la necesan kvanton da graso, aŭ la fabrika administrantaro ŝtelis parton el la produktita butero.

Sergejenko kiel ĉefo de tiu buterfabriko estis akuzita pri ambaŭ krimoj, t.s., ke li perfidis la sovetan ŝtaton per akceptado de la laktliverantoj de malgrasa lakto kaj forŝtelis buteron. Tre verŝajne ambaŭ riproĉoj kontraŭ li

estis veraj kaj la akuzo ne estis senbaza. Kiel konstatis esplorkomisiono, li dum sia administrado tre multe drinkis. Preskaŭ ĉiam li estis ebria. Li drinkis eĉ tiam, kiam oni ne povis aĉeti brandon por la normala ŝtata prezo. La ŝtata prezo estis ĉirkaŭ 40 rubloj por litro kaj en la t.n. "libera merkato", aŭ nigra merkato, litro da brando kostis ĉirkaŭ ducentrublojn. Ĉiutage Sergejenko fordrinkis kune kun siaj amikoj minimume litron da brando. De kie Sergejenko havis por elspezi ĉiutage ducent rublojn, se lia monata salajro estis ĉirkaŭ tricent rubloj ?

Tamen, Sergejenko la akuzon kontraŭis, klariginte, ke li tiom da brando ne drinkis kaj ke la butermanko ne estis kaŭzita pro iu ŝtelado, sed pro tio, ke la laboristoj tre ŝatas trinki kremon kaj la kremo anstataŭis ĉiujn iliajn manĝaĵojn. Nek li persone, nek la ceteraj administrantoj kapablis gardi la laboristojn, ke ili tiom multe da kremo ne trinku. Verŝajne la mankoj estis tro grandaj, eĉ se oni akceptus la kremtrinkadon de la laboristoj. Dum la juĝproceso Sergejenko estis kondamnita je dek jaroj de "eduklaboro".

Kvankam Sergejenko estis juna, li tamen havis sufiĉe da soveta sperto por ne labori kiel simpla laboristo eĉ en la koncentrejo. Dum iom da tempo li estis brigadisto, dum iom da tempo li estis mezuristo, dum iom da tempo li estis kontrolisto, sed plejofte li helpis tiujn, kiuj faris nenion.

Komence de la jaro 1940 Sergejenko estis reveturigita al la malliberejo kaj lia afero estis denove esplorita. Pri siaj drinkadoj li multe rakontis kaj fieris. Li estis tre vigla, preskaŭ ĉiam gaja kaj ankaŭ kuraĝa por fari en la ĉelo multajn malpermesitajn agojn. Se ia malpermesita faro estis rimarkita de la gardisto, li ĉiam havis pretan mensogon, kiun la gardisto ne povis kontroli. Sed laŭ sia karaktero li estis sufiĉe simpatia kaj impresis havi en normalaj cirkonstancoj bonan karakteron.

Al la ĉelo venis ankoraŭ du poloj, ambaŭ el Vilno. Unu el ili estis laboristo en la aĝo 24-26 jaroj. La dua estis ioma studanto kaj ioma laboranto. La studanto opiniis sin pli litovo ol polo. Siajn studadojn li okazigis kiam li havis iom da mono por la necesaj vivbezonaĵoj. Kiam la mono elĉerpiĝis, li devis labori. Ĉar akiri monon

per laboro okazas malrapide, do li pli laboradis ol studadis.

Liaj studoj estis filozofiaj kaj sociologiaj kaj ni nomis lin komence "filozofo" kaj iom poste ni komencis lin nomi "profesoro" kaj tiun nomon li havis dum la tuta tempo, ĝis lia foriro al la koncentrejo.

La juna polo estis arestita pro "kontraŭrevolucia propagando", li plendis pri la malalta enspezo de sia laboro, pri la mankoj de varoj kaj simile. Ankaŭ la t.n. profesoro estis arestita pro "kontraŭrevolucia propagando" kaj akuzita, ke li okazigis "ekonomian sabotadon" kaj malestimis partianon,"kiam tiu plenumis sian respondecan laboron."

En Sovetunio ekzistas por ĉiuj laboroj normoj. Plenumi normon dum la laboro estas preskaŭ ŝtata kaj civitana devo. De la plenumado de la apartaj labornormoj dependas la plenumado de la tutŝtata plano. Plenumo de normoj estas taksata kvazaŭ minimuno, sed oni devas la normojn superplenumi. Pri homoj, kiuj faras tricent aŭ kvarcent procentojn de la normoj oni povas ĉiam legi en la gazetoj.

La metio de la "profesoro" estis aŭtomobilmekanikisto. En Borisovo li estis sendita labori en aŭtomobila riparejo. Kompreneble, por riparo de aŭtomobiloj ankaŭ ekzistas normoj. La "profesoro" dum sia laboro ĉefe atentis, ke la laboro estu bone farita kaj ne atentis la fiksitajn normojn por tiu laboro. Tre verŝajne li estis en Polio komunisto, aŭ almenaŭ komunista simpatianto. La mallonga restado en Sovetunio lin ne komplete liberigis de la komunismo. Li kredis, kiel multaj aliaj, ke la ideologio kaj ankaŭ la superaj komunistaj ĉefuloj estas bonaj, sed en la malordo kulpas nur la gvidantoj je la malsupraj postenoj.

Inter la "profesoro" kaj la laboreja ĉefo venis ofte konfliktoj pri la laboro. La laboreja ĉefo postulis, ke oni devas gardi la normon kaj ne la kvaliton. La "profesoro", parte pro la komunisma patriotismo, por la bono de la komunista patrio, parte alkutimiĝinta labori bonkvalite, ne obeis la postulojn de la ĉefo. Dum unu tia kverelo la "profesoro" diris al la ĉefo : "En Polio tiaj homoj kiel vi estis utiligitaj labori per manfosiloj aŭ purigi la stratojn, sed ne administri mekanikigitajn laborejojn."

Kelkajn tagojn post tiu kverelo la "profesoro" estis arestita. La akuzo kontraŭ li enhavis : li intence ne plenumis la fiksitajn labornormojn, do ekonomia sabotado.

Per sia konduto li ekscitis aliajn malkonsciajn laboristojn, ke ili sekvu lian ekzemplon, tio ja estas kontraŭrevolucia agado eĉ publika. Li ofendis publike konfideman partiulon sur sia posteno laŭ la ricevita tasko de la partio kaj de la ŝtato. La komunistema "profesoro" certe neniam povis imagi tiajn akuzojn en sia "laborista patrio". Sed li estis senhelpa al sia sorto kaj atendis en la ĉelo punverdikton por esti edukata per laboro, por esti bona kaj fidela soveta homo.

Huberto Fitman

La unuan vesperon, kiam mi venis en la ĉelon, post la rakonto al la ceteraj samsortanoj pri la okazintaĵoj en la "libera ekstero", post mallonga interparolo kun Pomikalski, mi komencis la kutiman paŝadon tien kaj reen, de la muro al muro. Tiam alvokis min unu el la kuŝantoj sur la litoj, legante libron. Li estis malaltstatura kaj havis simpatian junaspektan vizaĝon. Sed spite sian junan aspekton tiu vizaĝo havis la trajtojn, ke ĝia posedanto estas minimume duone pli aĝa ol la vizaĝo aspektas.

La sola demando de li estis en la germana lingvo : "Ĉu vi parolas germane ?" Mi respondis en la demandita lingvo, ke mi parolas ankaŭ iom germane, sed gramatike ne perfekte. Li remetis la libron antaŭ siajn okulojn, daŭrigis la legadon, nenion plu li demandis. Iom poste mi aŭdis, ke li estas nomita Fitman.

Kun tiu Fitman mi amikiĝis en la unuaj tagoj de mia estado en la ĉelo kaj tiaj ni restis ĉirkaŭ naŭ monatojn, ĝis lia foriro el la ĉelo, du aŭ tri semajnojn antaŭ mi. Sed strange estis, ke malgraŭ nia amikeco mi intuicie de la komenco ne havis al li la konfidon, kiun oni havas al normalaj amikoj. Mi tiun senton kontraŭ li absolute ne kaŝis. Ankaŭ Fitman ekde la komenco de nia konatiĝo ne provis min konvinki, ke mi en tiu afero eraras. Neniam li celis, ke mi havu al li kompletan konfidon. Ni estis en ia senco amikoj, kun singardema amikeco aŭ inter ni amikeco de singardemaj amikoj. Tamen ni tre multe interparolis pri aferoj seriozaj kaj babiladis pri aferoj malseriozaj.

Pri sia pasinteco Fitman rakontis multe pli ol mi deziris scii kaj li ne instigis min rakonti pri mia pasinteco. Baldaŭ mi rimarkis, ke ankaŭ la ceteraj en

la ĉelo en ia senco estas al li singardemaj, kvankam li ĉiam penis esti konsilema kaj kondutis ĝenerale tre kamaradece.

Post kelkaj tagoj eksplodis kvereloj inter Fitman kaj aliaj, precipe kun Bielov kaj Sergejenko, pri iaj aferoj por mi ne komprenataj. Dum unu el tiuj kvereloj Bielov eĉ volis lin bati. Fitman estis ankaŭ ofendita per la plej vulgaraj esprimoj kaj insultita en la plej akra formo. Plejofte Fitman dum tiuj okazaĵoj kuŝiĝis sur la lito kaj silentis.

Kiam la krioj ĉesis kaj mi demandis Fitman, kial li kverelis, li respondis : "Ili ĉiuj estas stultaj", neniajn klarigojn pli li volis doni al mi.

Kiam mi demandis la aliajn pri la sama afero, tiuj nur movis manojn kaj respondis : "Nenio !".

Mi dum tiuj okazaĵoj petis de Pomikalski, kiu estis kune kun ili pli longe ol mi, klarigon pri kio koncernis la afero. Pomikalski diris : "Ankaŭ mi nenion komprenas. Vi neniam ilin komprenos." Sed iom poste estis klaraj por mi la kaŭzoj de tiuj malpaciĝoj.

Kiu do estis Fitman ? En la jaro 1783, sub la regado de la rusa reĝino Katarina, enmigris al Rusio kelkmil germanaj koloniistoj. Similaj enmigradoj okazis ankaŭ en la sekvontaj jaroj de la dekoka jarcento. Tiuj enmigrintoj enloĝiĝis en certaj teritorioj. En la daŭro de multaj jaroj ilia nombro plimultiĝis. Ili evoluigis sur siaj loĝlokoj la germanan kulturon. Iliaj vilaĝoj estis la plej modernaj en la tuta Rusio.

Post la bolŝevika venko, tiuj germanoj ricevis kvazaŭ "nacie aŭtonomiajn rajtojn" kaj ili estis nomitaj oficiale "la aŭtonomia regiono de la germanoj ĉe Volgo". En la ĉiutage uzata lingvo oni nomis ilin "la Volgaj germanoj".

Fitman devenis de la "Volgaj germanoj". Lia aĝo estis proksimume 40 jaroj. Lia patro apartenis al germana religia sekto nomita Menonitoj. Pri la patrino li nenion rakontis al mi. Laŭ liaj klarigoj pri la menonismo, ĝi estas tre progresema religio. La menonitoj havas nek profesiajn pastrojn, nek iun ajn idolaĵojn. Iliaj komunaj preĝoj estas tre simplaj. Ili nur kunvenas kaj laŭtlegas fragmentojn de la profetoj, precipe tiujn partojn, kiuj rilatas la plibonigon de la homa moralo en la reciproka interhoma kunvivado. Por tiuj aferoj ili dediĉas pli ol pri la rila-

toj inter la homo kaj Dio.

Lia patro estis profesia instruisto kaj en la menonita grupo en sia loĝloko li plenumis la pastran oficon. Post la bolŝevika venko, lia patro elmigris al Kanado, kie li havis ankaŭ aliajn parencojn.

Laŭ la konduto de Fitman oni povis vidi, ke li havis zorgeman edukadon. Li tre atentis siajn vestaĵojn, kvankam primitivajn. Li gardis, ke ili estu riparitaj kaj ke ili havu ĉiujn butonojn. Li tre zorge eluzis ĉiujn ekzistantajn eblojn en la ĉelo por atenti la higienon, dum la ceteraj tiun aferon eĉ tro neglektis, iuj eĉ taksis lin troigema en sia lavado.

Ĉiuj rakontoj de lia pasinteco datiĝis de post la bolŝevika venko, kiam lia aĝo estis ĉirkaŭ 17-18 jaroj. Li edziĝis tre juna kun iu dancistino-baletistino kaj ili havis kvar infanojn, ĉiujn knabojn. Dum mia restado en la malliberejo la plej aĝa filo havis pli ol 19 jarojn kaj militservis kiel maristo. Rilate sian familion li havis la germanan sentimentalecon.

Laŭ la fragmentaj rakontoj de sia pasinteco ĝi estis diversflanka kaj ankaŭ iom aventurisma. Sed spite liajn kvazaŭ sincerajn rakontojn, oni povis rimarki, ke profunde en lia animo kaŝiĝas io, pri kio li volus rakonti kaj ne volas rakonti.

Kia do estis lia pasinteco ? Post la bolŝevika venko li lernis en ia speciala militista lernejo por "komsomolanoj" en la Kremlo. La "honorignomo" kiujn uzis la edukistoj por tiuj lernantoj estis "Leninaj Junkroj". En tiu lernejo ili estis tre zorge edukitaj kaj tre zorge flegitaj. Unu fojon li rakontis al mi, ke inter la profesoroj en tiu lernejo troviĝis kelkaj generaloj de la malnova cara armeo kaj li menciis iliajn nomojn.

La nombro de tiuj "elektitaj Leninaj Junkroj" estis iom pli ol tricent. Ili estis ankaŭ la gardistaro interne en la Kremlo. Fitman konis persone ĉiujn ĉefojn de la bolŝevika partio dum tiuj jaroj, li vidis ilin multajn fojojn dum la gardservo en la koridoroj, kie estis iliaj kabinetoj. Multe pri tiuj ĉefoj Fitman ne rakontis. Pri Lenin li rakontis, ke Lenin tre multe legis librojn. Ĉiuvespere Lenin kunprenis hejmen kelkajn librojn el la biblioteko kaj reportis ilin venontan matenon.

Al la gardistoj Lenin kondutis afable kaj de tempo al

tempo li demandis iujn gardistojn kiel ili fartas kaj iomete kun ili babiladis.

Trockij kondutis rigide, ĉiam kun la kapo kaj la okuloj direktitaj supren, kvazaù leono. Ĉu la diferencigo de tiuj ambaù bolŝevikaj ĉefoj estis sincera, aù enhavis nur la oficialan kaj necesan opinion, mi ne scias.

Pri kelkaj ĉefoj li rakontis, ke ili venigis ofte virinojn en siajn kabinetojn kaj tie ili restis dum la tuta nokto. La plej fervoraj virinĉasantoj estis Buĥarin kaj Lunaĉarskij. Lunaĉarskij venigis preskaù nur famajn aktorinojn.

En tiu kremla lernejo, ekskluzive por komsomolanoj, li estis dum tri jaroj, tiom longe daùris la lernado kaj ekzercado. Kia estis lia okupo post la forlaso de la "Leninaj Junkroj"-lernejo li ne rakontis. Sed dum iom da tempo li estis redaktoro aù kunredaktoro de germana gazeto, aperinta en la "Germana Aùtonomia Regiono". Dum iom da tempo li estis instruisto de la germana lingvo en la sama regiono. Ke liaj pedagogiaj kapabloj estis preskaù neniaj, mi konstatis, kiam li komencis al mi instrui la rusan gramatikon, kvankam li scipovis la rusan lingvon perfekte. Unu fojon li eĉ diris al mi, ke krom li kaj Karpienko neniu scias la rusan lingvon perfekte en la ĉelo, kaj la generalo tiun lingvon scipovas malpli bone ol Sergejenko, kiu ja estis ukrajnano.

Dum iom da tempo Fitman estis oficisto en "Vojennaja Torgovlja", mallongigita "Vojentorg". Tio estas institucio, kiu prizorgas varojn por la militistaj vendejoj. Dum tiu tempo li multe veturadis al diversaj partoj de la lando, kaj dum tia vojaĝo li estis arestita.

Li estis arestita en la jaro 1937, similmaniere kiel Bielov. Estinte en ia granda urbo, li ricevis telegramon en la hotelo, ke li tuj kontaktu per telefono ian komercan oficejon en alia urbo. La interparolo per la telefono enhavis nur unu aferon : ke li alveturu tiel rapide kiel eble por afero tre grava kaj tre urĝa. Se eble li alveturu per aeroplano, se li ne sukcesos alveturi per aeroplano, li estis petata alveturi per la plej rapida venonta trajno. Estis al li ankaù menciite, ke antaù la forveturo li telefonu kaj diru per kia trajno aù per kia aeroplano li veturos, ĉar li estos atendita, kiam li eliros el la trajno aù el la aeroplano.

Post tiu telefona sciigo li klopodis ricevi lokon en iu aeroplano, sed ne sukcesis. Fitman antaŭ sia forveturo per trajno telefonis kiel estis al li menciite kaj li estis ankaŭ atendita ĉe la eliro de la kajo al la stacidomo. Li estis sidigita en aŭtomobilo kaj veturigita al NKVD-oficejo kiel arestito.

Dum la multfojaj esploradoj li estis terure batita. Li ruliĝis en sia sango sur la planko. Kelkajn fojojn li dum tiuj esploroj perdis la konscion. La konfeso, kiu de li estis postulita, devis enhavi, ke li de multaj jaroj estis germana spiono, ke li havis kontaktojn kun la ĉefuloj de germana naziista partio kaj registaro kaj laŭ iliaj instrukcioj li faris la spionadon.

Unu el liaj filoj nomiĝis Herman, pro tiu kaŭzo al li estis riproĉite, ke li nomis la filon Herman por honori Herman Göring. Komence Fitman provis klarigi la sensencaĵojn de tiuj akuzoj prezentitaj kontraŭ li, sed neniaj klarigoj helpis - li devis nur ĉion konfesi. Fine li venis en stato, ke li ne volis plu vivi por ne esti plu turmentita. Li ĉion konfesis kaj atendis esti mortpafita, sed la mortpafo ne okazis.

Pro la timo esti pluvokita al la esploroj, li skribis leterojn al iuj juĝinstancoj, ke li estis germana spiono kaj volas esti mortpafita. Kiam tiuj skribaĵoj ne helpis, li batis en la pordo de la ĉelo kaj kriis : "Kial vi ne mortpafas min ? Mi ja estas germana spiono".

Iom post iom li trankviliĝis, li komencis ricevi manĝaĵpakaĵojn de la edzino, kaj li reakiris la volon vivi kaj ĉesis peti la mortpafon.

Dum siaj arestjaroj li tramigris multajn malliberejojn en diversaj urboj. Unu fojon li estis veturigita al speciala esplorkomisiono en Moskvo. Dum tiu veturo akompanis lin kvin miliciistoj. Unu portis lian sakon, unu paŝadis antaŭe, du ĉe ambaŭ flankoj kaj unu malantaŭ li.

Dum kelkaj monatoj li estis en la malliberejo "Lubjanko" en Moskvo. Pri "Lubjanko" li multfoje rakontis, kvankam ĉiam la samajn aferojn. "Lubjanko" estas certe la plej hermetika malliberejo en la mondo, laŭ sia interna ordo kaj laŭ siaj malliberejaj ecoj.

Antaŭ ol oni estas enlasita al la ĉelo, oni devas trapasi verŝajne dek ĉambrojn kaj en ĉiu ĉambro estas

farita io alia. Ekzemple, en la unua ĉambro oni estas demandita pri la nomo kaj pri ceteraj personaĵoj ; en la dua ĉambro oni forprenas ĉiujn objektojn, kiujn oni kunportas ; en la tria ĉambro oni devas senvestiĝi ; en la kvara ĉambro oni lavas la manojn ; en la kvina ĉambro oni estas fotografita ; en la sesa ĉambro estas prenitaj la fingraj signoj ; en la sepa ĉambro oni estas razita kaj la haroj estas fortonditaj de ĉie kaj ankaŭ fortranĉitaj la ungoj ; en la oka ĉambro oni sin banas ; en la naŭa ĉambro oni sin viŝsekigas ; en la deka ĉambro oni rericevas la vestaĵojn kaj vestiĝas. Poste la arestito estas gvidita al la ĉelo.

En la ĉelo li estas sola. Estis rimarkinda pureco, sed li mem nenion rajtis purigi. Ĉiumatene venis al la ĉelo homo, ordigis lian liton, purigis la plankon, forviŝis polvon k.c.

Ĉiumatene li devis ellitiĝi precize je la sama tempo kaj iri al la necesejo. Ĉe la pordo de tiu unupersona agrablejo li ricevis de la gardisto unu papereton. Post faro de la neceso, li devis ĉion forigi per akvo kaj poste meti la papereton sur la akvon. La gardisto ĉiam kontrolis ĉu la papereto estas metita. En la sama ĉambreto estis aranĝita lavujo kaj oni devis lavi la vizaĝon. Ĉiutage razis lin la sama homo, kiu purigis lian ĉelon.

Reveninte el la necesejo, li ricevis sur telero sian ĉiutagan porcion da pano, tranĉita je pecoj, iomete da sukero, porcelanan tason sur telereto, kulereton kaj ujon da teo. Post la matenmanĝo oni forprenis ĉiujn manĝilarojn. Se li ne formanĝis la tutan panon, ĝi estis forprenita kaj redonita al li dum la tagmanĝo, aŭ dum la vespermanĝo.

Por la tagmanĝo li ricevis iom da supo kaj iom da griaĵo. Vespere li ricevis nur iom da teo.

Li ricevis ĉiutage dek cigaredojn, sed neniam alumetojn. Kiam li volis fumi, li bezonis elpuŝi la signalon ĉe la pordo, tiam venis la gardisto kaj donis al li fajron. Li ricevis ankaŭ librojn kaj povis legi.

Dum tago estis severe malpermesite kuŝiĝi aŭ sidiĝi sur la lito. Vespere, post la fiksita tempo, estis malpermesite sidi ĉe la tablo aŭ paŝadi en la ĉelo, oni devis nur kuŝi en la lito. Dum la kuŝado en la lito li ĉiam devis teni la manojn sur la kovrilo kaj havi la vizaĝon direktita al la

pordo. Li estis multfoje vekita de la gardisto, ĉar li ne tenis la manojn sur la kovrilo, aŭ se la vizaĝo estis direktita en alian flankon, ne laŭ la regularo.

Dum la kelkmonata restado en la ĉelo li eĉ ne unu vorton aŭdis de la gardisto aŭ de la purigisto. Se li ion deziris, li devis paroli tre mallaŭte. La gardisto lin vokis per manmontro. Se oni volis atentigi lin pri io, ankaŭ tio okazis per manmontro.

Li neniam aŭdis iun ajn vorton de la koridoro aŭ de ie ajn ekstere. Interkompreniĝo inter la gardistoj okazis ankaŭ per monmontro, kaj se iam estis necesa ia laŭta signalo, ĝi okazis per mallaŭta ekfrapo de la ŝlosilo en butono sur la uniformo aŭ per klakado de la lango. Tie la arestitoj vivis en kompleta silento.

Dum sia kelkmonata restado en la ĉelo de "Lubjanko" li vidis nur la samajn du aŭ tri gardistojn kaj la saman purigiston, ĉiujn ĉiam silentantajn.

Post kelkmonata restado inter tiuj kelkaj ĉiam silentaj homoj, li nur unu fojon estis esplorita de kelkaj altrangaj NKVD-oficiroj kaj baldaŭ resendita al alia malliberejo. Al la malliberejo en Borisovo li venis kelkajn monatojn pli frue ol mi kaj atendis la sekvon de sia sorto.

Kial Fitman preferis mian amikecon pli ol alies, mi komence ne komprenis. Li rakontis al mi pri diversaj okazintaĵoj en Sovetunio, kiujn mi ne aŭdis de aliaj. Aliaj tion ne rakontis, ne pro tio, ke ili tion ne sciis, sed ĉar ili tion ne volis rakonti. Ĉar liaj diversaj eldiroj enhavis nur du aŭ tri frazojn, diversaj liaj konkretaj konkludoj estis por mi kompreneblaj, kiam mi spertis pli longan restadon en Sovetunio. Iujn liajn eldiraĵojn mi komprenis poste, kiam mi estis for de Sovetunio. Ne pensinte tiom multe pri mia persono, mi kapablis iujn aferojn pripensi pli profunde, serĉi kaj trovi kunligon pri diversaj aferoj aŭ okazintaĵoj.

Komence mi kredis, ke Fitman amikiĝis kun mi, ĉar ni parolis inter ni germane kaj tiun lingvon li amis paroli. Sed la lingvo certe ne estis la ununura kaŭzo de nia vola-nevola tamen amikeco.

Rilate al mi kaj Pomikalski, Fitman per diversaj komprenigoj esprimis, ke li estas pli proksima al la t.n.

"okcidentanoj" ol al la rusoj. En la germana lingvo ni povis paroli libere kaj laŭte pri ĉio, ĉar krom mi kaj Pomikalski, la ceteraj ne komprenis tiun lingvon.

Post iom da tempo mi rimarkis, ke Fitman skribas ion sur longaj kelkpaĝaj folioj. Demandite de mi, kio estas tiuj skribaĵoj, li respondis, ke tio estas petskriboj al diversaj instancoj. Tiuj multpaĝaj, kvazaŭaj petskriboj kaŭzis ĉe mi suspekton kontraŭ li. Tiuj suspektoj pligrandiĝis, kiam Fitman estis de tempo al tempo vokita de la gardisto kaj restis for dum kelkaj horoj. Post lia reveno li rakontis, ke li ricevis leteron el sia hejmo kaj legis ĝin en la kontoro, rakontinte samtempe pri kio skribis al li la edzino. Neniu en la ĉelo krom li ricevis leterojn.

Mi komencis rimarki ankaŭ, ke dum iuj promenadtagoj (ni havis ĉiun duan tagon 20-minutan promenadon), li iras la lasta kaj kiam ĉiuj estas jam enlasitaj al la ĉelo, li parolas pri io kun la gardisto en la koridoro. Demandite poste pri kio li parolis kun la gardisto, li ĉiam respondis, ke tio koncernas aferon por ĉies bono. Ofte li diris, ke li hodiaŭ ne havas la emon promenadi kaj restis en la ĉelo sola.

Laŭ ĉiuj verŝajnecoj mi komencis kredi, ke Fitman antaŭ sia aresto laboris en NKVD kaj ankaŭ en la ĉelo daŭrigis tiun laboron. Mi sciiĝis, ke ekzistas leĝo, laŭ kiu minacas longjara puno en la koncentrejo pro kontraŭrevolucia propagando en mallibereja ĉelo. Praktika komento pri kontraŭrevolucia propagando en Sovetunio povas esti ĉiu ajn malkontenta esprimo kaj tiu inkubo ŝvebas ankaŭ en la malliberejaj ĉeloj. Pri tio povis scii nek mi nek Pomikalski. Sed sciis tion bone Bielov, Sergejenko, Karpienko kaj aliaj. Ilia malamo al Fitman ne estis senbaza.

Fitman estis pli konscia pri la taktikaj agadoj de la registaraj instancoj ol ĉiuj ceteraj en la ĉelo - tion mi konstatis poste. Fitman malamis la rusan reĝimon pli ol aliaj - ankaŭ tion mi konstatis poste. Sed en lia animo okazis senĉesa batalado inter la devigoj, kiujn li plenumis en la karcero kaj lia propra moralo, pro la servo al tiu reĝimo, kies kruelaĵojn li ne nur vidis, sed ankaŭ spertis sur sia propra korpo kaj en sia animo. Fitman al

neniu havis tiom da konfido, kiom li havis al mi - mi ja ne estis rusa civitano.

Preskaŭ ĉiuj sovetaj civitanoj skribis petojn al diversaj juĝinstancoj kaj prokuroroj. Mi tion eĉ ne unu fojon faris. Unu fojon Fitman min demandis : "Kial vi neniam petskribon sendis al iu juĝinstanco ? Ĉu vi iam skribis ?" Mi respondis : "Mi ĝis nun neniun peton skribis kaj mi tion skribi ne volas".

- Sed kial vi tion ne faris ?
- Mi ne kredas, ke tia skribaĵo povas ion helpi.
- Nu, certe, tiaj skribaĵoj eble ne helpas, sed nenion ili povas domaĝi.
- Mi ne scipovas sufiĉe la rusan lingvon por tiaj skribaĵoj.
- Tio ne povas esti la kaŭzo, ke vi ne skribu. Mi volonte por vi tian skribaĵon faros.

Mi respondis al li tute klare : "En tiuj petskriboj oni devas ĉiam en la fino deklari, ke oni estas sincera kaj fidela al la soveta registaro kaj oni volas tia esti. Mi ne volas fari tiajn deklarojn kaj absolute ne estas fidela al la rusa registaro. Cetere, koncerne tion mi neniam estos alia."

Fitman sendube sciis mian opinion sen mia klarigo, mi tamen kredis, ke li ne intencas fari al mi ian malbonon per tia skribaĵo. Fitman sciis pli bone ol mi, ke tiuj skribaĵoj estas nur memtrompadoj. Tiuj, al kiuj la petskriboj estas senditaj, je la fidelecaj deklaroj ne kredas. Sed la diferenco inter ni estis, ke mi vivis sub la bolŝevika reĝimo ĉirkaŭ unu jaron kaj Fitman vivis sub tiu reĝimo ekde ĝia komenco.

En Sovetunio ĉiuj reciproke trompas kaj mensogas, kvankam ĉiu scias tre bone, ke la aliaj ne kredas tiujn trompojn. Trompas kaj mensogas la soveta registaro per promesoj al siaj civitanoj, sciante tre bone, ke neniu civitano taksas serioze iliajn mensogojn. La samo estas kun la partio kaj la ceteraj registaraj instancoj.

La civitanoj trompas kaj mensogas al la registaro kaj al ĝiaj instancoj pri sia fideleco, kvankam la partio kaj la registaro scias, ke la sovetunia loĝantaro farus ĉion eblan por forigi ilin. Por tiuj trompoj la loĝantaro en Sovetunio estis dresita de la bolŝevika

reĝimo ekde la t.n. revolucia venko. Nun tiu reciproka trompado iĝis fenomeno tute "natura". Fitman trompis kaj estis trompita kaj estis por li io ne normala, ke mi ne trompis per petskriboj.

Iun tagon dum niaj kutimaj babiladoj Fitman diris al mi : "Mi vidis vian edzinon - en sonĝo".

- Kiel ŝi aspektis ? - mi demandis.
- Ŝi estas altstatura, nigra hararo, parolas bone la rusan lingvon.

Li rakontis pri ŝiaj trajtoj de la vizaĝo kaj eĉ pri la korpmovoj.

Mi restis sen vortoj, ĉiuj liaj rakontoj pri la aspekto estas precizaj kaj ni inter ni neniam parolis antaŭe. Vere, ke pri niaj sonĝoj ni ofte parolis en la ĉelo kaj ilin komentadis. Mi eksciis la principojn de tiu komentado, ekzemple : Se iu sonĝis pri rivero aŭ iu ajn akvo, tio signifis, ke li foriros - "elfluos", li iros for de la ĉelo. Se iu sonĝis pri ia preĝejo, tio signifis, ke li restos daŭre en la malliberejo. Preĝejo kaj malliberejo estas kvazaŭ la samo. Se iu sonĝis pri multe da homoj, tio signifis, ke li estos prenita al fora komuna forveturigo. Kaj tiel ekzistis aro da komentoj por ĉiuspecaj sonĝoj. Sed sonĝoj ja estas nur sonĝoj, ni do ne taksis la sonĝojn serioze en la ĉelo.

Mi komencis kredi, ke Fitman vidis mian edzinon ne en sonĝo, sed dum unu el liaj "leterlegadoj". Fitman verŝajne rimarkis ĉe mi la surprizon, kian lia rakonto pri la sonĝo efikis kaj baldaŭ rakontis pri la sonĝo laŭte por ĉiuj, dirinte : "Kiel mirinde, mi ja ŝin neniam vidis."

Mi demandis lin : "Ĉu vi povas diri al mi, kie vi vidis ŝin ?"

- Ho, tion mi ne povas diri precize, sed elirinte el iu loko.

Mi foriris de li kaj pensis pri mia edzino kaj lia sonĝrakonto.

Venontan tagon mi ankoraŭ unu fojon komencis paroli kun Fitman pri la sama sonĝo, interalie mi diris : "Estus interese, se vi rememorus, kie vi ŝin vidis." Fitman respondis : "Nu, precize tion mi ne povas diri al vi, sed ŝajnas al mi, elirinte el tiu ĉi malliberejo."

Kiam mi ricevis de mia edzino la unuuran leteron en la

koncentrejo en Arĥangelsko, ŝi skribis interalie, ke kelkfoje ŝi estis en la mallibereja kontoro demandi pri mi. Komence la mallibereja administranto ne volis kun ŝi paroli. Poste li diris, ke mi troviĝas en tiu malliberejo, sed ke li ne rajtas permesi, ke ni tie renkontiĝu kaj li rekomendis al ŝi veni alian fojon, tamen neniam li ebligis, ke ni renkontiĝu.

Post tiu ĉi letero, estis por mi klare, ke Fitman estis vokita al la mallibereja kontoro por "leterlegado" dum vizito de mia edzino. Ke li estis ŝin vidinta, certe ne estis hazardo. La rigoro en la malliberejoj malebligas, ke arestito vidu alian arestiton ne de la sama ĉelo.

Se arestito estas gvidita kaj li survoje devas renkonti alian arestiton, unu el ili estas starigita vizaĝon al la muro en iu angulo, por ke ili ne vidu unu la alian. Kiel do povis la mallibereja administranto permesi, ke Fitman vidu la homon de ekstere - de la libera, kun kies edzo li estas kune en la sama ĉelo ? Kia ja povis esti la intenco de la mallibereja ĉefo ? Ĉu li planis envolvi min en ian reton ? aŭ eble en profundo de la animo de tiu mekanikigita NKVD-isto ekzistis ankaŭ ia homeco, kaj, ĉar la rigoro al kiu li estis subordigita ne permesis al li ebligi, ke mi kaj la edzino renkontiĝu, li tiamaniere aranĝis per Fitman ian elpensitan sonĝon, por doni al mi iun saluton aŭ iun sciigon de ŝi... Kiu povas scii kion pensas alia, kiam ĉiujn premas timego...?

* * *

Unu fojon Karpienko estis vokita ien. Li revenis post kelkaj horoj tre nervoza kaj li ne volis diri, kie li estis. Tre nervoza estis ankaŭ tiam Fitman. Poste mi vidis, ke Karpienko parolas aparte kun Bielov kaj kun Sergejenko. Ĉiuj en la ĉelo iĝis malbonhumoraj, silentemaj, neniu kun iu parolis, sed Fitman estis speciale evitita.

Post du tagoj Fitman komencis "paroladon" speciale direktitan al Karpienko, kial li ne volas rakonti kien oni vokis lin kaj pri nepravigitaj suspektoj, kiujn Karpienko havas kontraŭ li. Karpienko respondis sufiĉe

akre, turninte sin al Fitman kiel al tria persono. "Mi absolute ne devas raporti kien mi estis vokita, precipe tion mi ne devas raporti al Fitman. Koncerne la suspektojn, - mi ja rajtas pensi pri Fitman kion mi opinias, kaj mi ne malpermesas al Fitman pensi pri mi kion Fitman opinias."

Per Pomikalski mi eksciis poste, ke al Karpienko estis proponite, ke li povas al si multe faciligi la liberigon, se li de tempo al tempo raportos pri la konduto kaj la opinio de aliaj kunestantoj en la ĉelo, sed Karpienko malakceptis tiun proponon. Ankaŭ kun Karpienko en la kontoro oni parolis ion pri Fitman, sed Karpienko ne volis tion rakonti. Karpienko ankaŭ per Pomikalski konsilis al mi ne amikiĝi kun Fitman, ĉar tiu amikeco por mi ne povas esti bona, tion mi komprenis mem.

Mi kondutis dum tiuj tagoj kiel la ceteraj en la ĉelo, estis nur sola, silentema, nur kun Pomikalski mi iomete babiladis. Dum tiuj tagoj Fitman alvokis min iun matenon kaj demandis : "Ĉu ankaŭ vi bojkotas min ?".

- Ĉu oni bojkotas vin ? - mi demandis.
- Ĉu vi ne vidas, ke ĉiuj min bojkotas ?

Post mallonga pripenso mi diris al li : "Mi parolos kun vi tute sincere. Estas por mi indiferente, ke la mallibereja administranto kaj NKVD opinias min kontraŭulo de la soveta registaro, mi neniajn petskribojn sendis por deklari al ili mian fidelecon. Mi estas via amiko, sed plenan konfidon al vi neniam mi havis antaŭe kaj ne povas havi nun."

- Ĉu mi iam provis vin konvinki, ke vi havu al mi plenan konfidon ?
- Ne ! Neniam vi tion provis, kaj eĉ se vi provus konvinki min por tio, mi ne kredas, ke vi en tio sukcesus.

Post mallonga pripenso Fitman diris : "Mi tute bone komprenas vin. Mi ne deziras, ke vi havu al mi konfidon, sed VI ne devas min timi."

Ni ambaŭ silentis, rigardante unu la alian en la okulojn.

Post kelkaj tagoj Fitman denove vokis min por babilado. "Aŭdu ! Tre verŝajne mi en la proksimaj tagoj estos forveturigita al koncentrejo."

- De kie vi povas tion scii ? mi demandis.
- Tion mi ja scias, lastfoje kiam mi estis vokita al la administranto por legi leteron, li diris al mi, ke li atendas en la proksimaj tagoj ian decidon por mi. Mi kredas, ke li tiun decidon jam havas, sed ili prenos min rekte el la ĉelo, kiam ili forsendos baldaŭ grupon de malliberuloj. Do, mi havas al vi gravan peton. Vi ne estas soveta civitano. Vi havas ŝancojn post la milito foriri el Rusio. Mi havas onklon en Kanado, li estas tre riĉa. Mi donos al vi lian adreson por ke vi skribu, ke li helpu min, kaj se estos por vi necesa ia ekonomia helpo li certe helpos ankaŭ al vi.

Kvankam la forlaso de Sovetunio, laŭ mia kompreno, povus esti realigota nur pro eksterordinaraj okazintaĵoj, mi tamen traktis serioze la eldiron de Fitman. Mi ja scis, ke pri gravaj aferoj Fitman ne parolas sen iu ajn bazo aŭ kaŭzo. Fitman donis al mi karteton, kie estis skribita la adreso. Mi la karteton kaŝis bone, sed tamen ĉiam timis. Se oni vivas en la atmosfero, kie ĉiu homa paŝo estas kontrolita, la plej simpla afero vekas suspekton. Mi komencis cerbumi pri la karteto, eble Fitman planas ion teruran por mi, mi ja aŭdis multajn tiajn rakontojn. Fitman ja povis doni al mi tiun karteton kaj se la gardistoj pri ĝi scios, ili serĉos ĉe mi dum la revizio tiom longe ĝis ili ĝin trovos. Pri kio mi povus esti akuzita, se ĉe revizio oni trovus eksterlandan adreson, kiun mi kaŝis... pri tio estas en Sovetunio plejbone ne pensi. Eble tiu adreso estas por ia speciala celo. Mi tiun adreson kontroli ne povas kaj se ĝi venos en la posedon de NKVD-istoj, ili ĝin ĉiam povos kontroli.

Mi diris al Fitman, ke la adreson mi lernos parkere kaj la karteton mi bruligos. Pri la angla lingvo kaj pri anglaj adresoj mi dume nenion sciis.

Mi lernis la ordon de la literoj kaj de la numeroj. Poste Fitman ekzamenis min multfoje, ĉu mi ĝin bone memoras. Kiam mi konis la adreson parkere, Fitman diris : "Nun vi povas la karteton bruligi."

- Mi ĝin redonos al vi kaj vi mem bruligos ĝin.

Mi volis, ke Fitman sciu, ke la karteto estas bruligita. Iom tro da singardemo neniam malutilos, laŭ tiu principo pensas kaj agas ĉiuj homoj en Sovetunio.

Post la konflikto Fitman-Karpienko, kiu daùris apenaù du semajnojn, Fitman estis vokita el la ĉelo kun ĉiuj siaj objektoj. Kiam, post kelkaj semajnoj, oni gvidis min al la koncentreja forveturonta grupo, mi trovis en la revizia ĉambro sur kelkaj lokoj skribitan sur la muro la sciigon de Fitman : "Kvin jarojn", poste sekvis la dato kaj lia subskribo. Tia estis la maniero sciigi la riceviten punverdikton.

Kvin jaroj estas en Sovetunio malgranda puno (en tiama tempo), eĉ se oni estas senkulpa. Verŝajne li helpis sin multe per la raportoj pri la ceteraj en la ĉelo.

Fitman per sia foriro postlasis preman atmosferon.

Ĉu estis pravigita la lasta suspekto de Karpienko kontraù Fitman ? Sendube jes ! Por Fitman jam estis verdikto kaj li devis iri for de la ĉelo. Por la mallibereja administranto estis necese prizorgi por si alian informanton. Karpienko estis la plej inteligenta homo en la ĉelo, eble lia rezistemo ne estis tre forta kaj devigi lin al la informada laboro povus ŝajni tre facila por la administranto. Eble la kandidatecon de Karpienko proponis Fitman. Laù la psiko de NKVD-istoj Karpienko ja devus esti interesata faciligi sian liberigon. Karpienko eble aspektis timema, tamen en tiu okazo li sin montris morale pli forta ol la NKVD-istoj supozis.

Ĉu Fitman havis sincerajn intencojn, doninte al mi la adreson ? Mi opinias, ke jes kaj tiun opinion mi havis poste. Fitman, kvankam naskita en Rusio, diferencis psike de la rusoj. Finfine mi povis konstati, ke la plej granda parto de la rusa popolo estas trapenetrita per ia mistera kredo al ilia Rusio kaj pri ĝia sankta tasko regi la mondon. La kelkcentjara propagando de la rusaj caroj kaj parto el la rusa intelektularo kaj la daùrigo de tiu koncepto fare de la bolŝevikaj regantoj donis rezulton. La plej granda parto el la rusa popolo traktis la t.n. Okcidenton per ia malestima neglekteco, ĉiam substrekante, ke la "Okcidento" estas tute degenerinta morale. Eble en la subkonscio de tiu neglekteco kaŝiĝas ĵaluzo, kiun havas homo, kiam li ne kapablas konkurenci sian kontraùulon, sed tio ja ne ŝanĝas la fakton. Ne sen kaùzo la nunaj regantoj en Rusio multe dediĉas al la honorigo de la iamaj militestroj Suvorov, Kutuzov, caro Petro la unua, nomita Petro la

Granda, kiujn oni nun en Rusio propagandas, kiel la ĉefajn heroojn en la rusa historio. La libro de Aleksej Tolstoj kun la titolo "Petro la Granda" estas en Rusio ne nur rekomendita, sed reklamita pli ol aliaj verkoj de post la revolucio.

Dum la lasta milito ĉiuj revoluciaj sloganoj estis forigitaj kaj la tuta milita propagando okazis nur sub la naciaj sloganoj. La nunaj regantoj en Rusio scias tre bone, ke la rusa popolo malamas la bolŝevikan revolucion kaj ĝiajn realigintojn, sed Kutuzov, Suvorov, Petro la Granda en la animo de tiu ĉi popolo vivas.

La plej granda parto el la rusa popolo kredas, ke iam ili regos la mondon kaj la popolo subtenas la reĝimon nur en la politiko de la mondakirado. La plej granda parto el la rusa popolo eĉ ne pensas, ke devas esti alie. Plejbone tion esprimis la rusaj oficiroj post la milito en sinceraj interparoloj : "Ni batalis por Rusio ne por la bolŝevika ordo".

Sub la regado de Stalin estis multe propagandite, ke la rusa popolo estas la plej progresema inter la aliaj, ĉar la rusa popolo estas la unua en la mondo, kiu liberigis sin de la kapitalismo, la unua, kiu konstruas la socialismon kaj en tiu spirito estis edukitaj la komunistoj en la t.n. kapitalistaj landoj. Mi neniam rimarkis, ke iu ruso malakceptus iun agreson kontraŭ alia popolo, farita de tiu malamegata reĝimo. La ĉiama ekscitado kontraŭ la t.n. "Okcidento" mistifikis iliajn mensojn, fortigadis ilian misteran kredon en sia "sankta misio" redoni al la homaro la naturan vivmanieron, kiun forrabis la "okcidentaj degenerintoj".

Sendube povus esti alie, sed la rusoj ĉiam vivis izolite de la cetera mondo. Ĉiujn ajn rilatojn de la rusa popolo kun la aliaj popoloj la bolŝevika reĝimo tute malebligis. Fitman tiurilate ne estis ruso. Li naskiĝis inter germanoj, inter ili li edukiĝis dum sia juneco kaj ĝis la unua mondmilito tiuj germanoj havis rilatojn kun homoj en aliaj landoj.

Post la revolucio Fitman dum kelkaj jaroj korespondadis kun sia patro kaj kun siaj parencoj en Kanado; en la rusaj cirkonstancoj tiu korespondado signifis multon.

Neniu ruso povis imagi, eĉ ĝis la lasta momento, ke oni ebligos al la polaj rifuĝintoj forlasi Sovetunion,

neniam okazis io simila en la historio de la bolŝevika regado.

Dum la militkomenco inter Germanio kaj Polio la rusa registaro per diversaj neoficialaj propagandrimedoj disvastigis inter la popolo la opinion, ke Rusio ne partoprenos en la milito ekde la komenco, sed atendos ĝis ambaŭ batalantaj kontraŭuloj estos elĉerpitaj de la milito kaj poste Rusio sen multe da perdo kaj sen risko okupos la tutan mondon. Ĉu la samon imagis la ĉefuloj en la Kremlo ? - mi ne scias, sed inter la rifuĝintoj estis la opinio, ke ne daŭros longe ĝis venos konflikto inter la hitleristoj kaj la bolŝevikoj. Kaj se tiu konflikto okazos, oni ne povis antaŭvidi kiel sekvos la militaj kaj la politikaj aferoj, tamen la ŝancoj, ke la rusoj okupu la tutan mondon ne estis tiel simplaj, kiel tion imagis tiam la rusoj.

Mi ne sciis, kion pensis tiurilate Fitman, sed havante psikon de "Okcidentano", li verŝajne kredis, ke la rifuĝintoj havos la ŝancon forlasi Rusion. La skribaĵo al lia onklo per mi povus do esti realaĵo.

Bedaŭrinde, tiun skribaĵon poste mi ne realigis. Kiam mi estis liberigita el la koncentrejo la milito inter Germanio kaj Rusio estis en la komenca stadio. Mi ne havis ian konstantan adreson kaj mi devis resti en Rusio unu jaron post la fino de la milito. Sendi eksterlandan leteron en Rusio sub la regado de Stalin, eĉ pri la plej malgravaj aferoj, estis opiniita ia risko, mi do ne povis skribi al germano dum la milito inter Germanio kaj Rusio, kaj krome pri arestita germano, akuzita pri spionado por la germana ŝtato. Tia letero certe ne irus pli malproksimen ol al loka NKVD.

Dum mia kelkjara restado en Sovetunio mi tute forgesis la adreson, poste ĉio ŝanĝiĝis kaj tiu adreso povis havi nenian aktualecon.

***

Mohikanoj de la privataj agrikulturistoj

Laŭ la soveta statistiko de la jaro 1939, troviĝis en Sovetunio ĉ. 5% memstaraj agrikulturistoj. Se mi juĝu tiun statistikon laŭ la nombro de privataj agrikulturistoj, kiujn mi renkontis dum mia sesjara restado en Rusio, mi

ĝin devus opinii troigita. Tamen, certa nombro de memstaraj kamparanoj fakte ekzistis.

Kvar tiaj "mohikanoj" estis kun ni en la ĉelo kaj unu mi renkontis kvar jarojn poste en Kirgizio.

Por esti memstara terkulturisto necesas eksterordinara kuraĝo kaj oni devas esti en ĉiama minaco de diversaj ĉikanoj de la ŝtato.

Laŭ la teorioj de marksistoj kaj leninistoj, la kamparanoj havas "duoblan animon". Ili simpatias kun la klaskonsciaj kaj batalantaj laboristoj, ĉar ili mem estas utilaj kaj laboremaj homoj, sed, ĉar ili posedas siajn privatajn produktilojn kaj propran teron, iliaj animoj estas ĝis certa grado egoismaj, simile al la klaso kapitalista, aŭ etkapitalista. La laboristoj ne posedas siajn proprajn laborilojn, pro tio ili ne estas egoistoj.

Laŭ la teorio de la ortodoksaj marksistoj, la proletaro estas la klaso revolucia kaj plej progresema, precipe la proletaro de la granda industrio. En la batalo por akiri la ŝtataparaton devas la laboristaro profiti la helpon de la kamparanoj, sed neniam oni devas al tiuj kamparanoj plene konfidi, eĉ post kiam la proletaro akiris la ŝtataparaton.

Ĝis la forigo de la carismo en Rusio en la jaro 1917, tiu lando estis tipe agrikultura, la laboristaro en la granda industrio konsistis el ĉ. du procentoj de la loĝantaro. La ortodoksaj leninistoj iam opiniis, ke la rekomendo de Lenin por akcepti kamparanojn al la partio kiel plenrajtajn membrojn estis giganta modernigo de la marksismo.

Laŭ asertoj de homoj, kiuj sciis pri la diskutoj interne de la plej alta regantaro en la partio, estis iam projekto formi, post la bolŝevika regadakiro, ankaŭ kamparanan partion, ĉar la bolŝevika partio estis formale partio laboristara. Sed tio estis nur teoriaj diskutoj por la naivaj kredantoj, ĉar la regantoj ne povis ja trakti tiujn abstraktaĵojn serioze. La sola estinta kamparano inter la ĉefaj regantoj de la bolŝevika partio estis Kalinin, la ŝtatprezidento de Sovetunio, kies praktika funkcio estis nur ke ankaŭ tia formale ekzistas.

Kvankam Lenin kaj liaj kamaradoj akceptis la teorion de Marks, ke la laboristaro estas la ĉefa revolucia

avangardo, praktike Lenin kaj lia anaro formis sian partion laŭ la principo de "profesiaj revoluciistoj". Tiuj revoluciaj profesiuloj devis konsisti el la plej inteligentaj kaj plej sindonemaj homoj, kaj nur ili kapablos akiri la ŝtataparaton.

La diktaturon de tiuj profesiaj revoluciistoj ili nomis la diktaturo de la proletaro, kvankam tiam la fakta proletaro estis la plej malmulta socia grupo de la popolo. La pravigo de tiu diktaturo estis, ke tiuj profesiaj revoluciistoj opiniis sin la plej progresemaj homoj kaj nur tiaj rajtas reprezenti la popolon.

Dum la unuaj postrevoluciaj jaroj la kamparanoj posedis teron kaj samtempe estis organizitaj ŝtataj bienoj t.n. "sovĥozoj". La privata agrikulturado prosperis en tiu tempo tre bone, kaj la privataj agrikulturistoj tute ne intencis forpreni de la reganta partio la ŝtataparaton, ili tamen estis grupo malpli dependa de la ŝtato ol la laboristaro - ili estis ekonomie en certa grado liberaj.

Ĉu la marksismaj suspektteorioj rilate la kamparanojn fakte maltrankviligis la ŝtatregantojn, aŭ ĉu ekzistis eblo, ke la kamparanoj fakte iam komencos postuli por si politikajn rajtojn kaj kundecidon en la ŝtataj aferoj, aŭ ĉu Stalin simple ne volis, ke la kamparanoj havu iom pli da ekonomia libereco ol la laboristoj, kiuj estas de la ŝtato tute dependaj kaj sub la kompleta ŝtata kontrolo ? - al tiuj demandoj mi respondi ne povas.

Povas esti, ke en tiu komplekso de suspektoj kunagadis partoj de ĉiuj elementoj kune, tial en la jaro 1928 la soveta registaro komencis organizi amase agrikulturajn kooperativojn, la t.n. "kolĥozojn", ĉar la private ekzistanta kamparanaro povus iĝi malamika al la "proleta diktaturo".

La solvo por forigi tiun minacon estis simpla. Se estos likvidita la privata kamparanaro ĉesos ekzisti la danĝera, ĉiam minacanta klaso.

Povas esti, ke per la organizado de la kolĥozoj la rusa registaro celis havigi al si ne nur severan kontrolon super la kamparanoj, sed ankaŭ havigi al si laboristojn por la industrio, ĉar tiam estis komencitaj la kvinjaraj planoj. Laŭkutime, la soveta registaro komencis la kolĥozigon realigi kvazaŭ por la bono de la popolo.

En la jaroj 1927-28 la gazetaro komencis propagandi la favorojn, kiujn havos la kamparanoj, se ili libervole organizos kolĥozojn. La sama propagando okazis per multaj kamparanaj kunvenoj. Estis al la kamparanoj promesita la ŝtata helpo per diversaj maŝinoj, kiuj ebligos kulturi vastajn areojn. Estos al ili senditaj diversaj specialistoj kaj simile.

Sed la kamparanoj ne volis havi la ŝtatan helpon kaj ili libervole ne aniĝis al la kolĥozoj. Tiam la tasko por pli intensa organizado de la kooperativoj estis komisiita al la partio. La kamparanoj estis vokitaj al la kabinetoj de la regionaj partiaj sekretarioj por "interparoloj". Dum tiuj "interparoloj" ĉeestis en la kabinetoj po du, aù po tri anoj de la komunista junulara organizaĵo kaj du pistoloj estis metitaj sur la tablo. Tiuj "interparoloj" estis mallongaj. La sekretario demandis nur : "Ĉu vi aniĝos libervole al la kolĥozo, aù ne ?".

Multaj kamparanoj akceptis baldaù en la kabinetoj tiun libervolan aniĝon. Tamen, multajn la pistoloj ne timigis kaj ili rifuzis sian aniĝon.

Tiuj, kiuj al la kolĥozoj ne aniĝis, estis devigitaj pagi tre altajn impostojn kaj ili estis per diversaj manieroj ĉikanitaj.

Kompreneble, la aniĝado al la kolĥozoj iom post iom multiĝis, sed la kamparanoj antaù sia aniĝo buĉadis la dombestojn.

Spite ĉiujn ĉikanojn, restis granda amaso da obstinaj kamparanoj, kiuj persistis kaj rezistis ĉiujn persekutojn kaj ili restis memstaraj. Tiujn obstinulojn kapablis likvidi nur NKVD.

La ĉefa atako kontraù ili okazis dum vintro de la jaroj 1930-31. Al iliaj hejmoj venis partianoj, akompanate de miliciistoj kaj NKVD-soldatoj. Tiuj reprezentantoj de la proleta kaj kamparana ŝtato ordonis al la kamparanoj : "Post du horoj, la tuta familio devos esti preta forlasi sian hejmon."

Post la forpaso de la menciita tempo, la kamparanaj familioj estis gviditaj al la urbaj placoj. Dum la kamparanaj familioj venis al la placoj, la partio sur la samaj placoj aranĝis amasajn popolkunvenojn. La parolintoj dum tiuj kunvenoj montris al la popolo la apudstarantajn kontraùrevoluciistojn, kiuj kulpas en la

mizero de la popolo kaj en manko de agrikulturaj produktoj por la ĉiutaga bezono, ĉar tiuj "kulakoj" kaŝis, detruis, sabotadis realigi la ŝtatajn planojn, ili bremsis ĉiujn ŝtatajn penojn por plibonigi la vivnivelon de la sincere laboranta popolo. Nun, tiuj sabotistoj ricevas sian punon. Ili estas forveturigotaj por edukado per deviga laboro kaj ĉe ni de nun ĉio funkcios bone.

Plejofte tiujn kunvenojn ĉeestis militistaj orkestroj, kiuj ludis revoluciajn melodiojn. Tiu ludado de la orkestroj kvazaŭ esprimis, ke la popolo festas sian venkon super la "kulaka" malamika klaso.

Post tiuj kunvenoj, la "kulakoj" estis gviditaj al la fervojaj stacioj, akompanite per insultoj de la popolo. Kompreneble, la insultantoj estis la komunistaj kaj komsomolaj fanatikuloj, sed ili ja estas en la komunista parolmaniero "la plej progresema parto de la popolo".

Tiuj "kulakoj" estis senditaj al la malproksimaj kaj malvarmaj partoj de Sovetunio, kie ili devis komenci "novan vivon", sub la kontrolo kaj per la edukado de NKVD.

Al tiuj "kulakoj" estis dum la forsendado ebligite kunpreni nur etan parton de sia havaĵo. Ilia veturado daŭris dum multaj semajnoj en ŝarĝvagonoj. Survoje multe el tiuj homoj mortis, precipe infanoj, ne povantaj elporti la malvarmon.

En la oficiala kaj partia lingvo, tiuj aranĝoj estis nomitaj : "La revolucio kontraŭ la kamparanaj riĉuloj (Kulakoj)"

Iuj kamparanoj, kiuj ne volis aniĝi al la kolĥozoj, sin savis per akcepto de laboro en la urboj, kie ili dum iom da tempo laboris en fabrikoj kaj poste reiris al siaj vilaĝoj. Post iom da tempo, kiam la "kulakoj estis likviditaj kiel klaso", iuj kamparanoj ankaŭ reakiris peceton da tero kaj restis memstaraj agrikulturistoj. Ili ĉiam estis ĉikanitaj, sed ili preferis sian peceton da tero kaj pagi de ĝi altajn impostojn, ol esti en la kolĥozo. Oni povas trovi tiajn unuopajn kamparanojn en diversaj lokoj; kiel socia grupo en la ĝusta senco ili ne ekzistas.

Kvar tiaj "mohikanoj" - memstaraj agrikulturistoj - troviĝis en nia ĉelo, ili devenis de vilaĝoj malproksimaj inter si. Du el ili estis sub la akuzo de "kontraŭrevolu-

ciismo" (kompreneble, laŭ la soveta difino) kaj du estis pro neglektado de la laktoliverado al la ŝtato. Du el tiuj "riĉuloj" venis al la ĉelo sen ŝuoj. Ĉiuj tiuj kvar, nome memstaraj agrikulturistoj, ofte laboris iom en la urbetoj, ĉar ilia terpeceto kaj unu bovino ne postulis multe da okupo kaj certe ne sufiĉis por kompleta nutrado de iliaj familioj. Ĉar la neglektado de la laktoliverado ne estis taksita grava krimo, tiuj rajtis ricevi de siaj familioj manĝaĵpakaĵojn. Unu el la vilaĝanoj ricevis plejofte iom da hejme farita fromaĝo, iom da pano kaj kelkajn cepojn. Kiam li ricevis pakon, ni ĉiuj ĝojis, ĉar duonon de la fromaĝo li dividis al ĉiuj, aldoninte al la fromaĝo peceton da cepo.

Kvankam li fordonis duonon de la fromaĝo, ĉiu ricevis nur duonon da kulero. Tamen tiu bonaganto en la sovetaj cirkonstancoj faris multe por siaj samsortanoj. Tute kontraŭe kondutis la dua pakricevinto, li metis la paketon sub sian matracon kaj neniu ĝin eĉ vidis. Iom el sia paketo li manĝis ĉiumatene kun la pano. Dum tiu manĝado li sidis vizaĝon al la muro, ke neniu vidu kion li manĝas.

Ankaŭ en la ĉiutaga vivo li evitis kun iu ajn paroli kaj ne partoprenis en la komunaj interbabiladoj - preskaŭ ĉiam li estis silentema. Nur de tempo al tempo estis por li escepto Pomikalski, kun kiu li iomete babiladis.

Unu fojon tiu silentemulo spertis grandan perdon kaj certe ankaŭ animajn suferojn. Ĉiutage matene, antaŭ la matenmanĝo oni ellasis nin al la necesejo, sed en du grupoj. Reveninte unufoje de la necesejo, alvokis min Fitman kaj donis al mi peceton da cepo, dirante : "Jen vi havas al la hodiaŭa matenmanĝo". Mi tute ne komprenis de kie Fitman akiris tian luksaĵon. "De kie vi tion havas ?" " - Ne demandu, tion vi ekscios iom pliposte". Dum la manĝo mi rimarkis, ke ankaŭ kelkaj aliaj manĝas po peceto da cepo.

Iom poste mi eksciis, ke kiam la "avara kulako" estis en la necesejo, oni forŝtelis liajn kelkajn cepojn kaj dividis ilin. Tiun laboron certe faris komune Fitman, Sergejenko kaj la generalo. La domaĝito eĉ ne unu vorton diris pri tiu okazintaĵo, silentis kiel ĉiam. Sed kiam li venontfoje ricevis pakon, li ĉion portis en la poŝoj kaj dumnokte li metis sian malgrandan saketon sub la kapon.

Similan sorton spertis unu fojon ankaŭ Pomikalski. Ĉiun dekan tagon ni povis fari aĉeton en la mallibereja butiko. La tuta varsortimento en tiu butiko konsistis el pano, "maĥorko" kaj alumetoj, nur unufoje estis vendita putriĝemaj cepoj. Pano estis vendita po tri kilogramoj. "Maĥorko" kaj alumetoj estis venditaj en nelimigita kvanto.

Nur kelkaj homoj havis monon por aĉeti en tiu butiko - tiuj, kiuj venis antaŭnelonge. La estintaj en la malliberejo dum longa tempo monon ne havis. Estis ĉe ni kutimo, ke ĉiu aĉetanto, laŭ sia propra volo, aĉetis kelkajn paketojn da "maĥorko" pli ol mem bezonis kaj donis al tiuj, kiuj monon ne havis. Sammaniere ni faris ankaŭ kun la pano. Ĉiu panaĉetanto forprenis trionon, aŭ duonon de la pano aĉetita por li, tranĉis ĝin je pecojn kaj donis al tiuj, kiuj ne havis monon por mem aĉeti.

Dum iom da tempo same faris ankaŭ Pomikalski, kvankam li mem ne fumis, sed li ĉiam aĉetis kelkajn paketojn da maĥorko por la fumantoj. Pomikalski ne aĉetis panon, por li sufiĉis la sescent gramoj da pano, kiujn li ricevis. Neniu al li riproĉis, ke li ne volas aĉeti panon.

Kiam la silentema vilaĝano komencis ricevi paketojn, Pomikalski ĉesis aĉeti "maĥorkon", sed aĉetis panon. La panon li interŝanĝis kun la "kulako", de kiu li ricevis iomete da sukero kaj kelkajn cepojn. Tiu interŝanĝo okazis tuj, kiam Pomikalski alportis la panon el la koridoro.

Verŝajne la silentema "kulako" ŝuldis al Pomikalski pro antaŭe pruntepreniita pano kaj Pomikalski ne havis la emon plu kreditigi. Tri-kilograma panbulo kuŝis en la saketo pendanta ĉe la lito de Pomikalski, kiu atendis, ke la "kulako" ricevu pakon.

Tiu pano pendanta dum kelkaj tagoj inter la malsataj homoj estis tro ekscita kaj oni ne povas en Rusio nomi ŝtelisto eĉ Sergejenkon. Noktomeze oni vekis min. Malfermiinte la okulojn, mi vidis apud mi Sergejenko. Li metis al mia mano pecon da pano kaj diris : "Manĝu !".

Rigardante ĉirkaŭen, mi vidis, ke krom Pomikalski kaj la "kulako" neniu dormas. Mi komprenis de kie Sergejenko havis por mi tiun panpecon. Mi sentis min iom embarasita. Mi estis ĉiam malsata kaj manĝema ankaŭ noktomeze. Mi ne malaprobis tiun "panproprigon", sed kun Pomikalski mi

estis en kolegaj rilatoj kaj mi pensis, kion mi diros, se Pomikalski matene rakontos al mi pri la dumnokte forŝtelita pano. La panon mi preskaŭ englutis por eviti klopodon, se Pomikalski vekiĝos, kiam mi manĝos.

Venontan matenon, kiam Pomikalski rigardis en la saketon, mi direktis la vizaĝon for por ne vidi lin, ĉar mi preskaŭ ekridis.

Iom poste al mi venis Pomikalski kaj diris : "Aŭdu ! iu forŝtelis de mi dumnokte la tutan banbulon". Mi penis haltigi la rideksplodon kaj kapablis respondi nur : "Hm". Pomikalski certe atendis de mi iom pli da vortoj kaj mia eldiro "Hm" igis lin certe suspektema al mi.

Iom poste Pomikalski denove ekparolis pri la forŝtelita pano, mi silentis kiel antaŭe kaj atendis, ke li ĉesu paroli pri tio.

Pomikalski tamen havis la policistan ambicion por eltrovi ŝteliston. Dum la tuta tago li rakontis ankaŭ al ĉiuj pri la sama afero. Ĉiu, al kiu li rakontis pri la forŝtelita pano, komencis ridi. Laŭ tiu ridado Pomikalski certe konkludis, ke tio estis ia komuna ago.

Ankaŭ la sekvontan tagon tuj post la matenmanĝo, Pomikalski denove komencis daŭrigi la esploradon pri la forŝtelita pano, komencante de mi. "Mi nek hieraŭ nek hodiaŭ vidis, ke iu havas aŭ manĝas pli da pano ol la ricevita porcio. Laŭ tio mi do povas konkludi, ke la ŝtelisto la panon formanĝis tuj post kiam li ĝin ŝtelis. Nu, diru al mi, kiu povas havi tian stomakon por formanĝi per unu fojo tri kilogramojn da pano."

- Jes, vi pravas, por formanĝi tri kilogramojn da pano je unu fojo oni devas havi eksterordinaran stomakon - mi respondis. Dum tiu mia eldiro Pomikalski rigardis min en la okulojn, sed nenion konkrete li ja povis al mi riproĉi. Finfine li tiom longe demandadis, ĝis Karpienko diris : "Mi scias, kiu prenis la panon kaj mi tion pravigas. Vi tiun panon mem ne manĝus, sed vi volis fari komercadon, tiu komercado ne estas necesa. Prenis ĝin tiuj, kiuj estis malsataj."

Pomikalski iĝis malica kaj diris : "Nenies intereso devas esti por kio mi la panon aĉetis kaj por kio mi ĝin volis havi. Tio estas mia propraĵo kaj kun mia propraĵo mi rajtas fari kion al mi plaĉas."

Ili certe daŭrigus la diskuton, sed la ĉiam gajema Sergejenko proksimiĝis kaj diris : "Sinjoro Pomikalski, la pano ja estas for, pri tio ni nenion povas fari. Mi diros al vi la veron. La panon prenis mi persone. Mi ĝin distranĉis je pecojn kaj disdonis al la ceteraj en la ĉelo."

Post la konfeso de Sergejenko, Pomikalski montris kvazaŭ kontentan mienon al la por li malkontentiga ludo kaj diris : "Ho, se vi tion faris tiamaniere, ĉio ja estas en ordo. Sed diru al mi, ĉu ankaŭ P. ricevis iom da tiu pano ?". Sincere ĝis tia grado por perfidi min, Sergejenko ne estis kaj respondis : "P. nenion sciis pri tio." Tamen laŭ la eldiro de Sergejenko Pomikalski komprenis, ke mi ne estas tiel honesta kiel volas min antaŭ li prezenti Sergejenko.

Ukrajna tolstojano ?

Inter la kvar "kulakoj" troviĝis unu, kiu en sia tempo estis membro en kolĥozo kaj ĝin forlasis. Tia ago neniam povas esti pardonita en Rusio. Tiu kuraĝulo certe ĉiam atendis la areston kaj estis sufiĉe hardita por trankvile ĝin renkonti.

Lia altstatura solida korpo impresis esti de homo pli ol mezgrande forta. Liaj mildaj bluaj okuloj, esprimante infanan naivecon kompare al la societo ĉirkaŭ li, ĉiam rigardis trankvile. Li aspektis esti absolute certa pri tio, kion li havas en sia animo. Ankaŭ la helflava maldensa hararo sur lia ronda kapo diferencigis lin eble pli ol ĉio de la ceteraj, en la ekstera aspekto.

Li estis la sola profunde religia en la ĉelo. Se mi devus imagi sanktulon, mi prenus lin kiel ekzemplon. Li estis la sola en la ĉelo, kiu kuraĝis sen timo laŭte kritiki la sovetan ordon pro ĝia ĉiama aplikado de la brutala perforto kontraŭ la popolo. Ĉiam li parolis nur la ukrajnan lingvon, kvankam li la rusan tre bone komprenis kaj certe ankaŭ parolis.

Kvankam li estis religia, pri religiaj aferoj li neniam parolis, nur pri aferoj moralaj. Li neniam citadis la Biblion aŭ eldirojn de profetoj, kvankam oni povis rimarki, ke tiuj verkoj estas de li sufiĉe bone konataj. Multfoje li estis atakita de Bielov kiel soveta malamika

fanatikulo. Bielov tiam eligis el sia amaso da ateistaj frazoj. Pli ol ĉion li ripetadis la sloganon de Marks, "Religio estas opio por la popolo". Mi admiris la kuraĝan konduton de tiu ukrajnano. Li neniam humiliĝis. Li kuraĝe kritikis la bolŝevikan teroron, kvankam li estis komplete katenita de tiuj komunistaj hipokrituloj. Mi multfoje pensis, kian moralan influan potencon povus havi tia homo en normalaj cirkonstancoj.

Kelkfoje mi provis okazigi kun li apartan interbabiladon, neniam mi sukcesis en tio. La malfacilaĵo estis la lingvo. Mi la ukrajnan lingvon paroli ne scipovis kaj li la rusan lingvon komplete evitis.

Arestita pro citado de frazoj de Lenin

Iun vesperon malfermiĝis la pordo. Eldirinte la kutiman "Estu salutataj !" ankoraŭ sur la sojlo enpaŝis maljunulo. La historio de lia vivo estis sufiĉe ampleksa. La ĝeneralaĵojn li rakontis dum kelkaj minutoj, la detalojn li rakontis en la daŭro de sia restado en la ĉelo.

En la partio li estis ekde la jaro 1912. Dum la revolucio li batalis per armiloj plejparte en Siberio. Laŭ siaj rakontoj, li trapasis Siberion piede. Kompreneble, en liaj rakontoj estis ankaŭ troigoj. Post la bolŝevika venko li administris ian grandan fabrikon kaj poste aliajn malpligrandajn entreprenojn.

En la jaro 1937 li estis arestita. Li ricevis dekjaran verdikton kaj oni sendis lin al "eduktendaro" en la regiono de Kotlas. Komence de la jaro 1940 li estis liberigita kaj venis por labori en Borisovo. Lia restado en la "libereco" daŭris apenaŭ kelkajn monatojn. Li eĉ ne povis revi pri la reaniĝo al la partio. Li ricevis laboron en la muzikinstrumenta fabriko kiel simpla laboristo.

Verŝajne pro lia longjara restado en la partio, la alkutimiĝo por ĉiama kvazaŭ kritikado, memkritikado kaj la kutimo okazigi paroladojn ne forlasis lian menson. Lia rolo nur ŝanĝiĝis, iam li estis estro de produktadaj entreprenoj kaj li devis kritikadi la laboristojn. Nun li estis mem laboristo kaj laŭ sia "klasa aparteno al la senklasa socio" li ja devis defendi sian klason. Siajn paroladojn li faris dum kunvenoj de la profesia sindikato.

Praktika tasko de la profesiaj sindikatoj en Sovetunio estas helpi al la ŝtato realigi la laborplanon. Dum

la kunvenoj de la profesiaj sindikatoj ĉeestas administrantoj de la entreprenoj kaj kune kun oficistoj de la sindikatoj estas pritraktataj aferoj ŝtataj kaj precipe pri plialtigado de la produktado laŭ la ŝtataj planoj.

Dum tiuj kunvenoj okazas, ke la laboristoj estas kritikataj pri diversaj neglektoj dum la laboro. Sendube, la "malnova bolŝeviko" estinte iam laborestro rigardis la kritikadon al la laboristoj afero tute normala. Sed estante laboristo, li memoris la frason de Lenin pri la rilatoj inter la profesiaj sindikatoj kaj la ŝtato, eĉ se la ŝtato estos socialista.

En unu el siaj artikoloj Lenin skribis, ke eĉ en la laborista ŝtato la profesiaj sindikatoj havos la taskon defendi la laboristaron. Eble Lenin tion skribis, sed ekde la tempo kiam tiu frazo estis skribita ĝis la jaro 1940, sub la regado de Stalin, okazis aliaj pli grandaj maljustaĵoj ol la malatento de ia frazo de Lenin.

La malnova bolŝeviko certe ne estis naiva por ne scii tion, sed la kutimo kaj la emo paroli publike estis ĉe li tre fortaj kaj por tiuj paroladoj li uzis kunvenojn de la profesia sindikato. Li povus paroli kiom li nur volus, sed samsence kiel aliaj, t.s. kritiki la laboristojn kaj postuli plimultigon de la produktado. Anstataŭ tio, li atentigis la sindikatajn oficistojn pri iliaj taskoj laŭ la opinio de Lenin.

Sekvintan tagon post tiu ĉi kunveno, li estis vokita al NKVD kaj arestita kiel publika kontraŭrevolucia agitisto, kiu celis per sia parolado instigi la laboristojn sabotadi la labortaskojn.

En la ĉelo li tre ŝatis paroli pri saĝaĵoj en la bolŝevikaj teorioj. Li bedaŭris, ke la nunaj regantoj mistifikadas tiun genian teorion kaj ke tio kaŭzas multe da damaĝo al la ŝtato. Liaj eldiroj estis fakte mallongaj sloganoj de la bolŝevika frazeologio. Precipe li uzis frazojn la plej mallogikajn por ne bolŝeviko, ekzemple, li klarigis, ke la proleta diktaturo estas pli alta - supera - formo de demokratio ol la kapitalista demokratio, aŭ kiel li tion nomis "pseŭdo-demokratio". Laŭ Lenin. Sian personan sorton li malpli bedaŭris, ol la militan fiaskon (laŭ lia opinio) en Finnlando. Pri tiu milito li multfoje parolis, ke ĝi kostis multe da viktimoj kaj la ĉefa celo - la kompleta venko en Finnlando - ne estis akirita.

Foje ni eksciis, ke la belga reĝo kapitulacis al la germanoj, sed la belga registaro ne volis obei la reĝon kaj vokis la popolon daŭrigi la batalon kontraŭ la germana armeo. Mi tiam demandis la malnovan bolŝevikon, kion li opinias pri tiu afero. Li komencis filozofadi, sed nenion konkrete diris. Fitman helpis lin en la embaraso per jena klarigo : "Por vi kiel polo estas pli bone, ke la belgoj daŭrigu la militon, sed pro niaj amikaj rilatoj inter Sovetunio kaj Germanio, ni devas preferi la decidon de la reĝo, ol tiun de la registaro." La malnova bolŝeviko tion konsentis. Mi tiam havis la opinion, ke Fitman senceremonie volis montri al mi la opinion de la bolŝevikoj ĝenerale.

***

Kolimano

La pordo foje malfermiĝis kaj enpaŝis per rapida vigleco, preskaŭ enkurante, masiva, forta, dikstatura viro. Elparolinte la kutiman "Estu salutataj ! ", li aldonis laŭtvoĉe : "Kamaradoj, mi revenis nun de Kolimo!" Li elparolis tion kun eksterordinara fiereco. Ĉiuj stariĝis aŭtomate, eldirinte ĥore : "Ho !". Ĉiuj interrompis siajn okupojn kaj proksimiĝis al li por rigardi tiun homon, kvazaŭ ian nekutiman estaĵon. La enveninta viro portis sur sia dorso malgrandan sakon. Oni helpis al li depreni la sakon, kvankam ĝi estis nek granda nek peza. Forpreni de li tiun sakon enhavis ian honorigon.

Tiu novveninto estis tuj petita sidiĝi sur la lito. Ĉiuj sidiĝis ĉirkaŭe por aŭdi liajn rakontojn. Tiam mi nek sciis nek aŭdis kio estas Kolimo. Sed la rusoj aŭdis pri Kolimo kaj ili havis pri ĝi scion en certa grado.

Por ili tiu reveninto de Kolimo povis esti eksterordinara estaĵo.

Lia nomo estis Artomonov. Li estis kamparano, kiu posedis la simplan kamparanan sincerecon. Pri Kolimo li rakontis longe. Ĉiuj ĉirkaŭe preskaŭ englutis ĉiun lian vorton. La ĉirkaŭsidantoj dum la aŭskultado kondutis serioze, kiel neniam ĝis tiam. Oni povis havi la impreson, ke en la ĉelo ŝvebis la atmosfero de Kolimo, ŝvebis la timego de Kolimo.

Do, kiu estis Artomonov kaj kiaj estis liaj rakontoj ? Ĝis la jaro 1937 li estis kolĥoza administranto, proksime de Borisovo. En tiu jaro li estis arestita ne sciinte kialon, simile al li centmiloj da samsortanoj en tiu tempo. La lin esplorinta NKVD-oficiro menciis al tiu Artomonov aron da akuzoj : li planis kaj intencis eksplodigi pontojn, bruligi provizejojn de kolĥoza havaĵo, veneni la dombestojn de la kolĥozo, ĵeti en la teron fisemojn por diversaj herbaĉoj, kiuj malebligus la normalan kreskadon de la plantoj. Li estis ligita kun kontraŭrevolucia organizaĵo, de kiu li ricevis tiujn instrukciojn. Li estis sciigita, ke tiu kontraŭrevolucia organizaĵo celas forigi la sovetan ŝtaton kaj ĝin anstataŭigi per ŝtato kapitalista kaj faŝista. Li apartenis al spionista organizaĵo, al kiu li transdonis raportojn pri la havaĵo en la kolĥozo, kiun li administris. Li ankaŭ penis havigi precizajn raportojn pri la havaĵo en la najbaraj kolĥozoj, por transdoni tiujn raportojn al la sama spiona organizaĵo, kiun li ofte kontaktis.

Ĉiujn tiujn akuzojn kontraŭ li li devis konfesi kaj la akuzdokumenton subskribi. Kiam Artomonov tiujn akuzojn malakceptis kaj rifuzis subskribi la paperojn metitajn antaŭ li, li estis batita per pugnoj kaj piedfrapoj, preskaŭ seninterrompe kaj senindulge. Lia korpo estis plena de vundoj kaj tre doloris. Lia vizaĝo similis senformigitan viandamason. Dum ok tagoj tiu fortega viro posedis la fizikan kaj psikan rezistadpovon. Je la naŭa tago li konfesis ĉiujn akuzojn prezentitajn kontraŭ li kaj ĉiujn antaŭmetitajn paperojn subskribis.

Dum la nokto de la venonta tago post sia konfeso, Artomonov estis vokita al la "juĝistarkunsido", kiu okazis en kabineto de NKVD-domo, kie li estis esplorita. Tiu "juĝistaro" laŭtlegis al li la subskribitan akuzdokumenton kaj demandis : "Ĉu vi ĉiujn akuzojn konfesas ankaŭ antaŭ la juĝistaro ?".

Artomonov ĉion konfesis. Post kelkaj minutoj estis anoncita la punverdikto : dek jarojn da eduklaboro. La venontan tagon li estis kun grupo sendita al Kolimo. La veturado tien daŭris kelkajn monatojn. Li estis veturigita per trajnoj, per boatoj, per ŝarĝaŭtomobiloj, okazis ankaŭ kelktaga piedirado.

En Kolimo troviĝas la plej grandaj orminejoj de Rusio. Artomonov per sia laboro riĉigis la ortrezoron de sia proleta patrio.

Homoj, kiuj estas sanaj kaj fizike fortaj, kiuj kapablis plenumi la labornormon, estas en Kolimo "bone pagitaj". Laboristo por la plenumita normo ricevas ĉiutage unu kilogramon da pano kaj ankaŭ aliajn manĝaĵojn, tial ne devas malsati. Tiuj, kiuj havas feliĉon trovi pli ol dekgraman orpeceton ricevas premiojn, ekzemple : paketon da "maĥorko" aŭ paketon da cigaredoj. La laboristoj "staĥanovoj" ricevas de tempo al tempo iom da brando.

Se ĉe iu estas trovita orpeceto, kiun li kaŝis, li estas mortpafita sen iu ajn ceremonio kaj serĉadoj ofte okazas. Tiajn orpecetojn povas kaŝi tiuj, kiuj kredas, ke iam ili estos liberigitaj kaj reveturos hejmen. Sed la vivdaŭro en tiu regiono estas mallonga.

Kolimo situas en tre norda regiono de Siberio en la regionoj "proksime al Alasko". La distanco inter tiu loko kaj Alasko estas taksita je ĉ. tricent kilometroj. Laŭ onidiroj iuj kvazaŭ provis trapasi al Alasko dum vintro, tiam la maro estas komplete glaciigita, sed neniu sukcesis en tiuj fuĝoj.

Dum vintro la temperaturo povas esti iam 50 C° sub nulo. Homoj mortas tie amase kaj subite. Okazas, ke oni parolas kun homo, sed subite li ĉesas respondi, li estas morta. En tiuj koncentrejoj troviĝas multaj invalidoj diversspecaj, invalidoj sen kruroj, invalidoj sen manoj kaj multe da blinduloj - viktimoj de la frosto.

Ankaŭ la invalidoj devas labori. La invalidoj sen manplatoj portas hejtlignon al la barakoj, la invalidoj sen kruroj havas diversajn manlaborojn en la barakoj. La plej malbonan sorton havas la blinduloj, ili nenion laboras, iliaj manĝaĵporcioj estas tre limigitaj kaj tio rapidigas ilian morton, - laŭ la vidpunkto de la koncentreja administrantaro ili ja estas senutilaj homoj.

Kiam Artomonov venis en la koncentrejon, li sendis multe da petskriboj al diversaj prokuroroj kaj al aliaj ŝtatinstancoj, menciinte la manieron, kiel li estis esplorita kaj deklaris, ke li estas senkulpa.

Fine, post kelkjara restado en la tendaro de Kolimo, li estis reveturigita al Blankrusio kaj lia afero denove ekzamenota. Artomonov ĝojis kiel infano, ke li sukcesis forlasi Kolimon kaj reveni por iom da tempo al malliberejo.

La kvar knaboj

De nia najbara ĉelo ni komencis ofte aŭdi kantadojn, kriadojn kaj aventurojn de junaj knaboj. Iom post iom tiuj aventuroj plioftiĝis kaj okazis ĉiutage. Ni komprenis, ke la malliberejа administrantaro ne kapablas devigi la knabojn al trankvileco, kiel ili faras kun ni aĝuloj. Verŝajne pro tiu kaŭzo la administrantaro decidis likvidi la specialan ĉelon por la junuloj kaj ilin loki en ĉelojn kune kun la pliaĝuloj.

Kvar el tiuj knaboj estis enlasitaj al ni. Ilia aĝo estis inter 13-16 jaroj. Unu el tiuj knaboj estis "rusa germano", sed la germanan lingvon li ne komprenis (almenaŭ tion li diris), li havis nur germanan nomon Hans. Lia familia nomo estis rusa. En la malliberejo li estis de kelkaj monatoj. Lia krimago estis : li kune kun kvin samaĝuloj rompis la plumbon de fervoja ŝarĝvagono sur la stacio en Borisovo, malfermis la pordon kaj elprenis po ok kilogramojn el ok kestoj de sukeraĵoj. La ŝtelo certe sukcesus, sed en la vagono restis ankoraŭ multe da kestoj kun la sama varo kaj la ceteraj kestoj ne donis trankvilon al la knaboj. Post la forporto de ok kestoj, ili revenis por preni ankoraŭ duan fojon kelkajn kestojn. Intertempe estis rimarkita la okazinta ŝtelo. La knaboj tamen havis ŝteladsperton kaj la duan fojon ili proksimiĝis al la vagono en du grupoj. Se la unua grupo sukcesus plenumi sian laboron forporti kelkajn kestojn, tiam la samon farus la dua grupo.

Sed kiam la unua duo proksimiĝis al la vagono, ili estis kaptitaj. En la miliciejo la du kaptitoj estis terure batitaj kaj ili perfidis siajn nekaptitajn kamaradojn. Poste la ŝteladgrupo perfidis la aĉetintojn de la sukeraĵoj kaj la tuta afero fiaskis. Kun la afero estis ligitaj pli da homoj kaj la esplorado devis daŭri longe.

La ceteraj tri knaboj devenis de la teritorio, kiu ĝis la milito apartenis al Polio. Ilia hejmvilaĝo situis 13 kilometrojn de la iama pola-soveta limo. La komunista

propagando sur tiuj teritorioj estis ĝis la milito tre forta kaj ĝi trovis multe da simpatiantoj.

La kaŭzoj de la komunistaj sukcesoj tie estis : sur tiuj terenoj, precipe en la vilaĝoj de Blankrusio, estis la mizero pli granda ol en la ceteraj partoj de Polio. Due, sur tiuj teritorioj loĝis multe da Blankrusoj kaj Ukrajnanoj kaj la pola ŝtato celis likvidi ilian nacian kulturon aŭ almenaŭ ilian kulturon malfortigi.

En la kadroj de Komunista Partio Pola troviĝis sekcio nomita (K.P.Z.U.) "Komunista Partio de Okcidenta Ukrajno" kaj sekcio (K.P.Z.B.) "Komunista Partio de Okcidenta Blankrusio". La sloganoj kaj la postuloj de tiuj ambaŭ partioj estis : kompleta libereco por la popoloj de Okcidenta Ukrajno kaj Okcidenta Blankrusio, eĉ kun la rajtoj sendependigi sin de Polio. Se tiuj popolgrupoj sendependiĝus de la pola ŝtato, ili aniĝus al Sovetunio. En la regionoj ĉe la limo de la t.n. Soveta Ukrajno ekzistis tre fortaj ukrajnaj naciaj movadoj, kiuj batalis kaj kontraŭ Polio kaj kontraŭ Rusio por sendependa ukrajna ŝtato. Sur la teritorioj de la t.n. Okcidenta Blankrusio naciaj sendependaj movadoj ne ekzistis kaj la malkontentuloj troviĝis sub la influo de la komunista partio.

La bolŝevika propagando, enhavinta ĉiuspecajn allogojn pri Rusio, revigis kvar knabojn, kiuj kredis trovi en Rusio la landon de sia feliĉo. Dum ia somera nokto en la jaro 1938 ili trapasis la limon al Rusio. Ili estis kaptitaj de la rusoj tuj ĉe la limo kaj anstataŭ feliĉon ili spertis ion alian.

Tri el tiuj knaboj troviĝis en nia ĉelo, la kvara estis de ili forprenita kaj ili ne sciis kien oni sendis lin.

Du el tiuj knaboj forgesis paroli la polan lingvon, ili komprenis ĝin apenaŭ. Ili parolis pri ĉiutagaj aferoj, sed ili evitis rakonti pri sia pasinteco en Rusio.

Kun tiu, kiu parolis la polan lingvon mi unufoje havis intiman interbabiladon. Li estis tre inteligenta knabo kaj por sia aĝo intelekte pli ol normala.

Komence ankaŭ li ne volis ion rakonti al mi, sed post ioma babilado pri aferoj indiferentaj li akiris al mi la konfidon kaj rakontis kiamaniere ili estis esploritaj de la limgardistaj oficiroj.

Dum la esplorado ili estis ne nur terure batitaj, sed ankaŭ diversmaniere turmentitaj. Mi neniam volus kredi, ke tiaj turmentadoj povas esti praktikitaj ĉe junaj knaboj eĉ en Rusio. Sed alian fojon mi havis la okazon aŭdi la samon de aliaj knaboj.

Dum du tagnoktoj ili estis seninterrompe demanditaj. Ili estis pikitaj sub la ungoj. Ili estis sidigitaj por longaj horoj sur bastonoj. Oni postulis de ili konfeson, ke polaj oficiroj sendis ilin por spionadi la havaĵojn en la kolĥozoj, ekzemple : kiom da porkoj, ŝafoj, kokinoj kaj homoj posedas iu kolĥozo. Fine la knaboj ne kapablis fizike daŭrigi sian obstinan rezistadon kaj subskribis la konfesojn postulitajn de ili. La paperoj subskribitaj de ili estis senditaj al pli altaj NKVD-instancoj kaj ili mem travagadis kelkajn malliberejojn, antaŭ ol ili venis al la borisova. Al la malliberejo vivo ili komplete alkutimiĝis kaj absolute ne volis urĝi sian aferon por veni al la koncentrejo, esti liberigitaj ili ne atendis.

Inter la postvenintoj al la ĉelo troviĝis polo, nome Pavlovski. Ĝis la milito li loĝis en la t.n. ĉefurbo de Okcidenta Ukrajno Lvov. La ruĝa armeo lin liberigis de la kapitalista jugo. Post la liberigo li veturis libervole por laboro en Rusion. Oni sendis lin al la regiono Biegomel en Blankrusio kiel termezuriston. Al la sama regiono venis ankaŭ sep inĝenieroj por la sama laboro. Post kelkaj monatoj el tiuj ok termezuristoj restis unu ĉe la laboro. La ceteraj sep estis unu post la alia arestitaj kiel kontraŭrevoluciaj agitistoj. Arestita ne estis tiu, kiu fidele servis la sovetan ŝtaton per raportado pri ĉio, kion opinias liaj laborkamaradoj pri Sovetunio.

Kontraŭ Pavlovski atestis, krom lia estinta laborkamarado ankoraŭ unu ruso : Pavlovski propagandis per laŭdoj la estintan polan militmarŝalon Pilsudski kaj dum la milito inter Rusio kaj Polio en la jaro 1920 Pavlovski komandis kiel oficiro eskadronon el pli ol ducent soldatoj. La sensencaĵo en tiu akuzo estis, ke Pavlovski estis naskita en la jaro 1907 kaj dum tiu milito li estis 13-jara knabo. Li ja devus esti pli genia militisto ol Napoleono por esti en tia aĝo oficiro por ducent militrajdistoj.

Kiam Pavlovski estis ian fojon esplorita, li eksciis, ke por ĉiuj ok termezuristoj venis dankleteroj de la blankrusa ĉefurbo Minsko pro ilia bona laboro. La dankleteroj

devis resti en tablokesto de la regiona oficejo por termezurado, ĉar la ricevontoj troviĝis en la malliberejoj.

Ankaŭ vera krimulo

En Borisovo troviĝis granda mekanizita bakejo, produktanta 60 tunojn da pano ĉiutage. Por la rusaj cirkonstancoj, tia entrepreno por la zorgo de la popolaj vivbezonaĵoj, estas konsiderata granda. Kompreneble, ĝia ĉefo devis esti plenkonfida homo kaj partiano, almenaŭ akceptita de la partio. Tiun banfabrikon (tiel ĝi estis nomita) administris judo el Blankrusio, nome Plavnik. Li administris ĝin dum kelkaj jaroj. La financaj aferoj en tia fabriko do devas esti ĉiam kontrolataj. La kontrolintoj ĉiam trovis ĉion en la plej bona ordo. Ĉio estus certe en daŭra ordo, se Plavnik ne venus en konflikto kun unu librotenisto.

La konflikton kaŭzis, ke la librotenisto postulis pli grandan parton de la ŝtelaĵoj ol tion volis doni al li la ĉefo. Plavnik opiniis, ke, se li donos al la librotenisto pli ol ĝis tiam, estos necese pligrandigi la ŝteladon kaj tio estas riska afero, ĉio do povas fiaski. Kion opiniis la librotenisto mi ne scias.

La konflikto inter tiuj ambaŭ sin prizorgantaj socialistoj venis pli ofte. Fine Plavnik maldungis sian antaŭan "kunulon", la librotenisto.

La librotenisto postulis de Plavnik private grandan monsumon kaj minacis, se la postulata sumo ne estos al li pagita, informi pri la ŝtelado tie, kie estas necese. Plavnik ne kredis, ke la librotenisto fakte perfidos la aferon, en kiu li mem partoprenis. Tamen okazis tio, kion Plavnik ne atendis. Kelkaj homoj de la bakeja administrantaro estis arestitaj kaj Plavnik kiel ĉefo.

La financaj reviziistoj trovis por la jaro 1940 mankon de ĉ. sesdek mil rubloj. La manko estus certe pli granda, sed la nova librotenisto sukcesis iamaniere enskribi iajn fiktivajn elspezojn.

Plavnik timis ankaŭ, ke la reviziistoj komencos kontroli la financojn de la pasintaj jaroj, tiam la mankoj estos pli ampleksaj.

Al la edzino de Plavnik estis permesite viziti sian edzon. Supoze, tiujn vizitojn ebligis la ŝparita mono dum

lia administradtempo kaj ankaŭ lia amikeco kun la miliciaj ĉefoj, kiel ankaŭ liaj partiaj amikoj kun kiuj li ofte "trinkis" (komprenu "drinkis").

Niaj okupoj en la ĉelo

En la malliberejo ekzistis duspecaj okupoj, permesitaj kaj malpermesitaj. Al la permesitaj apartenis : legi librojn, ludi ŝakon kaj simile.

Librojn prizorgis gardisto, eĉ nomita bibliotekisto. Unufoje monate li alportis kelkajn librojn, forprenis de ni la tralegitajn kaj donis al ni la kunportitajn.

La plimulto de la libroj temis pri la "socialistaj venkoj" sur ĉiuj terenoj en Sovetunio. Troviĝis ankaŭ libroj de Ŝekspir, Dumas, Knut Hamsun kaj aliaj. La libroj estis en lingvoj rusa, blankrusa, germana, pola, jida kaj iuj aliaj. Mi ne scias per kio tion klarigi, sed mi preferis legi la librojn, kies enhavo estis la bolŝevika propagando.

Fervore mi tralegis dufoje dikegan libron de Stalin en la pola lingvo sub la titolo "Problemoj de leninismo". Tiu librego konsistas el aro da artikoloj, paroladoj kaj intervjuoj de ĝia fama aŭtoro. Mi supozas, ke nenie mi trovis tiom da bolŝevika hipokriteco, kiom mi trovis en tiu libro de Stalin.

Tre laŭdita estis oficiale ia tiam vivanta kvazaŭ fama verkisto Jakob Kolas. Kiel ĉefverkisto de la blankrusa beletro, liaj libroj devis esti legataj ankaŭ en la blankrusaj malliberejoj.

Kiam en la ĉelon venis Plavnik mi eksciis, ke tiu blankruso estas lia kuzo kaj "pursanga" judo. Mi ne pretendas esti eksperto pri beletra literaturo, sed ŝajnas al mi, ke la altvaloraj verkoj de Jakob Kolas povas esti modelo por la naivaj propagandaj "ŝmiraĵoj". Precipe restis en mia memoro verko sub la titolo "Marĉo". En ĝi estas rakontite pri la milito inter Rusio kaj Polio en la jaroj 1920-21. Pli naive priskribi militajn okazintaĵojn oni certe ne povas imagi.

Pro unu libro mi havis eksterordinaran surprizon. La bibliotekisto iam alportis pollingvan libron kun aro da priskriboj pri la unua de majo kaj mi ĝin prenis. Interalie estis en ĝi rakonto kiamaniere la politikaj malliberigitoj festis la unuan de majo en ia malliberejo itala

tiam sub la regado de Mussolini.

La kamaradoj en iu ĉelo cerbumis antaù la unua de majo, kiel festi tiun tagon. Post longa cerbumado ili trovis originalan artifikon. En la malliberejo troviĝis kato, kiu de tempo al tempo venis en la ĉelojn. Tiun katon kaptis la kamaradoj. Iel ili havigis al si ruĝkoloran farbon kaj sur la kata felo skribis grandlitere "Lenin".

La malliberejaj gardistoj dum tuta tago ĝis malfrua nokto pelis la katon por ĝin kapti. Sed la kato kuris al kaj el diversaj ĉeloj, ĉie la kamaradoj povis legi la nomon Lenin. Nur la gardistoj ne sukcesis ĝin kapti (verŝajne la kato estis nekaptebla, ĉar sur ĝia felo troviĝis la surskribo "Lenin"). Tiu verkisto certe vidis malliberejon nur ekstere kaj pri la interno nenian komprenon havis.

Tiun rakonton mi laùtlegis al Fitman kaj li konservis la libron ĉe si. Kelkajn tagojn post la libroŝanĝo venis al la ĉelo la bibliotekisto tenante tiun libron en la mano. Li turnis sin al mi demandante : "Ĉu vi legis tiun libron ?" "Jes." mi respondis, sed oni povis vidi, ke li estas tre malica. Proksimiĝis ankaù Pomikalski kaj diris: "Ankaù mi ĝin legis." Sed la bibliotekisto absolute ne atentis kion diris Pomikalski kaj ekkriis : "Ĉu vi scias kiel oni punas pro tia ago ? Pro tio oni mortpafas." Mi havis nenian komprenon,ke la kamaradoj faris per la libro ion ajn kaj mi demandis : "Kion mi faris ?". Vere mi ne kredis, ke mi estos mortpafita, sed mi nenion sciis pri mia kvazaùa krimago. Sed tuj proksimiĝis Fitman kaj diris : "Ho ! vi trovis en la libro la skribitajn kartetojn, tion mi faris, P. pri tiuj kartetoj eĉ ne sciis."

La bibliotekisto trankviliĝis kaj foriris. Fitman rakontis, ke en tiu libro li enmetis kartetojn de cigaredpapero kun skribaĵoj, ke kamarado Stalin absolute ne kulpas en la malordo kaj en la maljusteco, kiu okazas en la lando. Kamarado Stalin estas tre bona homo kaj tre saĝa. Li certe sukcesos forigi tiujn ruzulojn, kiuj profitas la ŝtatajn postenojn por sia persona prospero kaj neglektas la bezonojn de la popolo kaj simile. Verŝajne Fitman en tiuj kartetoj tiel skribis, sed mi ne imagis, ke pro laùdoj de Stalin en Rusio povas minaci mortpafpuno.

La malpermesitaj okupoj

Inter niaj ĉefaj okupoj estis kartludado. La ludkartojn faris mi. Ankaŭ tio estis malpermesita. La kartojn en la malliberejo oni faras jene : oni elŝiras paĝojn el libroj kaj oni tranĉas ilin je kvarangulaj formoj. Se oni volas, ke la kartoj estu pli dikaj oni kungluas la paperojn. Por havi gluaĵon oni akvumas iomete da pano kaj post kelkaj horoj tiun panon oni filtras tra peco de ŝtofo, tia gluaĵo estas por la papero sufiĉe forta. Kiam la kungluitaj paperetoj sekiĝis, ili estas ĉirkaŭtranĉitaj laŭ ŝablono. La signojn oni povas fari kelkmaniere. La plej simpla maniero estas per krajonskribaĵo. Kvankam estis malpermesite havi en la ĉelo krajonon, ni havis ĝin. Plejofte oni aplikas la krajonskribaĵon, kiam la kartoj estas necesaj tuj, aŭ "urĝe".

Se oni havas sufiĉe da tempo kaj kondiĉoj, oni bruligas pecon da gumo kaj super la fumo oni tenas iajn objektojn, sur kiuj la fumo haltiĝas. Tiu fumaĵo servas por nigra farbo, kiun oni metas sur la kartojn per ŝablono. Ni faris ankaŭ ruĝan farbon el polvigita peceto da briko.

Ni kvazaŭ kulturaj homoj, eĉ en la malliberejo, ne forŝiris la presitajn paĝojn en la libroj. Ni forŝiris la paĝojn kun la titoloj kaj ankaŭ la lastajn paĝojn nepresitajn. Se troviĝis meze en la libro nepresitaj pecoj, ankaŭ ili estis por nia bezono.

Kudrado de saketoj

En la ĉelo troviĝis kelkaj matracoj pli ol estis litoj kaj homoj. En iuj litoj kuŝis po du matracoj. Tiuj matracoj estis iam uzitaj, kiam en la ĉelo estis pli da homoj ol estis litoj kaj kelkaj homoj dormis sur la planko. Tiuj kelkaj matracoj ne donis trankvilon al Karpienko kaj Fitman, kvankam ili havis la plej grandajn sakojn kun diversspecaj havaĵoj.

En kelkaj matracoj la pajlo estis pecigita kaj estis en ili multe da polvo. Karpienko komencis klarigi, ke la matracoj, en kiuj estas multe da polvo, devas esti forigitaj pro higienaj motivoj. La samon opiniis Fitman kaj baldaŭ ankaŭ la ceteraj.

Mi ne komprenis al kio ili celas. Polvo ja estas en ĉiuj matracoj. Ĉu ili intencas forigi ĝenerale la matracojn ?

Baldaù estis por mi klaraj iliaj intencoj. La pecigitan pajlon ili transmetis en aliajn matracojn, la polvon ili ŝutis en la "paraŝon". La malplenigitan matracon Karpienko kaj Fitman disŝiris kaj dividis inter si. Poste ĉiu el ili pecigis sian duonon de matraco je pli malgrandaj pecoj kaj kudris saketojn de diversaj grandecoj.

Laù la regularo mallibereja, estis malpermesite havi en la ĉelo kudrilojn kaj fadenojn, sed ni havis eĉ kelkajn kudrilojn.

La ekzemplon de Karpienko kaj Fitman baldaù sekvis la aliaj, ankaù mi. Ni malplenigis ĉiujn kromajn matracojn kaj kudradis saketojn. Ankaù la fadenojn ni faris. De maldika ŝtofo ni prenis kelkajn fadenojn, ilin kuntordis, ke ili estu fortaj. Post iom da tempo mi havis aron da saketoj, unu estis granda, la ĉefa sako, tiel ni nomis ĝin. En ĝi mi havis saketojn por ĉiuspecaj objektoj aparte. Ekzemple, en unu saketo mi havis kelkajn paketojn da "maĥorko". En unu saketon mi metis la paketon da "maĥorko" el kiu mi fumis. La samo okazis kun la paperetoj, kiuj plejofte konsistis el distranĉitaj gazetoj, sed aĉetitaj en la mallibereja butiko. Al arestitoj estis malpermesite doni iujn ajn gazetojn, sed la administracio ne ĉiam povis havigi por ni aliajn paperetojn. En unu sako mi havis la alumetojn. Unu sakon mi havis por enmeti la panon aĉetitan en la butiko. Unu saketon mi pendigis sur la lito por enmeti la porcion da pano ĉiutage ricevitan. Apud ĝi pendis malgranda saketo por enmeti la dudekgraman porcion da sukero ricevitan ĉiutage. Ambaù tiuj saketoj pendantaj sur la lito funkciis dum kelkaj minutoj matene kaj dum tuta tagnokto ili atendis plenumi sian utilon.

Kiam ni ĉiuj havis multajn kaj diversgrandajn saketojn, ni komencis ilin brodadi. Ankaù tiu ideo venis de Fitman. Dum iom da tempo li estis en ia malliberejo kune kun fama artpentristo. Tiu artpentristo faris por Fitman desegnaĵon sur peco da ŝtofo. Tiu desegnaĵo devus poste esti brodita per diverskoloraj fadenoj.

La desegnaĵo prezentis : meze gevirajn kapojn, kiuj simbolis lin kaj lian edzinon. En ĉiuj kvar anguloj troviĝis la komencliteroj de la nomoj de iliaj infanoj. Fitman pri tiu desegnaĵo fieris pro la fama artpentristo, kies verkon li kvazaù posedis. Li havis ĝin de kelkaj

jaroj kaj ĉiam revis havigi al si la ĝustajn silkajn fadenojn por fari la brodadon kaj kunporti hejmen donacon al sia familio, post kiam li estos liberigita.

Dum sia kelkjara restado en la malliberejoj, Fitman ne sukcesis havigi al si tiajn fadenojn. Kiam Fitman unufoje montris la desegnaĵon kaj kiam li rakontis pri la klopodoj kaj malsukcesoj por akiri tiujn fadenojn, venis al iu la ideo havigi la necesajn fadenojn por tio el la koloraj pecetoj da ŝtofoj, kiujn oni povas trovi facile.

Baldaŭ komenciĝis serĉado kaj kolektado de ĉiukoloraj ĉifonpecoj. Ni akceptis ĉiun ĉifoneton, kia ajn dika, granda, kolora ĝi estas. Iuj pecetoj ne estis pli longaj ol dekkvin centimetroj kaj ankaŭ tiaj taŭgis. La ĉifonetojn ni disigis je unuopaj fadenoj, poste kunigis kelkajn fadenojn kune kaj "brodadis" ĉefe monogramojn, sed ankaŭ aliajn aĵojn laŭ antaŭe faritaj desegnoj. La desegnisto por tiu "arta" laboro estis mi, pli bonan ni en la ĉelo ne havis. Mi estis ankaŭ la konsultanto dum la kudrado por decidi la taŭgajn kolorojn por ĉiu parto. Pro tiu kaŭzo mi akiris la kvazaŭ honoran nomon "artkonsultanto".

Pli ol ĉiuj havis ideojn Bielov, sed en niaj cirkonstancoj ne realigeblajn pro la manko de la ĝustaj fadenoj. Unu ideon li taksis "tre originala". Tiu "originala ideo" formiĝis ĉe li, kiam la bibliotekisto alportis al la ĉelo dikan libron de Miĉurin, pri liaj teorioj kun multe da bildoj de fruktoj kaj plantoj. Bielov montris al mi du bildojn de pomoj, la plej belajn kaj la plej grandajn en la libro. Li elektis ankaŭ tri grandajn foliojn kaj branĉeton de vinberoj. Ĉiuj tiuj fruktoj kunmetitaj, laŭ lia projekto, simbolis kvazaŭ virinon, kaj en certa loko li proponis enmeti la literojn "JU-JU"; tiuj literoj ju-ju estis la karesnomo de lia estinta amatino. Bielov estis de tiu projekto entuziasmigita, li opiniis, ke ĝi estas tre originala, precipe por li, kaj bedaŭris, ke li ne povas realigi tiun objekton.

Kiam elĉerpiĝis ĉiuj koloraj ĉifonpecetoj, kiujn ni kolektis, ni komencis alian okupon. Tiun fojon la ideo venis de Sergejenko. Ni havis en la ĉelo kelkajn kovrilojn pli ol estis homoj. Nur la plej malnovaj arestitoj, al ili apartenis ankaŭ Sergejenko, sukcesis havigi al si

po du kovrilojn. Tiun kroman kovrilon li disigis en fadenojn, ruliginte el la fadenoj globon. Li faris lignajn trikilojn kaj komencis triki gantojn, li faris tion tiel lerte kaj eĉ rapide, ke post unu semajno li havis pretan paron da gantoj.

Poste li komencis triki ŝtrumpojn kaj ankaŭ la ŝtrumpojn li faris tre bone kaj sufiĉe rapide. Kelkaj aliaj prenis ekzemplon de Sergejenko kaj komencis fari la samon. Ne daŭris longe kaj post la matenmanĝo la ĉelo aspektis kiel trikejo. Post iom da tempo ĉiu el ni havis dikfadenajn gantojn, ŝtrumpojn, kiujn oni ne povus aĉeti per mono eĉ ekster la malliberejo. Tiel li likvidis kelkajn kovrilojn. Strange estis, ke de tempo al tempo venis iu oficiro de la gardistaro kaj kontrolis la nombron de matracoj kaj kovriloj, li ĉiam ĉion notis, sed neniam li ion diris aŭ demandis pri la mankantaj kovriloj aŭ matracoj.

Kiam ni havis broditajn saketojn, gantojn kaj ŝtrumpojn, ni demandis, kion fari nun ? Nenion novan ni povis elpensi. Ni rekomencis la librolegadon, la kartludadon, kiu estis por iom da tempo preskaŭ interrompita.

Unu escepto estis Sergejenko. Li elpensis okupon por si, kiu estis poste por ĉies utilo. Unu el niaj revoj estis akiri razklingon. Laŭ la regularo niaj barboj kaj kapaj haroj devis esti tonditaj ĉiun duan semajnon. Fakte ni estis tonditaj ĉiun duan monaton kaj niaj vizaĝoj estis ĉiam barbvepraj. Ni cerbumis ofte, kiamaniere ni povus havigi razklingon, sed vane. Fine Sergejenko decidis, ke li mem faros razilon. En la ĉelo ni havis kelkajn emajlitajn potetojn. De unu poteto Sergejenko forprenis la tenilon kaj komencis per ĝi fari razilon. Kompreneble, tia laboro estis malpermesita. La iloj, kiujn li povis uzi estis ŝtono kaj najlo, ankaŭ kiel neleĝaj objektoj en la ĉelo. Unue li devis rektigi la tenilon por havi simplan pecon de metalo. Li devis tion fari, ke ne estu aŭdata ia frapado en la koridoro. Kiam li fine tion sukcesis, li komencis akrigi unu flankon de la feraĵo, unue sur ŝtono kaj poste sur peco de briko.

Pacience Sergejenko laboris dum kelkaj tagoj ekde la mateno ĝis la enlitiĝo.

Kiam la "razilo" estis finita, oni rimarkis, ke tiu metalo ne estas sufiĉe malmola por razilo. Dum la razado de unu homo estis necese ĝin kelkfoje akrigi, kvan-

kam la vizaĝo de la razito estis ĉiam neeviteble iom vundita.

Al Sergejenko venis la ideo, ke la "razilon" oni povas hardi, ĝin varmigante ĝis ruĝeco kaj poste subakvigante. Tia intenco ŝajnis al ni ne realigebla. Kiel ni bruligos fajron en la ĉelo, se ni ĉiam estas observataj de la gardisto en la koridoro ? Sed Sergejenko restis obstina, ke li hardos la razilon per fajro en la ĉelo.

Li pecigis iom da lignaĵo forprenita de la tabuloj sur la litoj, metis ĝin en plado kaj bruligis fajron. Kompreneble li faris tion en angulo, kien ne povas atingi la rigardo de la gardisto sur la koridoro. Sed en la ĉelo fariĝis multe da fumo, la kestoj ekstere de la fenestroj haltigis eliron de la fumo. Se ni estus kaptitaj dum tiu operacio, ni ĉiuj certe ricevus severan punon, ni eĉ povus esti akuzitaj pri la intenco bruligi la malliberejon. Feliĉe ĉio okazis bone, Sergejenko kvazaŭ hardis la "razilon" kaj fieris, ke nun ni havos bonan, unuaklasan razilon. Sed vane, la razilo kiel antaŭe malakriĝis post la forpreno de unu aŭ du harstrioj kaj oni devis ĝin dum la razado ĉiam kaj ĉiam akrigi.

Sergejenko ne volis akcepti la fiaskon pri hardo de la razilo. Li provis ĝin hardi ankoraŭ du fojojn kaj la rezulto estis la sama - la razilo ne hardiĝis. Tamen ni havis la eblon esti razitaj, kvankam ni dum la razado devis suferi iom da tranĉvundaj doloroj.

Niaj razitaj vizaĝoj ne restis sen atento de la gardistoj, precipe de iuj oficiroj.

La gardistaro konsistis el simplaj gardistoj en la koridoroj sur ĉiu etaĝo kaj unu deĵoranta oficiro por la tuta malliberejo. Tiu deĵoranta oficiro estis nomita "respondeca deĵoranto". La koridoristoj deĵoris po ok aŭ dek horoj, sed la respondecaj tutan tagnokton.

Unu el tiuj respondeculoj estis silenta. Enirinte en la ĉelon, li diris nur "bonan vesperon", nin nombris kaj elirinte li diris "trankvilan nokton". Unu el la respondeculoj estis tre babilema, nome Dimkin. Iuj opiniis, ke li estas judo. Kiam li venis vespere nin nombri, li ĉiam demandis, ĉu iu havas ian deziron kaj se iu tion havis, li ĉiam klopodis plenumi tion, kio estis petita de li. Multfoje li venis eĉ dumtage nur por iom babili. Li kondutis

kvazaù nia "patra zorganto".

Unu el tiuj respondeculoj estis de ni nomita "Kokina postaĵo". Li estis malaltstatura hometo, ĉiam tre singardema, atentema, suspektema al ĉio, montranta ĉiam sian superecon. Tiun "Kokinan postaĵon" ni taksis iom stulta, kvankam li tia ne estis. Liajn atentigojn ni neglektis kaj kiam li venis al la ĉelo, ni demandis lin pri multaj diversaj malgravaj aferoj, nur por ĝeni lin per demandoj kaj petoj kaj deziroj, kiujn li ne povis plenumi, eĉ se li havus la plej bonajn intencojn. Precipe Fitman embarasis lin.

Plejofte ni okazigis la razadon dum unu tago kaj poste la razilo estis kaŝita ĝis la venonta semajno. Unu fojon la "Kokina postaĵo", komencante la deĵoradon, rimarkis, ke ni estas ĉiuj razitaj. "Ĉu vi razis vin ?", li demandis. Sergejenko kontenta de sia sukceso respondis : "Ho jes, vi do vidas tion, civitano respondeculo".

- Sed kiamaniere vi razis vin ?
- Per vitro, respondis Sergejenko.
- Ĉu estas eble sin razi per vitro ?
- Nu, certe, vi ja vidas.
- Kie vi prenis tiun vitron ?
- Ni ĝin trovis sur la korto dum la promenado.
- Kaj kie vi havas tiun vitron ? Montru ĝin al mi.
- Ho, civitano respondeculo, la vitron ni forĵetis tuj post la razado.
- Kien vi forĵetis la vitron ?
- En la necesejon. (La necesejo estis aranĝita tute primitive).
- Ĉu vi scias, ke estas malpermesate fari en la malliberejo ?
- Nu, jes, sed forigi la barbojn estas tre dezirinde laù la higiena kaj kultura vidpunktoj. Por vi, civitano respondeculo, estas certe pli agrable vidi nin kulture aspektantaj.
- Vi tion ne faru plu, se vi ripetos, vi estos punataj.

Li elparolis "Vi estos punataj", kiel sinjoro de siaj malsuperaj estaĵoj kaj en kies povo troviĝas nia sorto.

Fitman decidis la "Kokinan postaĵon" plistultigi per interparolo, ke li ne sentu sin tiel rigide al ni. En la ĉelon venis de tempo al tempo kuracisto, lin akompanis flegistino. Tiu flegistino estis la edzino de "Kokina

postaĵo", sed por ni tio devis esti sekreto.

Kiam la "Kokina postaĵo" foje venis al la ĉelo, Fitman turnis sin al li per serioza voĉo kaj serioza mieno : "Pardonu, civitano respondeculo, mi volas paroli kun vi pri afero por ni tre grava, ĉu vi volas min aŭdi ?" "Nu, bonvolu !", tre atenteme preparis sin la respondeculo aŭskulti, kredante, ke fakte estas io grava por li. "Vi ja komprenas, ke ni, estante en la malliberejo de multaj jaroj, estas tre sentemaj koncerne virinojn. De tempo al tempo ni aŭdas de la koridoro, malantaŭ nia pordo, ke tiu flegistino okazigas kun la deĵorantoj... nu, kiel tion diri... kisadojn...nu, ni komprenas, ke nenion eksterordinaran ili ĉi tie okazigos; cetere, ne estas nia afero, kion iu faras koncerne tion. Sed por ni en niaj cirkonstancoj tiaj aferoj estas ekscitaj. Mi petas vin, se eble, diru al tiu flegistino, ke ŝi tion ne faru malantaŭ nia pordo." La "Kokina postaĵo" nenion dirinte forlasis tuj la ĉelon kaj al ni tre malofte revenis.

Al la ĉelo venis de tempo al tempo oficiro, kies titolo estis "Plenrajtigito". Al liaj taskoj apartenas prizorgi aferojn tre gravajn kaj precipe tiujn, kiuj koncernas rilatojn kun la ekstero de la malliberejo, ekzemple pri aferoj kun juĝejoj aŭ kun parencoj kaj simile. Povas esti, ke tiuj "plenrajtigitoj" estas en ia senco superaj kontrolantoj kaj decidas pri multaj aferoj.

Tiuj "plenrajtigitoj" venis al la ĉelo nur por vizito kaj ili demandis, ĉu iu havas iajn dezirojn. Volonte ili restis pli longe por interbabili, se ili havis volontulojn por babili. La "plenrajtigitoj" tro ofte ŝanĝiĝis : dum mia unujara estado en la malliberejo estis kvar aliaj "plenrajtigitoj". La lasta dum mia restado estis junulo, verŝajne nia malliberejo estis por la unua posteno post la lernejo.

Kiam li venis la unuan fojon al la ĉelo, li aspektis naivulo, sed ne daŭris longe kaj li komencis montri al ni sian superecon. Veninte foje al la ĉelo, li ĉien rigardis kaj demandis : "Pri kio vi okupiĝas ?" Ĉiam la respondantoj por ĝeneralaj aferoj estis aŭ Fitman aŭ Sergejenko. "Ho, ni legadas librojn, ni ludas ŝakon, kion ni do povas fari plu !" "Nu,jes !", li diris suspekteme kaj foriris.

Ni komprenis, ke tiu naive aspektanta junulo nin observadas por kapti nin ĉe ia malpermesita okupo. Ni estis singardemaj, sed unu fojon tiu naivulo sukcesis nin kapti ĉe kartludado.

Ludis tiam la plej egaj trompuloj : Fitman, Sergejenko, Plavnik kaj Pomikalski. Kiam ili estis tre fervore okupataj per ludado, aŭdiĝis mallaŭtaj sonoj en la seruro. La pordo rapide malfermiĝis kaj enpaŝis la "plenrajtigito". Li rapide proksimiĝis al la angulo, kie sidis la ludantoj kaj vokis : "Ludkartoj ! ludkartoj ! ludkartoj !" Sed dum tiu mallonga momento la ludantoj kaŝis la kartojn. Por tiaj aferoj ili ĉiam estis preparitaj kaj havis sperton.

La ludintoj stariĝis kaj Sergejenko diris : "Kion vi diras, civitano plenrajtigito ? Kartojn ! Kiajn kartojn? Mi ja vin absolute ne komprenas !"

La plenrajtigito certe kutimis aŭdi mensogojn de aliaj arestitoj, sed eble li tion ne atendis en nia ĉelo. Ni ja estis kvazaŭ "scienculoj" kaj okupiĝis pri "sciencaj laboroj". Li tuj per oficiala kaj laŭta voĉo respondis : "Vi volas min trompi ? Mi ja antaŭ minuto vidis tra la enrigardtrueto, ke vi ludis kartojn."

"Ho, tio ne povas esti, tio al vi nur ŝajnis", respondis Sergejenko. La ceteraj homoj komencis ridi. La plenrajtigito pli rigidiĝis kaj diris : "Mi postulas la kartojn nepre kaj tuj". Li demandis ĉiun ludinton aparte : "Diru la veron, ĉu vi ludis kartojn, aŭ ne ?". Ĉiuj movis siajn brakojn, kvazaŭ ili fakte nenion scias.

La plenrajtigito demandis en la ĉelo ĉiun aparte : "Diru la veron, ĉu ili ludis kartojn aŭ ne ?". Ĉiu demandito respondis nur : "Kiu ludis kartojn ?". Sed ĉiu samtempe ankaŭ ridis kaj tiu ridado lin stultigis.

La plenrajtigito iĝis malica kaj deklaris : "Mi ne foriros de ĉi tie, ĝis mi havos la kartojn en mia mano, kaj estu certaj, se mi volos, mi la kartojn trovos."

Ni komprenis, ke la afero serioziĝis. Li povus ordoni revizion kaj trovi objektojn pli malpermesitajn ol la kartoj. La malfacilaĵo por ni estis, ke la kartoj estis enpuŝitaj en truon kaj ni ne volis, ke la nedezirata persono vidu, kie troviĝas unu el niaj kaŝlokoj.

Fine, de neniu rimarkita, iu prenis la kartojn el la truo kaj ilin enmanigis al Sergejenko, kiu aranĝis la aferon, dirante : "Civitano plenrajtigito, ĉi tie vi havas

la kartojn !"

Ricevinte la kartojn, la plenrajtigito faris "predikparoladon". Ni kun li "konsentis" kaj promesis konduti pli bone. Ni tamen rimarkis, ke ni estas severe observataj de la soldatoj en la koridoro kaj ĉesigis la kartludadon.

Ankaŭ la postaĵo devas vidi la kradojn

La necesejo estis tute primitiva. Ĝi konsistis nur el kelkaj truoj elsegitaj en kunigitaj tabuloj. Malsupre en la tero troviĝis elfosita granda kavo, kien venis ekskrementoj. Post kelkaj tagoj ĉion el la kavo oni devis elĉerpi ankaŭ per primitiva maniero. Dum la ĉerptagoj la fetoro ĉirkaŭe estis terura, precipe dum somero.

Sed tiu primitiva necesejo servis por ni ankaŭ por komunikado kun homoj sur la aliaj etaĝoj. Veninte en la necesejon, ni povis ricevi informojn de aliaj homoj pri la politikaj okazintaĵoj, aŭ informi aliajn pri aferoj, kiujn ni sciis.

Sen gazetoj ni povis ricevi informojn de homoj venintaj de la "libero" kaj ĉiam alvenis iu nova arestito al iu ĉelo. Kompreneble, ankaŭ tiamaniere komunikado estis malpermesita. Se la soldato en la koridoro ekaŭdis, ke ni interparolas, li tuj venis kaj tion interrompis, sed komplete malebligi tiun reciprokan informadon la administrantaro ne kapablis, - tion ni almenaŭ kredis. La administrantaro tamen trovis rimedon por malebligi tiujn interparolojn.

Sur la truoj en la necesejo oni metis kradojn. La kradoj surdigis la voĉojn, do ni fakte nenion povis aŭdi, kio estis al ni dirita de supre, aŭ de malsupre. Tiun komunikadon ni devis ĉesigi kaj trovi aliajn manierojn por kontaktoj kun la aliaj homoj. Pri la surmetitaj kradoj ni diris : "Ne nur la okuloj, sed ankaŭ la postaĵoj devas vidi la kradojn."

* * *

4_ la longdistanca veturado

La 14an de marto 1941, ĉirkaŭ la deka horo matene envenis en la ĉelon la mallibereja ĉefo, akompanita de "Kokina postaĵo". Ĉirkaŭrigardinte ĉiujn en la ĉelo, li direktis al mi demandon : "Kiu estas via nomo ?" Post mia respondo li direktis la saman demandon al Pomikalski. Aŭdinte lian respondon, la ĉefo diris : "Prenu viajn aĵojn". La afero por ni estis klara, venis la verdiktoj.

Ni adiaŭis la restantajn kamaradojn. Stranga adiaŭo, nek ili nek ni havis ion por reciproke deziri. Dum tia adiaŭo estas ja sensence deziri ian revidon, kie ni tian revidon deziru ? La nura deziro povus esti farti bone, kaj la saman deziron aŭdi, sed kio povas esti tiu "bone"?

De la ĉelo ni estis gviditaj al la mallibereja kontoro. Tie ni renkontis ankoraŭ kvin polojn. Al ĉiu oni demandis pri lia nomo. Post la diro de la nomo oficiro laŭtlegis al ĉiu aparte : "Dum la kunsido de la (Osoboje Sovejeŝĉanie) "Speciala Juĝistaro" en Moskvo, okazinta la... (sekvis la dato) estis aljuĝita la punverdikto..." La samo okazis al mi : Estis konstatite, ke post mia alveno en Sovetunion mi faris kontraŭrevolucian kaj kontraŭsovetan propagandon kaj mi intencis fuĝi eksterlanden. Pro tiuj agoj mi estis kondamnita al kvinjara laboro en ia "eduktendaro" en la regiono de Arĥangelsko.

Po ok jarojn ricevis tri homoj : Pomikalski, unu arbargardisto proksime de Bjalistoko kaj unu kamparano, kiu en la jaro 1929 rifuĝis el Rusio al Polio. Po tri jarojn ricevis pola soldato, kiu post la bataloj estis en Vilno, irinte hejmen al Grodno li estis arestita, kaj unu juna knabo pro simila krimo. Poste mi eksciis, ke tiu "Osoboje Sovejeŝĉanie" rajtas puni ĝis okjare. Krimoj, pro kiuj minacas puno pli alta ol ok jaroj, devas esti pritrakt-

ataj de normala juĝistaro. Mi tamen renkontis homon, kiu ricevis de tiu NKVD-juĝistaro punon de dek jaroj.

Ni devis subskribi, ke la verdiktoj estis sciigitaj al ni laŭ fiksitaj paragrafoj. Mi demandis, ĉu ekzistas por mi iuj ebloj apelacii al iu supera juĝinstanco, se mi ne konsentas la verdikton. "Ho jes ! Kompreneble, vi povos skribi de la koncentrejo, en kiu vi estos al... por klarigi viajn plendojn kaj via afero estos ree esplorata. Nu, jes... oni ja ĉiam povas skribi en Sovetunio."

Post la subskribo de la verdiktoj sciigitaj al ni, oni gvidis nin al ĉelo en la kela etaĝo. Tie ni renkontis ankoraŭ kelkajn kondamnitojn, inter ili estis turkmeno. Li estis en ruĝarmeana uniformo, sed simpla soldato. Li parolis pri sia Turkmenio emocie, kie estas somero preskaŭ dum la tuta jaro kaj kreskas multe da vinberoj kaj aliaj fruktoj kaj la homoj atingas la centjaran aĝon.

En tiu malgranda ĉambro troviĝis nur la sola malliberejа "meblo-paraŝo". Ni havis sur la planko apenaŭ kuŝlokojn.

La arestitoj, kiuj estis punitaj, havis "privilegion", ili ricevis ĉiutage po cent gramojn da pano pli ol la nepunitaj arestitoj. En ia senco ni sentis inter ni en tiu malvasta ĉambreto ian pli proksiman komunecon, almenaŭ mi havis tian impreson. Estis inter ni ia sento, ke post kelkaj tagoj atendos nin io ekster nia ĝisnuna kono, - ekster nia ĝisnuna sperto, eble ne io terura, en ia senco io mistera, io neimagebla, io, kio apartenas komplete al alia mondo - nekonata.

La 17an de marto, tri tagojn post la sciigo al ni de la verdiktoj, oni gvidis nin al la banejo. Tio signifis, ke oni preparas nin al la forveturigo. Dum la banado venis la kuracisto, li demandis kiel ni fartas. Al lia demando ni respondis : "Kiel ja ni povas farti, se ni ricevis tiajn verdiktojn ? Kaj ni demandas vin, kiajn krimojn ni faris, ke ni devos esti en la tendaroj po ok kaj po kvin jaroj ? Vi ĉiam reklamas pro la alta demokratio en via lando, ĉu puni po ok jaroj per deviglaboro homojn, kiuj ne vidis eĉ la juĝistaron apartenas ankaŭ al la demokrataj principoj ?".

"Ĉu ĉe vi en Polio ne ekzistis koncentrejo en Berezo ?" demandis la kuracisto.
"Jes, ĝi ekzistis, sed neniu en la mondo nomis Polion demokrata lando, kaj neniu estis sendita tien por ok jaroj kaj kiel estis kritikita la koncentrejo de Berezo en la polaj gazetoj ?"

La kuracisto supozeble venis por aŭdi dankesprimojn de ni pro lia zorgado kiam ni estis en la malliberejo. Tia estis la kutimo, kiam arestitoj forlasas ian lokon, ili dankas al siaj gardintoj, tio ne estas devigo, sed kutimo. Eble kiel kuracisto li povas meriti dankojn, sed ni taksis lian manieron milde esprimite neĝentila, eble erare.

Posttagmeze ni estis gviditaj al ĉambro en la malliberejа kontoro. Tie ni renkontis la milicianojn nin atendantajn.

Arestitoj estis pli ol deko, same multaj estis milicianoj, kaj ni estis gviditaj eksteren sur la korton, kie la milicianoj staris ĉirkaŭ ni, forminte rondon.

"Vasta estas patrolando mia !
multaj en ĝi arbaroj, kampoj kaj riveroj.
Mi similan al ĝi landon ja ne konas,
Kie la homo tiel libere spiras."

(El populara komunista kanto en Rusio, disaŭdigita per la radio foje ĉiutage en la tuta lando).

Unu el la milicianoj staris aparte de siaj kolegoj, supozeble por prezenti sin la plej grava persono en tiu societo.
" Atentu ! Unu paŝo dekstren aŭ unu paŝo maldekstren estas taksata fuĝo. Okaze de tia fuĝo la gardistaro uzas fusilojn sen averto ! Tion vi aŭdas de mi nun, tion vi aŭdos ĉiam antaŭ via ekiro dum la tuta daŭro de via puntempo, ĉu vi estos en la Malproksima Oriento, aŭ ĉu vi estos en la Proksima Oriento. Tiun regulon vi devas memori, same kiel vi memoras vian nomon, kvankam tio estos al vi ĉiam memorigata. Ĉu vi komprenis ?", demandis la parolinta miliciano per oficiala voĉo. "Kaj nun antaŭen marŝu."

Kun tiu ceremonio mi adiaŭis la malliberejon, kiun mi ofte rememoris kiel la lokon, kie mi pasigis agrablan tempon en Sovetunio.

La frosto estis sufiĉe forta, almenaŭ por miaj piedoj en someraj ŝuoj kaj por mia malgrasa korpo, dekutimiĝinta de malvarma aero post preskaŭ tutjara estado tage kaj nokte en la varmigita ĉelo, sed nia grupo estis malmultnombra kaj ni povis paŝadi rapide.

Feliĉe, estis en la "stolipinko" sufiĉe da loko por sidi kaj dormi sidante. Ju pli la trajno proksimiĝis al Moskvo, des pli da arestitoj alvenis sur ĉiu stacio. Fine ni estis kunpuŝitaj, starantaj kaj sidantaj, ni estis ĝusta simbolo de la vojaĝantaro, gvidita ien tra la "socialista ĉefurbo" por konstrui la marksisman, leninisman, stalinisman socialismon en la vasta socialista patrio. De la sovetaj homoj, kiuj konis sian ĉefurbon, mi aŭdis, ke ni alveturas al la Blankrusa Stacidomo.

Kiom da milionoj da proletoj en la tuta mondo sopiras al tiu ĉefurbo ! Kiom da proletoj oferus ĉion por veni en tiun urbon ! Por kiom da proletoj tiu urbo estas la plej alta espero de kiu ili atendas sian inspiron al liberigo! Kaj jen mi, proleto de mia junaĝo kaj de mia pradeveno, proksimiĝas al tiu urbo enpremite en la mallarĝa kupeo kune kun aliaj mizeruloj en "vagono zak".

Mi proksimiĝas al tiu revolucia ĉefurbo, de kie venis por mi la kvinjara punverdikto, ĉar mi kuraĝis malakcepti mian sklavecon.

Mi proksimiĝas al tiu, la plej libera ĉefurbo, rigardante ĝin tra la malgranda netravidebla vitreto, jen la mateno de la 18a de marto 1941.

Post multaj veturigoj de nia vagono antaŭen kaj malantaŭen, ni estis vokitaj eliri el la vagono. Ĉirkaŭe sur la kampoj kuŝis multe da neĝo. Mi sentis malvarmon kaj kapdoloron.

La loko, kie la vagono staris, estis fora de iu stacia konstruaĵo, kvankam la relvojoj en tiu loko estis multaj. En la malproksimo estis videbla palisaro.

La elirintaj arestitoj estis gviditaj kelkdekmetrojn for de la vagono en kelkpersonaj grupoj. Post la ordono, ke ni haltu, sekvis ordono : "Sidiĝu! kvarope en vico!" Sed tiu "sidiĝu!" ne signifis sidiĝi per la postaĵo, sed genuiĝi. Ĉirkaŭ ni svarmis soldatoj kun bajonetoj sur la karabenoj kaj kelkaj hundoj en tiu societo.

Mi vidis ĝis tiam multajn genuantajn homojn. Katolikoj

genufleksas dum siaj preĝoj, mi vidis en teatroj kaj sur filmoj genuadscenojn, sed ĝis mi persone estis devigita genui, mi ne komprenis la psikologian taskon kaj la funkcion, kiun plenumas genuado. Ĝis tiam mi multajn fojojn estis devigita al obeo, kiam estis de mi forprenitaj miaj elementaj homaj dignoj, sed en la staranta pozo mi sentis, ke mi rezistadas, ke mi konservas mian personecon kontraŭ fizike pli fortan.

Kiam mi la unuan fojon estis devigita genui laŭ la ordono de NKVD-soldatoj, mi sentis, ke forestas de mi la lasta ero de mia persona volo, mi sentis, ke mi en ia senco ĉesas ekzisti psike aŭ mense, mi tiam travivis, ke mi en tiu genuanta momento aliformiĝas de homo al iu objekto, kiu povas komplete esti direktita kaj subordigita al ĉiu ajn ago, io en la senco, ke mi estas pupo, movata per la ordonoj, io, kio nun estas nomata roboto.

Moskvo ! tiu ĉefurbo, de kiu oni organizas en ĉiuj landoj kaj mondpartoj batalojn de la laboristaro por akiri siajn homajn dignojn ! Kaj ĉi tie, en tiu ĉefurbo, mi kune kun kelkcent laboristoj devas laŭ la ordono de la laboristara liberiganta soldataro genui, kaj laŭ mia propra volo mi ne rajtas eĉ stariĝi. "Mi similan al ĝi landon ne konas, kie la homo tiel libere spiras".

De tiu placo ni estis gviditaj en grupoj al pordo en la palisaro kaj enŝtopitaj en malgrandan aŭtobuson sen fenestroj. Interne mi aŭdis de miaj samsortanoj, ke ni estas en la "Ĉorni Voron" (Nigra Korvo).

La nomo de Stolipin konserviĝis kaj daŭras sub la regado de la leninistoj. Laŭ kies ideo estis kreita "Ĉorni Voron", ne estas konate al tiuj, por kiuj tiu aranĝo estis kreita.

Mi estis en "Ĉorni Voron" veturigita kelkajn fojojn tra Moskvo kaj poste kelkajn fojojn tra Vologdo, mi do povas ĝin priskribi.

Ekstere tiu malgranda aŭtobuso aspektas taŭga por transporto de varoj. Interne ĝi estas dividita en kvar partoj. Ĝia malantaŭo - la enirejo - havas mallarĝan koridoron. En tiu koridoro, tri pordetoj al tri mallarĝaj kaĝoj, laŭ la longeco de la aŭtobuso. En la internaj kaĝoj estas komplete mallume. En la kaĝoj de la eksteraj vandoj estas lokitaj benkoj. La funkcio de tiuj benkoj

estas verŝajne malvastigi en la kaĝo la spacon.

La divido de la "Ĉorni Voron" en kaĝoj celas malebligi, ke la tieuloj libere movu siajn krurojn kaj manojn. Supozeble en la "Ĉorni Voron" estas aranĝita aerumado, alie mankus en ĝi aero por spiri.

La traveturigo en "Ĉorni Voron" okazas rapide kaj urĝe, la soldatoj konstante vokas : "Rapide! Rapide! ". Tio estas la maniero transporti la socialistajn malamikojn, kiuj estas samtempe ankaŭ socialistaj konstruantoj en la socialista patrio - la unua en la mondo.

De la Blankrusa Stacidomo mi estis veturigita al alia fervoja disvojiĝo. Tie staris longaj vicoj da vagonoj, nur Stolipinkoj. La impreso estis, ke mi vidas moveblajn malliberejojn.

Oni gvidis min al unu vagono. El ĝia koridoro oni pelis min al kupeo kun amasigitaj homoj. Pri sidiĝo mi ne povis eĉ revi, ni staris kunpuŝite.

Apenaŭ mi interŝanĝis kelkajn vortojn kun miaj novaj samsortanoj, mi aŭdis vokon de supre sur la tria etaĝo. Rigardante al la direkto de kie venis la voĉo, mi vidis mongolan vizaĝon direktitan al mi.

" - Hej, vi! kiu vi estas ? Polo ? Balto, ĉu eble Finnlandano ?

- Mi estas polo !

- Ĉu vi eble havas ion por fumi ?

- Ĉu vi povas havi por mi lokon ĉe vi supre ?

- Se vi havas ion por fumi, troviĝos loko ankaŭ por vi.

- Do mi havas iom da "maĥorko".

- Do venu supren !"

Veninte supren, mi donis al la mongolo iomete da "maĥorko" kaj elgazetan papereton. Rulinte tiun tipan rusan cigaredon, li demandis malkuraĝe :"Ĉu vi povas eble havi iomete da tabako por unu cigaredo al miaj kamaradoj, se ne, ni fumos kune la saman cigaredon." Mi donis iomete da maĥorko ankaŭ al la kamaradoj.

" - Kiom longe oni devas resti ĉi tie ?' mi demandis.

- Tion oni neniam scias. Iuj estas por tri aŭ kvar tagoj, iuj estis por sep aŭ por ok tagoj. Iuj estis vokitaj post kelkaj horoj kaj iuj restis ĉi tie dek kvar tagojn."

Montrante al mi kuŝantan najbaron, li diris : "Jen tiu troviĝas ĉi tie jam la dekkvaran tagon."

- Kion oni ricevas ĉi tie por manĝi ?
- Duonon da kilogramo da pano por tagnokto. De tempo al tempo oni alportas sitelon da malvarma akvo, kiun ni devas baldaŭ fortrinki, ĉar ili havas unu sitelon por kelkaj vagonoj. Ĉiun duan, trian, kvaran tagon ili alportas kuiritan manĝaĵon."

Post mallonga babilado kun miaj kamaradoj logitaj per iomete da "maĥorko", mi ekdormis. Dum la pasinta nokto mi preskaŭ ne dormis.

Supre en la vagono estis sufiĉe da loko eĉ por kuŝiĝi. Tiuj, kiuj okupis la supran parton, ne allasis, ke iu venu tien sen iu pageto al ili, ekzemple maĥorko por unu cigaredo. Mi tamen estis de tie vokita post kelkaj horoj. Tra la kradoj de la apuda kupeo mi vidis Pomîkalski, li jam sidis. Li aspektis tre laca, ni adiaŭis per mansigno - nenion por deziri.

Post ankoraŭ unu veturigo en "Ĉorni Voron", ĝi haltis ĉe aparte staranta "stolipinko", fore de iu stacio, kien estis al mi ordonite eniri. Ekde la enirpordo ĝis la kupeoj ĉiumetre staris soldato. Ĉiu soldato forte tuŝis per la manplato ĉiun enirinton, samtempe vokante laŭte la nombron de la tuŝitoj. Tiu tuŝado fare de la soldatoj estis por mi abomena kaj mi ne povas klarigi ĝian kialon, - ĉu ili ne kredas siajn proprajn okulojn, ke ili vidas apud si trapasantan homon ?

De miaj malliberejaj kamaradoj troviĝis en kupeo la arbargardisto. Laŭ la verdikto li devis esti sendita al lago Onego.

Vespere la vagono estis alligita al trajno kaj ni ekveturis. La arbargardisto memorigis al la gardista oficiro pri manĝaĵo, ĉar li dum tuta tagnokto nenian manĝaĵon ricevis. La oficiro sentis sin ofendita :
- Mi mem scias, kion mi devas fari sen via memorigo.
- Sed ĉu mi ne rajtas demandi ? - diris la arbargardisto.
- Ho ! vi nur demandas !... Do sciu, ke hodiaŭ mi por vi nenian manĝaĵon havas. Ĉu nun vi ja scias ?

La arbargardisto respondis per silento.

"De Moskvo ĝis la randoj landaj
De la sudaj montoj ĝis la maroj nordaj
La homo paŝas kiel dommastro
Tra senfinec' de sia patrolando" (Strofo de la kanto "Vasta mia patrolando".)

Dum la tutnokta veturado ni reciproke konatiĝis. Inter ni troviĝis ankaŭ kelkaj poloj, interalie inĝeniero-ĥemiisto. Li verŝajne tre ŝatis sian profesion. Konstante li komprenigis al sia dekkelkjara pola amiko, gimnaziano, diversajn principojn pri ĥemio.

Estis ankaŭ tri eksterlandaj junuloj. Ili devenis de la teritorio, kie Hitler en la jaro 1938 kreis la ŝtateton "Karpatrusa", sur la teritorio de Ĉeĥoslovakio, kiu ekzistis kelkajn monatojn. Tiuj tri junuloj estis antaŭe komunistoj. Kiam en Ĉeĥoslovakio venis la reĝimo de Haĥa kaj en ilia hejmloko estis kreita tiu kvazaŭ "karpatrusa" ŝtateto laŭ la hitlerista modelo, ili rifuĝis al Sovetunio. Ĉe la limo ili estis kaptitaj kaj akuzitaj spionoj senditaj de la hitleristoj.

Dum sia esplorado, ili proponis al NKVD havigi informojn, ke ili estas komunistoj. Sed por NKVD estas indiferente, kio iu ie estis. NKVD havas interalie ankaŭ taskon prizorgi laboristojn por la tendaroj kaj tiuj tri junuloj estis tri unuoj por tiu tasko. Cetere, oni povas montri la fidelecon al la proleta patrio per laboro en ĝiaj tendaroj.

La tri junuloj ricevis po dek jarojn kaj ili estis kondukitaj al la "eduktendaro" daŭrigi la sanktan komunistan mision, konstrui la socialismon en la proleta patrio por la bono de la tutmonda laboristaro.

Troviĝis ankaŭ estinta rusa soldato, kiu partoprenis la "liberigon" de Okcidenta Blankrusio. Estinte en Grodno, li estis for de sia taĉmento dum 20 tagoj ĉe knabino. Verŝajne lia amo al ŝi estis pli forta ol la patriaj militaj devoj. Reveninte al la taĉmento, li estis arestita, akuzita, ke dum tiuj tagoj li kontaktis kun malamikaj spionoj kaj komunikis al ili gravajn militajn sekretojn. Li estis juĝita de militista tribunalo kaj ricevis dekjaran punverdikton plenumotan en malliberejo.

En la malliberejo ĉelo li estis dum kelkaj monatoj komplete sola. Ĉiun duan tagon li havis dekminutan promenadon en libera aero. Dum la tagoj, kiam li ne havis promenadon, estis en la ĉelo malfermita la fenestro por dudek minutoj. Li mem ne rajtis la fenestron malfermi aŭ fermi, tion devis fari la gardanta soldato en la koridoro.

La vivo en soleco lin turmentis. Li sendis petskribon al ia milita juĝinstanco, ke li volonte servos sian patrion

per laboro en la koncentrejo.

La laborista-kamparana militista juĝinstanco bonakceptis la petskribon de tiu pekinta perfidulo kaj nun li estis veturigita al iu tendaro. Li estis gaja junulo kaj memorigis Sergejenkon. Ĉiam li tedis la gardantan soldaton ĉe la pordo, per diversaj demandoj, ŝercoj kaj blasfemoj - ankaŭ nomante lin "kamarado". Arestito ne rajtas nomi kamarado liberan homon kaj precipe NKVD-soldaton. Inter diversaj liaj diraĵoj li multfoje ripetis : "Ĉe ni en Sovetunio vivas ducent milionoj da homoj, cent kaj naŭdek milionoj vivas en la koncentrejoj kaj en malliberejoj. Liberaj estas nur la ceteraj dek milionoj, mi do estas kune kun la plejmulto."

Iu ruso, altranga krimulo, konstante trompegis, rakontante pri sia persona graveco. Interalie li rakontis, ke pasintjare li partoprenis la novjaran feston kune kun kamarado Stalin. Antaŭ la aresto li laboris kvazaŭ sur iu granda insulo kiel ĉefinspektoro. Kion li inspektis, li ne volis rakonti. Koncerne al la Okcidentanoj li menciis sian grandan amon al la "proleta patrio". Li nin senĉese ofendis per la plej vulgaraj esprimoj : polaj sinjoraĉoj, faŝistoj, kapitalistoj, parazitoj kaj ekspluatantoj de la laboristoj apartenis al la esprimoj normalaj kaj ĉiam li aldonis : "Fine vi venis en nia posedo kaj ni instruos vin labori, per honesta laboro akiri vian panon."

En iun stacion venis kelkaj knaboj. Laŭ ilia konduto oni povis kompreni, ke ili estas spertaj, profesiaj ŝtelistoj. Ne daŭris longe kaj ili komencis "labori". La viktimo estis amiko de la inĝeniero, de la urbo Lodz, en Polio. La inĝeniero mem nenion havis krom siaj vestoj. Lian havaĵon antaŭe konsistantan el kelkaj vestaĵoj forprenis de li ŝtelistoj en iu malliberejo, sed lia amiko sukcesis ŝirmi parton el liaj vestaĵoj.

Dum la tuta vojaĝo ambaŭ amikoj gardis komune la "trezoron", kelkajn ĉemizojn kaj aliajn malnovajn vestaĵojn en sako. Dum tiu dumnokta veturado ilia gardado vane helpis. La sako estis eltranĉita kaj forprenitaj el ĝi kelkaj aĵoj. Ne helpis, ke ili tenis sur la sako siajn manojn. Kiam la "riĉulo" rimarkis sian perdon, li komencis krii, postuli, ke la soldato faru revizion por retrovi la forŝtelitajn aĵojn. Sed la soldato estis al-

kutimiĝinta al tiaj okazaĵoj, revizii la kupeon li absolute ne intencis, tio eĉ ne estus ebla. Cetere, la soldato devas gardi la arestitajn homojn, sed ne iliajn sakojn.

La viktimo mem komencis serĉi, li do estis certa, ke la forŝtelitaj objektoj ne estis elportitaj el la kupeo. Kelkajn li retrovis, sed la plej grandan parton li ne povis trovi. Verŝajne la forŝtelitaj objektoj jam estis ĉe la "granda soveta patrioto". Kiam la viktimo volis serĉi en lia sako, tiu socialista patrioto komencis insulti kiel ĉiam : "Kion vi pensas, ke mi estas kapitalista sklavo kaj permesos al vi serĉi en mia posedaĵo ?"

Matene la trajno venis al la stacio de urbo Vologdo. De tiu stacio disbranĉiĝas la fervojo en diversaj direktoj. En Vologdo oni forprenis multe da homoj de la vagono.

En Vologdo ni ricevis iom da pano, kelkajn pecojn da sukero kaj po kelkajn "ĥamsa". Tiu manĝaĵo devis sufiĉi por la tuta tago.

En Volgdo la trajno ne haltis longe kaj daŭrigis la veturadon. Sur ĉiuj stacioj okazis alveno kaj forigo de homoj el la "vagono zak". Vespere la trajno venis al la stacio en Arĥangelsko. Krom mi kaj unu mutulo ĉiuj estis forigitaj el la vagono.

Kun la mutulo mi restis ankaŭ la tutan venontan tagon. Vespere la vagono reveturis al Volgdo, kaj mi en ĝi. Mia reveturo okazis, ĉar de la koncentrejo, kien mi estis sendita, neniu venis por akcepti min.

En Arĥangelsko troviĝis en la vagono nur ni ambaŭ, sed dumnokte alvenis de la stacioj multe da homoj kaj ni estis preskaŭ kunpremitaj kiel haringoj en barelo. La fetoro en la kupeo estis suferiga. La kriadoj kaj petoj pri la necesejo daŭris senĉese el ĉiuj kupeoj. Sed laŭ la regularo oni ellasis al la necesejo du fojojn dum tagnokto, - matene kaj vespere. La problemo konsistas el tio, ke la internaĵoj en la homa ventro ne komprenas la regularon de NKVD aŭ ne volas sin subordigi al ĝi.

Ekstra vizito al la necesejo dependas de la gardistara bonvolo. Tiuj gardantoj jam delonge kutimis al la homaj krioj kaj petoj kaj ili povas resti pri tio indiferentaj. Ĉiam ili havas la respondon : "Ĉu vi estis en la necesejo

kiam okazis la ellaso ? Do atendu ĝis la venonta ellaso, mi nenion al vi povas helpi, tia estas la regularo."

Fine, mi la duan fojon atingis la stacion en Vologdo, akompanite de kriadoj kaj petadoj al la necesejo.

"De Moskvo ĝis la randoj landaj
la homo paŝas kiel dommastro
tra senfinec' de sia patrolando."

La urbo Vologdo situas ĉ. kvarcent kilometrojn norde de Moskvo. Dum la cara regado estis en tiu urbo malliberejo. Kiam la komunista registaro komencis pli konstrui kaj industriigi la nordajn partojn de Eŭropa Sovetio, Vologdo iĝis tre grava punkto por NKVD-transportoj. La kondamnitoj en la koncentrejoj estas la ĉefaj konstruantoj de novaj urboj, industriaj centroj, fervojoj kaj simile.

Ĉar Vologdo havas disvojigan fervojan stacion, estis en tiu urbo kunkolektita la "laborforto" sendota al la difinitaj tendaroj. Multfoje tiu "laborforto" devis resti en Vologdo dum kelkaj tagoj, atendante sian "stolipinkotrajnon". La ununura malliberejo ne havis sufiĉe da loko ankaŭ por la trapasantaj arestitoj. Por NKVD estis nepre necese havi en tiu urbo ankoraŭ unu malliberejon. Por ŝpari monon kaj plirapidigi tian konstruaĵon, oni transformis en malliberejon monaĥejon aŭ preĝejon. Dum la socialista konstruado tiu urbo ricevis unu plian malliberejon.

La nova malliberejo ricevis la nomon "Etapnaja Tjurma" (Malliberejo por traveturantoj) kaj la malnova malliberejo estis poste nomita : "Gorodskaja Tjurma" (urba malliberejo). Kompreneble, en la diversaj statistikoj pri la socialista konstruado, tiu "Etapnaja Tjurma" nenie estis menciita, nur la loĝantoj en Vologdo sciis pri ĝi. Mi eksciis de aliaj arestitoj, ke la necesejo en tiu konstruaĵo estis instalita en la loko, kie antaŭe estis la altaro. Ĉu la tiamaniera aranĝo estas ĝusta por kontraŭreligia batalilo ? Eĉ laŭ ateista vidpunkto, ĝi ŝajnas al mi ne tro laŭdinda. Do post la tutnokta veturado de Arĥangelsko, ankaŭ mi per la "Ĉorni Voron" venis kune kun ĉ. cento da arestitoj de la "vagono zak" al la "Etapnaja Tjurma".

Ni estis ĉiuj enlasitaj en kelĉelon. Krom la tipa ĉela meblo - la "paraŝo" - en ĝi nenio troviĝis. La loko sur la planko sufiĉis apenaŭ por sidi unu apud la alia aŭ eventuale por kuŝiĝi. Ekstere la frosto estis tre forta. De la malfermita fenestreto venis densa vaporo kaj ni en la ĉelo ŝvitis pro varmego.

Post longdaŭra postulado, petado kaj fine frapado ĉe la pordo, la deĵoranta soldato en la koridoro konsentis malfermi en la pordo la lukon, ke okazu trablovo. Por havi tiun privilegian trablovon ni devis promesi, ke neniu elrigardos tra la luko al la koridoro, ĉar de tempo al tempo iu en la koridoro trapasas. Spite de nia promeso, la soldato ne konfidis al ni, kaj se iu trapasis la koridoron, li la lukon ofte fermis.

En tiu ĉelo mi komencis sperti la teroron de la ŝtelistoj, ĥuliganoj, banditoj kaj al ili similuloj en tiu societo. Post iom da restado en tiu ĉelo venis al mi unu el tiu anaro, kvazaŭ por babilado. Post la unuaj demandfrazoj li diris : "Mi vidas, ke vi estas vestita en bona lana jako. Tiun jakon mi bezonas kaj mi volas, ke vi vendu ĝin al mi."

- Ho ne ! tiun jakon mi bezonas por mi mem kaj mi ĝin ne vendos, mi respondis.
- Sed mi donos al vi monon.
- Mi ne volas vian monon kaj mi ĝin ne vendos.
- Sed por mi tiu jako estas pli bezonata ol por vi, ĉar mi estas tuberkulozmalsana.
- Eble vi fakte estas tuberkulozmalsana, sed mi ne estas por vi kuratoro aŭ via prizorganto, mi ĝin ne vendos.
- Se vi ĝin ne vendos por mono, mi ĝin forprenos de vi sen mono.
- Tio povas okazi, sed mi la jakon libervole ne fordonos.

La kanajlo, kiu titolis min eĉ "kamarado", provis min konvinki, ke mi devas al li vendi la jakon, ĉar li estas tuberkulozmalsana, tamen vidante, ke mi plu ne respondas, fine foriris.

Kvankam mi antaŭe aŭdis, ke la krimuloj forrabas de la aliaj arestitoj ĉion, kion ili nur volas, mi tamen decidis kontraŭstari ilin sciante, ke mi estos venkita.

Dumnokte oni vekis min. Malferminte la okulojn, mi vidis apud mi tri "kamaradoj" de la krimula societo. Ili demandis min : "Ĉu vi havas monon ? Se vi havas monon, donu ĝin al

ni kaj ni ne revizios vin. Sed, se ni revizios vin kaj trovos monon ĉe vi, ni la monon forprenos kaj ankaŭ vin batos." Eble se mi estus havinta monon, mi ilin rezistus, sed fakte mi neniam monon havis. Per minaco, ke ili min tuj mortigos, se mi ne permesos revizion, ili traserĉis ĉe mi ĉion tre precize kaj foriris.

Post la foriro de mi, ili vekis la ceterajn dormantojn, ĉiujn ili reviziis. Ĉiun monon trovitan ĉe iu, eĉ la plej etan sumon, ili forprenis. Mi ne komprenis kial neniu ilin kontraŭstaras, poste tiu afero estis por mi klara. Unue : la survoja kaj koncentreja gardistaro kondutas al la krimuloj malpli severe ol al la kondamnitoj malkontentaj pro la politiko. Sendube tiu diferenciga traktado devenas de la pli altaj instancoj, kvazaŭ laŭ la ideologia rezonado. Ŝtelisto, defraŭdanto, ĥuligano aŭ bandito estas krimulo, sed li ne estas kontraŭulo de la "proleta socialista regadsistemo". Kondamnito pro kritiko al la registaro estas kontraŭulo de socialista regadsistemo, pro tio do klasa malamiko. Laŭ la komunista ideologio, devas esti la ĉefa tasko de la proletara registaro la klasan malamikon pereigi komplete per ĉiuj ekzistantaj ebloj aŭ rimedoj.

La dua kaŭzo, ke la krimuloj povas terorizi la aliajn arestitojn estas, ke ili estas en ĉiuj tendaroj organizitaj, ili vivas inter si kamaradece. Se ili estas transportitaj al aliaj lokoj, ili baldaŭ trovas siajn kamaradojn kaj ili reciproke interhelpas. Ekzistas aliaj motivoj, ke la gardistaro toleras aferojn al la krimuloj, kiujn ili ne tolerus al kritikantoj de la registara politiko, sed tio estas afero ampleksa, ligita al la ĝenerala komunista taktiko.

Matene, unu el la dumnoktaj viktimoj plendis al la deĵoranta oficiro, kiam li venis inspekti la ĉelon, ke dumnokte estis de li forrabita la mono. La oficiro nur demandis nomojn de la rabistoj, sed nenion faris. Apenaŭ la oficiro forlasis la ĉelon, la plendinto tuj ricevis kelkajn batojn kaj la rabistoj promesis, ke lin oni mortigos dum la komuna vojaĝado, ĉar li plendis al la oficiro.

Post la matenmanĝo, porcioj da pano kaj iom da varmeta akvo, alportita en lignaj siteloj, kelkaj poloj kolektiĝis kaj ekkuŝis sur la planko por komuna babilado. Al ni

proksimiĝis unu el la dumnoktaj rabistoj por kunbabiladi. Li diris, ke li estas profesia instruisto de mezlerneja grado. Tio ŝajnis al mi komence trompo, sed li baldaŭ komencis paroli pri la plej famaj humanistoj, filozofoj, romanverkistoj, muzikistoj kaj pri ties verkoj. Laŭ siaj konkludoj li havis en tiuj aferoj tre bonan kleron. Mi ne estis kapabla kompreni kiel tiu homo, havanta scion, kaj ankaŭ intereson pri moralaj, humanaj kaj sociaj aferoj kapablis antaŭ kelkaj horoj fari rabadon ĉe siaj mizeraj kunuloj, malfeliĉuloj kiel li mem. Tio fariĝis por mi komprenebla post kvar jaroj, kiam mi komencis pli sperti similajn ekzemplojn.

Post kvintaga restado en tiu duonnebula kelĉelo, mi estis iun posttagmezon vokita, kune kun kelkaj samsortanoj kaj gvidita al granda ĉambro. En tiu ĉambrego altstatura, nigrahara NKVD-oficiro demandis kaj kontrolis la enirintojn. Tiu oficiro de ia azia nacideveno uzis artifikan kaj rigidan voĉon, kiu impresis superece al siaj subulaj sklavoj, ne rigardante eĉ dum tiu demandado al ili. Ĉiun vorton li eldiris preskaŭ vokante kvazaŭ li volus esprimi ĝian gravan signifon : "FAMILIA NOMO ? NOMO ? PATRONOMO ?" Poste li per la sama rigida tono eldiris kvazaŭ elĵetante ĝin el sia gorĝo : "OBISK!" (revizio).

Li mem staris malantaŭ barilo, kelkajn paŝojn de li soldatoj ĉe longaj tabloj, en helverdaj kiteloj sur siaj manteloj, faris la revizion. Ĉiu revizioto devis ĝisnude senvestiĝi. La reviziantaj soldatoj enrigardis en la buŝojn kaj en la orelojn. Kiam ili neniajn danĝeraĵojn trovis, la reviziito devis turni sin al ili dorsen. Tiel starante, li devis dismeti la manojn flanke, malfermi la fingrojn kaj tri fojojn mallevi la korpon al sidpozicio, montrante al la soldato la postaĵon.

Tre severe estis reviziitaj ankaŭ la vestaĵoj kaj ĉiu ajn objekto. Post la revizio oni iris al unu angulo, kie virinoj donis al ĉiu nudulo duonon da panbulo kaj iomete da sukero. Kun la pano kaj la vestaĵoj en la manoj oni eniris apudan ĉambron por vestiĝi.

Subite mi aŭdis kriojn kaj riproĉojn de la oficiro al la soldatoj starantaj inter la reviziejo kaj la vestiĝejo. La tasko de tiuj soldatoj estas observi la soldatojn, kiuj

revizias. La oficiro rimarkis, ke iu soldato turnis sian kapon ne en la direkto, kie okazas la revizioj. La oficiro klarigis al la kvar soldatoj (certe ne la unuan fojon), kiel ili duope observu ĉiun flankon de la tabloj.

Ĉirkaù noktomeze ni estis gviditaj al la korto de la malliberejo. Kune ni estis pli ol cent homoj, ĉirkaùitaj de soldatoj kun la bajonetoj sur la karabenoj kaj kiel kutime de kelkaj hundoj kaj kompreneble ni devis genui. Aùdiginte al ni, ke unu paŝo dekstren aù maldekstren egalas fuĝon kaj en tiaj okazoj la gardistaro uzas fusilojn sen averto, estis al ni ordonite stariĝi. Ni proksimiĝis al la elireja pordego kaj per rapidaj paŝoj al la fervoja stacio.

Ĉe la stacio ni devis genui longan tempon en la profunda neĝo. Spite la froston kaj la malvarmon, kiun ni sentis precipe en la piedoj kaj kruroj, la gardistaro fidele atentis sian regularon, ke estas malpermesate stariĝi. Kiam venis la trajno, kunhavanta la "vagononzak", ĝiaj kupeoj estis plenŝtopitaj kaj la komandanto de tiu vagono akceptis kunpreni nur kelkajn personojn, la ceteraj devis reiri al la malliberejo. Denove estis al ni diritaj la bone konataj frazoj, kion egalas unu paŝo dekstren aù maldekstren kaj kio en tiu okazo minacas.

Kiam nia "procesio" de arestitoj kaj gardistoj sen hundoj kaj kun hundoj paŝadis tra la malforte lumigitaj stratoj de Vologdo, estis jam ĉirkaù la dua horo post noktomezo. Homojn en la stratoj ni renkontis malofte, ankaù ne tiuj montris al ni iun ajn intereson. La loĝantoj en Vologdo estas alkutimiĝintaj al tiuj dumnoktaj procesioj.

Reveninte al la malliberejo, mi estis enlasita en grandan ĉelon sur iu etaĝo. Surprize mi vidis en ĝi litojn, sed sur la planko kuŝis homoj, kunpuŝitaj same kiel en la kelo. Mi ne havis lokon ne nur por kuŝiĝi, sed por sidiĝi. Mi rimarkis, ke ankaù sub la litoj kuŝis homoj, same kiel sur la planko.

Mia eniro en la ĉelon neniun interesis kaj neniun vekis. Iom da tempo mi staris ĉe la pordo, havante apenaù liberan lokon sur la planko por meti mian sakon. Tiamaniere starante, mi baldaù laciĝis, ne helpis, ke mi de tempo al tempo transigis la korpan pezon de unu piedo al la alia.

En la ĉelo estis varme, mi fariĝis dormema. Mi sentis, ke pli longe mi ne kapablos min teni sur la piedoj. Mi rigardis atente, kie mi povus trovi iun liberan lokon por sidiĝi. Tian lokon mi rimarkis nur ĉe la "paraŝo". Mi devis trapasi super kelkaj kuŝantaj korpoj, metante la piedojn inter ili. Ili vekiĝis kaj insultis tiun, kiu super ili piedpaŝas, kaj mi sidiĝis en tiu loko tre utila en la ĉelo - ĉe la "paraŝo".

La fetoro de la "paraŝo" komence min ĝenis, ĉar dum ĉiufoja malplenigo estis en ĝin ŝutita iom da kloro. Tamen oni povas alkutimiĝi al tiu fetoro. Pli abomena estis, kiam iu venis al la "paraŝo" fari sian fiziologian bezonon. La "paraŝo" estis preskaŭ plena kaj ofte la disŝprucantaj gutoj falis sur miajn vestojn, certe eĉ sen tio sufiĉe fetorajn. Mi havis jam la senton ne de katenita bestaĉo, sed ke mi egalas vermon en iu kloako kun malpuraĵoj, super kiun oni povas verŝi la homajn ekskrementojn. Mi sentis al mi abomenon, naŭzon, kiel neniam ĝis tiu tempo.

Sidante en tiu fetoro, mi iom dormetis, fakte tio estis stato duondorma, duonmalkonscia, stato inter sonĝo kaj realo. Fine komenciĝis la sesa horo. Estis donitaj en la ĉelo niaj ĉiutagaj porcioj da pano. La homoj stariĝis kaj mi akiris kuŝejon sur la planko en alia loko malproksime de la "paraŝo".

"Ĉie vivaktiveco kaj libereco
Kiel Volgo en sia fluanta gracio
Por la junuloj ĉe ni ĉie la vojo libera
Por la maljunuloj ĉe ni ĉie la honoro."
(Strofo de la kanto "Vasta mia patrolando")

La "vagono-zak" trafikis inter Vologdo kaj Arĥangelsko ĉiun kvinan tagon. La kvar tagojn ĝis la venonta "vagonzak" mi restis en la sama ĉelo. La plejmulto el tiuj miaj samsortanoj apartenis al la malfavoratoj de NKVD-gardistaro, t.e. kondamnitaj pro "popola malamikeco", plejparte ili estis laboristoj kaj kamparanoj. Ĉirkaŭ dudek personoj el tiu anaro devenis de la teritorioj liberigitaj de la regado sub la "polaj sinjoraĉoj", inter ili kelkaj junaj knaboj. Ni havis la honoron havi inter ni ruson, profesoron pri literaturaj aferoj.

La polaj knaboj estis ĵus venintaj de siaj hejmlokoj el diversaj urboj. Ilia aĝo variis inter 13-16 jaroj. Tiuj knaboj al mi rakontis, ke la arestoj kaj forsendadoj de sur la "liberigitaj teritorioj" daŭras senĉese. Estas arestitaj multe da lernantaj junuloj en ĉiuj lernejoj. Dum la lecionoj iuj lernantoj estas vokitaj, surloke arestitaj kaj ankaŭ tuj forsenditaj. La gepatroj ekscias pri la sorto de siaj infanoj per samklasanoj. NKVD neniajn klarigojn donas al la gepatroj, kial kaj kien la geknaboj estas forsenditaj.

" - Kaj kion la NKVD-istoj diris al vi pri la kaŭzo de via aresto ?

- Al ni estis laŭtlegita akuzo, ke ni estas arestitaj pro la aparteno al P.O.W. (Sekreta pola militista organizaĵo, kiu ekzistis dum la cara regado).

- Ĉu estis al vi riproĉita ankaŭ ia konkreta agado por tiu organizaĵo ?

- Nenia konkreta agado estis al ni riproĉita, nur menciite, ke ni apartenis al tiu organizaĵo.

- Ĉu vi scias kien kaj por kiom longe vi estas forsenditaj ?

- Nenion pri tio ni scias. Ni estas veturigitaj kaj nenion pli ni scias."

("Por la junuloj ĉe ni ĉie la vojo libera...")

Dumtage la profesoro rakontis la enhavon de ia libro de Aleksandro Dumas. Tiujn rakontojn li komencis kelkajn tagojn antaŭ ol mi venis al tiu ĉelo kaj li daŭrigis ĉiutage. Ĉiam post fino de la parto de la rakonto, li laŭdis la libron kaj rekomendis ĝin tralegi, kiam la homoj havos por tio la eblon. Ne unu fojon mi aŭdis rekomendon pri iu libro de la postrevolucia rusa literaturo. En la malliberejo li troviĝis en la "privilegia situacio", ke li ne devis rekomendi la novan literaturon, prisilentante ĝin.

Najbara preleganto

Kuŝiĝinte vesperon, kiel normale, la kapon sur la saketo kaj la ceteran korpan parton sur la planko, mi komencis kun mia najbaro babiladon pri aferoj ĉiutagaj. Laŭ liaj vortesprimoj mi rimarkis, ke li estas t.n. scipovanta la teorion de la marksismo-leninismo. Baldaŭ li rakontis al mi, ke antaŭ la aresto li estis kandidato al la

partio dum kelkaj jaroj. Li multe studadis la markisman-leninisman teorion, li atente kaj detale "studadis" precipe la koncizan kurson de historio de la komunista partio en Rusio (la libron kompilitan laŭ la rekomendo kaj sub la kontrolo de Stalin).

Li estis en la aĝo inter 35-40 jaroj. Homo tute trankvila. Laŭ la karaktero li aspektis sincera. Kompare kun aliaj partianoj, kiujn mi renkontis, li eĉ aspektis tro honesta. Pri la ideologio, je kiu li kredis kaj kiun li propagandis al mi, li estis entuziasmigita ĝis tia grado, ke certe neniam li kapablus dubi pri ĝia praveco.

Al tiu apud mi kuŝanta najbaro mi ŝajnigis nenion scii pri la aferoj al li tre bone konataj. Mia najbaro, kredante, ke mi fakte nenion scias, demandis min, ĉu estinte laboristo en Polio, mi apartenis al profesia sindikato, ĉu mi legis laboristajn gazetojn aŭ librojn, ĉu mi ĉeestis prelegojn kaj iujn ajn laboristajn kunvenojn, ĉu min ĝenerale interesis sociaj aferoj.

Al ĉiuj liaj demandoj mi respondis nur : "Ne".

- Tio estas por mi stranga. Mi renkontis ĝis nun multajn polojn, sed ĉiuj tre orientiĝis pri sociaj problemoj. Mi povas diri, ke inter tiuj poloj, kiujn mi renkontis ĝis nun, vi estas la unua, kiu nenion scias, do per kio mi tion klarigu ?
- Nu, tute simple, aliaj verŝajne havis intereson por politiko kaj min la politiko ne interesis.
- Mi aŭdis, ke la vivkondiĉoj ĉe vi estis, kompare al niaj, tre bonaj kaj vi povis havi tempon kaj eblecon interesiĝi pri laboristaj problemoj kaj pri la teorio de klasbatalo.
- Nu, jes, tempon mi povis havi, sed mi havis intereson nek por la politiko nek por partioj, mi ne scias kial estis tiel, sed mi tion ne ŝatis.
- Ĉu vin absolute nenio interesis ? Ĉu vi neniajn librojn legis ? Kion vi faris dum via libera tempo ?
- Ho, mi interesiĝis pri certaj aferoj, ĉiudimanĉe mi ĉeestis la diservojn en la preĝejo. Mi ŝatis aŭdi la predikojn de la pastroj. Mi multe legis la Biblion kaj aliajn prireligiajn librojn, sed precipe la Biblion.

Sekvis tio, kion mi atendis. Mia najbaro klarigis al mi, kio estas religio laŭ la leninisma kaj marksisma teorio : stultigado de la laboristaro, veneno por la popolo kaj

servigado al la reganta kapitalista burĝaro, fine li konkludis : "Ĉe ni en Sovetunio estis likvidita la ekspluatanta klaso kaj la religio malhavis sian bazon. Laŭ nia konstitucio estas permesate praktikadi religion, sed ĝi estas por ni maldanĝera, ĉar la religio perdis sian potencon kaj influon."

- Ho, vi parolas tre saĝe kaj eble vi pravas. Mi neniam antaŭe aŭdis tiajn interesajn aferojn.

Mia najbaro, vidante, ke lia klaskonsciiga klerigado efikas per bonaj rezultoj ekhavis pli da kuraĝo. Li promesis al mi prelegi ankaŭ pri aliaj aferoj laŭ la marksismaj-leninismaj principoj venontan tagon, ĉar hodiaŭ ni devas dormi.

La sekvintan tagon mi petis la dumnoktan najbaron, ke li faru al mi la dumnokte promesitan prelegon : "Ho, volonte!",li diris.

Ni iris al angulo, kuŝiĝis sur la planko. Mi preparis min aŭdi kaj mia preleganto preparis sin prelegi. Unue li demandis : "Ĉu vi memoras ion de la hieraŭa prelego?" Mi ripetis en mallongigita formo la enhavon de lia prelego kaj precipe akcentis la konkludojn, ke "religio estas necesa tie, kie ekzistas klasoj en la homa socio kaj malnecesa en Sovetunio, kie la klasaj diferencoj en la socio estis forigitaj per la venko de la bolŝevika revolucio." Mia preleganto admiris miajn kapablojn ĉion kompreni kaj memori.

La sekvinta prelego, dum ni kuŝis sur la planko, enhavis : "La historian evoluon de la homa socio."

La komenco de la homa socio, laŭ tiu prelego, estis la epoko de la feŭdismo. Por ne "perfidi" min, mi ne kuraĝis demandi, ĉu la feŭdisma epoko komencis la historion de la homaro, aŭ ĉu antaŭ la feŭdismo ekzistis iu alia socia formo.

Ripetante en sia parolado multfoje la esprimon "objektivaj kaj subjektivaj kondiĉoj en la socia evoluo", li konkludis : En la feŭdisma socio naskiĝis la kapitalismo. La kapitalismo "naskis" la proletaran klason. Tiu proletara klaso nenion posedas en la kapitalistaj landoj kaj nenion havas por perdi, krom la katenoj de la kapitalismo. Tiu proletara klaso unuiĝas sub la gvidado de sia partio, la komunista, ĝi akiras la ŝtatregadon kaj konstruas la socialismon, la eternan feliĉon por la tuta

homaro sur la terglobo. Tiun homsocian evoluon nenia forto kapablas ŝanĝi, la kontraŭuloj aŭ la malnova kapitalista klaso, kiu devas perdi, povas por iom da tempo tiun evoluon iom bremsi, sed fine la kapitalista klaso devos perei. De tiu pereo nenio ĝin povas savi. Tiujn evoluprincipojn konstatis Marks antaŭ cent jaroj kaj ni vidas, ke liaj konstatoj estis ĝustaj, ĉar ĉio en la mondo realiĝas laŭ liaj antaŭvidoj, prognozoj.

Liaj sekvantoj kaj plej egaj geniuloj post Marks estis Lenin kaj nun Stalin. Lenin kontinuis kaj pli profunde kaj pli genie evoluigis la teorion de Marks. Lenin ankaŭ montris, ke la proletaro ne devas atendi la kompletan evoluon de la kapitalismo, sed ke eblas trairi de la feŭdisma socio al la socialisma socio, se ekzistas revolucia, bone organizita kaj aktiva partio. Ni vidas laŭ la okazintaĵoj, ke Lenin pravis.

Pro la ekzistado ĉe ni en Rusio de la revolucia partio bolŝevika, la proletaro venkis kaj nun ni havas en nia lando la socialismon.

Laŭ la teorio de Marks, la socialismo devus esti realigita komence en Anglio, ĉar Anglio estis tiam industrie la plej evoluinta lando en Eŭropo. Sed dank'al ekzistado de la revolucia komunista partio en nia lando, ni venkis la feŭdismon kaj la kapitalismon per ununura revolucio.

La nun ĉe ni ekzistanta socialista ordo ne estas la plej alta ŝtupo en la homa socio. De la socialismo ni trapasos en la komunistan ordon, kiu estos pli alta ŝtupo ol la socialismo. Nia lando estis la unua en la mondo, kiu ekpaŝis laŭ tiu vojo. Nian ekzemplon sekvos la laboristoj en ĉiuj landoj en la tuta mondo.

En la fino de sia parolado tiu preleganto aldonis, ke tiuj aferoj postulas multajn studadojn, li diris al mi nur pri la ĉefaj punktoj.

Poste li demandis min, ĉu mi ĉion komprenis kaj ĉu mi havas iujn ajn demandojn. Mi demandis, kia estas diferenco inter la nun ekzistanta socialismo kaj la venonta pli alta ŝtupo komunismo.

Mia preleganto estis tre kontenta pri tiu demando. Li vidis en mi scivolemulon. Post longa parolado kaj klarigado li konkludis, ke en la nuna socialisma stadio, la registaro bazas la ekonomion sur la principo : "De ĉiu laŭ

liaj kapabloj kaj al ĉiu laŭ la labormeritoj. Kiam ni atingos la komunisman stadion, estos laŭ la principo : de ĉiu laŭ liaj kapabloj kaj al ĉiu laŭ liaj bezonoj."

Mi kvazaŭ ne komprenis tuj tiujn saĝajn esprimojn kaj por mia najbaro estis necese uzi diversajn ekzemplojn, kion signifas labori laŭ la ebloj kaj ricevi laŭ la bezonoj.

Kuŝante sur la malpura planko en la ĉelo, mia najbaro entuziasme vortpentris bildojn pri la estonteco, kiun preparas por ni tiuj, kiuj nin nun havas en siaj malliberejoj. Mi demandis, ĉu la homoj estos en la malliberejoj kaj en la koncentrejoj dum la komunisma stadio ankaŭ iom pli bone traktataj ol nun.

" - Hm ! Dum tiu epoko ekzistos neniaj koncentrejoj, eble nur por unuopuloj, sed la vivkondiĉoj estos tute aliaj ol nun.

- Do en kiu jaro via soveta registaro intencas realigi la komunisman socion laŭ la plano aŭ laŭ viaj kvinjaraj planoj ?"

Pensante iomete, mia preleganto daŭrigis :

- Mi vidas, ke vi fakte havas nenian komprenon pri sociaj kaj politikaj aferoj.

Denove li faris longdaŭran prelegon pri objektivaj kaj subjektivaj momentoj kaj okazintaĵoj en la mondo ĝenerale, kiuj povas plirapidigi aŭ malrapidigi la forigon de la kapitalismo en la ceteraj teritorioj sur la terglobo, ĉar la forigo de la kapitalismo estas la ĉefa kondiĉo por realigi la komunismon en Sovetunio.

- Sed eble vi povus diri al mi, kial vi havas tiom da homoj en la malliberejoj kaj en la koncentrejoj ? Kaj kial mi devas nun esti en viaj koncentrejoj kvin jarojn?

Povas esti, se mia preleganto estus libera, li sen iu ajn dubo pravigus mian estadon en la malliberejo, sed estante kun mi en la sama situacio, en lia animo li iomete ekdubis. Tamen venkis ĉe li la longjara encerbigo de la komunistaj principoj, kiuj pravigas ĉiujn agojn de la reĝimo, ĉiam akceptitajn kaj subtenitajn de la partianoj. Li ripetis la multfoje aŭditajn konceptojn, ke Sovetunio estas ĉirkaŭata de eksteraj malamikoj, la tutmonda kapitalistaro kaj la ŝtatoj, en kiuj ĝi regadas.

Interne de Sovetunio troviĝas la malamikaj restaĵoj de la malnova cara reĝimo. Tiel longe, kiel tiuj malamikoj ekzistos, la Sovetunia registaro devas gardi la ekzistadon de la socialista ordo en la lando per ĉiuj rimedoj, eĉ se tio kostas milionojn da senkulpaj viktimoj.

Sed mia celo ne estis aŭdi la al mi konatajn aferojn, tial mi komencis mian afablan preleganton tedi per diversaj gravaj kaj malgravaj demandoj. Fine li supozeble komprenis, ke mia scivolemo estas ne tiel serioza, kiel li opiniis antaŭe kaj li ĉesigis la prelegojn.

Venis la tago, kiam la "vagono-zak" devis veturi al Arĥangelsko. Post tagmezo mi estis vokita el la ĉelo. Post la precizaj severaj revizioj kutimaj antaŭ la forsendo, mi estis enlasita en vastan kelĉelon. Tie mi renkontis ĉ. dudekon da junaj knaboj, ĉiuj 12-15-jaraj rusoj. Tuj ili stariĝis ĉirkaŭe kaj komencis siajn scivolemajn demandojn pri mi.

Kvankam ili estis hazarde kunkolektitaj, ili jam havis en la ĉelo sian "estron". Tiu "estro" donis al mi la manon kaj diris : "Mi nomiĝas Volodjo". Kiel estro li sentis sin nur sole amikiĝi kun mi. Mi ja estas pliaĝulo kaj kun pliaĝuloj devas havi rilatojn nur "gravaj personoj".

Post kelkaj minutoj li ordonis al siaj kamaradoj, ke ili foriru. "Kial vi ĉirkaŭstariĝis ĉiuj ĉi tie ? ĉu vi neniam vidis homon ?"

Liaj kamaradoj estis obeemaj al li, kelkaj fakte foriris, sed baldaŭ ili revenis por aŭskulti nian interbabiladon.

Volodjo estis en la aĝo de 15-16 jaroj. Fizike bone disvolviĝinta, mense por sia aĝo tre matura. Kompare al la junuloj en sia lando, li estis elegante vestita. Li portis bonan varman mantelon kaj belajn ŝuojn, kiujn li baldaŭ al mi fierante montris. Mi lin demandis, ĉu la ŝuoj havas ankaŭ ledajn plandojn aŭ gumajn. "Ho ! ĉu vi scias, kiu ĉe ni havas ŝuojn kun ledajplandoj ? Partianoj, judoj kaj spekulantoj".

Baldaŭ li demandis, ĉu mi havas ian "ŝamoton", vorto kiun mi ĝis tiam ne aŭdis. "Kio estas ŝamoto ?" mi demandis. "Manĝaĵo."

- Mi havas pecon da pano, kiun mi ricevis por la vojo.

- Ho ! de la "pajko" (porcio). Ne pri tia manĝaĵo mi demandas. De la porcio mi ne petas.
- Alian manĝaĵon mi ne havas.
- Nu bone, povas esti sen tio."

Mi baldaŭ eksciis pri lia pasinteco. Li naskiĝis en Leningrado. Tie li estis kun la patrino. En tre juna aĝo li komencis akiri por si la vivbezonaĵojn per ne tre honesta maniero. Lia nuna aresto estis la kvina en lia dekkvinjara vivo.

Lia unua puno estis unu jaro en ia edukejo por junaj knaboj. En tiu edukejo ili havis bonajn vivkondiĉojn kiel en lernejo. Sed post la forlaso de la edukejo li ne rajtis reveni al Leningrado. Oni veturigis lin ien al malgranda urbeto, kie li devis labori.

"La plejmalbono estis, ke la konciza enspezo de la laboro ne povis sufiĉi por miaj vivbezonaĵoj. Per praktikado de la ŝtelmetio, mi multe ne povis akiri. Ĉiuj en tiu urbeto estis malriĉuloj : nenio por ŝteli. Krom tio, en la malgranda urbeto ĉiu ŝtelo povas baldaŭ fiaski. Praktiki la ŝteladmetion estas plejbone nur en grandaj urboj", konkludis Volodjo.

En tiu urbeto li estis nur kelkajn semajnojn kaj reveturis al sia bone konata urbo Leningrado. Post kelksemajna estado en Leningrado li estis kaptita de iu milicianо. Feliĉe li ne estis kaptita ĉe iu "laboro", sed li ne rajtis reveni al Leningrado.

Kelkajn semajnojn li estis arestita kaj resendita al la antaŭa malgranda urbeto, el kiu li fuĝis. Komence, post la reveno en tiun urbeton, oni gardis lin kaj li devis vivi malpli lukse ol en Leningrado. Tiam li estis en la dekdujara aĝo.

De la patrino li eksciis, ke la patro estas direktoro en ia granda fabriko. Li veturis al la urbo, kie troviĝis lia patro, li iris al la fabriko, kie la patro estas direktoro kaj petis viziton ĉe la direktoro. En sia kabineto la patro lin demandis, kion li deziras. Volodjo klarigis al la patro, kiu li estas, rakontis pri la vivo de la patrino kaj pri sia vivo.

La rakontoj de Volodjo absolute ne interesis la patron. La direktoro demandis nur por kio li venis. Volodjo tiam klarigis al la patro, ke li petas ian helpon, li estos

kontenta, se li ricevos laboron en lia fabriko, ĉar li ne volas plu esti en malgrandaj urbetoj. Sed vane, la patro respondis, ke nenian helpon li povas doni. "Sed mi ja tamen estas via filo, ĉu tio estas por vi tute indiferenta afero ?

- Ho ! Mi havas eble dudek filojn kiel vi, ĉu vi pensas, ke mi povas al ĉiuj helpi ? Mi neniun el ili helpas kaj vi ne povas esti escepto." La patro donis al li kelkajn rublojn kaj aĉetis por li bileton por la trajno al la urbeto, en kiu li devas esti.

Volodjo absolute ne intencis reiri al tiu urbeto kaj li komprenis ankaŭ, ke reiri al Leningrado estas same riska afero, ĉar la milicianoj lin tie konas. Li veturis al diversaj grandaj urboj tra Sovetunio. Siajn vivbezonojn li akiris per elpoŝa ŝtelado sur la bazaroj, en la stacidomoj kaj la trajnoj. Tio daŭris ĉ. sep aŭ ok monatojn. Fine li estis kaptita dum iu "laboro".

En la miliciejo li prezentis sin per alia nomo, alia devenloko, li havis neniajn dokumentojn (en lia aĝo oni ne devas en Rusio havi pasporton). Ĉar li estis kaptita je eta ŝtelo, li ricevis nur unu jaron de eduklaboro en ia koncentrejo.

Post la forlaso de la koncentrejo oni denove lin veturigis al urbeto, kie li devos labori. Volodjo jam sufiĉe konis la vivon en urbetoj por scii, ke nenio tiea povas esti interesa. En la nova loko por li destinita, li restis dum du tagoj. La sekvantan tagon post la alveno oni sendis lin al laboro kaj li baldaŭ petis en la laborejo kelkajn rublojn kiel prunton, ĉar li estas sen mono. Dumnokte li denove malaperis por daŭrigi sian enspezan okupon - elpoŝan ŝteladon sur la bazaroj, en la trajnoj kaj en la stacidomoj tra la vastega Sovetunio. Ĉio okazis bone kaj feliĉe dum kelkaj monatoj, denove li estis kaptita dum ia "laboreto" kaj la antaŭaj okazintaĵoj ripetiĝis : prezento en la miliciejo de alia nomo, verdikto por unu jaro de "eduklaboro", post la "edukado" ree forsendo al urbeto, fuĝo el ĝi kaj daŭrigo de la elpoŝa ŝtelado. Lastfoje li ĝuis la liberan vivon iom pli ol kvar monatojn kaj renkontis li fiaskon.

Li konis ĉiun grandan urbon, pri kiu ni parolis kaj rakontis kiel aspektas ĝia bazaro, ĝia stacidomo kaj la

homa vigleco. Tiuj lokoj estis liaj laborterenoj kaj li ilin memoris. Tiun fojon li ricevis dujaran punverdikton, li ja estis pli aĝa ol antaŭe, kiam li ricevis nur unujarajn verdiktojn.

Mi lin demandis, ĉu li daŭrigos la ŝteladon post la nuna forlaso de la koncentrejo. "Nu, kompreneble, jes! Alimaniere oni ja ne povas vivi en Sovetunio. Vivaĉi en la urbetoj mi ne intencas. Kiom ajn da fojoj mi estos kaptita, mi ĉiam restos la sama kiel nun."

Kompare kun Volodjo la ceteraj knaboj estis komencantaj ŝtelistoj kaj nenion interesan povis rakonti. Ĉiuj konis siajn patrinojn, pri la patroj ili nenion sciis.

"Por la junuloj ĉe ni ĉie la vojo libera".

Iom post iom oni enlasis en la ĉambregon multajn homojn forveturigotajn al Arĥangelsko. Volodjo baldaŭ reiris al siaj junaj kamaradoj kaj ĉesis interesiĝi pri mi. Baldaŭ li komencis ludi kartojn kun unu el siaj pli aĝaj kamaradoj, Saŝo. Tiu Saŝo estis famkonata bandito kaj kartludadon kun Saŝo Volodjo opiniis kiel grandan honoron.

Kvankam Volodjo ludis kartojn, liaj junaj kamaradoj tuj komencis "labori".

Inter la envenintoj por la forsendo troviĝis unu el la t.n. "Moldavia Respubliko". Tiu respubliko estis kreita dum somero 1940 sur la teritorioj "liberigitaj" de Rumanio. Kio estis moldavo en sia hejmo mi ne eksciis. La rusan lingvon li ne parolis aŭ paroli ĝin ne volis. Tiu moldavo havis kun si grandan plektitan korbon, ŝlositan per du seruroj. La junaj samprofesianoj de Volodjo ĉirkaŭis la moldavon, komencante kun li babiladon, kiun li nek komprenis nek deziris. Dum la sama momento kelkaj junuloj provis malŝlosi la serurojn. La moldavo tion rimarkis kaj forpelis siajn ĵus nedeziritajn amikojn. La junuloj tamen ne volis rezigni sian ĉasaĵon aŭ pli ĝuste sian rabaĵon. Mi ne komprenis de kie tiuj junuloj havigis al si pecon de plata metalo, rapide ĝin akrigis sur la planko kaj baldaŭ ili havis tranĉilon.

Kiam la moldavo gardis la korbon en la flanko, kie estas la seruroj, la knaboj kuŝiĝis sur la planko ĉe la dorsa flanko de la korbo kaj ili komencis enigi en la korbon. Ankaŭ tion tuj rimarkis la moldavo. Li devis

preskaŭ senĉese ĉirkaŭiri la korbon por savi sian posedaĵon.

Kiam ni estis dumnokte gviditaj al la stacio, mi vidis, ke kune kun la moldavo paŝadas virino. Mi rimarkis, ke ŝi ne estas tiel severe gardita kiel li. Poste mi eksciis, ke ŝi ne estis arestita, sed memvole partoprenis la sorton kune kun sia edzo.

Fine de marto mi venis la duan fojon al Arĥangelsko. La duan fojon jam venis gardisto, kiu gvidis min al la tendaro. Fine mi atingis la "edukejon", kie mi per laboro komencis akiri mian panon : mi pasigis unu jaron en la malliberejo kaj survoje mi nur "parazitis".

En kolektejo antaŭ la granda tasko

En la komunista propagando pri la ekzistantaj produktadaj kaj konstruaj entreprenoj en Sovetunio estas prisilentita unu entrepreno, eble la plej granda. Ĝia kompleta nomo en la rusa lingvo estas : "Glavnoje Upravlenie Lagerej" (Ĉefadministracio de la tendaroj). Sed en la ĝenerala parolo estas uzata la mallongigita literumformo "Gulag".

Tiu entrepreno estas sub la kontrolo de NKVD. Al la ĉefaj taskoj de tiu "Gulag" apartenas la konstruado de novaj ŝoseoj, fervojoj, kanaloj k.s. Laŭ unu el tiuj vojoj, konstruita antaŭ la milito, Minsko-Moskvon, mi havis la "honoron" kelkajn fojojn veturi. Tiu vojo estas larĝa, kovrita per asfalto kaj cetere ankaŭ bona. Sed, ke tiun vojon konstruis sklavoj de la komunismo, devas ja mencii nek la soveta registaro nek ĝiaj ĉiuspecaj propagandistoj, aŭ en Sovetunio aŭ en la kapitalistaj landoj.

Krom la konstruo de vojoj, la tendaranoj laboras en ĉiuspecaj minejoj - karbminejoj, minejoj por naftoĉerpado, minejoj por diversaj krudaj metaloj, interalie en la orminejoj de Kolimo. Krome laboras tendaranoj ĉe arbosegado kaj ĉe lignaĵŝarĝado por la eksporto al eksterlando.

Laŭ la opinio de la rusoj, troviĝis en la koncentrejoj ĉ. 10 % de la loĝantaro, t.e. ĉirkaŭ 20 milionoj da homoj. Se mi devus taksi laŭ la koncentrejoj, kiujn mi mem vidis kaj pri kiuj mi aŭdis de estintaj samsortanoj, mi opinias, ke tiu nombro ne estis troigita. Kompreneble, entrepreno, kiu laboriĝas 20 milionojn da homoj, devis havi multajn grupiglokojn por la "varbitaj" laboristoj krom la malliberejoj.

En la regiono de Arĥangelsko troviĝis multe da koncentrejoj, kie la malliberuloj laboris ĉe arbofaligado kaj por lignolivero al aliaj partoj de la lando. En la urbo Arĥangelsko troviĝis kelkaj malgrandaj tendaroj, kie estis kolektitaj la kondamnitoj kaj poste forsenditoj al la grandaj tendaroj en pli malproksimaj lokoj. En la rusa lingvo tiuj kolektejoj nomiĝas "Peresilnie lageri".

La restaddaŭro en tiuj "Paresilnie lageri" dependas de diversaj faktoroj. Ekzemple : de la ricevitaj ordonoj de "Gulag", kiom da homoj estas necese forsendi al iu granda tendaro aŭ de la nombro da homoj, kiuj kolektiĝis por la forsendo aŭ simile. Sed ĝis la forsendo oni ankaŭ devas labori en la urbo Arĥangelsko.

En la akompano de NKVD-soldato mi estis de la stacio gvidita al unu el la kolektejoj. Dumnokte mi vidis nur grandan lumigitan placon kaj aron da mallumaj barakoj en vicoj ambaŭflanke de la placo.

Kelkdekmetrojn for de la barakoj troviĝis forte lumigita barilo de pikdratoj. La NKVD-isto eniris kun mi al unu barako. Starante ĉe la pordo li vokis : "Odivalni!". Venis al ni viro. La soldato ordonis al li : "Li estos ĉi tie.", montrante samtempe al mi kaj li baldaŭ foriris. (Odivalni estas ofica nomo de ĉambrogardisto aŭ prizorganto de ĉambro). La "Odivalni" demandis mian nomon kaj diris : "Okupu iun lokon, kiu estas libera."

La barako estis tre longa. Laŭlonge de la muroj troviĝis duetaĝaj kuŝejoj sur tabuloj. Meze en la barakoj staris granda alta forno. Ĉirkaŭe pendis diversaj ĉifonoj por sekigado, plejparte ili estis ĉifonoj por envolvi la piedojn. Ili disvastigis strangan odoron ne tre agrablan, sed mi jam alkutimiĝis al la odoroj tiuspecaj.

La homoj en la barako plejparte dormis. Iuj kudrante riparis siajn ĉifonigitajn vestaĵojn. Iuj babiladis kaj iuj forigis de si pedikojn por mortigi ilin. Mia enveno neniun interesis. Al tiu tendaro konstante oni alveturigis novajn homojn. Baldaŭ mi eksciis, ke mi estas en unu el la "Peresilnie lageri". Mi trovis liberan lokon en la malsupra etaĝo. Tre laca mi baldaŭ endormiĝis.

Venontan tagon mi havigis al mi iom da scio pri mia "edukejo", pri ĝiaj organizo, funkciado, kutimoj k.c.

Tiu "Peresilni lager" konsistis el aro da lignaj barakoj, grandaj kaj malgrandaj. La grandaj barakoj estis por loĝejoj. En granda barako troviĝis la kuirejo kaj la manĝejo. En la malgrandaj barakoj troviĝis diversaj magazenoj, ekzemple, la nutraĵmagazeno, vestaĵmagazeno, kiu havis ian stranganĵ nomon "Kaptiorka" (prononcu Kapciorka) kaj magazenoj por diversaj laboriloj. En iu baraketo estis aranĝita frizejo. En alia baraketo loĝis kaj deĵoris dum kelkaj horoj tage kuracistino. En granda barako estis aranĝita la banejo kaj la pedikmortigejo. Troviĝis ankaŭ en la malproksimeco punkarcero, nomita "izolatoro". Tiu ĉambreto estis aranĝita en komplete malluma kaverno.

Tiu tuta aranĝo estis dividita en du partoj. Dispartigis ĝin nur barilo de pikdratoj, kiujn estis eble trapasi kaj la trapaso ne estis malpermesita. Verŝajne tiu dispartigo restis de la pasinteco, kiam ĝi ekzistis por iu funkcio aŭ konservita por eventuala bezono.

La tuta tendaro estis kvarangula, ĉirkaŭis ĝin duoblaj bariloj de pikdratoj ĝis tri metrojn altaj. Inter la bariloj estis distanco de kelkaj metroj. En kvar anguloj troviĝis lignaj turoj ĉirkaŭ 15 metrojn altaj. Kiel diris tendaranoj, soldatoj en la turoj havas ĉe si maŝinpafilojn ŝargitajn per kugloj.

Kelkajn metrojn antaŭ la unua barilo troviĝis tabuletŝildoj havantaj tekston "Zapretnaja zona" (Malpermesita zono). Se iu proksimiĝis al la "malpermesita zono", la gardisto de la turo komencis krii kaj minacis mortpafi.

La gardistaro konsistis el kelkaj soldatoj, sed pli ol soldatoj estis gardistoj el la arestitoj, kiuj, estinte longan tempon en la koncentrejoj, havigis al si la konfidon por gardi aliajn. Kompreneble, tiuj gardistoj estis sub kontrolo de la soldatoj.

Kvankam finiĝis marto, en Arĥangelsko estis kompleta vintro. La neĝo estis alta, la frosto matene atingis preskaŭ ĉiam 16 gradojn.

La plimulto da koncentrejanoj estis viroj. Nur en unu malgranda barako troviĝis kelkaj virinoj.

La tendaranoj estis ĉiutage senditaj al diversaj laboroj. La administracio de tiu tendaro ne havis propran entreprenon, ĝi fordungis laboristojn al aliaj entreprenoj. Plejparte estis senditaj homoj al ŝarĝado de ligno

sur fervojaj vagonoj. De tempo al tempo oni sendis nin al diversaj laborlokoj, ankaŭ al la bakejo. Iun tagon mi laboris en brigado, kiu forigis neĝon sur la trafluanta rivero en Arĥangelsko, Norda Dvino, por fari vojojn por ŝarĝaŭtomobiloj. Dum kelkaj tagoj mi kun brigado malŝarĝis brikojn el fervojaj vagonoj kaj simile. Tiu laborista dungado okazis tute simple ; la entreprenoj mendis ĉe la tendara administracio laboristojn kaj por la farita laboro ili pagis al ĝi.

Je la sesa horo oni vekis nin. La brigadestro disdonis la ĉiutagan panon kaj supkuponon. Ĝis la sepa ni disponis tempon por tion enigi en la stomakon.

Antaŭ la sepa ni estis forpelitaj de la barakoj al la elirpordego, nomita "Vaĥta". Tien venis la brigadoj, ĉiu aparte. Plejofte tiuj brigadoj nombris 30-40 homojn. Ĉe la pordeto, kiun povis trapasi nur unu homo, ĉiu estis severe reviziita, la samo okazis dum la reveno de la laboro.

Ĉe la elirejo ekstere de la tendaro ni estis sub la gardo de NKVD-soldatoj. Ili gvidis nin al la laborlokoj. Dum la tuta tago la samaj soldatoj nin gardis. Kelkajn fojojn dum la tago la soldatoj ordonis interrompi la laboron, stariĝi en vicoj kaj kontrolis, ĉu iu ne fuĝis.

La labortempo ne daŭris pli ol ok horojn (ni do estis kvazaŭ nur dungitaj laboristoj). Post la laboro la samaj soldatoj nin gvidis al la tendaro. Ĉiufoje antaŭ la foriro el la tendaro kaj antaŭ la reiro al ĝi, iu soldato al ni rememorigis kion egalas unu paŝo dekstren aŭ maldekstren kaj tiel plu.

Ĉiuvespere estis kontrolita la nombro de la anaro. Por la kontrolo ĉiuj estis elpelitaj el la barakoj al la placo. Tie ni staris en dupersonaj vicoj kaj la soldatoj en la akompano de la gardistoj tendaranoj nin nombris kaj kalkulis. Iuj al la placo por la kontrolo ne eliris, ĉar ili devis resti ĉe sia laboro. Ekzemple, ĉe la laboro devis resti la "Odivalnioj", minimume unu kuiristo kaj malsanuloj, kiuj ne kapablas iri.

Iam tiuj kontroloj daŭris ĝis du horojn. Preskaŭ ĉiam mankis unu aŭ du homoj al la nombro laŭ la listoj ; iam estis unu aŭ du homoj tro multe. Ni devis resti sur la placo kaj la gardistaro serĉis en la barakoj la mankantojn aŭ cerbumis pri la troaj.

Se la vetero estis malvarma, turmentis nin la starado ekstere, sed foriri de la vico antaŭ la fino de la kontrolo estis malpermesate, ni estis dume gardataj de niaj kolegoj la "Samoîranikoj".

Iun tagon ni estis senditaj ŝarĝi tabulojn en fermitajn vagonojn por la entrepreno sin nomanta "Severles" (Norda arbarentrepreno). Tio estis granda kaj plurbranĉa entrepreno, "nia" tendaro ĉiutage sendis tien multajn laboristojn. Se la vagonoj estis fermitaj, ni metis la tabulojn, ke ili okupu multe da loko. La pago estis por enŝarĝita vagono kaj ni faris la laboron, ke la vagono aspektu plena. Kiam la vagonoj estis plenigitaj ĝis duono, la brigadestro konsilis al ni meti la tabulojn nur antaŭe ĉe la pordoj, lasante malplena la mezon, ne estos do eble por la kontrolantoj enrigardi en la mezon.

Dum kelkaj tagoj ni kunmetadis en stakoj malgrandajn ŝtipojn, kuŝintajn dissemitaj sur granda placo. Tiujn ŝtipojn ni ankaŭ metis je distanco inter si tiamaniere, ke ili okupu multe da spaco, ĉar ni estis pagitaj laŭ kunmetitaj kubometroj. Tiun fojon ni ne sukcesis multe trompi. La kontrolanto, kiu mezuris la farintan laboron, deprenis 25%. Sed eĉ post la depreno de tiuj 25% ni tamen lin iom trompis.

Kiam ni malŝarĝis brikojn el vagonoj, ni nenian trompon povis fari, ĉar ne estis eble meti la brikojn je distanco inter si ; dum tiuj tagoj ni faris 70% de la normo kaj nia manĝoporcio estis pro tio tre limigita. Dum tago, kiam ni preparis vojon sur la rivero Norda Dvino, foriginte la neĝon flanken, ni faris 250% de la normo. En tio helpis al ni la mezuristo, la neĝo estis ĝis 20 centimetrojn alta kaj la kontrolanto notis ĝin 55 centimetrojn alta.

Iun fojon kelkajn brigadojn, kune ĉ. ducent homoj, oni gvidis ok kilometrojn for de la tendaro. Tie kuŝis multe da ŝtipoj en stakoj, ĉirkaŭ 50 metrojn for de la fervojreloj. Dum du tagoj ĉiuj brigadoj metis la ŝtipojn pli proksimen al la reloj laŭ ordono de la laborgvidanto. La trian tagon venis alia laborgvidanto kaj ordonis remeti la ŝtipojn precize sur la antaŭan lokon. Ankaŭ la remeto daŭris du tagojn. Se kune kalkuli tiun laboron, oni havus okcent labortagojn, sed nenian rezulton.

Dum kelkaj tagoj mi ŝarĝis kun brigado pezegajn, dikajn

kaj longajn tabulojn en vagonojn ĉe la fervoja stacio. Kiel mi kaj miaj samsortanoj, malfortaj kaj malgrasaj, kapablis dum tiu tempo porti tiujn pezegajn tabulojn, mi ne povas kompreni eĉ nun. Dum tiuj tagoj ni estis gviditaj al la laboro kaj reen al la tendaro tra la urba centro. En aliaj landoj tia procesio, gvidita de NKVD-soldatoj certe interesus la pasantojn. Sed dum la tuta tempo de nia urba trairado mi ne rimarkis, ke iu atentas nin. Al la loĝantaro de Arĥangelsko tiuj procesioj estis bone konataj. Ankaŭ dum tiuj tagoj ni havis certajn gajnojn. La brigadisto, mem estinta NKVD-soldato, sukcesis ĉiutage aĉeti por ĉiu el ni po duonon da kilogramo da pano, laŭ normala prezo. Kion signifis en niaj cirkonstancoj tiu peco da pano, tion povas kompreni nur homoj, kiuj mem spertis tiajn aŭ similajn travivaĵojn.

Dum mallumaj vesperoj ni vidis sur la firmamento la nordan lumon. Tio aspektas kiel radioj el reflektoroj, senditaj el diversaj direktoj. En normalaj cirkonstancoj mi tion certe rigardus dum longa tempo, sed la vesperoj estis malvarmaj kaj mi estis malbone vestita kaj mi preferis esti en la varma barako.

Iun matenon mi havis eĉ kuriozan seksinviton. Malantaŭ la barakoj troviĝis la necesejoj, unu por viroj kaj proksime de ĝi unu por la virinoj. Enirinte fruan matenon nian porviran necesejon, mi ekvidis starantan virinon. Ekvidinte ŝin, mi dum la unua momento kredis, ke mi eraris. Turnante sin al la eliro ŝi vokis min kaj diris : "Kial vi timiĝis ? Ĉu vi neniam "pizdon" vidis ?" (Tio estas triviala esprimo en la rusa lingvo por la virina seksorgano). Ŝi ankaŭ proksimiĝis al mi kaj diris: "Nu, vidu, kio estas ĉi tie skribita." En la sama momento ŝi levis la jupon kaj montris al la teksto. Estis tatuite : "Goraĉaja Jebla". Tio estas ankaŭ trivialaj vortoj esprimantaj "Arda seksrilato". En la abomena tendara necesejo ŝi eĉ kun la alloga reklamteksto ne estis tre alloga.

Dum mia preskaŭ unujara restado en la malliberejo kaj survoje al Arĥangelsko, mi havis nenian leteran kontakton kun mia edzino, tio estis kaj malpermesita kaj malebligita. Post mia veno al Arĥangelsko mi volis sendi al ŝi leteron aŭ almenaŭ poŝtkarton. Poŝtkarto laŭ la ŝtata prezo kostis dudek kopekojn. Sed la problemo akiri

poŝtkarton estis la sama kiel kun aliaj objektoj.

En la poŝtoficejo oni povas aĉeti poŝtkartojn tre malofte, kvankam la rusa loĝantaro ne multe korespondas. Mi estante en la tendaro ne havis eĉ eblon iri al la poŝtoficejo demandi pri la kartoj. La administracio de la tendaro opiniis, ke ĝi ne havas la devon prizorgi poŝtkartojn por la tendaranoj kaj ĝin absolute ne interesas, ĉu iu skribos leterojn aŭ ne skribos. Post kelkaj tagoj mi sukcesis aĉeti poŝtkarton, pagante por ĝi tri rublojn, t.e. dekkvinoble pli ol ĝia normala prezo. Kompreneble, la senditaj poŝtaĵoj el la tendaro estis kontrolitaj eĉ formale de cenzuristo.

En tiaj cirkonstancoj mi multe skribi ne volis. Mi nur sciigis al ŝi, kie mi estas, kian verdikton mi ricevis kaj salutojn. Renkontinte homojn estintajn iam en la grandaj amasaj koncentrejoj kaj aŭdinte iliajn rakontojn pri la vivaĉo tie, mi ne povis kredi, ke mi iam revenos al la normala vivo. Mi kredis, ke baldaŭ mi pereos tie, sen iu ajn postsigno same kiel multaj aliaj samsortanoj. En tiu poŝtkarto mi ankaŭ konsilis al ŝi vendi ĉiujn miajn vestaĵojn, ĉar mi ne scias, kio povos okazi dum la kvin jaroj, kiujn mi devos esti en koncentrejoj. Mi ne volis skribi por malĝojigi ŝin kaj mi ne volis skribi ankaŭ ne por esperigi ŝin. Tia estis la sorto de multaj milionoj da homoj en Rusio, inter kiuj troviĝis tiam mi.

Post dekses tagoj mi ricevis de ŝi respondon. Ŝi estis en alia urbo, laborante kiel bibliotekistino. En tiu letero ŝi skribis, ke ŝi sendis pri mi petskribojn al Stalin kaj Berja, sed "ne ricevis respondon". Mi ja taksis stranga ŝian naivecon, verŝajne ŝi troviĝis en la stato de la rusa loĝantaro, ke oni devas trompi, kvazaŭ de tio venus bona ŝanĝo. Ŝi skribis ankaŭ pri la sensukcesaj vizitoj ĉe la mallibereja administranto. Ŝi ankaŭ esperigis min per la vortoj, ke nenio en la mondo estas eterna kaj neŝanĝebla kaj kvinjara punverdikto ne estas de tio escepto.

Tiurilate ŝia profetaĵo realiĝis nur por malgranda nombro de la malfeliĉuloj. Inter la viktimoj, kiuj pereis kaj pereas sub la komunista reĝimo troviĝis ankaŭ ŝi. Tio estas la sola letero, kiun mi ricevis de ŝi. Post du semajnoj oni sendis min al la granda koncentrejo, kie nenia poŝtsendado okazis. Kiam oni liberigis min el la koncentrejo,

la urbo de kie mi ricevis la leteron estis okupita de la germanoj. Post la milito mi eksciis, ke pro mia aresto estis rifuzita al ŝi laboro dum longa tempo - la kolektiva respondeco estas en Rusio praktikita en larĝa formo. Mia aresto estis la kaŭzo, ke ŝi veturis al alia urbo, kie oni ne sciis, ke ŝi havas edzon "kontraŭrevoluciulon".

Dum la unuaj vesperoj post mia veno al Arĥangelsko, mi konatiĝis en la barako kun du varsovianoj. Ambaŭ nomiĝis Rozenberg, kvankam ili estis neniel parencoj. En Varsovio ili ne konis unu la alian. Aŭdinte, ke mi estas ankaŭ varsoviano, ili invitis min okupi kuŝejon apud ili.

Unu Rozenberg estis hejme metallaboristo. Dum la militkomenco li estis mobilizita, partoprenis la militbatalojn. Kiam la pola armeo estis venkita, la oficiro de la taĉmento, en kiu estis Rozenberg rezignis daŭrigi la militadon. Li diris al siaj soldatoj, ke ili povas iri kien ili volas kaj fari kion ili volas. Rozenberg troviĝis sur la teritorio al kiu proksimiĝis la rusa armeo. Li akiris de ie civilajn vestaĵojn kaj taksis sin rifuĝinto. Venontan tagon venis al tiuj terenoj la rusa armeo. Estante en civilaj vestoj li evitis esti militkaptita.

Li havis la emon reiri al Varsovio, sed li restis sur la teritorioj liberigitaj de la rusa armeo, liginte la sorton kun aliaj rifuĝintoj. Li estis arestita pro la samaj kaŭzoj kiel aliaj rifuĝintoj : "kontraŭrevolucia propagando". Li estis fortega viro, ĉiam li laboris streĉe, kredante, ke li per laboro sukcesos ricevi sufiĉe da manĝaĵo. Kvankam li ricevis preskaŭ ĉiutage "staĥanovan porcion", li ĉiam estis malsata.

La dua Rozenberg estis en Varsovio frizisto. Sed verŝajne li estis nur ŝajna frizisto, unu el tiuj poŝŝtelistoj, kiuj svarmis en Varsovio. La elpoŝan ŝteladon li praktikis ankaŭ en la koncentrejo, multe da sukceso li ne povis havi - ĉiuj ja malhavas monon. Rozenberg, la ŝtelisto, tamen kapablis aranĝi por si la vivon, ke li laboris malmulte kaj neniam malsatis. Dum iom da tempo li laboris en la frizejo. Dume li ricevis de la administrantoj kuponojn por pli bona manĝaĵo, kiel pagon por la razado kaj hartondado. Tem li ŝtelis

kaj komercadis.

Kiam li laboris en la frizejo, li tie ankaŭ dormis. Li estis forigita de tiu laboro, ĉar li venigis al si por noktoj virinon kaj tio estis en la tendaro kvazaŭ malpermesita. La veraj kaŭzoj de lia forigo el la frizejo estis, ke la administracio eksciis, ke li estas judo el Polio. Ĝi preferis esti razita kaj hartondita de rusa homo (almenaŭ Rozenberg opiniis tion).

Kuŝante apude, ni multe babiladis, precipe pri la pasinta bona vivo en Varsovio. Plejofte ni parolis pri tio, kion ni iam manĝis.

En tiu barako estis ankaŭ aliaj poloj, pliparte junuloj. Inter la pli aĝaj poloj troviĝis aktoro el Grodno, nomata Utnik kaj altranga fervoja oficisto. Iuj poloj estis arestitaj pro la aparteno al diversaj organizaĵoj, eĉ al sportkluboj ne komunistaj.

La fervoja oficisto estis arestita, nur ĉar li okupis altan postenon kaj laŭ la komento de NKVD tian postenon povis okupi nur subtenanto de la faŝista pola reĝimo, iun alian akuzon kontraŭ li NKVD ne menciis. Ĉiuj tiuj poloj ricevis siajn punverdiktojn per la "Osoboje Sovieŝĉanie" po ok kaj kvin jaroj.

Ni havis en la barako ankaŭ muzikprofesoron en Leningrado. Verŝajne li estis rusa judo. Al la ŝarĝlaboroj oni ne sendis lin. Li ĉiam ricevis atestojn de la kuracistino, ke lia sanstato ne taŭgas por la ŝarĝlaboroj. Li estis altstatura viro ĉiam serioza. Li konservis siajn vestaĵojn de antaŭ la aresto, kvankam ĉiuj estis malnovaj. Sian nigran bonan mantelon li tre malofte deprenis eĉ en la barako, pro timo, ke ĝi estos de li forŝtelita. Supozeble la koncentreja administracio helpis al li laŭ siaj ebloj por ne sendi lin al la ŝarĝlaboro.

En la barako ni havis ankaŭ aliajn eksterlandajn reprezentantojn. Pli ol ĉiuj estis rimarkebla maljuna ĉino, nomata Li, ĉirkaŭ sesdekjara. La rusan lingvon li absolute ne parolis, kaj verŝajne ĝin malmulte komprenis. Preskaŭ ĉiam li estis pensanta sole, kun neniu li povis konversacii. De tempo al tempo iuj krimuloj lin alvokis por sin distri. La bando da krimuloj vokinte lin, komencis tiam lin ofendi kaj insulti. Sed Li nenion respondis, eble li nenion komprenis. Tiam tiu bando komencis al li fari diversajn fiagojn,

ekzemple : forpreni la ĉapon kaj ĝin ĵeti for, pinĉi lian nazon, tiri je orelo kaj simile. Dum tiaj okazoj la maljuna Li respondis per balbutado, kiun neniu komprenis, poste li foriris al iu angulo, sidiĝis por ne esti rimarkita kaj daŭrigis la pensadon.

Neniu sciis detalojn pri tiu malfeliĉulo. Se iu demandis lin pri io, li fariĝis tre parolema. Certe li rakontus pri si multe. Kapablis lin kompreni ĝis certa grado iu judo el la urbo Lodzo, kies nomon mi ne memoras. Tiu judo diris al mi, ke ili komprenas unu la alian kaj verŝajne tio estis vero, ĉar mi vidis ilin de tempo al tempo sidantaj kune kaj babilantaj inter si. La judo diris al mi, kvazaŭ komprenante la ĉinon, ke Li estis en Ĉinio partizano, batalanta kontraŭ Ĉang Kaj Ŝek. En Ĉinio Li estis membro de la komunista partio. Al Rusio li fuĝis, ĉar minacis al li mortigo far la Ĉang-Kaj-Ŝekanoj. Ĉe la rusa-ĉina limo Li estis kaptita, akuzita, ke li venis al Sovetunio spionadi kaj ricevis dekjaran punverdikton de la "Osoboje Sovieŝĉanie".

Alia reprezentanto de la "flava raso" estis unu japano. La japano scipovis la rusan lingvon perfekte kaj laboris en la kontoro. Al la barako li venis malofte nur por babili kun siaj kamaradoj tendaranoj, kiuj estis en la koncentrejo konstante kaj laboris en la administrejo.

Troviĝis ankaŭ du eskimoj. Ilia krimo estis, ke iam ili veturis fiŝkapti sur boato. Dum la fiŝkaptado ilin rimarkis rusa ŝipo kvazaŭ en la akvoj de la Sovetunia teritorio. Ili estis akuzitaj, ke ili intencis ne fiŝkapti, sed nur spionadi la marlimon de Sovetunio. Verdire, neniajn teknikajn aparatojn oni trovis ĉe ili, sed por NKVD tiaj aferoj ne gravas.

Ambaŭ eskimoj estis kondamnitaj po dek jaroj da punlaboro. Ili havis nenian leterkontakton kun siaj hejmoj kaj iliaj parencoj certe kredis, ke ili dronis.

Unu fojon ĉe la laboro mi rimarkis viron en militista uniformo, simila al la polaj. Mi kredis, ke li estas pola militkaptito. Kiam mi komencis kun li paroli dum la laborpaŭzo en la pola lingvo, li respondis, ke li ne estas polo, sed rumano. De la interparolo kun li kaj poste mi eksciis pri lia sorto kaj lia krimago.

Laŭ deveno li estis judo, naskita en Rumanio. Hejme li estis komunisto. Dum la militservo en Rumanio li estis en gardistara taĉmento ĉe la rusa-rumana limo. Iun fojon sur la gardposteno li trapasis la limon al Rusio kun la fusilo. Kiam la rusa limgardantaro lin esploris, li deklaris sian ideologion. Li esprimis ankaŭ sian ĝojon, ke li feliĉe sukcesis rifuĝi de la burĝa kapitalista kaj faŝista reĝimo, kiun li malamas kaj deziris de siaj kamaradoj la permeson resti en la socialista Sovetunio.

Alie traktis la aferon NKVD, liaj kamaradoj, en kiuj li kredis. Li estis juĝita kiel spiono kaj ricevis dekjaran punverdikton al laboro en koncentrejo.

Inter la multaj rakontoj de Sergejenko troviĝis jena : ĝi okazis dum unu el liaj veturigoj de malliberejo al la koncentrejo. Sur la mallibereja placo estis kolektite amaso da viroj, ankoraŭ ne ricevintaj siajn verdiktojn. Al tiu anaro venis NKVD-isto de la mallibereja kontoro. Laŭ siaj paperoj li vokis grupon kaj ordonis al ili stariĝi aparte. Poste li vokis nomojn por alia grupo, stariginte ĝin aparte. La plej granda parto de la anaro restis ne vokita. La NKVD-isto, montrante per la mano, diris : "Ĉiuj en tiu grupo estas punataj po tri jaroj, ĉiuj en tiu grupo estas punataj po kvin jaroj, ĉiuj ceteraj ne vokitaj estas punataj po dek jaroj." Jes... dek jaroj da koncentreja laboro por la homoj, kies vizaĝojn la juĝistaro eĉ ne vidis.

"Mi similan al ĝi landon ne konas, kie la homo tiel libere spiras".

---

fino de la unua volumo

Directeur de publication et imprimeur : C.Baudé
F 47340 Laroque Timbaut. CPPAP n° 58651.